**Adrienne Földi sinjorino Pásztor**

# Danco de Feinoj

**Elektitaj verkoj**

La tekstojn elektis kaj la antaŭparolon verkis sinjoro
Iŝtvan Budai poeto, honorigita per distingo „Pro Bono”

*Holnap Magazin 2012*

ISBN 978-615-5083-70-9

*Holnap Magazin 2012*

Adrienne Földi sinjorino Pásztor

# Danco de Feinoj


– Unua eldono –

Titolpaĝo kaj la internaj fotoj estas de
Adrienne Földi sinjorino Pásztor

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

*Holnap Magazin* 2012

# Antaŭparolo



Adrienne, edzino de László Pásztor, naskiĝis en 1943 en urbo Kaŝŝa, kiu nomiĝas nun Koŝice kaj troveblas en Orienta Slovakio. Post la abiturienta ekzameno en 1961, ŝi iĝis oficistino en sociala instituto Help-kaso por gemalsanuloj (1961-1996). Ĝis la pensio-ekhavo en 1996 ŝi laboris samloke kiel financofaka ĉefprelegantino. Ekde 1962 ŝi estas esperantistino, membro de Hungaria Esperanto-Asocio, ekde 2005 Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos", ekde 2006 individua membro kaj delegito, fakdelegito de UEA (FD pri turismo), en urbo Miskolc, por Hungario, ekde 2010 ŝi estas membro de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio) kaj membro de HAT (Asocio de Tokaj-Montosubaj Verkistoj-Artaj Kreantoj de Hungaroj). En 1966 dum la 52-a UK en Budapeŝto ŝi estis deĵorantino, kaj grupestro de ties ekskurso al Aggtelek. Ekde 1966 kun geesperantistoj de la slovakia urbo Koŝice, ekde 1973 kun geesperantistoj de la finnlanda urbo Tampere ŝi flegas ĝemelurbajn kontaktojn. Ŝi faris A-B-C lingvo-ekzamenojn de Esperanto ĉe HEA, poste en 1973 en ELTE supergradan lingvoekzamenon. Inter 1974 kaj 1976 kiel sekretariino, de Teritoria Esperanto Komitato en Borŝod-Abauj-Zemplén departementoj de Nordhungario, ŝi okupiĝis pri Esperanto-turismaj aferoj. Inter 1974-1976 ŝi gvidis du sukcesajn Esperanto-lingvokursojn en la BAZ-departementa Sindikata Kulturdomo en Miŝkolc.

En 1975 ŝi geedziĝis kun la same esperantisto László Pásztor. Ili havas unu filon Ferenc Pásztor, naskitan en 1981 kaj du nepojn de li. Li faras la komputil-teknikajn laborojn de la retrevuo Nordhungaria Informo, Informilo de la Miŝkolca Esperanto-Amika Rondo „Király Lajoŝ", ĉefredaktita de ŝi. Ŝi estas verkantokunulino de la edzo László Pásztor. Ŝi partoprenis du UK-jn kaj ok Esperanto-Landkongresojn (en Hungario, Pollando kaj Slovakio) kaj multe vojaĝis helpate de geesperantistoj.

Ŝi havas multnombrajn originalajn Eo-lingvajn artikolojn, rakontojn, raportojn, riportojn, recenzojn, fabelojn, du eseojn aperintajn en la retrevuo NHI krom ties hungarlingva varianto. Ŝi estis kunultradukanto kun D-ro Endre Dudich, de versaĵaj fabeloj titolitaj Kapreoleto de olda onjo, Kapreolavinjo: hungarlingve verkitaj de Anna Fazekaŝ. Krome ŝi estis kunulverkanto de fraŭlino Nelly Masemi (Kinshasa. DR. Kongo) pri la unuaj tri esperantlingvaj Kongaj-teatraĵoj, verkitaj kaj kunbinditaj en la jaro 2009a. En 2009 ŝi atingis duan premion dum literatura konkurso de la Eldonejo Lusiadoj de Brazilio, per ŝia etnovelo: „La Misio". En la jaro 2010a, ŝi verkis teatraĵon titolitan: „PRINCINO ŜEKA DIZABETI", kio estas temo-varianto de nacia dramo „Princino Andrea" verkita de fraŭlino Nelly Masemi Mbi kaj sinjorino Adri Pásztor. En 2012 ŝiaj tri hungarlingvaj fabeloj atingis unuan premion ĉe Fabelo-verkanta konkurso en urbo Szeged. Ŝia unua volumo de hungarlingve verkitaj rakontoj aperis en 2012. Same en 2012 naskiĝis ŝia unua propra dramo pri la tradicion-ŝanĝinta reĝo Ghezo de „Fon-Dahomeo" (nun Benino en Afriko) laŭ la titolo: „Ombro en Lumo", premiita per „honora mencio" de la Belartaj Konkursoj de UEA en Hanojo Vjetnamio.

Ŝi estis la aranĝinto de la 2005-2011. jaraj literaturaj-memorfestoj pri doktoro Kolomano Kaloĉai en la Nord-hungaria urbo Abaujszántó (abaujsa:nto: - naskiĝloko de la esperantsta kuracistprofesoro-poeto doktoro Kálmán Kalocsay/Kolomano Kaloĉai), kaj de la 2007, 2008. jaraj Esperanto-libroekspozicioj en urbo Miŝkolc. Krome al ŝia nomo ligiĝas la organizo de la Hungara-Pola-Esperantista Renkontiĝo en Abaujszántó-Miskolc en 2008, kiam 50 membra pola esperantista grupo faris ekskurson en la du urboj. Ŝi faris programojn por inde amuzigi la polan esperantistan grupon gviditan de la tiama prezidantino de PEA: s-ino Halina Komar, kiun eventon honoris per ĉeestoj la du honoraj prezidantoj de HEA: sinjoroj doktoroj profesoroj Endre Dudich kaj György Nanovfszky.

Ankoraŭ en 2007 ŝi petis la urb-estraron por prinomi publikareon pri la ekiriginto de la unua Esperanto-lingvokurso en Miskolc en 1913. En 2008 naskiĝis la publikarea prinomo de ŝtuparvico kondukanta al monto Avaŝ apud la Kalvinana tombejo kie por eterno sonĝas doktoro Lajoŝ Győry Nagy (Ludoviko Djori Nadj) la estinta prezidanto de esperanto-klubo kaj de Teritoria Esperanto Komitato de departamentoj Borŝod-Abauj-Zemplén, Heveŝ, kaj Nógrád. – Al lia nomo ligiĝas ne nur la anonco kaj gvido de la unua Miŝkolc-urba kurso instrui Esperanton kun doktoro Kolomano Kaloĉai, sed ankaŭ la enkonduko de instruado de la lingvo internacia en ĉiuj gradaj lernejtipoj en la departamentoj B-A-Z. La nomdoninto preparigis muzikantan horloĝon por la Avaŝmonta Kalvinana sonorilturo, poste li donacis ĝin al la urbo. Ties muziko sonas nuntempe kvarloke en la urbo. El inter la kvar sonoj, unu estas la apersigno de la Radio Miŝkolca.

Per Esperanto malfermiĝis por ŝi la mondo, ĉar ŝi trovis eblecon por akiri novajn konojn, konigi valorojn de ŝia kulturo al la ne ŝialoke vivantaj homoj, kaj trovi multajn same pensadulojn, multajn geamikojn de la internacia lingvo Esperanto.

Ĉi tiu libro meritas la manprenon. Mi proponas legi ĝin.

La lastaj vortoj de la verkista testamento de la hungara fabelverkisto **Benedek, Elek** (Aleksio Benedek) – estis:

*„… gravas, ke vi laboru.”*

**Koffi Anan** rekomendis: ***„Ne lasu iun ajn, kiu konsilas realismon, bremsi vian entuziasmon!”***

Pensojn de s-ro Stefano Budai kompletigis per citaĵoj de aliuloj kaj esperantigis la tuton:

s-ino Adrienne Pásztor
pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu
http://kiralylajos.uw.hu

# Eta Damo

Iun posttagmezon peraŭtobuse ni vojaĝis al vilaĝo Ómaŝŝa [O:maŝ:a] situanta en sino de montoj, for de urbo Miskolc. Pasis nur la unua semajno de oktobro. Ankoraŭ floris la unusomeraj floroj en la ĝardenoj, sed antaŭnokte subfalis la unua neĝo.

Enurbe koto estis sur la stratoj, ni volis rigardi la virgan neĝon, kaj enspiri la puran freŝan aeron en la naturo.

Alveninte, la ĉielo helgriza estis kaj la homoj rigardinte supren, diris, ke certe plie neĝos kaj eble denove nokte. La neĝon la entrepreno jam ŝovis flanken de la landvojo, tiel ĝi estis libera por la trafiko. Ankaŭ de sur la antaŭ trotuaroj de la domoj estis jam forigita la neĝo.

Sed, tuj ĉe la trotuaro antaŭ la aŭtobushaltejo, amasiĝis la neĝo rompita al neĝkaĉo. Se la homoj volis trairi al la aŭtobushaltejo, devis enpaŝi ĝin, eviti preteriri ne eblis. Nu, la homoj grumblis tial. Sed fore, sur la arbarrandon kaj ankaŭ enen rigardante la arbaron, vidante la netuŝitan virgan neĝon, ili paciĝis. Paca estis ĉio. La arboj ankoraŭ verdiĝis pro la antaŭa tuta dusemajna pluvado, kio sekvis post la longdaŭra sekeco. Ankaŭ la fontoj, putoj pleniĝis. La rivereto havis abundan akvon. Ĝi digne ondruliĝis en sia kavo kaj tute kovris la herbaĉon elkreskintan dumsomere, inter la bazon kovritaj ŝtonpecoj kunportitaj de la monta rivereto. Sur la arbobranĉoj la verdan foliaron nun ŝarĝis iom da neĝo. Nur iom, ĉar ĝia grandkvanto deglitiĝis jam pro la tagmeza sunradiado. Aliloke la subkreskaĵaro komencis flaviĝi, ruĝiĝi. Kelkaj birdetoj plumojn aranĝis sidante sur la deflu-trogo de iu domo. En iu korto sub la pino submaĉitaj konusoj kuŝis montrante la spuron de vizito de sciuro.

Malvarme estis. La homoj malvarmsente kuntiris sur mem la jaketojn. En la haltejo amasiĝis jam aro da atendantaj homoj. Estis, kiuj mallaŭte paroladis inter si. Estis homoj, kiuj nur staris atenteme rigardante la proksiman naturon. Estis ankaŭ tiuj, kiuj nur staris rigardante antaŭ sin mem kaj certe profundiĝis en pensoj. Staris tie soluloj, geedzoj, familioj, krome unu junpatrino kun ĉ. tri jara filineto, kiu prenis manon de pupo.

La veturilo malfruis. La filineto enuiĝis. Eltiris la manon el mano de la panjo kaj iris al iu maljunulo kaj salutis lin: „Saluton Avo! Ĉu vi atendas la buson?” – diris tre mallaŭte. La alparolitulo ne respondis. Li aŭ ne aŭskultis ŝin pro la pensado, aŭ simple: ne havis emon paroladi

kun la infano. Ŝi paŝis antaŭ la maljunulon kaj komencis fikse rigardadi lin. La maljunulo nek tiam atentis ŝin. Poste ŝi ektiris la jakon de la jam ne juna homo, kaj denove alparolis lin: „ĉu vi ne malvarmas?" La viro respondis nek nun, sed sin turnis aliflanken senvorte.

Post ĉi tio la knabineto antaŭis lin kaj neatendite subfaligante la pupon ploreme komencis postuli de li la suprenlevon de la pupo. Sed, la viro restis senvorta kaj senmova. Laŭvideble la knabineto ne efikis lin.

Sed, la postulado daŭriĝis. Fine, la viro atentante, ke la buso alproksimiĝas jam, suprenlevis la pupon kaj per ioma malsuprenkliniĝo transdonis ĝin, dirante: „Bonvolu, prenu vi eta damo! Jen via pupo!" La buso fine alvenis kaj plenigis ĝin la homoj. Ĉiu sursidiĝis. Unu malantaŭ la alia havis lokon kaj la maljunulo, kaj la junpatrino kun la filineto. La veturilo komencis sian iron reen. La ŝoforo prenis la stirilon certamane. La vojaĝantoj kontententis por la veturila varmo. Agrabla estis ene. La junpatrino unue iom babiladis al la filineto, poste komencis rigardi la eksteran pejzaĝon. Tiam, la filineto deglatiĝis de sinon de la patrino kaj iris al la avo, kaj petis lin, prenu ŝin sur sian sinon. Ricevinta lian jeson, ŝi oksidiĝis tie komforte. Poste, pensis alion. Malantaŭen turniĝis kaj kisetis la multsulkan vizaĝan maljunulon, dirante: „Mi dankas vian karecon, avo! Mi neniam forgesos ĝin!" La vira vizaĝo pleniĝis pri lumo de kormoliĝo kaj flankenkliniĝante al ni diris: „Mi ne estas avo de tiu ĉi eta damo. Mi neniam havis familion. Ho, kvankam mi havus ŝin kiel nepinon!"

Post kelkaj haltejoj, la „nepino kaj la avo" adiaŭi devis, ĉar la patrino vokis ŝin forlasi la veturilon. Ili eliĝis. La knabineto kisetojn ĵetadis permane al la viro, kaj kriis: „Mi neniam forgesos vin, avo!"

# Sako De Vintra Avo

Kiam mi havis jam fileton, ni kune ĉeestis la programon de festo pri la Vintra Avo aranĝitan de la sindikata organismo de mia laborejo en la Kulturdomo Rónai, Sándor [ŝa:dor ro:nai] sur la Placo Mindszenti [mindsenti]. La placo Mindszenti ŝerce estis nomita: Placo de Ĉiuj Sanktuloj, ĉar sur la sama placo ĉeestis domoj de la Socialisma Partio, kaj de la Sindikato krom la preĝejo.

Kiam sonorilegoj de la preĝejo (estante ĝi en tuja proksimeco de la Sindikata sidejo) batis la 18-an horon, ĝenerale tiam komenciĝis la Vintra Avo-programo. Sed foje okazis, ke pro io la mendita rolanto pri Vintro-avo ne povis veni. Al la festo la invitilojn ricevis ĉiuj, ne eblis prokrasti la eventon. Edzo de iu mia kolegino entreprenis la anstataŭigon de la Avo. Oni vestigis lin en vestaĵon de la atendita Vintra Avo kaj klarigis al li la farendaĵojn. Sed li tre timis pro lia laŭebla erara ago. Por kuraĝigi lin, la kolegoj donis al li unu glason de forta vino. De tio li ekhavis varmon, ruĝiĝis lia vizaĝo kun nazo kaj kun la blanka barbo en la ruĝa jako ruĝvizaĝe li aspektis kiel vera Vintra Avo alveninta el la fora frosta Nordo. Neniu estis povinta diri, ke ne li estas la vera atendita persono.

Nu, li salutis la infanojn, kiuj jam pli frue kantadis kantojn pri la Vintra Avo kaj la de li atenditaj donacoj. Poste komenciĝis la disdonado de la saketoj plenaj de dolĉaĵoj. La festeto okazis plensukcese. Finante la programon, la Vintra Avo adiaŭis kaj klopodis baldaŭ foriri, ĉar li havis jam varmegon pro la ekscito kaj la varmega jako.

Sed tiam neatendite mia fileto ekkuris post li kaj ekkriis por haltigi lin:

– Haltu Vintra Avo! Haltu! Vian sakon vi lasis ĉi tie! En kio vi portos la donacojn sekvontjare?

Vintra avo surprizite haltis, turnis sin al mia filo tri jara, tuŝis ties vizaĝeton kaj tre kare alparolis tiun:

Fileto, kia bona estas, ke vi tiom zorgeme atentis mian sakon. Nun vi vidas, ke la maljunulo estas jam forgesema! Dankojn karuleto!

Poste li prenis la malplenan sakon en lian manon, denove salutis la publikon kaj foriris. Ni longtempe menciadis, ke la neatenditan situacion „Vintra avo” kiom brile solvis.

# La Vaganta Kaprino

En radioprogramo mi aŭdis mallongan historion pri la kaprino.

Sur rando de urbo Pécs en suda Hungario, arbaro proksime vivis metiisto, kiu estis ĝoja posedanto de virkapro kaj kaprino.

Elinjo, la kaprino vivis iomete ruze. Kiam ĝia posedanto foriris labori, ankaŭ ĝi foriris el la ĝardeno kie ŝi vivis kune kun sia parulo, kun la nigra kapro. Kaprino Elinjo sciis el propra sperto, ke pli bongustaj estas la subĉiele manĝitaj herboj, folioj de arbustoj, ol en la mallibereco antaŭ ilin metita herbaĵo. Sed en la arbaro la deziratan delikataĵon ĝi devas membrojn streĉigante atingi de piedpintoj. Tiu maniero interesa kaj tute alia ĝuo estas. Je vespero la vagantino reiris ĉiam al sia parulo. Veras, ke la posedanto miris pro la malfermita pordo, sed ĉar mankis nenio, do li pensis, ke ĉio estas en ordo.

Okazis foje, kiam la kaprino hejmeniri volis, ne povis reiri en la ĝardenon. Vane ĝi puŝadis per nazo kaj kornoj la pordan seruron, la ĝardena pordo ne volis malfermiĝi ĉar la klinko-lango en la ĝardena pordo tiel resaltis en la seruron dum la matena frapiĝo, kvazaŭ ĝi estus fermita per ŝlosilo. Vane blekis kaprino Elinjo al ĝia parulo por helpo, sed la nigra kapro ne kapablis helpi.

Do, kion fari? Ekstere restis Elinjo kaj aliris denove al la arbaro. Malvarmeta venteto blovadis, hirtigis hararon de la kaprino, kiu sentis sin tre agrable. En la densejo Elinjo kaprino trovis kampetan herbejon ĉirkaŭitan ronde per malaltaj arboj kaj arbustoj. Manĝis iom da herbo, poste kuŝiĝis la kaprino kaj ensonĝon falis. Vekiĝante ekiris al profundo de la arbaro. La nokto malleviĝis baldaŭ. La ĉielo montris sin per multmilionoj da steloj, matene sentis ĝi malvarmeton, vidiĝis ĉiu beleco de la leviĝanta suno, kaj la besto povis eksperti multajn mirindaĵojn de la vekiĝanta naturo, ĝis tiam ne viditajn. Freŝa ŝoso, ĝermoj, plantidoj, arbfolioj atendis la kaprinon. Ĉio ĉi nova vivo ebriigis, plenigis ĝin per kontenteco, ĝuo de vivo, kaj la kaprino jam ne pensis plu pri la hejmeniro. La kaprinhavanto ĉie serĉis Elinjon, sed sensukcese. Ankaŭ la ĉasistoj serĉis la kaprinon, sed vane. Ankaŭ ili ne trovis ĝin.

Ĝi vekiĝis kaj endormiĝadis kune kun la naturo. Sed, neatendite la kaprino eksentis dolorojn en la ventro kaj poste naskis tri kapretojn. Pro la novaj estaĵoj ĉirkaŭantaj la novan patrinon, Elizabeto estiĝis multe pli ĝoja ja nun jam ne plu estis sola. La nutrado de la idoj same ĝojdonis

krom la bona evoluo de la eta virkapro-filo, kiu je aŭtuno evoluis al sana forta masklo.

Kvankam la aŭtuno sternis antaŭ ilin abundon el ĉiu havaĵo de korbo de la naturo, sed ĝi elĉerpiĝis al fino de la sezono, kaj ĉefe je ensaluto de la vintro. Elĉerpiĝis la maizo-spadikoj lasataj vole-nevole sur agrikulturaj terenoj de la proksimaj kampodomoj kaj de la vilaĝoj foraj, la brasikoj, terpomoj, bruselbrasikoj, betoj, ruĝaj betoj, kaj karotoj. Sed kiam glaciiĝis la akvoniveloj de la fontoj, rojoj, riveretoj, ili devis travagadi grandajn teritoriojn por trovi kia ajn manĝaĵojn samkaze tutplenigi la buŝon, ĉar tiam jam estis netrovitaj eĉ freŝaj verdaj folioj. Ili devis trovi tiujn manĝaĵojn, kiuj povas anstataŭi per siaj sukoj la mankantan akvon kaj plenigi ilian stomakon murmuranta pro malsato. Tiam jam malvarmaj blovoj blovis eĉ inter arboj de la arbaro. Ne povis jam defendi ilin la foliaro, ĉar ĝi defalinte teron kovrante kuŝis. La frosta neĝa ŝtormo libere kuregis tra montoj, valoj. Ili staris strikte unu apud la alia por varmigi sin kaj akceptis kiel Dibenon, kiam dum iu frosta mateno enarbare trovita estis nutrejo por bestoj plenigita per diversaj bongustaĵoj. Senliman ĝojon eksentis la societo rimarkinte ĝin. Ili povis manĝi libere ĉiu-specan delikataĵon. Estis tie ĉio, kion bestokuloj bestobuŝoj povis deziri: terpomoj, karotoj, rapoj, pomoj kaj similaĵoj. La printempo salutis ilin per sia tuta pompo, ĉia sia ĉarmo. Elizabeto ĝojis kune kun siaj idoj pligrandiĝint-nombraj.

Post kvar jaroj iu forstisto portante manĝaĵojn por la arbaraj bestoj al la manĝejo, mire vidis, ke ia blanka kaprino dekuras el la arbaro al la kampo. Al siaj kolegoj li tuj menciis pri la blanka bruto kun sonorileta sonorilo. Tiuj rememoris pri la perdiĝinta besto kaj sciigis la posedanton, jam perdintan esperon por trovi ĝin, ke iu vidis lian kaprinon.

Kiam ili kune trovis la serĉitan kaprinon, ekhavis miron.

Ili trovis ne nur unu kaprinon, sed tutan gregon da gekaproj.

# La Similulino

Dum somero de la 1972-a jaro mi ricevis permeson de mia laborejo por unu semajna ripozo sur danuba ripozŝipo en urbo Esztergom. Pli frue mi ekkonis jam la urbajn vidindaĵojn, artobjektojn, tial nun mi atentis plie nur la homojn kaj la pejzaĝon ĉirkaŭanta min.

Bedaŭrinde dum unu – du tagoj post la komenco mi spertis, ke la kultura respondeculo de la ripozejo ofte ĝoje faras malagrablaĵojn por mi.

Mi demandis la purigiston kial kondutas sin tiel la kultura respondeculo. La purigisto pridiris la veran kaŭzon. La kulturrespondeculo edukiĝis en urbo Fót. Lia onklino kiu estis lia sola vivanta parenco, malamis lin. Li same sentis al la onklino. Mi estas tute la similulino de la onklino – diris la demandito.

Mi ne povis kion diri je tio.

La purigisto ankaŭ tion konfesis al mi, kiel volas min fari ridinda la kulturgvidanto. Mi dankis la sinceran tradonon de tiu sekreto. Poste, mi longe pensadis kion fari. Fine nasakiĝis mia, por mi tre plaĉema agmaniero.

Mi faris el papero ranon. Ĝin mi enpoŝigis kaj iris en la klubkunvenejon ludi komune kune kun la aliuloj..

La kulturrespondeculo vere deklaris sian decidon. Mi devas baleti. Iomete, mi lasis min peti. La junulo jam kolere postulis la baletdancon de mi. Fine, jesis mi. Malrapide mi rakontis pri fabelo Mutamúr [mutamu:r] de nia verkisto Ferenc Herczeg. Araba princo estis Mutamúr, kiu estiĝis cikonio pro soĉo de sorĉisto. Mi diris, ke mi nun pluteksas la historion. Mi atentigis la ĉeestantaron, ke pripensu: kion senteblis tiu malfeliĉa hombesto, kiam li devigita estis malsuprenflugi al la akvodensa kampo, inter la verajn cikoniojn. Kaj kiam li feliĉe teronatingis, el la vera cikonigrupo eliĝis cikonivirino kaj sinprezente oferte ĉirkaŭ iris la ĵus alvenintan novan cikoniviron.

Nu, per mia kapo kapbalancade dekstren – maldekstren, mi memfide sintene paŝadis. Dume miajn brakojn mi levigadis, kaj la fingrojn movadis. Poste kelkfoje mi turniĝis ĉirkaŭ la „cikonio – kalifo”. Fine, mi provis en lian buŝon ŝtopi la paperranon. La rezulto: bonhumora ridego estis.

Fine, ankaŭ mem la kultura respondeculo ridegis kune kun la aliaj ĉeestantoj.

# Kata Ĝojo, Kata Malgajeco

Kelkuloj opinias, ke la kato ne estas racie pensanta estaĵo, ĝi malplivaloras ol la hundo; kio estas amiko de la homo. Mi ne kutimas diskuti kun tiuj homoj, ĉar mi akceptas ĝusta la onidiron: „ Iu homo ŝatas la pastron, alia la pastroedzinon”, aŭ alieldirante: „Iu homo ŝatas la hundon, alia la katon.” La vivo multkoloras, ankoraŭ ĉe la klonoj ne certas, ke ili tute samos ĉiurilate kun la subjektoj de la eksperimentoj. Ni devas akcepti, ke multon da interesaĵoj kaj valoroj kaŝas la alieco. Por pruvi ĉi pravon, mi kolektis kelkajn ankaŭ min koncernajn eventojn, kies ĉefrolantoj tamen estis la katoj.

En nia fruktoĝardeno ni bredis kuniklojn por provizi la viandon por nia familio. La bestoj estis karaj. Mi ŝatis ilin kaj vivante kaj ankaŭ prilaborite al manĝaĵoj, kvankam ni bedaŭris buĉi ilin. Ni pensadis tiel, ke dum ilia vivo ili estu ĝojaj, ilia morto estu neatendita kaj sendolora. En la ĝardena ilarbudo ni elformis la lokon por iliaj kaĝoj, kaj samloke ni deponis ankaŭ la fojnostokon.

Foje kiam surbicikle portante la sakon plenigitan per herbo por fojno, kun mia filo mi venis reen el direkto de Argilmino, ni rimarkis, ke sur la aŭtovojmeze estanta eta nigra makulo ne estas alia, ol ĉ. dumonata eta nigra-blanka makula kato. Ĉiaj duonvizaĝeto, la kolosuba parto de la busto kaj la kvar manaĉetoj estis blankaj. Tie ni ne volis lasi, ĉar ja ni trovis ĝin. Ni ne volis, ke iu senbride kureganta aŭtomobilo surkuru kaj murdu ĝin. Ni metis la etulon en la herbplenan sakon kaj hejmenportis en nian ĝardenon. La katido ŝajnis esti kaj stria, kaj makula. Tiu nekutimis. Poste ni rimarkis, ke la tre maldika besteto tial ŝajnis esti stria, ĉar siaj ripoj tre tuberis. Tiutempe la someron mi pasigis kun mia familio en nia ĝardena dometo farita el lignofibraj plakoj, ni kunligis la agrablan somerumadon al la utilaj laboroj pri ĝardenistado kaj bestbredaj prizorgoj. De tie ni vojaĝis en urbon Miŝkolc por aĉeti nutraĵojn por kuiri, sed ankaŭ por ekskursi al la ĉirkaŭantaj arbaraj lokoj kaj al lago de vilaĝo Harsány [harŝa:nj]. Matene ni ĝuis la orumajn radiojn de la leviĝanta suno. Vespere ni miris la sunsubiron kaj silenton. La fajfoj de la kantantaj birdoj, la freŝaj legomoj kaj fruktoj estis niaj ĉiutagaj ĝojfontoj. En mia familio elformiĝis la labordivido pri la bestprizorgado, tiel nia somero pasis senĝene, feliĉe. Dume nia etkatido plidikiĝis. Unutage, kun ĝi samaĝa katido vizitis nin, kiu poste ankaŭ restis ĉe ni ĝis la sekva printempo.

Tiam ĝia posedanto hejmenportis sian katidon, sed tiu poste daŭre pasigis ĉe ni la grandparton de siaj tagoj. Ja, la griza stria-blankmakula katido ligis tutvivan amikecon kun nia kato: Cicóka kaj kun ni. Kun nia katido Cicóka [cico:ka] la alia kune manĝis, ludis kaj unu la alian trabrakumante dormis en la ilarbudeja katid-dometo, farita de mia filo el lignoskatolo. Okazis foje, ke la fojnon mi ĵetis supren al la fojnodeponejo ne per la fojnoforko, sed permane. Mia geedza fingringo deglitiĝis de mia fingro kaj malaperis. Sed ties mankon mi rimarkis nur post tagoj. Sed tiam, mi ne sciis jam kiam kaj kie mi povis perdi ĝin. Preskaŭ unu monato pasis, kiam alvenis la unuaj frostaj tagoj. La katidoj jam ne dormis en la katid-domo, sed ili enigis sin en la porbestan kuŝfojnon por tranokti. En la sekigita diktrunka-herbospecio ili havis pli da varmo. Iumatene antaŭ ol fermi pordon de la ilarbudejo, mi kaŝrigardadis en la ejon por rigardi kion faras tie la bestoj. Mi vidis, la du katetojn enprofundiĝante ludi kun mia geedza fingringo. Per siaj antaŭaj kruroj ili ŝovadis mian fingroringon inter si sur la intertegmento de la kelo, kaj dume atentis, ke evitu ili la tien falintan fojnostokon. Kiam la ringo rulis iom, ili ekscitite ekmiaŭis, poste iu de la du sursaltis la ringon por malhelpi ĝian ruladon sub iun kaĝon. Ankaŭ al la kunikloj povis esti ĝuinda la vidaĵo de la ludo. La kunikloj nun ne skuis la kaĝon signante sian malsaton. Ili atendis pacience min.

Komence de decembro dum iu neĝa mateno surprizis min, ke nia nigra-blanka kateto jam atendis min ĉe la ĝardena pordego. Ĝi samloke levadis piedojn kaj ekscitite daŭre miaŭante provis klarigi al mi ion. Tiam ni atendis naskon de unu nia kuniklo. Do, mi pensis, ke la katido volas anonci al mi, ke la atenditaj estaĵoj alvenis. Malferminte la pordon mi vidis, ke antaŭ la katido-domo sidas Marci la alia katido, kaj persiste atentas ion. Mi enrigardis la katid-domon kaj rimarkis, ke alia fremda malbela kato rigardas sur min, kaj ne forkuras kiel kutimas la fremdaj katoj. Pensante unue, ke la vizitanto batis miajn katidojn, mi volis forperli ĝin. La fremdulo ne moviĝis por fuĝi, sed la aliaj du saltis apud la fremdan beston, ŝajne por savi ĝin. Ankaŭ aliam manĝis malsata besto dumvintre ĉe ni. Do ni pensis: bone, restu do. Ĝi certe foriros printempe. Sed, ĝi restis por eterno. Pase de nova monato, kiam ĝiaj palpebroj, brovoj kaj lipharoj komencis denove elkreski, ni spertis: tial estis la fremda kato tia strangaspekta, ĉar ĝi mankhavis. Iu stulta infano aŭ plenkreskulo certe fortranĉis tiujn de la kato. Nu, Cirmoŝ (stria) jam multaĝa estis, ne naskis posteŭlojn, sed feliĉe ŝi bone rilatis al la du virkatetoj. Cirmoŝ senlace ludis kun ili, kaj instruis multajn gravajn

sciindaĵojn. Ekzemple ankaŭ la salton al altaj trunkaj arboj kaj kapton de musoj. Videble la triopo amis unu la alian.

Dum iu fruprintempa tago kiam bele bluis la ĉielo kaj varme sunradiis, Cirmoš ordonis nian virkateton por atendi šin ĉe nia barilo. Nia kateto ne rajtis sekvi la maljunan inon en la najbaran ĝardenon. Kiel el partera loĝio li devus esti finatendanta la novan spektaklon de kapto de muso. Ja, la manovrojn, ruzaĵojn ankoraŭ devis ekzerci. Cirmoŝ ne rimarkis la najbarĝardene kaŭraĉantajn tri vagabondhundojn. La malsataj hundoj kuratakis kaj antaŭ ni disŝiris kaj formanĝis nian kompatindan maljunan katon, sed tiel, ke eĉ unu juglandogranda haŭtpeceto ne restis el ĝi. Ĉion ĉi vidante nia nigra-blanka virkateto ektremis – kaj se mi ne estus vidinta, mi neniam povus esti pensanta lian agon ebla – el iu de la katet-okuloj falis unu larmo pro la granda anima ŝoko. Postevente dusemajnojn ĉiutage nia kateto iris tien kaj malgajadis, kie la tragedio okazis.

Ofte ni iras por ekskursi en Miŝkolc-Tapolca. Agrabla estas sidadi lagborde, promenadi en la bela vilaokvartalo aŭ manĝi bakitan fiŝon ĉe iu proksima bufeo. Je nia iama simila promenado ni vidis iun domposedanton, kiu ĝuste tiam debatis per stango la hirundoneston sub la defluilo de sia domo. Tial li agis tiel, ĉar laŭ lia rakonto kiel nutraĵon al la birdidoj, la hirundogepatroj portas cimojn. Li ne volas, ke la tienportitaj cimoj enkrablu sian domon. La nesto falis surteron kun du idoj. Unu tuj mortis, la alia ŝajnis vivi ankoraŭ tiam, kiam ni ekzamenis ĝin. La birdgepatroj malesperiĝante atentis, kio okazas pri la nesto. La neston, kune kun la ŝajne vivanta ido, ni metis sub iun arbedon apud la trotuaro. La eventon vidis ankaŭ juna kato, kiu certe apartenis al tiu domo, de kie la hirundo-nesto forigita estis. Volante ni jam foriri, rimarkis, ke ankaŭ la stria kato prepariĝas je io. Ni antaŭeniris sur la vojo, sed post kelkpaŝoj ni haltis por atenti ĉu okazos io, kaj se jes, kio. Okazis tia ago, kian, ni ne atendis. La stria junkato unue flaradis la neston. Poste enbuŝigis la idon kaj kun tio ekiris antaŭen laŭ la vojo apud vico de platanoj. Preterirante la ludplacon la kato multfoje haltante progresis al la lagbordo akompanante pere de la birdogepatroj. Birdnutrejo estas muntita inter la trunko de la maljuna kava saliko kaj ĝia branĉo estanta tri metrojn alte de la tero. Post longa penado atingis la birdnutrejon la kato enbuŝigita per sia portaĵo, kaj la birdidon elbuŝigis tien. Plenumante sian celon, la kato malrapide retroirante de la saliko surtereniĝis kaj foriris. Ni hejmeniris poste. Longe ni menciadis la eventon. Ĝis tiam ni spertis neniam, ke kato savu

estaĵon ne apartenantan al sia specio, kaj ĉefe birdo estu tiu. Konata fakto estas, ke la kato ĉasas ilin. Ja, la birdviando pli delikatas ol la musa.

Ĉu vi povus pensi, ke tiome kara, sentemanima, kaj saĝa estas la kato?

Pase de kelktagoj ni vidis, ke ĉirkaŭ la idon la zorgemaj birdgepatroj jam konstruis neston kaj lerte portadis al sia unusola ido la insekto-nutraĵon preditan super la lago.

Vi povus diri, ke ĉi rakontitaj eventoj estis nur unuopaj kazoj. Jes, vere estis tiaj. Sed ankaŭ tio veras, ke iu ajn vivulo povas havi tiujn proprecojn: bonecon, saĝecon, pro kiuj ni homoj: kronoj de la dia kreado, povas gapmiri. Mi ĝuste tial ne aĉtaksas eĉ unu specion de la vivularo.

# Danco de Feinoj

La plenaĝuloj diras: kiujn la infano spertas en sia infanaĝo, tiuj travivaĵoj restas en la cerbo poreterne. Tiel okazis ankaŭ ĉe mi. Nun mi rakontos al vi pri unu.

Dum mia kvina jaraĝo la kokluŝo, poste la frua forpaso de mia amata patro, rezultigis por mi infanaĝan astmon. La infankuracistoj vane provis helpi, ĉar neniu kontraŭastma medikamento efikis. Fine en 1954, la kuracistoj – de la tiam ekkonstruiĝanta socialisma infankuracado – decidis sendi min en infansanatorion por kuraci min ankaŭ per bona, pura aero. Al la nordhungaria urbo Sátoraljaujhely [ŝa:toraljau:jhej] mi vojaĝis kune kun mia patrino per ordinara trajno, de tie per mallarĝtraka trajno ĝis la setlejo Füzérradvány [fueze:r-radva:nj]. De la dezirita haltejo, grandparte inter du vicoj de piceoarboj ni marŝis ses kilometrojn por atingi la malaltajn domojn de la sanatorio. Tiuj dometoj servis tiutempe kiel observejo, kie la infanoj restis dum unu monato. De tie la kuracistoj nur tiam sendis la infanojn plu en la kastelon, se ili havis neniun infektan malsanon. Antaŭ la dua mondmilito, la malaltaj domoj estis loĝejoj por la servistaro de la kastelposedantoj. Sed kromaj servistoj loĝis ankaŭ en la vilaĝeto Füzérradvány, proksime al la kastelo.

En departemento Zemplén [zemple:n] oni trovas la setlejon Füzérradvány, proksime al la fortikaĵo de Füzér.

La plej gravan vidindaĵon de Füzérradvány: la vilaĝrande starantan kastelon, konstruigis la terbienula familio Réthey [re:thei], en la 16a jarcento, por sia kroma loĝloko kiel kompletigaĵon de la fortikaĵo de Füzér. Poste tiu bieno iĝis kaj ankaŭ restis posedaĵo de la grafa familio Károlyi, dum kvar jarcentoj. La kastelo konstruiĝis en la 1850-aj jaroj, en romantika stilo, laŭ planoj de la hungara konstruartisto *Miklós Ybl* [Nikolao Ibl: 1814-1891]. Li estis unu plej granda reprezentanto de la novrenesanca konstruarto de la 19-jarcenta Eŭropo. Liaj plej gravaj verkoj estas la Operdomo de la hungara ĉefurbo, la Károlyi kaj Festetics [ka:roji kaj feŝtetiĉ] palacoj, la Kristina-urba flanko de la Reĝa palaco de Budapeŝto…/. La plej grandajn internajn trakonstruojn de la kastelo de Füzérradvány, poste planis *Albert Pio* viena konstruisto, laŭ la mendo de László Károlyi [Ladislao Ka:roji]. Inter 1898 kaj 1907 estis konstruitaj la internaj stuko-ornamaĵoj, la marmorkovraĵoj de la muroj. Same tiam oni enkonstruis la marmorbanejojn, la renesancajn kaj

frubarokajn kamenojn skulptitajn per floroj kaj nudaj – ofte flugilaj dikaj infanoj. La infansanatorio funkciis per lerneja instruado por kuraci, kaj samtempe ankaŭ eduki la spirorgan-malsanajn infanojn. Ekde 1952 ĉi tiu vilaĝranda kastelo, ĉirkaŭata per 3000 arpenta parko kaj arbaro, kreiĝis tera infanparadizo.

Post la alveno de la infanoj, la hungaran lingvon kaj literaturon instruanta pedagogo konigis kun la infanoj la sciindaĵojn pri la loko, por riĉigi iliajn konojn pri la patrolando, krom la hejma ordo en nia kastel-hejmo dum nia tiea restado. Ni bonvole ĉizis liajn informojn en nian cerbon kaj gardis ilin. Li estis vera, entuziasma patrioto…Tiu kastelo per la floroj florantaj ĉirkaŭ ĝi ĉiusezone en siaj parkoj, la interarbaraj kampoj, arbaroj, montoj-valoj iĝis mia dua „Feinlando.” Ni la tie loĝantaj infanoj vere kredis, ke la ŝanco por vivi tie, estas iu admirinda donaco de la vivo por ni. De la parko ĉirkaŭanta la kastelon, paŝante sur la perloŝtonera vojo ni povis surgrimpi la larĝan ŝtuparon, poste malfermi la brilan kuproklinkan grandan pordon, kaj poste paŝi en la kastelon. Tie ni atingis post la marmorplanka antaŭĉambro, la konversaciejon, poste la manĝoĉambregon, la kuirejon, kaj la kamerojn. El la antaŭĉambro, koridoro malfermiĝis al la vojoj kondukantaj al la lernoklasoj kaj la etaĝaj ejoj. Sur la etaĝo estis la ĉambregoj de la knaboj kaj aparte tiuj de la knabinoj kune kun la flankaj ejoj (banĉambroj, necesejoj ks.). En la knaba flanko estis ankaŭ la loĝejoj de la geinstruistoj, gedoktoroj, la geflegistoj kaj la direktorejo.

La branĉoj de la dikaj grandaj platanarboj – kiuj estas indiĝenaj arbospecioj en nia regiono Nordhungario – etendiĝis ĝis la etaĝaj fenestroj. Vintre, kiam la arboj nude ripozis, ni povis enrigardi ankaŭ en la proksiman malantaŭparkan arbaron. Sur la neĝa arbara grundo ni ofte vidis vulpopelatan leporon kaj konsiladon tenantajn korvojn.

Ĉiu ĉambra infanaro havis estron, la knabinoj estrinon el inter ili mem, kiu devis zorgi pri la ordo. Sed ilia tasko estis ne nur postuli la ordon, sed ankaŭ rakonti fabelojn vespere antau ekdormo kaj inspiri la komunan kantadon. Se la estro ne volis fabeli ĉiuvespere, havis la rajton por rakontigi ankaŭ aliulojn. Tie mi ellernis fari belajn kroĉitajn rubandojn el silkaj fadenoj. Tiujn mi donacis al tiuj knabinoj, kiuj diris belajn fabelojn anstataŭ mi. Estante mi la estrino de nia dormejo, la loĝantaro denove komencis postuli de mi novajn fabelojn. Kion fari se mi jam rakontis ĉiujn de mi konatajn? Mi komencis fabeli pri la arbaraj bestetoj, poste pri la feinoj kiuj dancas en belaj longaj roboj subĉiele majnokte, kaj la Luno per sia lumo arĝentigas iliajn hararojn. Miaj

samĉambraninoj piece aŭskultis la fabelon, kaj dum la sekva nokto ili sonĝis ke ili estas feinoj. Post kelkaj tagoj ekiris la susuro inter ili. Kia povas esti, kian senton povas havi la feinoj, dancante florkronite sur la densa herbejo? Ho, nur unufoje en sia vivo ili ege ŝatus havi tiun pacan, ĝojan senton. Kiam ili decidis pri ties provo, vokis min kun ili. Unue mi neis, dirante ke niaj superuloj certe ne permesos nian planitan dancadon. Sed la sopiro estis tiel forta, ke ili diris, se mi ne iros, ili iros malgraŭ mia neo, ĉar ili ne volas ellasi tiun el sia vivo. Fine mi jesis, sed petis ilin, ke ili tutvestigu sin sub la noktan ĉemizon, ke ne malvarmumu. Unu el la knabinoj parolis pri la plano al iuj knaboj, kaj tiuj decidis danci kune kun ni. Sed tiam iu knabino atentigis nin, ke knaboj ne povas esti feinoj. Al tiu iu knabo respondis, ke en la „Sonĝo de somermeza nokto" de la fama angla verkisto Shakespeare, la nomo de reĝo de la feinoj estas Oberon. La reĝo reĝas certe ne nur feinojn, sed en Feinlando certe vivas ankaŭ knaboj. Do, se ankaŭ tiuj estis loĝantoj de Feinlando, ankaŭ ili rajtas danci nun kune kun ni la feinoj. Tiel okazis, ke dum bela stelluma maja nokto tri knabinoj kun tri knaboj eliris eksteren el la kastelo.

Tiam jam forfloris la majfloro kaj same la kastelapuda tulipanarbo. La basenon de la iama fiŝa-lago plenigintaj multnombraj flavaj primoloj kaj violoj same forfloris jam . La aeron plenigis odoroj de la robinio, la blankajn ombrelojn farantaj floroj de sambuko, kaj la lilavestaĵaj siringoj. Kiam ni ekaŭdis kriadon de la turdoj:"Kio okazos nokte? Knabo, Knabo!" Ni ĉiuj ses infanoj kunridis sekrete flustrante inter ni: „Belega feindanco okazos!" Kaj malfruvespere, kiam dormis jam – krom ni – ĉiuj infanoj, ni la ses infanoj 9-13 jaraj rapide kaŝe tutvestiĝis kaj eliris el la kastelo. Ni rapidis sur la antaŭ ĝi estantan densan verdan herbejon. Unue ni staris sub la brila stela ĉielo, ĝue rigardante ties belecon. Poste ni prenis la manojn unu de la alia kaj mallaŭte ekkantis. Unue ni kantis infankantojn, poste ankaŭ popolkantojn pri la printempa naturo. Poste ni ankaŭ ekdancis. Unue ĉiuj kune, poste po knabo, po knabino. Fine denove kune. Dum nia dancado subfalis de niaj kapoj la pli frue preparitaj leontodo-florkronetoj. Sed, en la sentita kortuŝa vivĝojo ni ne rimarkis tiun. Plenigis nin la sento de nia feineco, nia senĝena plezuro de la lun – kaj stelluma varm-venta trankvila florodora nokto. Sur la longan hararon de la knabinoj la luno verŝis puran arĝenton, kaj iliaj vizaĝoj same brilis. Ni estis tute ebriaj, ĉarmitaj. Pro tial ni ne rimarkis, la dume ĉirkaŭ ni kolektiĝantajn same plenvestitajn doktorojn, instruistojn kaj flegistinojn. Ili ne interrompis

nian kantadon, dancadon. Sed kiam ni haltis iom ripozi, ili venis al ni kaj petis nin ĝentile por fini nian amuzadon kaj reiri en niajn dormoĉambrojn, por ne veki la dormantojn. La sekvonta tage ricevitaj riproĉoj estis justaj, ĉar ni senpermese amuziĝis nokte. Tamen ni ĉiuj la ses infanoj ankaŭ nun bona-sente rememoras nian tiaman feindancon dum nia dekmonata resaniga tempo en la arbarzonita kastelo de Füzérradvány.

Certe nek antaŭ la dua mondmilito, nek niatempe povas multaj infanoj rakonti pri tio, ke ili povis aŭskulti pianokoncerton en kastel-halo tenata per du ruĝmarmoraj spiralformaj kolonoj, baniĝis en same ruĝmarmoraj bankavejoj, aŭ pri tiu, ke ili povis sinvarmigi en marmorkamena ĉambro kies planko estis flormotiva pargeto, en la kastela diskutejo kaj koridoroj de sur la muroj rigardis nin enŝtopitaj ursokapoj kaj cervaj, muflonaj kornaroj, niajn ĉambrojn lumigis veneciaj-kristallustroj, en la manĝejo ni sidis ĉe tiuj tabloj, ĉe kiuj iam princoj, grafoj, baronoj nutris sin post la grandaj ĉasadoj. La tuta floraro de la granda naturo odoris al ni, la piceoj verdiĝis al ni, la fringoj kaj kantantaj turdoj al ni montradis kontente siajn nestojn inter la arbobranĉoj kaj la sciuretoj manĝis niajn kuketojn kiam ili saltis al niaj fenestroj. Dum la ekskursoj ni povis ekkoni la tutan vivularon de la tri mil arpentoj.

La tiama socialisma-socia ordo tre saĝe prizorgis la kuracadon de la malsanaj infanoj, bone sciante, ke la futuron konstruanta nova generacio devas havi sanan junularon.

# Kristnaskoj

Kiel heroldo de printempo, mi alvenis al ĉi mondo kun vento degelinta la neĝon. Do mi naskiĝis je fino de marto 1943, en urbo Kaŝŝa. Tiu urbo apartenis tiam al Supra-Hungario. Nun ĝia nomo estas Koŝice kaj estas ĉefurbo de Orienta Slovakio.

Mia patro estis juĝisto, vicprezidento de la regiona juĝejo en Kaŝŝa. Mia patrino instruis brodi interesantojn. La patro de mia patrino estis la unua mekanikisto de la elektrocentralo de urbo Miŝkolc de la komenca 1913-a jaro ĝis 1941. Liaj prauloj kaj ankaŭ miaj patro kaj patrino-branĉaj antaŭuloj estis terkulturistoj kaj dombesto-bredistoj vivintaj diversloke sur teritorio de granda Hungarujo, mastrumantaj pri propraj bienoj. Povas esti, ke mi heredis ilian tero – kaj besto ŝaton, ŝaton de la belecoj, de mia patro: batal-spiriton koncerne la verecon, de ili ĉiuj la agemon kaj ŝaton de la kulturo. Kiel li siatempe, laŭeble ankaŭ mi helpas aliulojn. Li helpis jure, mi helpas per konsildonoj laŭ propraj spertaj. Mi alte esprimas la laborantojn sendepende de la heredita havaĵo, nacio, rango kaj instruiteco.

Kiam mi naskiĝis, furiozis la dua mondmilito, sed iuj jam supozis vidi ties baldaŭan finon kaj alvenon de iu pli bona, pli homama mondo, kiam ili povos ĝoji al travivo de la teruraĵoj de ankaŭ tiu erao.

La 28-an  de februaro 1945 estis la decidita limdato, je kiam la urba loĝantaro devis doni deklaron: al kiu nacio apartenanta sentas sin. Ĉu ili estas: Slovakoj, Germanoj, Hungaroj, Ĉehoj, Poloj, aŭ Rusenoj? Neniu konis la kaŭzon, celon kaj la klarigon de tiu deklar-devigo. Nur la politikistoj sciis, ke tiam establiĝis la pli posta ŝtato Ĉehoslovakio.

Miaj gepatroj substrekis sur la listo la vorton: hungara, poste ili poŝtigis ĝin al la urba estraro. Sekvontatage, je la 1-a de marto 1945, frumatene je la 5-a horo soldatoj vekis nin. Ili ordonis, ke ni tuj vestu nin, kunpaku la oficialajn personajn proprajn dokumentojn de nia familio, ke tiuj forporteblaj estu. Ili ordonis, ke la geedzoj, do miaj gepatroj paku manĝaĵon por tri tagoj, transdonu la ŝlosilojn de nia loĝejo al la oficiro, kaj forlasu nian hejmon kune kun ili. Nu, ĉio okazis ordone, ĉar tiutempe neniu kuraĝis agi kontraŭ soldatoj. Ekster la urbo, kien la soldatoj akompanis nin, ni renkontiĝis kun la aliaj same deklarantaj familioj. Kiam jam mankis neniu de inter ni, la soldatoj ordonis, ke ni ekiru hejmen al Hungario, se ni deklaris nin Hungaroj. Nia grupo marŝis en neĝa pluvego tri tagojn, kaj tute laciĝinte atingis la

grandvilaĝon Szikszó [sikso:]. Tie, la vilaĝa estraro lokigis la grupanojn inter la tiea loĝantaro. Tiu vilaĝo (nun jam urbo) situas je 25 kilometra distanco al urbo Miskolc. Inter la tiamaj militaj cirkonstancoj al miaj gepatroj oni ne konsilis, ke ili perpiede pluiru en Miŝkolc kun malgranda infano sidanta surbrake. Do, mia familio restis ĝis oktobro de 1947 en la vilaĝo akceptinta nin bonkore. Maljuna, vidviniĝinta apotekistino donis al ni loĝejon. Sur la parcelo staris la loĝdomo kiun akacio arba siringo arbeda – parko zonis kun samjaraj kaj plurjaraj floroj. Ĉe fino de la parcelo legomĝardeno, duflanke necesejoj situis, kameroj per materialoj por hejti, kaj du ĉambrojn konsistanta dometo staris. La hejmanoj konservis tie la ilojn al kultivado de la ĝardeno, sed pli frue la ĝardenisto loĝis en ĝi. En la flora parko japana pavilono staris, farite el skulptitaj lignotabuloj. De la domtegmento la pluvakvon kondukis defluilo malsupren, supre ĝi figuris kapon de drako. Feliĉe la por loĝejo ricevita konstruaĵo estis seka, konstruita el briko, kaj hejtebla. La vilaĝa kuracisto kun familianoj portigis tien malnovajn, neuzitajn meblojn, tolaĵojn al litoj, kuirpotojn, nutraĵojn kaj ĉion necesaĵon, kion ni bezonis por komenci nian vivon tie.

Mia patro nenie ricevis laborlokon. Sed ni bezonis monon al la pluvivo, ke ni ne devu petegi, aŭ akcepti ĉion senpage. Do, kion fari? Mia patro iris arbon haki, terkulturi, kaprojn kaj bovinojn nutri, stalojn purigi, sterkojn porti eksteren al la agrikulturaj teritorioj de la vilaĝanoj… k.s. En sia libertempo el vergoj de salikoj li plektis seĝojn, korbojn. De la maizo-bastoj (el la ekstera kovraĵo de la maizfrukto) li trikis: ĉapelojn por gardi kapon pro brulado de suno, pantoflojn, tapiŝojn, korbojn por la ovoj kaj agraj produktaĵoj. El maljunaj sed ne putriĝintaj arbotrunkoj li skulptis objektojn por esti loĝejaj ornamaĵoj, kaj uzobjektoj. Poste ilin li forvendis al la vilaĝanoj. Ĉiu aĉetis de li, sed neniu donis monon. Ĉiu donis tion, kion, havis. Ekzemple ni ricevis: materialojn por hejti, grasaĵon, rizon, terpomon, lakton farunaĵojn el tritiko kaj el maizo, el kiuj mia patrino bakis panon kaj kukon, kuiris kaĉon ktp. Nia domposedantino donacis grajnojn da legomoj kaj proponis terkulturi sian legomejon dum la sekvaj jaroj. Tiel alvenis nia unua kristnasko en la amika vilaĝo Szikszó.

Ni havis nek kristnaskan arbon, nek viandan manĝaĵon al la sankta festo. Sed, la domposedantino invitis nin kune kun ŝi festi la „sanktan vesperon”: naskiĝtagon de Jesuo. Helena, la maljuna onjo metis vastajn, molajn kusenojn sur la benkojn de la japana pavilono. Kaj miajn gepatrojn kaj min ŝi vestigis en foruzitajn jakojn el pelto, ke ni ne sentu

la malvarmon sub la vintra stela ĉielo en la libera aero. En la paca lunlumo ili bakis lardon, poste manĝis ĝin per mola blanka pano. Dum sorbado de la vin-supo ili babiladis. Mi, la etinfano ricevis ĵus kelkminutojn antaŭe bakitan per sekvinberoj plenan migdalan kukon kun varma laktigita ĉokolado. Onjo Helena zorgis pri ĉio. En la mallumo krakado de la fajro, la amsento, la nin gardintaj drakoj, la ĝis tiam nekonataj delikataĵoj tute sorĉis min. En oktobro de la 1947-a jaro mia patro laboron ricevis en Miŝkolc ĉe la distrikta-juĝejo. Fine, li povis praktiki lian juĝistan profesion. Do, ni forlasis mian „Feinlandon kie drakoj gardis min" kaj translokiĝis en urbon Miŝkolc. Nia havis tie parencojn. Do de tiam ni ne vivis jam for de mia patrina avino kaj baptopatrina familio.

La domo, en kiun ni enloĝiĝis, estis sufiĉe bonstata. En nia strato je tiam oni forigis jam la surstraton falintajn domruinojn pro la dummilitaj bombadoj. Sed, irante sur la strato mi povis rigardi, multajn domojn difektitajn pro eventoj de la dua mondmilito.

La lasta difektigo okazis, kiam dum la tn. „tapiŝbombado" la familidomojn la Germanoj bombadis komencinte la retiriĝon. La domoj, situantaj sur la bombardita teritorio en distanco 50-100 metrojn al la fervojlinio, multege suferis. Ankaŭ la lernejo tute ruiniĝis. Sed, la konstrulaboristoj komencis ties rekonstruon en 1947. Unue estis forigitaj la ruinoj, poste oni komencis konstrui la novan konstruaĵon de la elementa lernejo. Mi iris tien ĉiutage, ĉar ŝatis rigardi leviĝon de la muroj. Multaj homoj laboris senlace, ke la lernejo estu denove hejmo de la kulturo. Iu maljuna masonisto permesis, ke ankaŭ mi metu brikojn en la briko vicojn en la rapide leviĝantaj muroj. Poste, kiam la lernejo estis jam komplete pretigita, mi rakontis ĝoje al ĉiu, ke ankaŭ mi konstruis la lernejon.

Hejme, ĉiu vespere ni devis senlumigi la fenestrojn. La klarigon de la kialo poste mi ekkomprenis. Miaj gepatroj tial devis tiel agi, ke iu vojerara fusila grenado ne rompu la fenestrovitrojn kaj la vitropecoj ne povu vundi nin. Tiutempe multaj homoj rabis la fervojojn. Ilin persekutis la policistoj kaj soldatoj, kiuj ofte ankaŭ pafis post la ne haltantaj rabistoj. Krome tiuj soldatoj pafis jam ankaŭ tiukaze, se videblis ie iom da brilo, ĉar ili pensis, eble malamikoj de la popolo kaŝas sin tie per armiloj kiuj briletas.

Poste novaj streĉiĝoj sekvis. La policistoj de Mátyás Rákosi [Matiaso Ra:koŝi] la tiama estro de la Hungara Komunista Partio – per oftaj demandadoj afliktis mian patron, kiu devenis el familio terkulturinta

bienon kiel propran terposedaĵon en la eksa Supra-Hungarujo en Lófalu [Lo:falu, sed nun slovaka nome Kobily]. La geava familio de mia patro vivante sur la sama teritoria alia vilaĝo Šiba [Ŝiba], same okupiĝis pri terkulturado, bestobredado, krome forst-kulturis, funkciigis segmuelejon kaj vitrofandejon por fabriki vitrojn al dom-fenestroj. Mia patro, kiel ilia ido apartenis tiatempe al tiu tavolo de la popolo, kiun, la tiama Komunista Partio persekutis. Feliĉe, la juĝeja estraro protektis nin. Tiel sukcesis eviti, ke la hungaraj ŝtato-defendaj komunistoj portigu nin en koncentrejon en Recsk [reĉk] aŭ sur la hungara ebenaĵo Hortobágy [hortoba:dj] kien oni portis la supozitajn „malamikojn de la reĝimo de la nova hungara ŝtato.” Mia avo patra-flanka laboris krom la terkulturado kaj bestobredado, kiel agrikultura ĵurnalisto sendante anoncojn al la Habsburga-kortego pri agrikultura stato pri teritorio 3000 arpentojn havanta en Supra-Hungario. Sian okupiĝon perdinte en 1919 li kune kun la edzino translokiĝis apud Budapeŝton al Vaŝad, ke ili tie daŭrigu ilian antaŭan profesion, pli proksime estante al iliaj gefiloj vivantaj sur teritorio de la 1920an jaron posta Hungario. Sed la komerca makleristo trompis ilin ĉe la aĉeto de bieno. La grundon netaŭgan esti por ĉirkaŭ-doma bieno pro ne havo de sufiĉa kvanto da akvo en la puto, ili povis vendi nur pro multe pli malalta prezo. Mia patra avo perdinte sian profesion kaj havaĵojn, mortis sur teritorio de la nuna Hungario en 1920, post la verdikto de Trianon (en Francio). Mia patra avino mortis en 1949, loĝinta tiam ĉe ŝia pli aĝa filina familio en la nuna Norda-Hungario.

Rapide evidentiĝis, ke salajro de mia patro ne sufiĉas por nia familio. Mia patrino skribis en Budapeŝton al la pli frua entrepreno, kiu laborigis brodantinojn de la lando por fari hungarajn brodaĵojn kaj sendi ilin al eksteraj landoj. Mia patrino estiĝis poste la de hejmo direktanta organizanto de la brodaj laboradoj en Miŝkolc, sed ankaŭ ŝi brodis hungarajn ĉemizojn, tablotukojn, mantukojn, unufoje ankaŭ eklezian flagon. Ambaŭ laborante, rapide alvenis kristnasko de la jaro 1947-a.

Mia patro jam laboris ekde tri monatoj. Nia familio havis malmultan ŝparmonon. En ĝoja atendo pasis la tempo ĝis kristnasko. La 24-an de decembro miaj gepatroj sendis min promeni. Ili proponis, ke mi iru „serĉi la Jesueton kaj, se mi ekvidos lin, petu, ke li venu al ni portante donacojn ankaŭ por ni.” Dum mia promeno la neĝa pluvo ekfalis. Ĝis genuoj kota mi iĝis. Miaj vestaĵoj tramalsekiĝis je mia alveno hejmen. Alveninte mi raportis al mia patrino, ke mi vidis

ornamitajn kristnaskajn arbojn multloke, kie Jesueto certe estis jam vizitinta. Mia patrino ridete kisetis baninte min, poste vestis min en novan varman robon. Ho, Dio mia, kian grandan surprizon mi havis poste!

La ĉambra pordo malfermiĝis malrapide, festene, kaj mi povis enrigardi la ĉambron. Ene agrabla varmo akceptis. La forno zumis. En proksimeco de la fenestro kristnaska arbo staris, preskaŭ tiel alta estis ĝi kiel mi. Sonorileto sonis. Sur la branĉoj de piceo arbo brulis koloraj kandeletoj, pendis kristnaskaj bombonoj kaj koloraj vitrogloboj. Belega estis la vidaĵo. Post multaj jaroj mi eksciis, ke tiujn kristnaskajn bombonojn mia patrino pretigis per sukero, butero, muelita juglando kaj aldono de akvo pere de kunfando, dum la pli frua nokto. Ankaŭ min brakumante staris ili apud la pinarbo, kaj ni dankon donis al filo de Dio, ke li helpis nin travivi la malfeliĉaĵojn, ke ni povu ekvivi ĉi tiun momenton. Jen, ni staris en nia familia hejmo, kune, ĝoje. Ni estis malriĉaj tiam, sed nia estis la promeso de la pli ĝoja estonto.

Post nia preĝo mi ekvidis donaco urseton, ludilon por mi kaj fabelo libron pri Neĝulineto kaj la sep nanoj. Mi plue serĉis donacojn, sed vane. Mi trovis donacojn por miaj gepatroj nenie. Je mia mira demando ili tion respondis, ke de Jesuo ricevis donacojn ankaŭ ili, eĉ ili ricevis la plej grandvalorajn donacojn: unu la alian, min kaj la pliboniĝon de niaj viv-cirkonstancoj.

Ankaŭ mi volis ricevi mian parton el ilia ĝojplena rideto kaj brakumo. Tial mi portis skabelon apud ilin, sur kion starante mi povis tra karesi miajn gepatrojn.

La „sankta vespera" festa manĝaĵo por ni ĉiuj: varma laktosupo kaj per sekvinberoj plena novbakita rompitajn pecojn da migdaloj enhavanta  lakta kuko estis. La dolĉan kukon mia patrino bakis.

La odoro de la vanilherbo odora sukero sur la kuko, sorĉo de la kristnaska ĝojo tute plenigis kaj baldaŭe lulis min en profundan sonĝon. Kaj dume ekstere mallaŭte denove ekfalis la grandaj neĝeroj, de kiuj al mateno la neĝo atingis ĝis miaj genuoj.

# Fino Bona, Ĉio Bona

Vir-luphundon aĉetis la ŝafisto al la maljuna kuvashundo, ĉar bezonata estis jam la juna forto, gardi la ŝafojn. Foje iuj jam ŝtelis el lia ŝafaro, sed tiam la policistoj ne trovante la kulpulon, insinuis lin, la damaĝiton pri la sinrompŝtelo.

La novhundo kaj ĉarmis, kaj saĝa estis. Ĉiuj ŝatis ĝin, ankaŭ la maljuna hundo ĝoje akceptis, nur Johanĉjo, la biena laboristo ne. Nu, se li estis malamika, ankaŭ Bobi hundo ne estis alia. Renkontiĝante Bobi hundo ĉiam bojis, murmuris lin.

Novembrokomence okazis, ke naskiĝtago de la ŝafisto samtagis pri la ĵus unujara hundo. Tiel ankaŭ Bobi rajtis partopreni la solenan festenon kaj ricevis ankaŭ donacon krom la neordinara manĝaĵo. Interne kava, pul-pelanta estis la hundo-kolringo, la donaco. Ene papereto kaŝis sin per datumoj de la posedanto kaj de la hundo. Post kelke da tagoj nova festo estis atendita. La gemastroj prepariĝis al baptofesto de fileto de bofrato de la ŝafistmastro. Kunkolektiĝis la tuta parencaro, la multaj vilaĝaj geamikoj kaj najbaroj. Oni vokis ankaŭ ciganmuzikistojn en la Vilaĝdomon, por ke la amuziĝo estu pli grandstila. Jam posttagmeze komenciĝis la gajigado, pro kio nun la geedzoj lasis ne kolĉenigitajn la du hundojn, ĉar dum forestoj de la posedantoj la hundoj devis gardatenti la domon kaj la bienon. Ja, Johanĉjo petis kaj ricevis elirpermeson je tiam. La mastro ne volis lasi tute sola, neobservita de li la bienon, ĉar ankaŭ lastfoje tiam okazis la damaĝo kiam ili ne hejmestis.

Kvankam la hundoj bonaj estas, kaj ĉe la ŝafaro ĉio enordo estas, sed ĉar la anticipa zorgemo neniam superfluas, foj-foje mi hejmenvenos – pridecidis la ŝafisto.

Malfrua posttagmezo estis, sed la vilaĝo jam sonis pro kantado de la diboĉadantoj kaj la muziko. Nun plimalhele estis ol kutime. Unuj prognozis pluvon, aliuloj aŭguris pri neĝfalo, rigardante la nubozan ĉielon. La gardhundoj staris ĉe pordo vilaĝdirekta. Ili atentis sonojn de la diboĉado, kaj tion, kiel rapide proksimiĝas la foraj fulmoj kaj tondroj. Subite ili ekaŭdis aŭtomotorbrumadon kaj pordegan grincon el direkto de la paŝtejo, de fino de la bienkorto. Poste malfermiĝis la pordego de ŝafejo. Ambaŭ hundoj kuregis malantaŭen pensante pri malbono kaj kiel furiozaj diabloj ĵetis sin al la penetrantoj. Inter la tri neinvititaj vizitantoj Bobi ekkonis Johanĉjon la malamikon, kiu daŭre batis ilin per

vipo, tiel vole forteni la domgardistojn. Pro la neatendita kuratako de hundoj la du aliuloj pri tio kraĉdemandis Johanon, kial li ne dormigis la hundaĉojn, ĉar nun tiuj damaĝus. En la ŝafejo dise-mise kuregadis la sian noktan trankvilon konfuzitaj, ekscititaj bestoj, dum la plurojn savi la virŝafoj provis kornofrapadante devigi al foriro la du fremdulojn. Tamen fine la du rabistoj sukcesis preni la destinitajn bestojn, kaj pordonmalfermante komencis eltiri la traligitajn bestojn en la korton. Tie luktis jam nur la pli juna hundo, ĉar la alia kuŝis per tranĉita ventro, dolore tirbojade apud la balailo apogita al ŝafejmuro, sed intertempe terenfalinta. Ĝis kiam Johanĉjo kaj liaj du fiamikoj okupiĝis per la meto de ŝafoj sur la aŭton, Bobi eltiris la poŝtranĉilon el la kuvaso kaj pernaze puŝis ĝin sub la balailon. Finante Bobi denove ekatakis la malamikon. Johanĉjo ne trovante sian tranĉilon, per la kun si portita bastonego komencis bategi la junan hundon, por forteni ĝin de si mem, ĉar la enaŭtomobiligon jam devis rapide fini. Finante la ŝarĝadon, ankaŭ la aliuloj ekatakis Bobin. Dum ilia interbatalo Bobi sukcesis mordi en maleolon de iu fripono, kiu veadi komencis. Sed la mordo ne estis danĝera por daŭra plendo, tamen sufiĉis al pliiĝo de ilia kontraŭhunda kolerego. Fine la tri fiuloj kapbatis Bobin tiel, ke ĝi surtereniĝis. Ili batis ĝin ankaŭ post tio, poste enpremis en iun sakon dirante, ke la kadavron ili enterigos ie. La alian hundon ne trovante – ĉar dumtempe ĝi kaŝis sin en ombron de la sterkejo – lasis tie kaj ekiris. Jes, je sia ĝojo ili tutsukcese povis foriri, ĉar post kelkminutoj falegi komencis la „diobenata pluvo", kio forlavis iliajn spurojn de la kortogrundo.

Enarbare ĉe iu deklivo surglitiĝis de la aŭto unu ŝafa sako kaj la hunda, ĉar pro la rapidego ili forgesis fiksi la finan subklineblan flankon de la aŭtomobilo. Ne tuj estis rimarkita la perdo. Encerbiĝinte la perdiĝo, ili blasfemante remanovris, denove ŝarĝis, fiksis la malantaŭan flankon de la aŭto por ke ne okazu nova damaĝo kaj denove komencis provi la progreson antaŭen sur la jam gluema grundvojo. Foje poluakvon portanta eksternokamiono aperis antaŭ ili.

– Kion serĉas tiu bovo ĉi tie, kial venas sur ĉi vojo anstataŭ la betonvojo? – siblis ili inter dentoj kaj sakris, ĉar sur la malvasta vojo la du aŭtomobiloj ne havis lokon por si unu apud la alia. La tri amikoj devis denove remanovri, sed nun tuj ĝis la vojkomenco, ĝisfine sur la jam plenumita glita rompita tervojeto. Kaj ili ne povis agi aliel, ĉar la portaŭto pezis. Do ili devis esti ĝentilaj helpi la alian. Kiam la eksternokamiono preterlasis ilin, la tri amikoj senŝarĝiĝintaj adiaŭis ties

ŝoforon. La akvaĉon portantulo reenrigardante sur ilin, en la rerigarda spegulo povis rigardi sur ilian aŭtomobilon lumigitan per la ŝarĝaŭta malantaŭa lampo. Li vidis tie kvar pakaĵojn el kiuj tri movis sin sub la kovranta veltolo.

– Estas interesa, ke sur la veturilo ili portas ŝajne bestojn, sed kial ne staras tiuj en kaĝoj, kaj kial estas tiuj kovritaj? Ĉu estus tiuj ŝtelitaj? – trafulmis siacerbe la penso. Bone, mi mencios pri la interesa okazaĵo al mia policist-kamarado – decidis fine la ŝoforo. La tri aĉuloj sur la jam kota vojo sen nova malbono fine atingis ilian arbaran restejon. Amikino de la rabon elpensita Johanĉjo kuris antaŭ ilin.

– Mateno estos je kiam ni manĝos! Vi malfruis multon! Kial vi malfruis? Sed respondo ne venis. La tri viroj rapide komencis pretigi la vespermanĝon el la portita viando.

Kiam la ŝafmastro hejmenatingis observi la bienon, jam ne pluvis. Rimarkinda estis la silento, kaj la hundoj ne kuris antaŭ lin. Malbonon antaŭsentante kuregis li al la ŝafejo. Teruriĝante malkovris li la grandan blankan agoniantan kuvashundon. Tuj hejmenvokis sian edzinon el la amuziĝo kaj vokis la policistojn. Ili kune konstatis la perdiĝon de la tri ŝafoj kaj Bobi. La policistoj trovis nur la iome hundoŝmukan sed per ungospuroj plenan sangan poŝtranĉilon. Alia spuro ne restis. Ili skribis tuj la protokolon pri la unusola trovita objekta pruvaĵo, prucis la esploron pri nekonataj pekuloj agantaj en pekoj de rabo, damaĝkaŭzo, kaj bestosuferigo.

Longa tempo pasis ĝis rekonsciiĝo de Bobi. Ĝi volis stariĝi sed ne povis, kaj apenaŭ povis spiradi. Malrapide komencis rememori la eventon de ŝafrabo. Feliĉe ne kovris ĝin grandkvanta grundo, ja oni subterigis la hundo korpon nur improvize, haste. Je kiam ĝi elgrimpis el la sakon kovrita grundo, la vento jam pelis neĝflokojn.

De brulaj bestoostoj, haŭto kaj ankoraŭ de iu proksima io devenanta odoraĉo naŭzigis. La unua encerbon veninta penso estis, ke oni ĵetis lin en arbaran bestkadavrejon, ĉar el kio alia povas inundi tioma odoraĉo. Ĉirkaŭrigardis. Enarbara kampo ĉirkaŭis lin. La aŭtomobilo portinta ilin ĉi tien, staris arbarrande. En ĝi ebrie ronkis du rabistoj. Lia malamiko kun iu virino ridetadis en la proksima dometo, sed poste ankaŭ ili silentiĝis. Bobi plu flaradis. En la proksimo li malkovris siajn iamajn samsortanojn kiuj same kunsake estis subterigitaj tute aŭ nur duone. Tiuj odoraĉis. Bobi encerbumis foriri de tie dum dormo de la rabistoj. La devo por foriri postulis la tujan plenumon! Ekmovis sin al densejo de la arbaro, ĉar ne volis, ke ĵus

aŭtovoje kaptiĝu. Poste ĝi elanis al kuro. Iom da tempo ĝi kuris sur spurvojeto, poste haltis la kuregon. Ĉar ĝi estis senforta, enboris sin en la sekan foliaron amasiĝinta ĉe trunko de iu dika arbo kaj dormiĝis. Sunradio vekis Bobin. Iom blovis, la malmulta neĝo fordegelis. Akvo de la proksima fonto ĵus apud la dormejo fluetis suben de la montoflanko, sur kio suprenis la printempe kreskintaj vergoj de la al ŝtipegoj dehakita akaciarbaro. Unue trinkis, poste kaptis birdeton por manĝi. Malmultis la matenmanĝo, sed mem sukcesis akiri, do ĝi kontentis. Poste ekatentis ĉu estas aŭdebla de iudirekto homa voĉo, motormurmuro, aŭ ĉu senteblas fumodoro. La hundo konstatis nenian kuraĝiĝaĵon. Sur iu senarbarigejo domaĉo, arbara azilo staris. Tiel ŝajnis, la arbaron oni priplantis ĉirkaŭ tion ĉ. antaŭ dek jarojn. Dumvoje rememorante pri la artifikoj – montritaj de sia mastro – kiel eviti la dratfadenojn, ĝi plensukcese povis postlasi ilin. La hundo rememoris ankaŭ la montokruston ĉe sia vilaĝo, kie la mastro liberigis damaĝitan beston. Sed aliam plimalbonis la situacio de la fortunolasita senprotektata cervido, ĉar iu malsata vaganta hundo jam demaĉis la malantaŭan femuron de la cerveto. Je ties mencio la ĉasgardisto tion respondis al la mastro, ke la ĉasistoj tial funkciigas la maŝkaptilon kontraŭ la vagabondhundoj, ĉar tiun agon la neceso postulas.

De la montosupro Bobi enrigardis la tutan antaŭ si situantan lokon. Arbaroj etendiĝis antaŭ si, ĝis la okuloj rigardis. En la foro ŝajnis vojo inter la arbaroj, eble publikvojo povas esti tio. Tiudirekte gvidis ankaŭ la arbarista vojo, sur kiu ĝi alvenis ĉi tien. Sur ĉi romantika pejzaĝo de sudaj deklivoj de montaro Bükk, Bobi neniam estis vizitanto kun la mastro. La suno bele brilis, la ĉielo bluis. Iuloke sur la sekfoliaro videblis la velkintaj rozkoloraj florpetaloj de la aŭtuna anemono. Surĉiele rabobirdo giris. Dum Bobi odorojn serĉadis por decidi kien iri, liajn orelojn batis sonoj de arbohakado el direkto de la vidalvida arborando.

– Homo estas tie! Bobi ĝojplene ekbojis, poste ankaŭ hojlis longe. Ĝi tuj komencis la rapidan malsupreniĝon sur la disterniĝanta montoflanko, direktante sin al la hakanto. La homo kaponlevis pro la bojado. Scivoleme rigardis li direkton de la montopinto.

– Ĉu lupo? Ĉu ĉi loke, ĉe malantaŭ de dorso de Dio? Lupo ne povas esti. Tio trairas de Slovakoj nur en departamenton Zemplén. Ĝi ne povis veni ĝis mi. Nur hundo povas esti tiu. Sed, tiudirekte ne estas landvojo, kien oni povis ĵeti ĝin. Ĉu iu batis, kaj poste ĝi enkuris la grandan naturon? Sed, kiu agis tiel? Kaj kial? Respondon la hakanto ne

ricevis je siaj demandoj. Li pluatentis la krutan montoflankon. Sed la penso por baldaŭe havi gaston, pluagitetis cerbumade en la maljunulo.

– Ho, ankaŭ la voĉo estas propreca. Kvazaŭ ĝi dirus:

– He, homo, ne foriru, atendu min!

Li ekfajfis. Sentu la alvenanto, ke atendata estas, venu trankvile. Bobi kurante klopodis atingi la valan vojon. Dumvoje glitiĝis, komencis ruliĝi. Surteron kliniĝantaj branĉetoj de unu sovaĝrozarbedo haltigis. Tiuj tutpikadis la hundon per siaj dornoj. Je kiam Bobi elgrimpis de la arbedo kaj kiel pulojn kutimas li formaĉis la dornojn el sia haŭto, laciĝegis. Ĝi sian hararon lekadadis, kiam aŭdis la fajfon. Denove ekiris al la homo. La hakanto arbarrande atentis kiel proksimiĝas malrapide la hundo.

– Tiel sisteme proksimiĝas ĝi al mi, ke mi tutcerte havos gaston, kiu laŭvideble min serĉas – balbutis mallaŭte inter dentoj. Bobi sidiĝis, poste kuŝiĝis ĉe piedoj de la homo, kaj rigardis ties ridetantan vizaĝon. Bojis kelkajn salutojn, jelpis iom, poste kapklinis sur ŝuon de la ulo. La viro moviĝis por klini sin al ĝi. Bobi retiriĝis. La nerazita vizaĝulo alparolis la hundon.

– Se ci serĉas min, venu. – Li ekiris antaŭ ĝi montrante la vojon. Ĝoje li spertis, ke Bobi moviĝis por sekvo. Li eksentis, ke la fremda besto atendas de li ion. Duonturniĝante al ĝi, denove alparolis li la hundon:

– Venu! – La homo paŝadis temponhave. Bobi komencis malrapide sekvi lin, sed post kelkpaŝoj lasis la hundon sia tuta forto. La laboristpantalone vestita homo denove reenrigardante ekvidis, ke la hundo kuŝas sur la vojo kaj ne aspektas, ke ĝi volas sekvi la vokantulon. Li denove komencis vokadi:

– Ek, hundeto, venu kuraĝe!

Sed la besto ne havante pli da forto, restis samloke. La invitinto scivoleme kliniĝis super ĝin, ekzamenis kaj konstatis, ke la alvenintulo apenaŭ spiradas, kaj la okuloj fermitaj estas. Li vidis dume ankaŭ la hundokolringon kaj la tutbatitan vunditan hundokorpon. En la maljunulo plulaboris la bona koro. Eniris la arbaron. El dikaj arbobranĉetoj kaj de sia jaketo faris porteblan liton. La moviĝi jam ne povantan hundon li kuŝigis sur tion, kaj malrapide komencis tiri al sia domaĉo. De la vojeto pli malproksime kuŝis defalinta kverkoarbo, kies foliaro kovris la grundon. La kverkoarbo kun kelkaj radikoj grimpis en la maldikan tertavolon, ankoraŭ suĉis sukon de la tero, vivis. Bobi tie dormiĝis sub ties foliaro, kien la homo surmetis.

Malsatego vekis la hundon alitage. Ĝi ankaŭ soifis, sopiris karecon. Elrampante de sub la foliaro, la junhundo observis la falintan arbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Sub la radikaro de la kverko, en la sabloŝtono kavo malhelis, ene kelkaj mebloj, la malantaŭan internan kavon kovris kelkaj dikaj arbobranĉoj kaj sur unu pendigita ne nova jako. Apud muroj de la ekstera kavo hakitaj segmentitaj arbopecoj kaj en sakoj briketpecoj estis arigitaj por vintra hejtado. Al la kavomuro apogiĝis forŝovebla, el vergoj plektita, per nilantavolo kovrita ĉarpentaĉaĵo por defendi kontraŭ pluvo, vento. Antaŭ la kavo la grundo ŝtonigita estis, staris sur tiu planko portebla malgranda kahelforno, en kiu fajro brilis kaj sur ĝi en kuirpoto kuiriĝis iu bonodoraĵo. La homo sidis apud la tablo kaj atendis la pretiĝon de la kuirita manĝaĵo. La hundo pli proksimen rampis al la tablo, ekjelpis. Je kies voĉo la solulo stariĝis. Bonefikis al li, ke la hundo serĉis la societon, ĝi alvenis lin.

– Bonan matenon kara hundo. Ĉu ci vekiĝis, bone? Ne timu min – diris li mole, poste alturnis sin al la alparolito kaj malrapide proksimigis ĝin. Li ne volis timigi aŭ eksciti ĝin per sia abrupta movo. Bobin la gesto plenigis per fido, pliproksimen rampis al li, sed vostumi eĉ ne povis. La gastiganto malrapide karesis la kapon de la kompatinda besto. Bobi fermitokule ĝuis la glatigitajn manmovojn. Ili sentis fidon unu al alia.

– Ho, ci povas soifi kaj malsati – reprudentiĝis la avo kaj submetis telereton da akvo antaŭ la hundon, kaj en la alian metis iom el la jam kuirita cepa terpomo. Enmanĝaĵigis li panpecojn, kaj lardopecetojn por esti pli densa, pli satiga la nutraĵo. Rimarkinte la kuirulo, ke la hundo ne povas manĝi, pureigis la terpomon kaj perkulere apuden sidante komencis manĝigi la gaston. De la kolringaj informoj li sciiĝis, kiel nomiĝas sia gasto, kaj al kiu apartenas. Bedaŭre li ekkomprenis, ke la hundo ne povas resti ĉe li. Tamen kia bona estus tiu ĉi kunulo, ja li ne estus sola, estus al kiu paroli. Krome… kie estas manĝaĵo al unu malsata estaĵo, povas havi tie ankaŭ alia – pensis li. Sed, ĉar ordo devas regi en la mondo, la hundon li devas hejmenigi. Sed, ĝis la hejmenirigo, ĝi devas refortiĝi iom – decidis li fine. Sur sian jakon kuŝigis la hundon tiel, ke la fajrujvarmo atingu ĝin, manĝigis, trinkigis ĝin per tio, kion li havis. Post tri tagoj ili vizitis la policejon de la proksima vilaĝo. La maljunulo rakontis kiel trovis lin la hundo, kio okazis de tiam, kaj montrante la hundo-kolringon petis la policistojn alvoku ili la hundoposedanton prenu de li la posedaĵon kaj portu ĝin hejmen. De la alveninta ŝafisto li sciiĝis pri la ŝafo-rabo kaj de ties cirkonstancoj.

Dank' al la trovita poŝtranĉilo kaj konfeso de la poluakvonportanta aŭtoŝoforo, la policistoj baldaŭ plensukcese kaptis la efektivigantojn de la krimago.

La ŝafposedanto ĝojegante pro rericevo de siaj du vivantaj ŝafoj kaj pro trovo de la kara hundo, dankeme akceptis la honestan bonkoran maljunulon por esti la nova biena laboristo. Krom la monata regula salajro, al la maljunulo proponata estis ankaŭ kvartiro, por loĝi samloke.

Veturante hejmen kun la ŝafisto, la maljunulo rakontis pri sia vivhistorio. La malbono ekfuriozis tiam en sia vivo, kiam mortis la edzino kaj li pro publikvoja akcidento estis portita en hospitalon. La aŭto tutrompiĝis, li longe malsanadis. En la hospitalo la bofratino ofte vizitis lin, tre kare prizorgis la domajn florojn de la bofrato, kaj pagis la komunajn elspezojn de la apartamento en la domego. Li ĝojis pro la kareco. Kiam foje la bofratino petis lin por kontrakton skribi pri tio, ke ŝi prizorgos la bofraton post la hejmeniro el la hospitalo, kaj post lia morto la bofratino ricevu lian loĝejon, li senpripense kaj nelegante – pro fido – ĝoje surskribis la dokumentojn. Finfine hejmenirante el la hospitalo, li ne povis eniri sian loĝejon. La dommastro informis lin pri tio, ke li vendis sian apartamenton al la bofratino, kiu same vendis jam ĝin, tiel li nenion serĉeblas jam tie. Do, li ankoraŭ ne ricevis monon de la Asekura Instituto pro la akcidento, monon ne havis por aĉeti novan loĝejon, la lukostoj de iu loĝejo altis. Ne sciante kion fari tiutempe, kiam ne volis estis li liberaere dormanto, el sia pensio do li aĉetis kelkajn meblojn kaj aliajn necesaĵojn kaj arbaronŝatante li transloĝiĝis en tiun arbaron de montaro Bükk.

La maljunulo kiel freŝbakita ŝafprizorgisto ekvidinta la proponitan belan puran loĝejon ĉe la ŝafisto, pro korpremo dankeme mankisis la edzinon de mastro. Tiu ĝenridete protestis pro tiu dankesprimo. Sed la maljunulo pruvigis sian pravon: pro ĉi bone zorgata pura, bela dometo ŝi meritas ĉi dankon. Li sentas, ke li kaj hundo Bobi hejmenalvenis, de kie ili jam iros neniam nenien.

# Ĉe Tombmonumento De D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof

Dum la somero de 1976 mia edzo kaj mi kun mia bofratino faris grandan vojaĝon en Pollando. En nia vojaĝplano rolis la vizitoj inter aliaj en: Zakopane, Krakovo, Vieliĉka (pro la salminejo), Varsovio, Toruń [Torunj, Bidgosĉ, Katovice] Bydgoszcz, Gdansk kaj Katowice]. En ĉiuj lokoj ni renkontiĝis kun geesperantistoj, kiuj helpis nin trovi tranoktejon por ni.

En Varsovio ni vizitis la tomb-monumenton de D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Li estis la kreinto de internacia lingvo, kio estas ponto de la homa kompreno inter la popoloj.

La tombejo estis malproksime de la lasta tramhaltejo. Do, ni longtempe marŝis por atingi ĝin.

Kiam fine ni trovis la okulfrapan tombon, ni ĝojis, ĉar celon trafis.

Sed, tiam ni konstatis, ke ne kunportis floron. Kion fari?

Mia edzo reiris aĉeti floron ie. Mia bofratino kaj mi restis tie, en la tombejo. La ĉielo estis foje luma, foje malluma, nuba. Dum la foresto de mia edzo ni pasigis la tempon per rigardado de la tombejo. Mia bofratino iradis inter la tomboj. Ŝi estis scivolema: ĉu ekzistas nur hebrea literaj tomboŝtonoj, aŭ ekzistas ankaŭ latinliteraj tombmonumentoj krom la Zamenhofa. Starante ĉe la Zamenhofa monumento mi mem de tie atentis la enrigardeblan parton de la tombejo.

Mi vidis, ke la parcelojn apartigas unu de la aliaj arboj, arbedoj, ornamaj plurjaraj kreskaĵoj. La vojetoj inter la tomboj estis superŝutitaj per aro da ŝtonetoj de rivero Vistulo. Ĉi tiujn vojetojn rastis la zorgisto de tombejo.

La foreston de mia edzo mi komencis jam pensi tro longa kaj dume la vento ekblovegis. La zorgisto venis al mi kaj alparolis min pollingve, demandinte pri „pan" ((pri la sinjoro). Mi, montrante al li sur mia fingro la fingringon kaj en la polvon apud la tombo mi desegnis floron. Poste per fingroj mi montrante iradon mi esprimis, ke mia edzo iris aĉeti floron.

Li komprenis kaj foriris plu ordigi la vojetojn. Post ne longa tempo li tamen revenis. Li ofte montradis la ĉielon, kion tiam jam enkovris la nigraj ŝtormnuboj, krome li montradis ankaŭ al la malalta, plata tegmenta domo. Li ne komprenis la lingvon Esperanto, mi ne la polan.

Sed mi tuj komprenis rigardante la ĉielon, ke ni devas iri sub tegmenton, ĉar granda pluvo venegas, baldaŭe pluvegos. Do, ni sekvis la zorgiston. Kaj vere, post kelkaj minutoj ĉio nigriĝis, pluvegis.

La konstruaĵo, kien ni estis invititaj, estis ene tre modesta, senornama . En la ĉambro staris apud longaj tabloj, longaj benkoj tuj en la proksimeco de la muroj. La tabloj estis kovritaj per mezgrizaj tablotukoj. La ejo ŝajnis al mi, ke ĝi eble estis aŭ kapelo, aŭ iaspeca kolektiĝejo. La zorgisto foje envenis la ĉambron. Li kunportis blankan damasko - tablotukon kaj metis ĝin sur la tablon antaŭ ni. Poste li kaj diris, kaj montris, ke ni povos manĝi tie, se ni volas. Mi diris al li esperantlingve kaj pole el vortaro Esperanto – pola ĉe ni estanta, ke ni atendas mian edzon, nur poste ni manĝos. Sed, la komplezon ni dankis per rideto. Mi ne scias, kiom li komprenis el tio. Baldaŭ li foriris. Dume la pluvego ĉesis, mia edzo revenis kun rozoj. Jam denove sunbrilis.

Dum mia starado en la tombejo apud la tombo de Zamenhof, mi ekvidis etajn ŝtonojn sur la tombmonumento. Ili estis ses. Ŝajnis ili al mi, kiel infanoj en vicon starigitaj. Ho, ve! – sed ne estas kun ili plenkreskulo – mi pensis. Mi serĉis pli grandan ŝtoneton ol la tieaj estis kaj metis ĝin apud tiujn, kiel instruistinon aŭ plenkreskulinon. Mi pensis, ke la ŝtonetojn metis tien infano. Eble, mem la nepo de zorgisto ludis tie. Kaj tiam, kiam mi surmetis „min", mi eksentis la rigardon de la zorgisto sur mi. Mi hontis min. Ej, do: mi ludas ĉi tie, en ĉi tiu sankta loko! Kien mi metis mian menson! Rigardante sur la zorgiston, mi volis forpreni mian ŝtoneton de la pluraj. Sed, li signis ne fari tion! Do, la penso fortiĝis en mi: li certe volas tion, ke la nepo vidu: nova homo venis tien, kaj ankaŭ tiu portis ŝtonon tien! Kia estos lia surprizo vidante ĝin! La zorgisto ridetis al mi. Ĉu povas esti, ke mi ne faris ian grandan stultaĵon per la ŝtono? Krome la sepa numero estas bonaŭgura numero por la Hungaroj. Nome, la patrujokupon la prahungaroj faris per siaj sep triboj en 896 post Kristo. Kial ne povas resti la sepa, mia ŝtono tie, sur la tombo de D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof? Li certe ne kolerus tial - mi pensis.

Nu, la rozbukedon ni metis sur la tombon de la „Majstro." Post nia tagmanĝo – en la malalta domo – ni adiaŭis la ankoraŭ ankaŭ tiam ridetantan zorgiston kaj ni reiris en la internan parton de la pola ĉefurbo.

Post tiu evento pasis 25 jaroj. Pro operacio mi kuŝis en urba hospitalo en mia urbo Miŝkolc.

Mia lit-najbarino estis pola virino, kiu edziniĝis kun Hungaro en mia loĝurbo. Estante ĵus post la operacio, ni ne manĝeblis. Do inter ni, ni paroladis pri la hungaraj kaj polaj manĝaĵoj kaj pri ambaŭlandaj ekskursoj niaj. Tiam mi rakontis mian interesan vojaĝon en Pollando dum somero de 1976.

De ŝi mi eksciis, ke tiu tre bongusta manĝaĵo, (kion ni tre ĝuante manĝis en Pollando, sed en Hungario ĝis tiam ni ne manĝis) kion la poloj nomas „flaki", estis farita el tripo.

Krome ŝi rakontis, ke la domo kie ni restadis dum la pluvego, estis la plorejo de la tombejo.

De ŝi eksciis mi ankaŭ tion, kial ridetis al mi tiel afable la zorgisto, ĉe tombmonumento de la „Majstro", kiam la ŝtonon mi metis tien.

En Izraelo ankaŭ nuntempe daŭras praa kutimo, laŭ kio: se ne estas ĉe mane floro, la vizitanto metas unu ŝtonon sur la tombon kiel signon de sia estimo, de sia tiea ĉeesto. Tiu kutimo devenis, restis al la nuntempo el tempoj de la en dezertaj migradoj de la popolo.

Ja, en la dezerto pli ofte estas en proksimeco de mano la ŝtono, ol floro.

## Se, la Malsato Turmentas

Mi estis kuracata en astmosanatorio en Miŝkolc urba Csanyik – valo [Ĉanjik]. Dum novembra posttagmezo mi ekatentis bonvestitan virinon sur la koridoro, kiu ŝajnis serĉi iun.

Ŝi rigardis enon de ĉiu ĉambro, sed fine renkontiĝis, parolis kun neniu. Mi, volante helpi, alparolis ŝin. La bonvestita virino ne bone aŭdeble, tremadante respondis, tial mi ripetis la demandon. Poste mi spertis ŝian ploretan konfeson: ŝi malsatas ekde tri tagoj, sed ne kuraĝas manĝaĵon peti.

Je mia ties kaŭzon demandanta demando, la virino ne respondis. Nur staris ŝi kaj rigardis eksteren tra la koridora fenestro. Mi iris en ĉiun ĉambron. Preskaŭ ĉiu donis kion povis.

En la saketo estis: kelkaj sukeretoj, piro, pomo, triangula fromaĝo, malmola kuirita ovo, butera bulko, kukoj. La virino dankon diris kaj foriris. Scivole, ke kiun direkton iros la virino, mi postrigardis ŝin. Sed, tuj ŝi iris nenidirekton. Ekstere ĉe la pordo ŝi haltis, kaj avide manĝegis la enhavon de la saketo.

Post du tagoj la matenmanĝo denove butera bulko, teo, mielo, fromaĝo kaj kuirita ovo estis. La gemalsanuloj elekteblis, kion ili volas manĝi. Mia samĉambrino ne finmanĝis la elektitan manĝaĵon. Flankenmetis la ovon kaj unu buterigitan bulkon. Tion diris al ni, ke ŝi enmetos ilin en la friĝidejon, kaj se venos denove tiu virino, ni donu tion al ŝi. Eĉ, la virino denove ne venis. La manĝaĵoj restis. Tial, ke tiuj ne malboniĝu, la malsanulino metis tiujn sur paperon sur la teron, en la korton sub nian fenestron. Tion diris ŝi, ke la eterne malsataj katoj kaj la birdetoj certe ĝojos al la nutraĵoj.

Baldaŭ aŭdiĝis kolera murmuro kaj stranga blovo de kato. Ni pensis, certe du katoj interkoleris pro ĵaluzo. Ni kuris al la fenestroj, rigardi eksteren kiu okazis.

Nu, ni ekvidis. Jes, vere! Sed ne la du katojn, sed katon, kio strange blovante malantaŭen retiriĝis de granda vulpo. La kato estis kolerega, la vulpo foje murmuris, foje manĝegis la trovitan nutraĵon.

La vulpo tuj tiam finis per unu ovo, kaj komencis desurleki la buteron pri la bulko. Nu, ni pensis, ke nun sekviĝos la alia ovo. Sed ne tiel okazis. Unue la vulpo finmanĝis la tutan panon, poste tre singarde enbuŝprenis la alian ovon kaj ekkomencis la retiriĝon al la kortobarilo. Fine, ĝi malaperis en la truo sub la barilo. Alitage ni vidis, ke tiu ejo ne

simpla truo, sed kaŝvojo estis, kio kondukis sub la barilo en eksteren, en la liberecon, en la aŭtunan arbaron.

De la sanatorio hejmenveninte min per tia anonco atendis mia filo, ke en nia ĝardeno ŝtelisto iras de tempo al tempo. La sekan nutraĵon de niaj katoj, erinaco ŝteladas. Po vesperoj, kiam la mallumo estas jam densa, kutimas veni la neatendinta gasto. Mi ne volis kredi, ĉar mi sciis tion, ke la erinaco manĝas semojn, malofte skarabojn, fruktojn, eble pomon, se trovas. Sed, foje, vespere mia filo kaj mi atendis la gaston. Antaŭpreparis la poŝlampon eklumigi ĝin, se venos. Do, subite ni aŭdis ioman klakadeton. Ni kuris eksteren el la ĉambro. Sed, ne la erinaco estis. Alia, vaganta kato komenceblintus manĝi, sed de ni timiĝinte forkuris. Ni longe atendis poste. Preskaŭ noktomezo estis, kiam ni denove aŭdis la mallaŭtan maĉadon. Ni komencis plie atenti. Unue en la mallumo. En la lunlumo ni vidis, ke la erinaco manĝis la bakitajn kokinviandopecojn kaj ostojn. Poste finante per ili, komenciĝis, kiel deserto la seka manĝaĵo: la „Kite Kat" de niaj katoj. Mi spertis, la veron diris mia filo. Kiam ni surlumigis la erinacon, ĝi iomete timiĝante palpebrumis, tamen post nelonge finis per la formanĝo. Poste enbuŝon kaptante unu kokinfemuroston, rapide foriris sub la ĝardenpordo el nia ĝardeno, eksteren. Jes, ĝi savis, kio savebla estis por si mem.

Nu, mi pripensadis. Antaŭ nia erao plur mil jaroj, en la pratempoj certe same komenciĝis la domeskiĝo de la sovaĝaj bestoj: de la hundo, de la kato.

Se la malsato turmentas, la bestoj proksimiĝas al la homoj.

Kiu scias, ke en la nuba estonteco kiam okazos, ke parenco de la hundo, la vulpo kiel iĝos helpanto de la homo. Mi estas scivolema: ĉu la vulpo kaj la erinaco kiel, per kia ago servos la homon? Interŝanĝegalvaloron kion ili donos al la homo pro la sopirata, bezonata nutraĵo?

Ĉar la malsato treege povas suferigi, turmenti!

# Castro kaj Kristo

En la urbo Split pasigita unu semajno la vetero estis varia: foje varmete pluva, venta, aliam sunradia, 37celsius grada varma vetero. Kiel malmultmonon havanta hungara turisto mi pridecidis por piedmarŝi proksimume sep kilometrojn de nia motela tranoktejo al la interna urbo. Ne uzonte al la vojaĝo aŭtobuson, la de tielmaniere ekŝparota mono mi povos aĉeti sur la propra arbo maturiĝintan veran mieldolĉan oranĝon.

Nu, mi agis tiel. Kiam mi ekiris, frumateno estis, varmeto, iom blovis. Sed la vetero rapide varmiĝis. Mi piedmarŝis, kiel eble rapide. Sed, je la lasta triono de la vojo mi eksuferis pro varmego.

Pli frue mi eksciis, ke tiutage grupo veturonta estos de la ŝiphaveno en urbon Trogir. Tiun mi planis partopreni, krome mi volis renkontiĝi kun iu kroatia esperantisto, kiu nur tiam havis tempon por mi. Sed la sorto disponis aliel.

De antaŭ la bakaj sunradioj kaj pro ioma laceco, mi serĉis sidlokon en la apudvoja arba-arbeda areo. Fine mi trovis la konvenan lokon. Mi sidiĝis sub la arbo kaj jam ripozis kelkminutojn, kiam iu metis sian manon sur mian dekstran ŝultron. Poste evidentiĝis, ke ne homo, sed unu granda luphundo staris apud mi. Mi ekparolis, por tankviligi min mem, kaj la hundon. Nature, hungarlingve. Je mia voĉo aperis soldato. Mi devis legitimi min, kiu mi estas kaj kial mi estas tie. Je mia redemando mi eksciis, ke li estas hungardevena soldato, kiu nun servas kiel gardisto, ĉar post kelkaj minutoj oni atendas tien kamaradon Fidel Castro [kastro].

Mi komprenis ankaŭ tion, ke mi ne licas foriri, eĉ moviĝi ne. Do tiel okazis, ke la soldato kaj la luphundo staris antaŭ la gardista budo, mi kuŝis sur ventron malantaŭ ili sur la herbo sub la arbustbarilo. Post nelonge venis Fidel Castro inter soldatoj. Kun elegantaj soldatpaŝoj li marŝis for antaŭ mi je pr. en tridek metra distanco. Poste aŭdiĝis kanonpafoj, kiuj surdigis min, longe mi nenion aŭdis. Do, mi adiaŭis de la soldato kaj ekiris al mia celo, nun jam freŝe.

Alveninte en la enhavenon, mi eksciis, ke la trogira grupo jam foriris, kaj ankaŭ la esperantisto. La por li portitajn donacojn: la brodaĵojn mi enportis en iun splitan promenadejan butikon kaj proponis al aĉeto. La butikistino tre ĝojis al la brodaĵoj kaj la afero aranĝiĝis inter ni. Ŝi poste proponis al mi por viziti Etnografian –

muzeon. Mi havis tempon, do mi iris tien. Tie evidentiĝis, kial sendis min tien la butikistino. Antaŭ multaj jaroj en certan teritorion de Kroatio el la hungara Mezőkövesd [mezoekoeveŝd], kelkaj familioj estis translokiĝintaj. Ili vere ensolviĝis en la ilin ĉirkaŭantaj popoloj. Ili ne havas jam ilian propran lingvon. Sed ilian kulturon ankaŭ nun havas. La brodaĵmotivojn kaj la kutimojn, kantojn – ili gardas ĝis hodiaŭo, kaj ankaŭ al la estonto volas ekgardi.

Post la muzea vizito sur la vendoplaco mi aĉetis la deziritan bongustan oranĝon.

En la enhaveno irade, gapade mi ekrigardis grandan ŝipon. Oni diris, ke tiu pramŝipo havos ses horan vojaĝtempon tien-reen. Mi tuj decidis kaj aĉetis bileton por tiu vojaĝo, kaj post dek minutoj la ŝipo elveturis de enhaveno de urbo Split. Mi ne sciis, ke unufoje je kio mi atentu, kion admiru. Ĉu je la multspeciaj subakvaj kreskaĵoj, ŝtonoj, fiŝoj de Adria maro, ĉu je sur la ŝipo vojaĝantoj, ĉu je brilo de la neĝblankaj muroj de la foraperanta urbo Split?

Dum la vojaĝo unu post la alia ĉion mi rigardeblis. La tiun koloran marakvon, kiun nia hungara pentroartisto Csontváry [ĉontva:ri] ekpentris, mi vere ektrovis en la naturo. La infangrupo estis sinvestita en blankaj ĉemizoj ornamite per vizaĝbildoj de Nikolao Zrinyi [zri:nji] kaj Francisko Frangepan. La infanoj gajnis historio konkurson. Iliaj premioj konsistis de la ornamitaj ĉemizoj, kaj la supetara vojaĝo.

Proksimiĝante al rezidejo de Brat' insulo al Supetar, ĉirkaŭ flugis nin la mevoj kaj de la foro videbliĝis jam la neĝblankaj muroj kaj ruĝtegmentoj de la domoj. Ni vidis inter la tiujn ĉirkaŭantaj pinarboj ankaŭ multajn rozkolorajn oleandro arbojn. La tuto ŝajnis, kiel juvelo.

En la enhaveno la demandita virino diris, ke ĝis reiro de la pramŝipo mi havos nur unu horon. Je mia demando: kio indas ekrigardi dum unu horo, oni sendis min en dekstran direkton Mi ekiris kaj atingis la tombejon. Tie la tombmonumentoj la samaj estis, kiel en niaj tombejoj. Sed, inter la tomboj multegaj florantaj oleandro - arboj odoris. Estis tie blankaj, buterkoloraj, rozkoloraj kaj ties variantoj. Iuloke mi vidis ankaŭ helan turkisbluan koloran. Mi neniam penseblis, ke tia kolora floro ekzisteblas. Mi ĝuis la flor-maron apud la maro Adria. Kaj subite mi ekrigardis etan kapelon. En ĝi el marmoro skulptitan Kriston. Ĝin kreis Ivan Meśtović skulptoartisto. Simile belan al tiu skulptaĵo mi neniam vidis. Mi rigardis pie tion. La koloro kaj la vaskularo de la marmoro preskaŭ la sama, kia estas de la vivanta homo. La homaj anginoj blue diafanis tra la haŭto. Kristo estas la unika

dia homo de la sufero de la pardondono kaj la kvietiĝo. Kun retenata spiro mi staris tie, staris antaŭ li.

De tie maldekstre apud ies tombo el bronzo farita alia Kristo skulptaĵo estis, de Ivan Meŝtoviĉ. Majstre verkita estis ankaŭ tio.

La unu horo rapide forpasis. Reirante al la pramŝipo iu ĝia maristo haltigis min demandante, kion mi volis de tiu ĉiesulino kun kiu mi parolis en la enhaveno. Vere, tiam evidentiĝis kun kia virino mi paroladis, sed koncerne ŝian konduton mi trovis nenion menciindan. Li konis ŝin, kontraŭ mi kiu ne sciis ke ŝi estas prostituitino. Do, kion fari? Mi respondis la veron:

– Tiu konkubino konis vojon kondukanta en la tombejon.

Poste mi enŝipiĝis, mansignante adiaŭis de Supetar kaj revojaĝis al Spalato (Split).

Dumvoje mi pripensis kia interesa estas la vivo. Se mi estus forvojaĝinta al Trogir, mi certe ne estus vidinta la Etnografian muzeon kaj Supetaron, la infanojn gajnintajn la konkurson pri Zrinyi, Miklós [Nikolao Zrinji]: la baŭno Kroata, sed certe estus mi vidinta ankaŭ aliajn por Hungaroj same grandvalorajn lokojn kaj eventojn, kiuj nun eble por eterno restas kaŝitaj antaŭ mi. Tamen, mi kontentis kaj vere ne bedaŭris la ŝanĝon, ĉar akiris senparajn, neforgeseblajn travivaĵojn ankaŭ ĉimaniere.

# Ranreĝido

Kie ĝi estis, kie ne estis, tamen eble ne fabelo estis la ekzisto de la HEA lernejo ĉe vilaĝo akvoborda, apudbalatona Zánka [za:nka].

En Zánka Hungara Esperanto – Asocio faris pluedukadan kurson per prelegoj de eminentaj hungaraj esperantistoj por aktivuloj de la Hungara Esperanto - movado. Inter la prelegantoj estis ekzemple:

Doktoro Jozefo Mátéffy [ma:te:fi], doktoro Stefano Szerdahelyi [serdaheji], sinjorino Éva Farkas-Tatár [eva farkaŝ-tata:r], sinjoro Ottó Nógrádi [ot:o: no:gra:di] kaj ankoraŭ ankaŭ multaj aliaj.

Doktoro Ludoviko Győry – Nagy, la prezidanto de nia BAZ departementa Esperanto-Komitato decidis, ke el Miskolc, tiun pluedukadan kurson partoprenu sinjoroj Jozefo Lőrinczi, Ladislao Pásztor kaj mi dum la somero de 1972.

La aliĝilon ĉiu mem devis sendi al la donita adreso kune kun la skribita propono de nia prezidanto.

La eldonanto de la aliĝilo estis HEA, do tial mi sendis ĝin al Budapeŝto, anstataŭ Zánka. Mi pensis, ke HEA kolektos la aliĝilojn kaj poste sendos ilin al Zánka.

Kiam mi parolis pri tio al oĉjo Ludoviko, ke mi volas viziti la vidindaĵojn de Zánka : la lignan kasedan plafonan lignopreĝejon kaj la ruĝan fonton, dum mia tiea restado, li multe malvarmigis mian entuziasmon per tiu fakto, ke pro la densa programo mi certe ne havos tempon por fari propran ekskurson ien ajn.

Nu, mi vojaĝis per trajno sur la bordo de lago Balatono, preskaŭ ĝis la mezo de ĝia norda bordlongo, kaj en la decidita tempo mi alvenis en Zánka.Tiutempe tiu estis fama ne pro la tiea Esperanto – lernejo, sed pro la pionira tendaro.

Do, mi alvenis, trovinte la adreson, sinanoncis ĉe la akceptejo.

Sed, tie evidentiĝis, ke mia nomo ne estas trovebla sur la nomlisto. Do, oni ne povas akcepti kaj tranoktigi min. Kiam mi montris al ili mian poŝtan papereton pri la dokumento sendita al HEA, en Budapeŝton, la akceptantoj tre ĝentile proponis al mi, ke mi iru promenadi. Se mi revenos post unu - du horoj, je tiu tempo certe jam trankvilige aranĝiĝos mia afero inter la oficejo de HEA kaj Zánka [za:nka].

Mi ĝoje iris for al la vilaĝo, por tamen viziti la sopiratajn vidindaĵojn. Bonaj homoj klarigis, kion kie mi trovos. Tiel, unue mi serĉis la malgrandan preĝejon, kio estas ne videbla nun jam

bedaŭrinde, ĉar ĝiaj muroj malfortiĝante teren falis post longdaŭra pluvego kaj tial oni devis malkonstrui la konstruaĵon.

De sur la strato ĝi.ne estis videbla. Mi eniris la korton. Sur mezo de korto staris ĉaro, sur ĝia timono pendis jungilaro. La pordo de maizsekigejo estis malfermita. Kvankam ene maizo ne estis, tamen en – kaj elflugadis kolomboj, paseroj kaj turdoj. Ili rapide flugadis tien – reen sur la elŝutiĝintan hordeosakon. Homon mi ne vidis.

Baldaŭ junedzino aperis je mia kriado, kaj pardonpetis, ke ne aŭdis mian alvenon. Ŝia vestaĵo kalka estis. Tial estas tia, ĉar ŝi per kalko pentris la staleton de la gekokoj – klarigis ŝi. Je mia peto ŝi tre volonte akompanis min al la alia korto, kie la eta preĝejo staris. Tiam ŝia edzo pentris la preĝejpordon kaj la pordofoston per oleofarbo je marverda koloro.

La preĝejo kaj ekstere, kaj ene estis malgranda. Antaŭ ĝi staris larĝkrona arbo kaj alta barilo. Tial videblis nenio el ĝi de flanko de la vilaĝstrato. Sed la modesta lignoskeleta, la batitaj orturitaj kaj per kalko blankigitaj muraj tre modesta preĝejeto tamen havis ornamon, valoron. Tiu estis ĝia, per floroj ornamita kaseda lignoplafono.

Jes, tio staris unue – klarigis al mi la junedzino – sur la  rando de la setlejo. Poste, pro la disvastiĝado de domkonstruo de la loĝantaro, ĝi staris sur malvasta ejo inter du domoj. La preĝejon oni konstruis ne el ŝtono. Sed ĝi sufiĉis ankaŭ tielmaniere por tiuj kelkaj animoj, super kiuj dum ilia preĝo al Dio aŭ dum la dankdiro estis tegmento, ne pluvis sur ilin, ilin ne blovis vento.

Post ĝia rigardo mi ekiris reen, ĝis fino laŭ la barilo de la pionira tendaro, eksteren el la vilaĝo. Mi transpasinte la fervojajn relparojn, baldaŭe ektrovis tiun por vidi tre sopiritan „ ruĝan fonton."

Sed, kiel granda seniluziiĝo estis ties ekvido. Ĝi estis tute ordinara ronda truo en la tero, el kio ioma ruĝa akvo trafiltriĝis eksteren. Mi tute ne trovis ĝin interesa. Preskaŭ tion mi ekkomencis pensi: kial mi venis ĉi tien, mi bedaŭras mian marŝon ĉi tien, kiam miraklo okazis.

Unu post la alia trifoje grandan bobelon devomis la truo, sed kian! Ĝi estis ruĝa, ĝia suko pro la enŝoviĝintaj fero – kaj manganaj kombinaĵoj estis densa kiel sango de maljunaj homoj!

La popoldiro nomis la fonton vere ĝuste „Sangofonto." Mi konstatis dume, ke la akvo ne estis varma. Mi estis desorĉita pro la ĝisvivita vidindaĵo. Post la ripeta vomado  sekvis trankvila tempo. Tial, mi ne staradis tie, sed ekiris al la Esperanto lernejo.

Vidinte, ke tie ankoraŭ ankaŭ tiam longa vico staras antaŭ la akceptejo, kaj mi ne volis enviciĝi, mi iris sur la bordon de la lago Balatono, kiu estis tuj, ĉe la fino de la teritorio de la Esperanto – lernejo.

Sur la bordo ĉe la barilo maljuna tristsaliko pendbalancis branĉojn al la akvo. Aliflanke boato estis ligita al tero tiel, ke ĝi kuŝis duone sur la bordo, duone en la akvo. Mi eniĝis, sidiĝis. Agrable estis sidi en la posttagmeza duonombro. Mi prenis la bildkarton aĉetitan en la vilaĝo pri Zánka kaj adresis ĝin por mia panjo. Sed, dume mi devis pripensi, kion skribi. Antaŭ foriro de mia hejmo, mi devis promesi al panjo: post mia alveno mi tuj skribos al ŝi pri la vojaĝo, tranoktejo, gekunuloj ktp. Mi ne povis skribi al panjo, ke mi ne havas tranoktejon. Kial mi maltrankviligu ŝin? Do, pri kio mi skribu?

Kaj tiam subite io ekplaŭdis antaŭ mi en akvo de la boatsubo. Mi rigardis tien kaj preskaŭ haltis mia spiro. Grandega rano rigardis al mi. Ne volante moviĝi por, ne forpeli la animalon, mi sidis silente. Mi sidis kaj nur el okulangulo mi rigardis la beston.

Ĝi estis plie malsata, ol timema. Pli grava estis por ĝi forpeli sian malsaton, ol okupiĝi pri mia ĉeesto. Do, post formanĝo de la boatakvo dronintaj muŝo, araneo kaj burdo, ĝi ekrigardis min pli pedante. Tian grandegan ranon mi neniam vidis en mia vivo pli frue. Singarde mi skribis sur la bildkarton, ke mi nun vidis la plej grandan ranon de mia vivo, kaj eble ĝi estas la ranreĝido mem.

Sed, kiam la ranego pensis: sufiĉas jam mia rigardo, traĵetis sin sur flanko de la boato kaj malaperis en la abundkreska subakva mondo, el kie ĝi venis. Larĝa rondo signis sur la akvosurfaco la lokon, kie ĝi subakviĝis. Dume mi postrigardis la ranreĝidon. Sur loko de la subakviĝo aperis juna virvizaĝo. Li invitis min reiri, ĉar intertempe aranĝiĝis mia anonciĝa afero. HEA pruvis mian tien poŝtigitan anonciĝon. Do, ĉio estis jam en ordo. Mi povis prepari min al la vespermanĝo kaj al la sekvonta interkona vespero, amuziĝo.

Post kelkaj tagoj mi aŭdis, ke en la najbareco funkcianta entrepreno produktanta kaj bredante eskuletojn por okcidentaj Eŭropanoj ili suferis grandan malprofiton, ĉar kelkaj bredbestoj sukcesis rifuĝi.

Tiamaniere mi eksciis, ke mia ranreĝido devenis de tie.



*La lago Balatono*

# De Buŝo Al Buŝo

Ni estis junaj geedzoj kaj multe ekskursis. Ĝoje ni aŭskultis historion de la fortikaĵo de Boldogkőváralja kiam ni estis tie. Poste ni havis tian ideon, ke foje ni ŝatus aŭskulti ian popolan fabeldiranton. Ni ŝatus vidi: kiel ŝi parolas, ĉu absorbigas sin mem en la rakonton?

En Boldogkőváralja [boldogkoeva:ralja] la konsultita virino sendis nin al malalta dometo, dirante, ke la maljuna onjo vivante tie, tre ŝatas paroli.

Ni facile trovis la domon. La pordegon malferminte ni vokadis la dommastrinon, sed neniu akceptis nin. Ni eniris en la korton. Fine ni aŭdis, la maljunulinon vokadi siajn gekokojn en la malantaŭa parto de la korto. Ŝi grejnojn ĵetadis al la gekokoj, sed ankaŭ kelkaj paseroj tienflugis rapide. Ŝi vestita estis en malhela vestaĵo, kaptuko kovris ŝian blankan hararon.

Kiam ŝi turniĝis, ekvidis nin, starante ĉe la barilo.

Ni diris saluton kaj klarigis, kial ni vizitas ŝin. La maljuna onjo senvorte atentis nin, poste eniris la domon. Post nelonga tempo kiam ŝi revenis, pura malhelblua antaŭtuko estis sur ŝi kaj du seĝojn kunportis. La onjo proponis, ke ni sidiĝu sur tiujn. Ni dankis kaj sidiĝis.

Ŝi sidiĝis sur la benketon, perdorse apogiĝante al la muro de la dometo, ĝuste vid-al-vide al ni.

Ŝi demandis, ĉu ni vere de ŝi ŝatus aŭskulti ian malnovan historion? Ni jesis. Nu, estas unu, certigis la onjo, sed tiu ne estas fabelo, sed vera historio.

Ni estos la unuaj, kiuj aŭskultos ĉi tiun historion de ŝi, ĉar ĝis nun ŝi rakontis tion al neniu. Ŝi aŭdis ĝin de sia patrino kaj tiu de sia avino, ĉar la rakonto en ŝia familio flugis de buŝo al buŝo. Ĉu ni ne bedaŭras se tio estos malgaja? Ni diris, ke ankaŭ tiam ni volonte ekaŭskultos ĝin.

Ŝi ekparolis, sed baldaŭ signalis, ke la magnetofono ĝenas ŝin, ni deŝaltu ĝin. Ni tiel faris kaj nun ŝi jam senĝene komencis rakonti la historion.

La evento tiam okazis, kiam la posedantoj de fortikaĵo de Boldogkő (Ĝoja Ŝtono) estis veraj reĝoj de la regiono. La fortikaĵhavanto nomigis sian filineton al reĝidino.

La patro tre amis ŝin, ĉar ŝi memorigis lin al lia mortinta edzino. La fraŭlineto havis okulojn bluajn, kiel la somera ĉielo. Ŝia hararo estis, kiel la stipoj kreskantaj sur la fortikaĵapudaj altaĵetoj. Amegis ŝin ankaŭ la kun ŝi kune ludanta servutulinfano.

La fraŭlineto depensade aŭskultis la ŝalmadon de la servutulfraŭlo. Dum la kanto de fajfilo la ĉielo aspektis al pli blua, la verdaro de la kampoj pli densa, kaj pli oreca la spikon maturiga plugkampo.

Se la reĝidino promeni iris kaj la servutulfraŭlo akompanis ŝin, li ĉiam allogadis la birdetojn de siaj nestoj de la fajfado. Li bukedon faris por ŝi de la freŝe kreskintaj heleboroj, pulsatiloj, kaj violoj. Kaj por, ke ŝiaj ŝuetoj ne iĝu kotaj, li sian ĉemizon metis sur la teron antaŭ ŝin. La servutulfraŭlo pensis, ke li donus lian vivon por la fraŭlineto, ĉar tre amis la karan rideton kaj la pure sonorantan laŭtan ridon de la blonda reĝidineto. Kiam la rigida patro ne vidis, ili kune karesadis la katidojn, interbabiladis. Ili estis bonaj geamikoj.

La tempo pasis, kaj la fraŭlineto iĝis dekses - jara. Iu tage la patro deklaris, ke por sia filino li trovis edzon kaj post kelkaj tagoj okazos la gefianĉiĝo, poste baldaŭ la geedziĝo.

La fraŭlino ŝatintus ekkoni la fianĉon antaŭ la gefianĉiĝo, sed tiun la patro ne permesis. Tamen post kelkaj tagoj el malproksimo ŝi sukcesis ekkoni la estontan fianĉon. Ŝi tre malgajiĝis, ĉar tiu estis maljuna. Ŝi sonĝis pri juna, fortbraka edzo kaj pri amoro ĉiam. Ŝi decidis ne edziniĝi kun tiu maljunulo, sed rifuĝi. Ŝi persvadis sian amikon, helpi ŝin fuĝi – kaj ankaŭ li forkuris kun ŝi. La gardistoj nur malfrue malkovris la fuĝon. La patro unue lasis ilin fuĝi, sed poste ordonis ilian reporton.

La gejunuloj kuris en senvojaj regionoj. Ili nokte iris, tage kaŝade ripozis. Sed el la fortikaĵo ĉiam oni vidis kie ili estas, ĉar de tie malproksime estis videbla ĉio. La dornoj en la herbaĉoj siris ilian vestaĵon, la ŝtonoj de la rivereto sangigis, vundigis iliajn piedojn, la branĉoj de la arbedoj skrapis iliajn brakojn, dum la kuroj. Ili manĝis nur sovaĝe kreskantajn fruktojn, ĉar ilia paneto jam delonge finiĝis. En valo de la rivereto Szerencs [serenĉ] en malgranda arbaro, kie ili volis ripozi, la soldatoj de la severa patro kaptis ilin. La fraŭlinon tuj levis en sian selon la estro de soldatoj de la taĉmento. La manojn de la servutulfraŭlo la soldatoj ligis al la sel-arko, kaj tiel ili trenis lin hejmen. Tie lin atendis malhela arestejo, malhela kelo, la fraŭlinon oni vestigis fianĉino.

Baldaŭe okazis la gefianĉiĝo, poste la geedziĝo. Post la ceremonio kaj geedziĝa bankedo, drinkfesto la geedza paro ekiris al sia malproksima hejmo. Sed ili eĉ la pordegon ne atingis, kiam ia ĝeno okazis malantaŭe. Tiam oni alportis la kadavron de la servutulfraŭlo.

Tiun liberigis de lia korpaj kaj animaj suferoj iu malgranda serpento. ĝi tiam ekmordis lin, kiam oni enpuŝis lin en la karceron kaj li falis sur ĝin. Post la rakonto la maljunulino longe silentis kun larmohavaj okuloj. Poste ŝi viŝis la larmojn kaj adiaŭante petis nin, ke sian historion ni bone eluzu, bone prizorgu.

# Panoptiko

Fraŭlino Adela paŝadis multe malantaŭ la ekskursa grupo, ĉar dumvoje ŝi volis rigardi ĉion bone, ja povas esti, ke neniam plu venos ŝi ĉi tien. Do restu ĉio en ŝia memoro. Ĉe la landvojo ŝi rimarkis interesan belaspektan domon tute diferencan de la aliaj vilaĝaj domoj vice starantaj sur ambaŭ flankoj de la vojo kiun akvofosaĵo apartigisj de la trotuaro antaŭ-parcela.

La neĝo jam degelis kaj la neĝa likvaĵo preskaŭ plenigis la akvofosaĵon. Adela ne atentis antaŭ sin proksimiĝante al la parcelo kaj enpaŝis la neĝan likvaĵon. Iomete kolere skuis ŝi ĝin de sur ŝiaj botoj kaj provis atingi la trotuaron kion ŝi fine sukcesis, sed ne kontentige, ĉar de la scivolemaj okuloj la parcelon gardis fero-krada barilo kovrita per ankaŭ drata reto kiun trateksis heĝo de la tamariko.

Adela malkontentis pri la rezulto, sed denove ekprovis vidi plie el la domo kaj la ĝardeno. Fine sukcesis tio de la dekstra najbara parcelo kies barilo ŝajnis taŭga pro ties malalteco. La neĝo de la ĝardeno de bela domo same degelis, sur ambaŭflankoj de la vojeto kondukanta de pordego al la domo videblis rozujoj klinigitaj al grundo, la herbejo antaŭeniĝanta de sub la neĝo freŝe verdiĝis. La bela, interesa domo staris ĉe fino de la antaŭdoma korto. La eble plurĉambran domon, el ruĝa briko levitan konstruaĵon ornamis meze vitrigita verando. Duflanke la ruĝa brika muro per la meze videbla piceo-figuro el flava briko, montris ŝaton de beleco kaj riĉecon de la konstruigantoj.

Nu, mi povas jam rapidi al miaj kunuloj, ĉar mi vidis jam ĉion – konstatis fraŭlino Adela, kiam neatendite ŝi ekvidis katon sidante en pordego-proksimo.

– Ho! Kato ĉi tie! Bonege! Cicc, cicc – komencis ŝi vokadi ĝin. Sed la kato ne moviĝis, ne movis kapon al la vokinto, ne miaŭis, restis tiel same. La bela kato altiris Adelan kiel la magneto. Ŝi eksopiris ameme tuŝadi ĝin kaj paroladi iom kun iu pri la bela domo, kaj la kato. Sonorilis ĉe la pordego, ankaŭ kriadis. Sed respondon ne ricevis. Neniu aperis pordegon malfermi, eĉ la najbaroj ne moviĝis. Eĉ el unu kameno ne alflugis fumo ĉielen. Ĉio ŝajnis senamikeca, la tereno neloĝata, kvazaŭ la domoj estus nur somerdomoj plenplenaj nur per somera vivo. La kato allogis kaj ŝi decidis grimpi tra la barilo al la parcelo por karesi ĝin, poste reen grimpi kaj rapide kuratingi la ekskursantajn kunulojn. La penson sekvis ago. La konvena loko por grimpi montriĝis

sama, kia estis loko de la rigardejo. Baldaŭ kaj plensukcese atingis ŝi teron de la ĝardeno kaj alproksimiĝis al la sidanta besto.

Adela jam levis je tuŝo ŝian manon, kiam rimarkis, ke ne vivanta besto sidas antaŭ ŝi, sed remburita. Ŝi unue koleriĝis, poste ekregis ŝin la konsterniĝo.

– Kia homo povis agi tiel kaj kial?

Ŝi eksentis malbonon. Tuj dorson turnis kaj volis ŝi komenci la reen grimpon tra la barilo, kiam malantaŭe aperis en funebran kompleton vestita virino kun granda nigra hundo. Tiu ina aperaĵo kriis al Adela:

– Kion vi serĉas ĉi tie? Ĉu ne sufiĉis murdi mian edzon, nun vi volas mortigi ankaŭ min? Ĉu vi volas ankaŭ prirabi min?

Adela returniĝis, salutis la virinon, pardonpetis kaj provis klarigi la kialon de ŝia tiea ĉeesto.

Sed la virino ne volis akcepti la pardonpeton. Kolere mansignis foriron tra la pordego. La fraŭlino hontante iris al la pordego, kie atingis ŝin nova malagrabla surprizo. El la pordego elstaris grandaj najloj dense kiel haŭteroj el la broŝo. Ŝajnis, se ŝi kontraŭstarus, kaj la virino incitus la hundon kontraŭ ŝi, la virino povus mortigi ŝin aŭ pere de la hundo, aŭ pere de la najloj, kiuj trapikus ŝin. Kontraŭ la tre danĝera situacio ŝi decidis montri sin decidema kaj al la pordego paŝante petis la virinon malfermi ĝin, ĉar ties seruro aspektante tre rusta, ne montris sin facile etendi. Dume la virino plurfoje mansignis, montrante al la pordego. Poste ŝi la liberan manon en poŝigis. Adela starante antaŭ la pordego atendis anime timtremante pro timo. Kaj dume malrapide la pordego malfermiĝis. Ne per la rusta klinko sed eble pere de ilo teleregi povis funkciigi ĝin la domposedantino. Adela mansignis adiaŭon, elpaŝis al la trotuaro kaj rapide fermis la pordegon malantaŭ si. Post ties fermiĝo jam tie saltadis kaj bojis la nigra besto aliflanke. Adela danko-donis al la Ĉiopova, ke ŝi havis ŝancon transvivi tiun kato-aventuron.

La grupanoj jam venis serĉi ŝin. Kune kun ili atingis ŝi ilian tranoktejon en ripozdomo de naturamikoj, kie ripozis tiunokte la grupo. De ĝia mastro eksciis la turistoj historiojn pri la demandita interesa domo kaj ties loĝantoj.

Ties unua posedanto, la konstruiganto estis forstisto. Heredis la domon lia filo, kiu portis al si edzinon el la fora Transilvanio. Sed je kiam la novedzino ekloĝis, je tiam la najbaraj muzeoj jam bezonis nek ripariston pri pentraĵoj, nek konserviston pri birdoj kaj povis doni neniun alian laboron al ŝi. Nu, ŝi restis hejme por mastrumi, terkulturi

en la ĝardeno. Ŝi vivis nur al la edzo. Poste foj-foje ŝi provis serĉi alian laborejon por dungiĝi, sed vane. Dum ŝia ripoza tempo ŝi amuzis sin per konservado de birdoj kaptitajn sed ne manĝitajn pere de la kato. Deiĝante el inter ŝiaj manoj ili aspektis kvazaŭ vivus. Per ŝia tiu ago konstruiĝis eta ornitologia muzeo je granda ĝojo de la vilaĝaj infanoj.

Iutage ploranta virino sonorigis al domo de la kuracisto por venigis la sinjoron doktoron al kompatinda malsanulino ege maljuna. La virino kondukis la aŭtomobilon sed neniam atingis la loĝejon de la malsanulino. La virin-ŝoforo volis savi surstrate trakurantan katon pro mortiga batiĝo, sed la aŭto falis en akvofosaĵon. La aŭtomobilo renversiĝis, ekbruliĝis kaj ambaŭ vojaĝantoj mortis. Kiam la virino sciiĝis pri morto de la edzo, ŝi svenis, kaj poste abortis. De tiam ŝi vestas sin nur en nigrajn kompletojn. Tiam ŝi malamas la katojn. Ŝi forpelis ankaŭ katon de la edzo dirante:

– Iru for kaj serĉu alian mastron, kiu nutros vin!

Sed, la kompatinda fidela kato ne obeis. Ĝi iradis kaj revenadis en la ĝardeno, sur la strato, ĉe la najbaroj. Atendis, serĉis ĉie tiun ege karan homon, kiu ŝatis glatumi la katinon,  kiu donis krudan viandon kaj en la varmegaj tagoj el la puto tiris malvarmetan akvon al la kato tre ŝatanta lin.  Sed vane. La kompatinda stria kato pro malgajo maldikiĝis, sed ne foriris. Dum varma nokto ĝi dormis sur la ŝtupo antaŭ la verando-pordo, kiam malvarmiĝis jam la vetero, ĝi dormis sur varma felto metita de la mastro en la korbon de kato. Kaj iun matenon sinjorino Cecila trovis la katinon mortan sur la ŝtupo, de kie ĝi vane atendis ekvidi sian mastron sur la verando, kie li kutimis fumi pipon.

Sinjorino Cili rimarkinte la mortinton, kliniĝis al ĝi, enmanigis, levis kaj molvoĉe flustrante diris al ĝi:

– Ej, ci karega kato, eta stulta besto! Kial vi revenis? Ja mi diris, ke serĉu alian posedanton ĉar la malnovan vane ci serĉas jam, ci vidos lin neniam plu!

La karan beston ŝi garde preparis kaj sidigis dum iom da tempo sub la birdan arbeton sur la verando, sed poste estis farita al ĝi dometo tute simila al la vera granda domo. Sinjorino Cecila sidigis la katinon sur ties terason kvazaŭ ĝi atendus la mastron.

Kiam la poŝtisto vizitis ŝin, ŝi komencis klarigi la situacion tiel, ke la murdistoj kutimas reiri al scenejo de la murdoj… La kato estos la alloganto… kaj se tiu venos, la nigra hundo fortimigos tiun.

La tempo pasis kaj feliĉe nenia malbono okazis. Sed la soleco iom-post iom iĝis pli prema al la vidvino. Kaj poste iufoje ŝi elformis el vakso figuron de sia edzo, vestis la korpon en la edzan kompleton kaj sidigis sur la verandon, la pipo kuŝis apude surtable, kaj la edzo ŝajnis legi. La poŝtisto timtremante iris tien kajrakontis, ke li vidis la edzon de sinjorino Cecila, kaj sentis ankaŭ lian pipo-fumon. Poste ne nur li, sed ankaŭ la najbaroj vidis sinjorinon Cecila agadi ĉirkaŭ la edzo, serĉante ties emon, kvazaŭ la edzo vivus. Sed, ĉar la kompatindulino faris malbonon al neniu, oni lasis la silentan frenezulinon kun ŝiaj ekstravagancoj.

Tiel kreiĝis tiu panoptiko, kiun jam neniu vizitas plu.

# La Misio

Kiam mi naskiĝis, la frumatenan ĉielon meteoro trapasis. Tiam nur mia mastro kaj kelkaj fruleviĝantaj vilaĝanoj vidis tion. Ili superstice susuris, ke venos eksterordinaraj tempoj.

Do, por mia mastro jam mia naskiĝo estis sufiĉe eksterordinara, ĉar li ne sciis pri la gravideco de mia patrinjo. Krome rara okazo estis, ke la granda blanka komondor-hundino ne naskis la laŭkutimajn naŭ idojn, sed nur min solan, la nigran puli-on kun blanka stelo sur la ventro. Oni nomis min Kormoŝ /Fulga/ pro mia nigra hararo. Sed ĉinome nur ili vokis min:

– Kormoŝ venu ĉi tien!

Se ili laŭdis min pro kontenteco, ili diris:

– Bona hundo, saĝa hundo vi estas!

Kiam mi povis jam iri, mi ĉiam obstakladis antaŭ ĉies piedoj. Mia mastrino grumbletis pro tio, sed mia mastro trankviligis ŝin:

– Lasu, karulino, vi ekvidos, ĝi iĝos bona brutpela hundo, kiu rekompencos la prizorgon! Mi instruos ĝin por ekkoni ĉion pri la hejmaj sciindaĵoj kiujn la hundolernejo postulas pri la devkonoj de la gardaj-defendaj- blindakompanaj hundoj. Tiel, fine ankaŭ lia edzino paciĝis pri mia ekzisto. Foj-foje ŝi tamen grumblis kun sia edzo, kaj ĉefe tiam, kiam la sinjoro parolis al mi per sia propra lingvo.

– Kial vi konfuzas tiun hundon, ĉu vi pensas, ke ĝi komprenas eĉ unu vorton de via parolo krom viaj komandvortoj? – demandadis ŝi – kaj ĉar la edzo ne respondis, la parolado ne finiĝis. Mi devis ĉiam tre atenti la paroladon, por kompreni ĉiun familianon, ja la mastro tute alimaniere parolis kun la familianoj kaj la aliaj homoj. Mi devis gardi la aliajn kvarpiedulojn paŝtantajn sur la herbejo etendiĝanta de nia domo tute ĝis la arbarrando, krom niaj hejmaj birdoj kaj la kunikloj vivantaj en kaĝoj. Mi devis priboji ĉiun fremdulon, pel-gardi la ŝafojn, forpeli vulpojn kaj vagantajn hundojn, katojn, sed nian hejman katon mi ne rajtis ĝeni. Kiam mi alkutimiĝis jam al la ĉirkaŭdomaj farendaĵoj, la mastro ligis hundŝnuron al mi kaj kondukis min al promenado kun li. Ni travagadis la proksiman arbaron tute ĝis Miŝkolc-Tapolca Banloko. Kiam ni estis nur solaj, li lasis min kuri tute libere laŭplaĉe sen hundoŝnuro. Dume mi povis ekkoni la spurvojetojn kun la plej diversaj odoroj de la arbaraj bestoj. Ni faris viziton ankaŭ ĉe la Ŝtonminejo. Poste, foje mia mastro decidis; ni iros por ĉasi. Dum la tuta marŝado mi

devis iri sen hundoŝnure silente en liaj spuroj. Iuloke li haltis, atentigis min silenti kaj ordonis nun resti malantaŭ li. Por vidi iom, mi leviĝis surpiedon kaj tiel kaŝrigardis antaŭen, de malantaŭ liaj botoj. Ĉi tiam ekknalis lia pafilo, kaj de la neatendita forta knalo mi tiel ektimis, ke sekve mi pisis sur liajn botojn. Li spertante ĉi fiagon, malantaŭenturniĝante iome kolerete alvokis min:

– Nu, ek, ci heroo, kuregu, portu ĉi tien la predon! Mi volas vidi ĉu lerta ci estas!? Ĉu ci povos?

Feliĉe, mi baldaŭe ektrovis la fazanon kaj kurege portis ĝin al mia mastro. Li, paceme batadis mian dorson. Kiam ni hejmenalvenis, la dommastrino denove grumblete alparolis sian edzon:

– Kio okazis denove, kial vi odoras kvazaŭ vi estus hundo?

– Ho, okazis malgranda akcidento, sed tio tute ne gravas! Sed gravas, ke el ĉi hundo povus iĝi tre bona ĉashundo!

La mastrino surrigardante min, diris:

– Bone, tiam ni devas doni donacon al ci.

Kaj, mi vere ricevis donacon, unu flugilon el la kuirita fazano. Sekvajare la mastro pruntedonis min por gardi boatojn de la Boatlago de Miŝkolc-Tapolca. Oni diris, ke mi Fulga, bone aspektas tie, inter la blankaj kaj ruĝaj boatoj sur bordo de la verdakva lago. Miajn novajn devojn mi rapide alproprigis.

En unu varma nokto somera okazis la evento, kiu ŝanĝis mian tutan vivon.

La banejaj gastoj estis jam for, la parko estis senhoma. Sur la ĉielo briletis nur kelkaj steloj, kaj eĉ la luno nur pale alradiis la teron. La silenton rompadis nur mallaŭtaj krietoj de malfruaj birdoj. Mi komode kuŝiĝis sub benkon. Mi jam preskaŭ ekdormis, kiam min salte vekis forta bruo kaj blindiga lumo. La lumo venis de malantaŭ la ŝtonminejo. Kiam ĝi venis al la banejparko, komencis faladi el ĝi harsimilaj aĵoj. Alteriĝinte tiuj transformiĝis je homoj portantaj perlamot-bluajn vestaĵojn. Flanken-kuŝante mi silente observis, kion ili faras. Ili duonarke ordigis seĝojn kontraŭ la enirejo de la Grotbanejo, kaj muntis podion. Mi ne komprenis, kio okazas. Du fremduloj – ilia staturo sugestis ke estis inoj – venis al mi. Ili alparolis min mallaŭte-ĝentile, kaj plurfoje glatumsis mian kapon. Mi pro surprizo ekbojis, ĉar – mi komprenis ilin! Tuj ili klarigis, ke per tiu karesado ili transdonis al mi la kapablon kompreni kaj paroli sian lingvon. Ĝustatempe ili avertis min, ke mi ne rajtas ataki la katon sidantan sur la najbara banko nur pro tio, ke ĝi estas alia ol mi. Aliflanke apud mi staris niaportaj ĉevalo kaj ŝafo.

Mi ĝojis vidi ilin en mia proksimeco, ĉar tielmaniere mi povis gardi, ne perdi ilin de antaŭ miaj okuloj.

Intertempe la seĝvicoj pleniĝis per gastoj blue kaj verde vestitaj. Kaj la mastro de la kunveno ekparolis. En tiu lingvo, en kiu mia mastro kutimis paroli al mi, kaj al siaj instruataj gardohundoj. Ni eksciis, ke li estas la ŝtatprezidanto de Esperantio. Post lia mallonga malferma parolado la ĉeestantoj ekstaris kaj kantis la himnon „Espero.” El la inundo de la sekvintaj paroladoj, demandoj kaj respondoj mi sukcesis ekscii sufiĉe multe pri la misteraj fremduloj. Ili estas loĝantoj de Esperantio. Il vivis sur planedo simila al nia Tero, sed pro tronombriĝo de la loĝantaro parto de ili transloĝiĝis al alia planedo. Kiel ties dua ŝtatlingvo ili elektis esperanton, ĉar el ĉiiuj lingvoj de sia patrinplanedo kaj de la Tero tiu pleje ekplaĉis al ili. Nun ili klopodas konatigi tiun lingvon al la popoloj de ĉiuj loĝataj planedoj de la Galaksio. Tien ili venis ĝuste pro tio, ke Tero estas la naskoplanedo de Esperanto. Kaj tial ĝuste nun, ĉar por la teranoj la jaro 2009 estas la Jaro de la Astronomo kaj la 400-a datreveno de la astronomia ekuzo de la teleskopo. Sed ili devas tuj forveturi, ĉar intertempe ilian planedon katastrofe trafis meteoritego. Por forigi la konsekvencojn oni bezonas ĉiujn fortojn, kaj eĉ tiel tio daŭros longe.

La Planedmastro demandis min: ĉu mi akceptas la mision, transdoni informon pri ili al la teranoj? Mi kuraĝe jesis. Sed mi demandis: kial ili ne kontaktas la homojn senpere? La respondo surprizis kaj malgajigis min. Li diris: ili ja konas la historion de la popoloj de Tero. Ties esenco estas konkero, senindulga lukto por subjugi aliulojn, ekspluati la riĉaĵojn de la planedo. Tio jam havis viktimojn ankaŭ inter la esplor-kosmonaŭtoj venintaj el aliaj mondoj. La loĝantoj de Esperantio ne volas riski malamikan ricevon. Por havi amikajn kontaktojn kaj pacan kunlaboron, la tera homaro devas ankoraŭ multe evolui. En tio vi povas helpi al ili. Ni atendas pacience ke ili anoncu sin, en la interplaneda lingvo esperanto. Tiam ankaŭ ili povos aliĝi al la popoloj de granda Kosmo.

Multe mi povus ankoraŭ rakonti pri la bildoj montritaj, la muzikaj prezentadoj kaj odorsimfonioj, kiuj estis almenaŭ tiomgrade eksterordnaraj, ol la evento mem…, la *unua interplaneda Esperanto-kongreso.*

Ili forveturis same rapide, kiel ili estis alvenintaj. La lumo estingiĝis, kaj, elĉerpite, mi profunde ekdormis sub la benko. Longe, longe mi atendis ke ili revenu, sed vane. Mia mastro daŭre parolis al mi

Esperantlingve, sed mi vane klopodis respondi al li tiel, ke li komprenu. Do, al kiu mi turni min kun mia misio? – turmentis min la penso. Ĉu entute troviĝas iu, kiu komprenas kaj eĉ kredas, kion mi diras?

Finfine mi ekvidis la geedzan paron Pásztor starantan sur la ponteto de la lago kaj admirante la sunsubiron. Ili ofte promenis tie, kaj akompanis tien esperantlingve parolantajn gastojn.

Mi alparolis ilin, kaj rakontis ĉion al la virino, kiu dume trankvilige karesadis min.

Nun mi jam estas trankvila, ĉar la historion de mia vivo ŝi priskribos en sia ĵurnalo. Tiamaniere ŝi helpos informi la homojn pri Esperantio.

Tiel okazis, ke mi – grava hundo, saĝa hundo! – plenumis mian mision.

# Ermito Nia-epoka

Kiel vi scias, multaj pastroj, pastoroj, rabenoj vivas en la mondo. Mi, nun rakontos pri iama romkatolika pastro vivanta en Hungario, Budapeŝto. Kiam mi ekkonis lin, rigardante lian aĝon, li povus esti jam mia patro. Li vivis sola, en la kvin ĉambra loĝejo aĉetita de lia patra avo, ankoraŭ antaŭ la naskiĝo de la unua nepo. Post morto de sia frateto kaj panjo, li ne vokis al si sian fratineton, loĝi kune en la patra loĝejo.

Li ne volis, ke aliuloj adaptiĝu al sia vivmaniero kaj ankaŭ li ne volis dividi sian vivon kun aliuloj. Tiel post morto de panjo de la maljuna pastro, la fratino vizitadis lin po du semajnoj, portante por la frato al du semajnoj manĝaĵojn, purajn vestaĵojn kaj la bezonatajn purajn aĵojn al la doma mastrumado. Pere de purigado de la loĝejo kaj la alia prizorgo ŝi volis, ke la frato havu neniom da manko pri la virina prizorgo. Vere la frato foje diris al ŝi, ke ŝi faru nenion en lia intereso, ĉar li estas prizorgata bone de la kredantoj. Ŝi rememoris kiel portis la kredantoj la dikigitajn anserojn kaj kokojn al la ermito de Fallóskút [fal:oŝkut] en la montaro Mátra (ma:tro), dum iu eklezia festo. Sed la fratino faris tamen ĉion laŭ sia bontrovo, ĉar ne trovis spurojn de la necesa prizorgo pri ŝia frato.Aliam la pastro turnis sin al sia fratino: kia feliĉo estas, ke li ne devas pagi pro la  prizorgoj, ĉar tiel li povas meti lian tutan monon al la templaj monujoj por la malriĉuloj. Kaj vere okazis tiel. La fratineto vidis kelkfoje, kiel metis ŝia frato sian altan suman pension en monujojn de la proksimaj kaj malproksimaj preĝejoj.

La frato pensiuliĝis kiel ĉefinĝeniero. Li poste plenumis la teologiajn studojn en Esztergom [estergom. En kadro de la romkatolika eklezio li diservis 21 jarojn, kiel romkatolika pastro. Pro la prizorgo pere de la fratineto, li vivis nur el sia pastra monata salajro, kaj la restintan monon li povis meti en la bankon por kolekti kiel postmortan donacon al malriĉuloj de Budapeŝto. Li ne rememoris pri la personaj festoj (naskiĝtagaj, nomtagoj, paskaj kaj kristnaskaj) de la gefrata familio, li neniam donacis ilin. Ja, la fratino kaj ŝia edzo laboris, neniam plendis, do ili certe havas la necesajn viv-cirkonstancojn, kial do ili estu donacataj de li? Dume precize pasis la tempo kaj la frato iĝis 85 jaraĝa. Post la festo de lia naskiĝtagreveno, li petis la fratinon ne serĉu lin por prizorgi, ĉar li trovis iun kredanton, kiu prizorgos lin same kiel fratino, kaj li vere ne deziras jam plie. La fratineto petis, ke povu ŝi ekkoni la

bonanimon, por karesi tiun. Sed tiu renkonto ne realiĝis. Poste la fratino vane serĉis la fraton plurfoje, ne trovis lin hejme. Kiam fine ili renkontiĝis, en la loĝejo regis granda malordo, kaj mankis kelkaj objektoj. Al demando, la frato tion respondis, ke li deziras lasi eniri en la loĝejon neniun. En la tuta loĝejo la plankoj estis grizaj de la polvo kovrante ĉion, sur la planko papereto-montoj leviĝis. Je nova demando la frato tion respondis, ke por ne forgesi la farendaĵojn, li skribas surpaperojn ilin por atentigi sin al gravaĵoj. Sed la jam ne necesajn paperetojn li tial ne forĵetas, ĉar tiel li ĉeestas ĉie, li ne sentas sin sola. Li estas la plej bona societo por si mem. Li jam volas elspezi neniom por si mem. Li jam ne plibonigas la malboniĝantan kamentubon, li ne uzas elektran lumigadon, li hejtas per nek ligno, nek gaso, nek elektro, – tiuj estas forigitaj el sia loĝejo. Tage la suno varmigas la loĝejon, el kio restas iom ankaŭ al nokto. Por eviti la frostiĝon vintre en sia loĝejo, li bone vestis sin kontraŭ la nokta malvarmo. Ne uzante vespere lampon, la forrestintan vesperan laboradon li anstataŭas tiel, ke li ellitiĝas je la unuaj matenaj sunradioj, kaj post tio tuj eklaboras. Nenian lukson li deziras tiel, li povas doni lian havaĵon al la nenion havantoj. Sed li donas pluse siajn instruajn konvinkojn al la homoj, ĉar dume li verkis ankaŭ du librojn. En la pseŭdonome eldonita lia unua libro, li prijuĝis liajn pastro-kunulojn vivantaj lukse, uzantaj multekostajn aŭtomobilojn, televidojn, telefonojn, multekoste nutrante sin dum iliaj eksterlandaj vojaĝoj.

Li sekvis ekzemplon de Francisko la sankta, forĵetite la de liaj pastro-kunuloj spertitan luksan homan vivmanieron. Ankaŭ lia alia verko havis eklezian temon: Rolo de Pastroj de Virgulino Maria la sankta, en la nuna romkatolika eklezio. En ĝi li publikis siajn instruojn: vivu la pastroj ekzemplodone al la sekvaj generacioj, por pluvivo de la eklezio, ĉar ĝia rolo ne disvastiĝis ekde la hungaria politika ŝanĝiĝo. Li prijuĝis pekojn de la eklezio. Lia dua libro estis ankoraŭ ne eldonita, kiam li eksentis finon de sia vivo. Li faris skribe sian lastan volon. Li lasis sian tutan havaĵon ne al sia fratineto, sed al iu monaĥejo, por prizorgi la malriĉulojn el tiu heredaĵo, ke li povu pace ripozi en la jam sopirita transmondo. Kaj post longaj sed tolereme tenitaj suferadoj li mortis en sia 86-a jaraĝo.

La fratino informite pri la fina volo, petis la ordenon por ricevi iom el valoro de la patra loĝejo. La ordeno kaj ŝi konsentis pri tiu ago.

Por la maljuna pastro oĉjo liaj pastro-kunuloj aranĝis pompan pastran entombigan ceremonion por honorigi lin, kiel sian mortinton.

21 pastroj faris la entombigan pastran ceremonion, ĉar la mortinto 21 jarojn diservis. Sed kiam ili sciiĝis pri tio, ke la mortinto sian havaĵon valorante plurajn milionojn da forintoj ne por ili lasis, ili petis pagi al ili la egalvaloron de la de ili aranĝita entombiga ceremonio. La heredantoj pagis al la romkatolika eklezio la de ĝi deziritan sumon.

– La fratineto havis amaron ne pro la pago, sed ĉar el inter la ceremonion farantaj pastroj unu ne venis al ŝi por esprimi kondolencon. Kaj ne nur ŝi havis amarajn pensojn, sed ankaŭ tiuj ĉeestantoj, kiuj konis kaj amis la mortinton, ĉar la estintaj pastro-kunuloj en morto humiligis ilian pastro-partneron kiu vere meritis la honoron, la donantan lastan ceremonion de ili, sed ĉi agon ne. Ili aĉe agis per tiu homo, kiu estis ermito de la 21a jarcento, kiu agis en sia tuta vivo en intereso de la katolika eklezio, en disvastigo de la dio-kredo.

– La ermito niaepoka entreprenis malsaton, vintre nehejtitan ĉambron, monon al mono li kunmetante kolektis sian monatan pension por helpi la malhavantojn. El tiu por li ricevita donaco de la vivo, li klopodis la eblan plej multon donaci plu al tiuj homoj, kiuj pro io ne estis same donacitaj kiel li.

– Ili humiligis tiun ilian pastro-partneron, kiu oferis sian junan vivon 41 jare senkulpe pro maljuna pastro; lia spirita pastro-patro, dum la 1960-1961 jara, de li: al politiko-koncepta proceso nomita hontinda okazintaĵo, en kiu la maljuna „pastro-patro" prijuĝinda al plenigo de malliberejo certe ne estus travivonta ĝin. Nia oĉjo pastro: ermito de nia erao estis en malliberejo tri jarojn. Li liberiĝis pro ricevo de indulgo post la nialanda vizito de kamarado Hruŝĉov prezidanto de la rusa Komunista Partio. Mi scias, ke el inter liaj nunaj pastro-kamaradoj - kiuj nun petis repagi la koston de la ceremonio en la eklezian kason tial, ĉar post la mortinto restis heredaĵo - eĉ unu patro ne estus, kiu estis havinta kuraĝon agi same tiam. Lia ago meritas nur estimon! Sed tiun donon de estimo forgesis fari la hungaraj pastro-kunuloj por la ermito nia eraa. Lia postmorta mono donacita al malriĉuloj de Budapeŝto estis tiu mono, kiun li ricevis de la hungara ŝtato kiel kompenson pro liaj suferoj pro tiu maljusta politika proceso, sed el kio li restigis por si neniom.

– Post la entombiga ceremonio ni diris:

– Bone estas, ke ĉi agon de liaj pastro-kunuloj jam ne vidis la mortinto. Iu respondis je tiu:

– Eble li dirus pro la situacio:

– Mi elpensis ĝuste por ne lasi mian havaĵon al miaj pastro-kamaradoj, ĉar, kiuj estas monavidaj, venĝemaj, sensentemaj, tiuj ne meritas la per Dio donacitajn terajn havaĵojn, krome la de mi nun prizorgitaj malriĉuloj certe ne estus posedontaj miajn valoraĵojn ricevitajn kaj garditajn de Dio, por ke mi povu nun donaci al malriĉuloj de Budapeŝto.

# La hamstro kaj Dio la Ĉiopova

*- Fabelo -*

En la vasta valo, inter la du arbaraj deklivoj de la karsta montaro de Aggtelek, la homoj produktis maizon, luzernon kaj cerealojn.

La hamstro loĝis kune kun sia familio sub la luzernejo. La bone elformitaj subteraj galerioj de la vivantejo protektis la posedanton kontraŭ la vintra frosto, donante por ĝi varman hejmon, nutraĵejon kaj ŝirmejon. Ties galerioj havis kaj en –, kaj elirejon. La hamstro saĝe provizis sin ankaŭ per vojo por eskapi. Tiu kondukis sub grandan rokon kuŝantan ĉe la arbarsube fluetanta rivereto ĉirkaŭitan per densa herbejo kaj tusilagoj. Por la hamstroj la naturo disponigis multe da kaŝejoj en la zigzagoj de la roko.

Ĉiumatene la hamstro-paro ekiris por akiri nutraĵojn por manĝigi siajn idojn per la kolektitaj grajnetoj. Sed foje la virhamstro senŝpure malaperis. Kion fari? La hamstrino devis sole daŭrigi la manĝaĵkolektadojn por la idoj. Ĝi devis plurfoje forlasi sian ŝirmejon, ĝis la malsatajn stomakojn de siaj etaj idoj ĝi povis plenigi per la semetoj kolektitaj en siaj buŝegsakoj.

Iumatene la hamstrino plenigis unue sian stomakon, poste plenpleniginte sian buŝegsakon, ekiris hejmen. Ĝi jam ne estis malproksime de sia hejmo, kiam devis ripozi kelkajn minutojn, ja plenplenstomake kuri estis laciga. Subite ĝi ekrimarkis la ombron de serpento kliniĝanta super ĝin. La hamstrino terure ektimiĝis. Kiam la serpento komencis etendigi sian forkan langon al ĝi, la hamstrino kompreninte la minacantan danĝeron, alparolis la serpenton:

– Bonan matenon, sinjoro! Ĉu ankaŭ vi ĝuas la unuajn sunradiojn?

La serpento pli alproksimiĝis, atenteme rigardis la hamstrinon, kaj respondis:

– Ho, jes, sed mi plie ŝatus matenmanĝi, ĉar jam du tagojn mi ne manĝis. Poste mi portus matenmanĝaĵon al miaj idoj, kiuj ĵus eliĝis el miaj ovetoj. Mi vidas, eble ankaŭ vi havas idojn, ĉar via ventro estas maldika. Vi estas malgrasa, sed vi estus por mi bona matenmanĝo.

La hamstrino vidante, ke nur la hazarda feliĉo povus savi ĝin, ekpetegis la serpenton, ke tiu ne volu tuj manĝi, atendu iom, eble povos kapti ian pli grandan viandaĵon.

– Mi atendas mian paron – diris la hamstrino – ni renkontiĝos kun kukolo, kiu vidis ie bonajn semetojn. Ilin rigardante la kukolo pensis pri niaj idoj, ke pro tiuj bonaj grensemoj niaj idoj pli bone kreskiĝos. Atendu la birdon, kio certe ne venos sola… – petegis la hamstrino la serpenton.

– Nu, kvankam mi estas vere tre malsata, mi eĉ povas atendi kelkajn minutojn – pensis la serpento kaj serpentumis iomete malantaŭen-Ĉi momenton eluzis la malgranda hamstrino por proksimiĝi al la roko. Dume ĝi ekpreĝis:

– Ho, Ĉiopova! Ho, mia granda Di'! Savu, nur nun unufoje mian vivon! Nur nun, unufoje helpu min, ĉar se mi ne estos, kiu nutros miajn etulojn? Ili ĉiuj malsatmortos sen mi! *Se vi savos min, ĉiam miaj idoj estos la unuaj por manĝi, kaj mi estos la lasta!*

Kaj tiam diris Dio:

*– Eksciu ci hamstrino, ke Mi, la Ĉiopova havos gracon al vi, mi savos vian vivon, ĉar vian promeson mi prijuĝas serioza. Sed poste ne forgesu vian promeson, ĉar tiam mi ne donos jam plian gracon al vi!*

La hamstrino jam levis supren sian kapon esperante, kiam la serpento rimarkinte la rifuĝvolon, ĵetis sin al ĝi, por kapti la rifuĝi volantan.

Sed tiumomente, kiam la serpento ekmoviĝis, kiel fulmobato elĉiela, falegis iu granda korpo tuj apud la hamstrinon. Ĝi timtremeĝante sentis kiel tuŝas sian bruston grandaj ungegoj.

Kiam la paralizanta terurego ĉesis kaj la hamstrino ĉirkaurigardis, ĝi ekvidis la serpenton, sian malamikon pendantan el la beko de granda aglo fluganta al la alta ĉielo.

La hamstrino eĉ ekkompatis iomete la malamikon, sed tamen ĝojis, ke ne si fariĝis predo de la aglo.

## La Perdita Mono

La pension atendantaj geedzoj ne aŭdis la sonorilon de la poŝtisto portanta monon, nur post lia foriro trovis ili lian atentigilon, ke pro ilia netroviteco por akiri ilian monon ili devas viziti la ĉefpoŝtoficejon. Kion fari? Andriŝ (Andreĉjo) entreprenis eniri la urbon por transpreni ilian monatan pension. En la bela printempa vetero li fajfante iris for post kiseta adiaŭo de la edzino.

– Mi rapidos – promesis li.

En la ĉefa poŝtoficejo li transprenis la monsumojn, metis ilin en aktujon kaj poste enbusiĝis por veturi hejmen.  Elrigardante el fenestro de la veturilo la granda parko ŝajnis netumulta. La printempa vento disblovis la nubojn. El brile blua ĉielo ridis sur lin la suno. Li pensis, ke en tiu ĉi belege sunradia vetero bonefikos la promeno tra la parko. Alproksimiĝante la lastan haltejon, vidalvide en la alia bushaltejo li vidis societon de gejunuloj atendantaj la revenintan aŭtobuson volantan pli frue turni sin sur la trafikcirklo. Li elbusiĝis kaj ekiris al la societo, kiu ŝajnis grupiĝi ĉirkaŭ blondulino kiu povis esti eble ŝatatulino de la trupo.

– Sur ŝia juna korpo streĉiĝis la farmista-pantalono, de ŝia ĉemizeto de sub la sama farba jaketo apenaŭ eliĝis ŝiaj bel-formaj malgrandaj mamoj, kaj ŝia ĉemizeto cedis por rigardi ŝiajn belajn kolon kaj kokson.

– Tute tia estas ŝi, kiam mian edzinon Magda (Magdalena) mi ekkonis, kaj ni estiĝis bela paro – miregis sinjoro Andriŝ. Dume la admiro restigis lin en ilia proksimeco. Starante ankaŭ li en la bushaltejo per siaj du maleoloj prenante la aktujon pli frue metitan surteron, kaj iom honteme li rigardis tiun blondulinon. Ho, sur mia karega Magda videblas jam spuroj de la forpasintaj jaroj. Ŝi peziĝis dume, sed feliĉe ŝia naturo neniom ŝanĝiĝis. Ŝi estas ankaŭ nun kara, ĉarma, aminda. Enpensojn profundiĝante Andriŝ ne rimarkis, ke ekde iom da tempo jam ne la blondulino, sed li estiĝis centro de la societo. Poste tamen rekonsciiĝis li pro urĝo de tempo por iri hejmen. Dume la trupo disiĝis. Iuj iris promeni, aliuloj forvojaĝis buse, kaj denove aliaj junuloj iris al la restoracieto proksima. Eksentante aktualecon de la ekiro, klinis sin por preni la aktujon de sur la tero. Sed lia mano prenis nenion. Li surpriziĝis, konsterniĝis netrovante la aktujon tie, kien li metis. Li komencis demandadi la starantojn ĉirkaŭ li, ĉu ili ne scias, kien malaperis sia aktujo. Sed ili vidis nenion, ne sciis pri la aktujo. Kaj estis,

kiuj minacis lin per batado, se li rigardas ilin ŝtelantoj, ja ĉiu povas vidi, ke ne estas ĉe ili la serĉanta aktujo. Andriŝ timiĝis. Ne nur ilia tuta mono perdiĝis, sed ankaŭ liaj legitimiloj rajtigiloj kaj ŝlosiloj. Se li devos denove farigi la legitimilojn, rajtigilojn, la oficistoj forte monpunos lin ĉar li ne gardis pli bone la perditaĵojn. Kaj timis li ankaŭ pro la jura riproĉo fare de lia edzino pro perdo de la valoraĵoj. Pro la ĉagrenadoj lia gorĝo malsekiĝis, apenaŭ povis li gluti salivon. Por ekhavi pli da salivo, li ekiris al la proksima restoracieto. Unue li petis unu botelon da biero, poste denove unu. Sur la benkon sidante, li rapide trinkis unu botelon da biero kaj klinante kapon sur tablon pensadis pri la evento. Havante jam sufiĉan forton, sed hezitante kiun direkton elektu al hejmeniro, ekrigardis sian ŝulaĉon deligiĝinte. Kliniĝante, ke ligu ĝin, rimarkis aktujon surtere ĉe la tablo. Li tuj sciis, ke tien nur tiu juna paro povis meti ĝin, kiu dume alvenis, sursidis proksime al li, manĝis-trinkis kun la surbrake sidanta infaneto kaj poste foriris.

Andriŝ alprenis la aktujon por rigardi ties internon. Jes, ĝi estis sia. Ĉia lia necesaĵo estis en ĝi, nur la mono mankis. Poste li ekiris hejmen tra la parko ke trankviligi povu sin pere de la freŝa verdo de la parka gazono.Li eksidis proksime al la lago. La aktujon li metis surgenuojn, enbuŝigis iom el la biero, poste metis la botelon apud la benkon. Dume li rimarkis homojn rapide ĉarpenti scenejon kaj baldaŭ agordi instrumentojn ia orkestro. La sidejon dume okupis la aŭdantaro vestita en specialaj vestaĵoj. Li scivole atendis la okazontaĵojn. Foj-foje li enbuŝigis buŝplenon el la botelo de la biero, ĝis ties tuta elĉerpiĝo. La programeroj rapide sekvis unu la alian. Rolis tie brilaj spacovestaĵaj eksterteranoj, kliniĝantaj floroj al taktoj de la muziko kaj abioj, poste grandaj papilioj alflugis kun multkoloraj kaj blankaj flugiloj. Tiuj lastaj poste manĝis unu la alian. Sed kiam ili saltis al la publiko, Andriŝ pro timo tremante metis siajn manojn antaŭ sin kaj komencis kriadi:

– Ho, ne! Min ne manĝu! Ho, ve, min ne! Sed vane li protestis. Kaptis lin du papilio-piedoj kaj komencis skui. Kiam li rekonsciiĝis el sia sonĝo, ĝoje li konstatis, ke ne la murdantaj papilioj, sed nur du policistoj staras antaŭ li, tiuj skuis kaj kriadis vekigante lin.

– Kial vi veadas, kriaĉas tiom terure? Kio okazis? Ĉu vi malsanas? Via ĝemo aŭdiĝas ĝis la alia bordo de la lago!

Sinjoro Andriŝ plenmezure vekiĝinta vidis sur la botelkolo unu ebrian burdon, la scenejon oni jam malkonstruadis. Pri lia kompleto li devis forigi la multajn velkintajn florpetalojn falintajn sur ĝi de la tuliparbo kliniĝanta super lin. Li dormis kaj sonĝis pri teruraĵo –

klarigis li al la policistoj, kiujn li petis akompani lin hejmen, ĉar pro lia tremado ne povus li iri sola. La policistoj scivoleme akompanis hejmen lin. Post ilia adiaŭo ili restis pordego-proksime aŭskulti, kion rakontos la ebriulo al la edzino kaj ŝi, kiel akceptos fabelon de la edzo. Ili aŭdis, kiel estis prirabita la edzo, kaj, kio okazis poste. Ankaŭ ties atestantoj estis ili, ke la edzino rakontis pri la okazintaĵo atinginta ŝin antaŭjare. Ŝi ĝojis, ke la edzo feliĉe alvenis hejmen. Sinjorino Magdalena trankviligis la edzon, ke ili same travivos ankaŭ ĉi okazintaĵon kiel pli frue, sed nun ili povos iri somerumi nenien pro la perdita mono. Alitage la tagĵurnaloj enhavis la famon kia bone sukcesis la unua Printempa Teatrista Festivalo, kie kaj la teatristoj kaj la publiko aperis en laŭepokaj kostumoj. Nur tio estis bedaŭrinda, ke la forflorinta tulip-arbo tiom forte faligis ĝiajn velkintajn florpetalojn.

Post paso de nova semajno la urba televido komunikis la novaĵon, ke la policistoj sukcese kaptis tiun bandon de rabistoj kiu „laboris" ĵus en tempo de la Teatrista Festivalo.

# Ekskurso en Okcidenta Slovakio

*– Raporto-detaloj –*

El revuo *Esperanto* – oficiala organo de UEA – ni estis informitaj pri la Tutslovakia Esperanto Kongreso aranĝenda en urbo Piešťany (26-28 de majo 2006). Ni, la geedzoj Pásztor, tuj informis ties ĉeforganizanton, samideanon Peter Balaž [Petro Balaĵ], pri nia partoprendeziro. Li tuj respondis kaj informante nin pri la kondiĉoj de la partopreno, sendis retpaĝadreson, kie ni povus trovi la mapon de la kongresurbo kaj sur ĝi la lokon de la akademia lernejo „Ludovit Winter" kaj studenthejmo, kie estis okazonta la Esperanto-Kongreso, kaj kie ni havis ankaŭ nian tranoktejon.

La tempo ekvojaĝi rapide alvenis. Ni estis ekscititaj pro la problemoj: en nekonata lando, ne konante ties nacian lingvon, ne havante tie helpanton, kiel ni atingos la kongresejon, kiun ni ne sukcesis ektrovi sur la mapo? Kaj ankaŭ mia telefono ekmalfunkcis, do mi povis nek voki Peter Balaž por demandi kiel atingi la kongresejon.

Por ne perdi valoran tempon, ni planis antaŭtagan alvenon. Krome ĝis nia trajnavojaĝo mi ellernis plurajn slovaklingvajn frazojn, esprimojn el slovaka esperantista konversacia poŝlibro. Tiun ni ricevis de nia malnova samideano Michal Kucin de Košice , en la 1978-a jaro.

En urbon Piešťany [Pieŝtani] ni alvenis el direkto de la slovaka ĉefurbo Bratislava. Ni ne eltrajniĝis tie. Sed el la fenestro ni vidis la *kvar bastionan fortikaĵon* de la ĉefurbo.

Do. La 25-an de majo ni alvenis en la kongresurbon Pieŝt'any. La trajno ege malfruis. Anstataŭ la 22,15 ni alvenis noktomeze.

Eltrajniĝinte, ni vidis nek taksion, nek aŭtobuson. Eĉ ne videblis homoj, de kiuj ni povus demandi kiun direkton elekti kaj kiel atingi la lokon. Sed post kelkaj minutoj haltis tie persona aŭtomobilo, kaj ties vojaĝintoj komencis paki en ties deponejon. Alparolinte ilin, slovaklingve mi petis helpon, kiel ni povus atingi la adreson montritan de mi. Unue ili mirante atentis nin, kaj mallonge interparolis slovake. Poste ili invitis nin sidiĝi en la aŭton. Ili veturigis nin ĝis la enirejo de la kongresejo. Dumvoje ni interparoladis angle, sed ĉefe slovake. Ili eksciis de ni nian vojaĝcelon. Kiam ni volis pagi al ili la benzinkoston, kiel vojaĝprezon, la virino neis kaj demandis nin, kia-nacianoj ni estas? Ni diris, ke ni estas hungaroj. Ŝi diris,serĉante la hungarajn vortojn, ke ili tre ĝojas, ke povis helpi al ni. Poste ni amike brakumis unu la alian.

Eble ŝi estas tria-kvara generacio hungardevena, sed povas esti slovakino. Ni scias nur, ke ŝi kaj ŝia edzo tre bonkore helpis nin. Ni estas tre dankemaj al ili. (Dum la kongreso kaj dum niaj vagadoj, ekskursoj en Slovakio ni renkontis la saman bonkorecon, helpeman ĝentilecon de la homoj.)…

# Slovaka Bet-Leĥemo en Rajecká Lesná

Rekte ĉe la preĝejo de vilaĝo Rajecká Lesná estis konstruita la domo de naskiĝo de Jesuo. Tiun projektis inĝeniero Stanislav Machovĉak el Staŝkov, la konstruadon gvidis Ŝtefan (Stefano) Botoŝ kaj Ivan Biely [bieli]. Helpadis oferemaj paroĥanoj kaj gejunuloj el diversaj vilaĝoj, venintaj ĉi-tien por spiritaj ekzercoj. La domo de la Bet-Leĥemo estis inaŭgurita kaj iĝis alirigebla por vasta publiko la 26-an de novembro 1955, okaze de la festo de Kristo la Reĝo, ĝin konsekris kardinalo Ján (Johano) **Ch.** Korec. La Bet-Leĥemon komencis konstrui ankoraŭ en la pasinta jardeko mem la majstro ligno-skulptisto Jozef (Jozefo) Pekara el Rajecké Teplice.

La biblia Bet-Leĥemo (la nomo signifas „la Domo de la Pano") estas urbeto ĉ. 10 km sude de Jerusalemo en la Sankta Lando, kie antaŭ du mil jaroj naskiĝis Jesuo Kristo. Tiun ĉi eventon antaŭdiris profetoj de la Malnova Testamento. En la stalon, kie kuŝis Jesueto en kripo, venis adorkliniĝi paŝtistoj kaj saĝuloj. (La tri Magoj aŭ tri reĝoj). Nuntempe al Bet-Leĥemo pilgrimadas multe da kristanoj el la tuta mondo.

En Rajecké Lesná ekde la jaro 1995 oni komencis realigi la ideon konstrui konstantan Bet-Leĥemon, kiu fariĝos parto de pilgrimad-areo, sed la biblia medio estos anstataŭita per bildoj el Slovakio. Fakte estas reprezentataj unuopaj regionoj de Slovakio kaj gravaj lokoj de ĝia historio. En la malantaŭo regas la montopinto Kriváň ]kriva:nj] /2494m/ en Altaj Tatroj. En la centro estas stalo kun kripo kaj la pilgrimloko Rajecká Lesná: mem. Malantaŭ la bibliaj personaĵoj paŝas al la kripo grandmoraviaj regnestroj, misiistoj Konstanteno (Cirilo) kaj Metodio kaj aliaj famuloj de la slovaka historio. La skulptoverko prezentas ankaŭ la metiistojn kaj popolartistojn de la slovaka popolo, iliajn morojn, kutimojn kaj vivmanieron. La figuroj moviĝas.

La skulptita Bet-Leĥemo estas vera lernolibro de historio kaj geografio, spegulanta la lertecon kaj arton de la tradicia lignoskulptado en la regiono de Rajec.

En la unua etaĝo troviĝas la ekspozicio de lignoskulptistoj de la regiono de Rajec, al kiuj apartenas Brieŝtenský, Veselŷ kaj Bača [brieŝtenski, veseli kaj baĉa], kiuj ekspoziciis siajn verkojn en pluraj landoj.

La lignoskulptaĵo estas 8,5 m. longa, 2,5 m. larĝa , kaj 3 m. alta. Ĝi enhavas pli ol 170 figurojn en popolaj (folkloraj) kostumoj, laborantajn, amuziĝantajn, sed precipe pilgrimantajn kaj adorantajn, kvazaŭ simbolizante la piecon de la slovakoj.

1, La ĉefa punkto de la tuta kompozicio estas la malriĉa stalo, kie Jesueton kuŝantan en la kripo ĉirkaŭas statuetoj de Virgulino Maria, Sankta Jozefo, vilaĝa knabeto – kun sia ĉevaleto ludilo – la tri reĝoj, paŝtistoj, bestoj. Venas feste vestitaj familioj kun infanoj, alportante donacojn. Surfronte staras Sankta Cirilo kaj Sankta Metodio, la misiistoj de la slavoj kaj la kunpatronoj de Eŭropo.

Geografie Slovakio dividiĝas je tri partoj: okcidenta, meza kaj orienta. Ĉiu vizitanto trovas ion ĉi tie el sia regiono.

2, En la kastelo de Bratislava havas sidejon la plej grandaj instancoj de Slovakio. Maldekstre de Bratislava, ni povas rigardi la restaĵojn de la fortikaĵo de Devín. Sur la sunvarmigitaj deklivoj de la Malgrandaj Karpatoj kreskas dolĉaj vinberoj, el kiuj oni produktas famajn vinojn de Raĉa, Pezinok kaj Modrá.

3, La Baziliko de la Sepdolora Virgulino Maria en Šaštín/Ŝaŝtin/ – estas nacia sanktejo de la slovakoj.

4, En Trnava la katedralo de Sankta Johano Baptisto estas juvelo de la frubaroka arĥitekturo en Slovakio.

5, Piešťany/Pieŝtjani/ estas mondfama kuraca banloko apud la rivero Vah/ Va:g.

6, La ceramikaĵoj de Modrá [modra:] estas vaste konataj.

7, Glora urbo Nitra, estas malnova episkopa sidejo, el tempo de reĝo Svatopluk, el la 9-a jarcento.

8, La kastelo de Trenčín/Trenĉin/ iam estis estrata de Mateo Csák). Proksime al tio vivis la ermitoj Sankta Svorado kaj Sankta Benedikto.

9, La kastelo Bojnice estas objekto de popolaj legendoj. Ĝi malfermas la vojon al la Rajčianka-valo. La najbara vilaĝo Ĉiĉmany /Ĉiĉmani/estas fama pri ĝia popola arĥitekturo kaj ĝiaj pentritaj domoj.

10, La pilgrimejo Rajecká Lesná mem ankaŭ estas skulpte prezentita.

11, La metiistoj de la urbeto Rajec famiĝis per siaj metioj, precipe pro lignoskulptado kaj ŝuofarado. Ni povas rigardi ankaŭ la forĝiston.

12, Jen, deklivo plena da ŝafoj, kiujn paŝtas paŝtisto kun helpantoj. Malsata urso ŝtelis ŝafon kaj tial la hundoj kaj la ŝafisto postkuras ĝin.

13, Rekte super la kripo altas la impona montego Krivaň/[Krivanj]. Ĉe la montpiedo Ni vidas la urbon Žilina/Ĵilina/ kaj la kastelon de Orava.

14, La bildetoj de Orava – kaj Kysuce [kisuce]- regionoj parolas pri la kampa laboro.Por montaraj regionoj de Slovakio estas karakteriza laboro en arbaro la segado, hakado kaj la laboro en la segejo.

15, Minado havas riĉan tradicion en Slovakio. Tion reprezentas la urbo Banská-Bystrica/Banska-Bistrica/ la ĉefurbo de Meza Slovakio.

16, La slovakoj estas kantema popolo. La muzikbando el Terchová/[Terhova:] boligas sangon en la vejnoj de junulinoj.

17, La geedziĝ-festo en Ždiar [ĵdiar]: montras disvastiĝintan popolkutimon. Sur la veturilo plen plena kun la veturantaj festanoj kaj muzikisto, oni veturigas ankaŭ la junedzinon en la novan hejmon. Sed tie baras la vojon junuloj, kiuj postulas riĉan drinkmonon de la junedzo.

18, Orienta Slovakio komenciĝas per la kapitolo de Spiš/Spiŝ/.

19, La urbodomo de Levoĉa [Levoĉa] kaj la preĝejo de Sankta Jakobo estas trezoroj de la arthistorio, precipe la verkoj de majstro Paŭlo.

20, Antaŭ la preĝejo de Prešov [Preŝov] staras la fama statuo de Neptuno.

21, Košice [Koŝice] estas la ĉefurbo de Orienta Slovakio. La katedralo Sankta Elizabeta apartenas al la juveloj de la gotiko.

22, La preĝejo de Sankta Egidio en Bardejov kun la urbodomo fermas la vicon de gravaj konstruaĵoj de Slovakio.

23, La lertecon de slovakaj lignaĵistoj montras la ligna preĝejeto en Mikulášová [Mikulaŝova:], kiu nun estas lokigita en la Muzeo de Popola Arĥitekturo en la banloko Bardejovské Kupele.

24, La vivon de homoj en Orienta Slovakio ilustras diversaj scenoj: plugado kun bovoj, tolo-farado kaj la familioj irantaj kune en la preĝejon.

Dum tuta tago de nia vizito en Rajecká-Lesná, pluvegis. La malseketeco enigis sin en niajn vestaĵojn, pro la malagrable forta vento ni sentis malvarmon kaj ege deziris varman lokon, varman nutraĵon manĝi, en varma loko atendi la reiron de la aŭtobuso. Do, ni konsente malfermis pordon de la restoracio, kiu pli ŝajnis al vilaĝa drinkejo ol komforta bona loko resti tie. Sed, la neceso estas deviga. Ni eniris kaj decidis tagmanĝi modeste, ja la vojaĝkosto kun buso estis alta. Nu, ni alsidiĝis tablon kaj mia amikino Magdi petis manĝokarton. Laŭ nia pli frua konsento, por si mem ŝi petis supon el terpomoj kaj paston kun

ŝaf-kazeo. Por mia edzo kaj mi ŝi petis la supon de kumino kaj krome paston surŝutitan per kazeo de ŝafo kun biero aŭ kun iuspeca varmiga trinkaĵo. Ŝi mendis ĉion slovaklingve, sed esperantlingve ni parolis. Akceptante niajn mendojn, la kelnero foriris, poste revenis por ordigi la tablojn. Dume ni interparoladis ridadis.

Foje mi demandis Magdi-n ĉu la kelnero ne forpelos nin pro la modestaj menditaj manĝaĵoj, ja ni ne mendis viandaĵojn multekostajn. La kelnero tiam turnis sin al ni kaj scivoleme demandis: kiu lingve ni parolas, ja li vidas, ke ne slovake. Magdi redemandis lin: ĉu ĝis nun li neniom aŭdis pri la internacia lingvo Esperanto? La kelnero surpriziĝis kaj demandis nin plu. Se li bone pensas: ke ni parolas esperante, tiam kiu kie naskiĝis el inter ni? Magdi diris sian naskiĝlokon, ankaŭ mia edzo la sian, mi anoncis, ke mi naskiĝis en Kaŝŝa (Koŝice), sed mia patra avo vivis en Kobily [kobili] kaj la praavo en vilaĝo Ŝiba. La kelnero pli bone surpriziĝis, kiam li sciiĝis ankaŭ pri familia nomo de mia patra avo.

Post nelonge okazis, kiam li jam altabligis la menditajn nutraĵojn, ke li faris mencion pri la fakto, ke en lia restoracio ekde 1920 ne estis hungara vizitanto. Ni estante la unuaj vizitantoj ekde la jaro 1920a malfeliĉa al la hungaroj (tiam okazis de la eŭropaj grandpotenculoj la divido de teritorio de la pli frue granda Hungario), ni sciu nin gastoj de la restoracio. Ni miris. Sed ne nur pro la gesto, sed ankaŭ pro la grandega telero de manĝaĵoj, trinkaĵoj, pro la nemendita sed donace ricevita glaciaĵo, bildkartoj, plumoj kaj brakumoj. Entute pro la vere bonkora gasto akcepto.

Poste li petis nin skribi niajn nomojn kaj landnomojn en la libron de gastoj vizitantaj tie. Dum lia nova foresto ni rigardis la gasto-libron scivoleme: kiuj estis gravaj gastoj de la restoracio antaŭ ni kiuj enskribis la libron. Kion vi pensas, kies nomon ni vidis? Vi certe ne eltrovos. La plej lasta nomo estis nomo de la hungarojn malamanta politikisto Jan Slota. Vidante lian nomon ni decidis tiel, ke por ne kaŭzi estontan eblan malagrablaĵon al la bonkora kelnero, ni skribos nenion en la gast-libron. Nia vizito tie estu nia komuna sekreto. Nian pridecidon ekkomprenis poste la kelnero kaj konsentis. Li akompanis nin al la aŭtobuso kaj longtempe adiaŭis nin per mansignadoj. Ni neniam forgesos lin el Rajecká-Lesná: Frivald-Na:daŝ.

# Tutmondaj Defioj de la Klimatoŝanĝiĝo

*(Originala Esperantlingva eseo)*

## 1. KONFUZIĜINTAJ SEZONOJ

Ĉiutaga demando de niaj tagoj estas la klimatŝanĝiĝo, kiu jam estas babiladtemo ankaŭ inter nefakuloj. La homo dum sia vivo spertas, ke ćio ŝanĝiĝas, ćio moviĝas. Oni ekkonas la rondiron de fenomenoj de la naturo, la ciklajn reaperojn, kiujn ni nomas sezonoj. Sed nuntempe forte rimarkeblas, ke la kutimaj sezonkriterioj jam tamen ne plu estas karakterizaj. Miksiĝis la ĝis nun konataj trajtoj de la sezonoj kaj novaj, ĝis nun ne konataj aŭ raraj fenomenoj estas rimarkeblaj.

La temposentumon de la migrantaj birdoj embarasas la ŝanĝiĝinta vetero. Foje ili pli frue alvenas ol kutime, sian foriron prokrastas al malfruo. Okazas, ke ili restas ći tie por vintrumi, poste pro la neatendite alvenintaj fortaj frostoj ili ne akiras nutraĵojn, malsatmortas aŭ frostiĝas. Ĉe la rivereto Szinva (sinva) transfluanta nian urbon, jam tra pluraj vintroj mi vidis riveretborde vintrumantajn cikoniojn. Se ili ne trovas manĝaĵojn en la akvo, ili malsatmortas, malvarmiĝas kaj baldaŭe mortas. Plejbonokaze oni portas ilin en la urban bestĝardenon aŭ en la ornitologian observejon, kie ili ricevas konvenan prizorgadon kaj post unu jaro ili povos ekvojaĝi al sia vintra restadloko. Pro la klimatŝanĝiĝo ankaŭ la nutraĵbestoj de la cikonioj iĝas pli malfrue manĝeblaj, pro kio la cikoniidoj ne povas ricevi ĝustatempe la neceskvantan nutraĵon. Pro tio-ći, ankaŭ la cikoniidoj, la cikoniida populacio estas damaĝita. En Hungarujo ĉiujare 80 000 cikoniidoj eloviĝas. En 2010. nur 20 000 restis vivaj, kaj oni povis kalkuli kun forflugo de tiu kvanto.

Ankaŭ la hungarlanda hirundpopulacio daŭre malkreskas jam de dek jaroj. Laŭ informoj: la malpliiĝo de la kvanto de la tri hungarujaj hirundospecioj estas atribuebla parte pro la klimatŝanĝiĝo, parte al tio, ke la homo ĝenas la birdojn en iliaj loĝlokoj. Sekve la la malmultaj hirundoj jam ne povas efike helpi la repremon de invadoj de kuloj vivantaj apud la riveroj kaj aliaj „vivantaj akvofluoj."

Ni devas mencii ankaŭ la pereon de fiŝoj de niaj akvoj havantaj vivantaron, ekzemple en la rivero Tibisko kaj lago Balatono. Ĉi tiu formorto de la fiŝpopulacio validas koncerne ne nur nian patrujon, sed ankaŭ la rumanian marbordon kaj la nord-polusan marakvon. La akvoj varmiĝas pli grandmezure ol al kia varmo la en tiuj vivantaj fiŝspecioj

kaj aliaj vivuloj alkutimiĝis ĝis nun. La pli varma akvo enhavas malpli da enakvosolvitan oksigenon. Tial pereiĝas la fiŝoj. Pro ilia pereo; el la nutroreto malaperas la nutraĵo de la polusaj ursoj, balenoj kaj de la homoj en la arktaj regionoj.

## 2. AKVO KAJ ALIAJ DAMAĜOJ

Travojaĝinte grandparton de Hungarujo, en julio de 2010, mi vidis, ke plejparton de la ĝistiamaj agroj kaj herbejoj kovras akvo ekde aprilo. La grundo ne povis sekiĝi pro la ofta kaj abunda pluvo kaj kiel ties sekvo pli grandmezure aperinta kampa akvo, kie pro tiuj sur ĝin jam nestiĝis la akvaj birdoj. Krome dum nia vojaĝo la vido de la vastaj marĉoj etendiĝantaj ĉe la Tibisko-bordoj kaj la trajnaj relparoj estis surpriza, kvazaŭ ne estintus river-reguligo dum la 19-a jarcento!

Nuntempe en Hungarujo oni kulpigas la klimatŝanĝiĝon pro la nekutima pluvo falinta la 21-an de junio 2010-a. Tiutage rana pluvo torentis sur la vilaĝon Rákóczifalva en departamento Jász-Kiskun-Szolnok. Kiel novaĵo aperis dum 2010; la pluv-torentoj, inundoj, koto-torentoj, termoviĝoj, ŝtormoj plagintaj preskaŭ ĉiun regionon de Hungarujo. Ankaŭ mi konstatis en urbo Miŝkolc du termoviĝojn. La samaj fenomenoj agis detrue ankaŭ en Ĉinio kaj en Pakistano. Laŭ la informo, la Pakistanon atinginta naturkatastrofo estis la kvaroblo de la damaĝo kaŭzita de la cunamo en la 2006-a jaro, detruinta la areon de la Pacifika oceano. Ĉi tie mi mencias informon ricevitan de mia brazila korespondantino: Liette Lęla, laŭ kiu la 5-an de aŭgusto 2010-a neĝis en Brazilio, kio estis tre rara evento. Tiusezone la norda parto de Brazilio havas 40 C gradojn da varmo – skribis mia amikino.

## 3. DEGELAS LA GLACIO DE LA POLUSOJ KAJ EKFILTRIĜAS LA METANO

Artefaritaj satelitoj kaj esploristaj grupoj daŭre observas la Nordan-poluson kaj la glacion de Glacia-maro. Degelas la polusa glacio. Se tiu procezo se tiele progresos, – la akvo devenanta el la degelaĵo altigos la marnivelon kaj dum la sekvaj jarcentoj povos subakvigi la insularon de la oceanoj, pluse ankaŭ la malalte kuŝantajn teritoriojn de Mezeŭropo. La klimatŝanĝiĝo pli forte efikas sur la Nordan-poluson dum la lasta duonjarcento, ol alie tion montras la indikoj mezuritaj antaŭ 1979. Ekde la jaro 1979-a. per satelitaj observadoj oni mezuradas la glacion de la

Norda-poluso. La pli malfrua, pli densa mara glacio ŝajne estas malaperanta – avizis la glacio – kaj neĝajn datumojn registranta kaj analiza observa grupo de la Unuiĝintaj Nacioj (NSIDC). /Klimatoprotekta Magazino ozonenetwork.hu/ Dum la pasinta duonjarcento ankaŭ plurfoje estis senglacia akvo, sur la Norda-poluso en somero. Komenciĝis la metan-likado de la grundo nun liberiĝanta de la frosto en la iam konstante frostiĝintaj nordaj regionoj, kaj el la marfundo. El la grundo la bakterioj liberigas karbodioksidon kaj metanon, kio plifortigas la varmiĝon – skribas la reta eldono de la semajna gazeto: Der Spiegel. La metano estas dudekkvinoble pli forta forcejefika gaso ol la karbondioksido. (INDEX; la 3-an de januaro de 2011).

La marnivelaltiĝo ĝis la jarcentofino povas superi la pli frue mezuritajn datumojn. La koralajn rifojn – kiuj donas hejmon al unu triono de specioj de maraj estaĵoj, donas vivmedion al duonmiliardoj da homoj, kaj protektas la marbordon kontraŭ la marinundoj – minacas la acidiĝo de la oceano – asertas ekspertoj pri la klimato.

### 4. KLIMATŜANĜIĜOJ EN LA PASINTO DE LA TERO

Ĉi tiuj fenomenoj ne estas solsolaj, ja dum jarmilionoj de la ekzisto de nia Tero multfoje okazis klimata ŝanĝiĝo. La ćirkaŭe ses grandaj malvarmiĝaj periodoj de la terhistorio senteblaj estis sur surfaco de la tuta Tero. La ĝis nun lasta glaciepoko finiĝis antaŭ ć. 10 000 jaroj. Tiu ći lasis spektaklo-rićajn spurojn sur la norda hemisfero. Ekzemple en Finnlando fundojn de pli ol 50 000 lagoj elkavis la glacio. Dum la interglaciaj pli varmaj periodoj tre variis la vivularo de Tero, multloke per tropika temperaturo kaj loke per tre sekaj periodoj. La diversajn epokojn la geologio pruvas plej bone, kiam el la elfosaĵoj malkovriĝas ŝtoniĝintaj restaĵoj de malnovepokaj vivuloj. Inter la hipotezoj, ke kio, kiuj povis kaŭzi la pereon de la malnovtempe vivintaj animaloj – kiuj kaŭzoj ne tuŝis ćie ankaŭ la flaŭron – la plej verŝajnaj kialoj povis esti ekzemple: malvarmiĝo de la klimato; malaltiĝo de la CO2 enhavo de la aero; bruska pliintensiĝo de la kosma radiado; ĝenerala regreso (retiriĝo) de la maroj; ŝanĝiĝo en la salo- kaj mikroelemento-enhavo de la marakvo; pliintensiĝo de la radioaktiveco sur la tersurfaco… krome ni devas paroli ankaŭ pri la vulkanaj erupcioj kaj la falo de meteoritoj.

## 5. ĈEFAJ FAKTOROJ DE LA KLIMATO

Laŭ la plej akceptitaj teorioj la ĝenerala klimato de nia planedo dependas de kunaj koeficientoj de tri faktoroj:

– konsisto de la atmosfero (laŭ supozo la kvanto de la karbodioksido + metano + akvovaporo)

– situo de la kontinentoj

– la modifiĝoj de orbito aŭ rotacioakso de nia planedo

– eventuale la situo de Suno en nia galaksio.

Ekzistas signoj pri tio, ke pro la homa agado estas ŝanĝiĝanta pli grandmezure la atmosfero, pro la kresko de la enhavo de karbondioksido + metano.

Laŭ mia opinio se nivolas difini la klimaton de iu regiono, ni devas konsideri ties topografiajn, hidrografiajn datumojn de la teritorio, la statistikajn indikojn pri la rilatoj de kvanto de precipitaĵo (inkluzive tion, ĉu la teritorio riĉhavas neĝon aŭ ne, po somero kiom da glacipluvoj falas, kia estas la direkto kaj la forto de la vento, kian temperaturon havas la aero, kiom varmas la vento, kian nubaro-kovritecon havas la teritorio, kiel longas la somero, kiom estas malvarma la vintro. Krome gravas ankaŭ la kvanto de la sunradiado kaj ankaŭ ankoraŭ multaj aliaj, ĉi tie ne menciitajn indikojn.

## 6. SAMTEMPE PLURSPECA KLIMATO

Hungarujo situas sur la limoj de pluraj klimataj terenoj. Ĝian veteron formas la Orient-kontinentala, la Okcidenta-oceana, la nord-polusaj aeramasoj kaj la suda-sudokcidenta mediterana efiko. La mediterana efiko  la plej forta estas sur la suda parto de Transdanubio, sed demonstreblas koncerne kaj la flaŭron kaj la faŭnon sur la sudaj flankoj de montaroj Mátra kaj Bükk, eĉ iom malpli forte ankaŭ en la Sátor-montoj (de Tokaj ĝis Abaujszántó). La atlantikan efikon la Alpoj devias el sia originala direkto, tiel ĝi alvenas al ni de nordokcidento. La de tie ricevitaj ventoj portas la pli multon da precipitaĵo falinta sur teritorio de la lando. Pli malgranda estas la efiko alvenanta de sudo kaj sudoriento. La hungaria klimato estas laŭ la sunagada divido modera. Pro ĝia geografia situo ĝi ne havas veterajn ekstremismojn. Pro la eta enlanda latitud-diferenco kaj la neglekteblaj altecodiferencoj, la klimato de Hungarujo estas sufiĉe unueca, sed nature la influoj de la ortografiaj faktoroj tamen senteblaj estas.

Hungarujo situas inter la 45° 45′ kaj 48° 35′ nordaj latitudoj, proksimume meze inter la ekvatoro kaj la Norda-poluso. Pli ol duono de ĝia surfaco estas ebenaĵo pli malalta ol 200 metra ternivelalteco, aŭ malalta teritorio, sed la proporcio de 400 metrojn superanta teritorio plimultas ol 2%. En Hungarujo la somero longas almenaŭ 3 monatojn, ĝia meza temperaturo superpasas 18 C°-n, kaj somermeze la varmo ne malofte superas eĉ 35 C°. Vintre alternas unu la alian la malmildaj kaj pli facilaj periodoj, sed la nombro de la multe pli ol 0 C gradaj temperaturaj monatoj ne plias ol tri.

La jara mez-temperaturo estas inter + 8 kaj +12 C°, kaj relative alta estas ĝia variado. La ĝenerala valoro estas la plej malalta en januaro, – 4 ĝis – 7C°, en julio estas la plej alta; 25-30 C°. La plej malaltan temperaturon: – 35 C° gradon oni mezuris la 16-an de februaro 1940-a en urboparto de Miŝkolco (hodiaŭ en Miŝkolc-Tapolca). La plej alta temperaturo: 41 C gradoj mezurita estis en urbo Kiskunhalas, la 20-an de julio 2007-a. La nombro de la sunradiaj horoj estas inter 1700 kaj 2015. Tio estas la plej alta sur la ebenaĵo kaj la plej malalta en la montara regiono. Tio ći estas grava faktoro por la agrokulturo. La meza averaĝa kvanto de la precipitaĵo estas 500-1000 mm. Sur la Ebenaĵo 500-600 mm, en la montara regiono 800-1000 mm. La distribuo de la precipitaĵo ŝanĝiĝas ankaŭ dum la jaro. Du maksimumoj rimarkeblas: la primara en la frusomeraj monatoj aprilo-junio, la sekundara aŭtune, oni povas kalkuli oktobron. La plej malmulte da precipitaĵo falas januare-februare. La nord-okcidenta vento estas la reganta. Miaopinie gravas la dumjara ŝanĝiĝemo de la precipitaĵ-kvanto inter la ekzamenitaj jaroj. La pli granda parto de la jara precipitaĵo falas dum la somera duonjaro.

Hungarujon trapasas ĉiujare pli ol 660 frontoj, kies 80% malvarmaj estas, 20 procentoj estas la varmaj. La pli malgranda parto de la precipitaĵo ligiĝas al tiuj ći frontoj. La plej granda parto de la precipitaĵo falas kiel pluvo, sed ć. 15-60 tagojn neĝas ĉiujare. La neĝkovro sur la ebenaĵo ekzistas dum 25-50 tagoj, sur la montoj ĝia nombro povas esti ankaŭ 25-50 tagoj.

Inter la kvar sezonoj estas grandaj diferencoj. La plej malvarma monato estas januaro, la plej varma la julio.

La taga temperatur-ŝanĝiĝo estas sufiće granda. La jara mez-temperaturo estas ć. 13C°, la maksimumo 38C°, la minimumo estas ĉ. – 10 C°.

La printempo komenciĝas je antaŭo de aprilo, kaj tion akompanas grandaj pluvadoj. Pro ĝia kaprica vetero la popola onidiro nomas ĝin freneza aprilo. La somero seka kaj varma estas. La aŭtuno estas malvarmeta, nebula kaj pluva. La vintro estas relative mallonga, meze malvarma kaj ordinare seka, kelkfoje oni povas baniĝi en admirinde belega sunbrilo.

Du pli pluvaj tempoj (frusomero kaj aŭtuno) kaj du pli sekaj periodoj (mezo de vintro kaj fruaŭtuno) alternas.

La jara averaĝa ventorapideco estas 204 m/sekundo. La klimataj indicoj enhavas plejparte averaĝajn valorojn (jara meztemperaturo, jara mezvaloro de la temperaturŝanĝo, averaĝa precipitaĵ-kvanto ks.) Malantaŭ la averaĝaj valoroj kaŝas sin diversaj temperaturaj – kaj precipitaĵkvantaj jaroj, unikaj veteraj datumoj de jardekoj kaŝiĝas – laŭ la hungarlingvaj budapeŝtaj kaj landaj veter-prognozaj datumoj de la Hungara Meteologia Instituto.

## 7. SCIENCA PROGNOZO KAJ POPOLAJ ANTAŬDIROJ PRI VETERO

Krom la veterprognozoj de la landa meteologia fakservo bazitaj sur matematikaj kalkuloj, la popolo konsideras ankaŭ la veteraŭgurojn elformiĝintajn dum la plurjarcentaj observadoj. Ĉi tiuj pruviĝas ankaŭ nun plejparte ĝustaj. Mi mencias kelkajn el inter tiuj, kiel interesaĵojn. Se la duan de februaro elvenas la urso el sia groto kaj tiam sunradias, la urso ektiminte sian ombron rekuras en sian grotkavon. Tio signifas, ke la alvenon de printempo oni devas ankoraŭ longe atendi. Aŭ: se pluvas dum Vince-tago, pleniĝos la kelo. Ties senco estas: se la 5an de aprilo (nomtago Vincento) pluvas (post floriĝo de la vito, tempe de la vinberkreskiĝo), tiam la mastro havos tre multan vinon. Kaj alia: se nomtagon de Katalin (Katarina, la 25-an de novembro) frostas, kristnaske malseka vetero estos atendebla, do pluvos. Kaj la sekvajara vetero estos tia, kia estis la vetero inter la nomtago de Luca (Lucia, la 13-a de decembro) kaj Kristnasko (la 25a de decembro).

## 8. KIO ESTAS PRUVITA – KAJ KIO NE ESTAS

Laŭ la libro: Klimato de Hungarujo de Zsigmond Róna (Sigmundo, 1909) en Buda (parto de Budapeŝto) en la jaro 1700. oni fondis la unuan hungarujan meteologian observan stacion kiel parton de eŭropa reto. Do, en nia patrujo jam pli ol ducent jaroj okazas sistemaj

atmosferologiaj mezuradoj. Ankaŭ en Hungarujo estas atesteblaj en la lasta triono de la 20a jc. ekzemple la kresko de la averaĝaj valoroj de la temperaturo de la vintra duonjaro kaj ioma precipitaĵkvanta malpliiĝo, ĉefe en la aŭtunaj monatoj. Ne estas pruvita, ke ĉi tiuj simptomoj devenas de la natura klimatŝanĝiĝo, aŭ ili vere estas la postsekvoj de la tutmonda varmiĝo provikitaj de la homa agado. (Laŭ la Landa Meteologia Servo: Temperaturo de Hungarujo – Meteologiaj informoj) Tiuj modifoj estas tiom etaj, ke laŭ mia opinio – sed ankaŭ laŭ aliuloj, oni ne devas timi tion, ke en la proksima estonteco okazos eĉ la tropika klimato aŭ glaciiĝo.

**9. LA 11 KAJ 22 JARA CIKLOJ DE SUNAKTIVADO**

Zsolt (ĵolt) Leitner amatora astronomo en Miskolc, donis la sekvan opinion al la temo: Fine de marto de ĉi tiu jaro (2010-a) mi havis bonŝancon por aŭskulti – en la Gimnazio de Diósgyőr – prelegon titolan „Sunaktiveco kaj klimatoŝanĝiĝoj” de doktorino Katalin Oláh; prezidantino de la Astronomia kaj Spacfizika Komisiono de **H**ungara **S**cienca **A**kademio (**MTA**); astronomo de la „Miklós Konkoly Thege” Astronomia Esplorinstituto de MTA. En tiu prelego la preleganto alvokis atenton je tre interesa afero: „ligo estas demonstrebla inter la 11 kaj 22 jaraj Sun-cikloj (minimumoj kaj maksimumoj) kaj la klimatoŝanĝiĝoj de la Tero. Laŭ tio, kiu procezo nun en nia vetero sperteblas, ne estas unuunura evento. Tiuj ĉi ŝanĝiĝoj okazis jam ne nur antaŭ kelkcentmiloj da jaroj, sed ankaŭ antaŭ kelkaj dekmiloj, aŭ kelkcentoj da jaroj. La sunaktivado ankaŭ ĉimaniere efikas al nia Tero, plie al nia klimato.

La teran klimaton influas la vulkanoj, la nuboj estantaj en la stratosfero kaj la oceanaj fluoj kaj ankaŭ ilia temperaturo. La vulkanoj enigas sulfurdioksidon en la stratosferon, kio tie kreas tavolon konsistantan el sulfurdioksid-gutoj. Al la klimato efikas ankoraŭ la partikloj elflugantaj de Suno (suna vento) kaj ankaŭ la kosma radiado. Se la sunvento pli grandas, ankaŭ la protekto estas pli forta. Je pli malalta sunagado plura kosma radiado alvenas. La kosma radiado estigas nuboĝermojn el akvovaporo kaj sulfura acido.”

## 10. LA TEORIO DE MILANKOVIĆ-BACSÁK [milankoviĉ-baĉak]

„György Bacsák (Georgo Baĉak, Pozsony, 5. junio 1870. – Budapeŝto, 4. marto 1970.) jura konsilisto, astronomo, geologo, doktoro de la Tero – kaj mineralogiaj sciencoj (1954) konatiĝis en Pozsony (nun Bratislava) kun la ĉiela meĥaniko. Aŭtodidakte li lernis astronomion. Per granda matematika scio kaj vast-horizonta paleoklimatologia vidmaniero li klopodis rekoni, kaj klarigi la movadleĝojn de la ćiela mekaniko kaj la interrilatojn de la plejstocenaj glaciepokoj. Tiujn ĉi konojn havante, li interpretis la elformiĝon kaj la tempan defluon de la plejstocena epoko kaj glaciepok-teorion de la serba klimatologo Milutin Milanković (Milutin Milankoviĉ 1898-1945), kiu – el leĝoj de ŝanĝiĝoj de la orbit-elementoj de Tero – klarigis per grafika prilaboro de la astronomiaj datumoj la estiĝon de la glaciepokoj. Tiu teorio konsideras la Suno-Tero distancon, la ŝanceliĝon (precesion) de la rotaciakso de Tero, la rotacioaksan angulon, kiuj determinas la kvanton de la surteriĝanta sunradiado. György Bacsák pruvis kaj kompletigis la teorion de Milanković, laŭ kiu la malnormala spaca pozicio de la Tero kreas taŭgajn cirkonstancojn por la estiĝo kaj ripetiĝo de glaciiĝoj.

La Milankoviĉ-Baĉak teorio estis la unua unusence formigita glaciepok-teorio, kiun la multaj jardekoj pasintaj depost ĝia naskiĝo la evoluo ne malkonfirmis… nur ampleksigis.”

Laŭ alia teorio „kaze de la glaciepokoj pluraj faktoroj povis elvoki la varmiĝon. Balanciĝo de la rivoluakso de Tero, suneksplodoj, vulkanismo povis esti la elvokaj kaŭzoj, sed la esenco estas, ke la eventoj tamen ćiuokaze kune okazis kun la ŝanĝiĝo de la koncentracio de la karbondioksido.

## 11. KARDINALA ROLO DE LA CIRKULADO DE KARBONO

1. La karboncirkulado en la verdaj kreskaĵoj okazas pere de la fotosintezaj procezoj.

2. Je solviĝo de karbondioksido en la akvo estiĝas karbonata acido (H2CO3), sekvos la acidiĝo de marakvo, pH malpliiĝo). Ankaŭ tio efikas malfavore al la vivularo! La akvo je alta temperaturo ćiam malpli da gaso povas ligi.

3. La karbodioksidon diversprocente povas ligi la C3-aj (mezvarmaj zonaj) plantoj, kaj la C4-aj (tropikaj) plantoj! Al la specio-rearanĝiĝo pro eventuala varmiĝo aŭ malvarmiĝo, plurcentoj da jaroj estas bezonataj!

4. Kaze de la C3-aj plantoj pere de altiĝo de la CO2 koncentriteco kreskos la kapacito por ligi la CO2-n, sed dume la plantoj eligas varmon, do grandigas la temperaturon de sia ĉirkaŭaĵo. Ni ne forgesu, ke dume la karbodioksidnivelo stagnos, eĉ ankoraŭ malpliiĝos.

Jes ja, sed far leviĝo de la temperaturo la fotosinteza agado de plantoj atingas ian maksimumon, ĉar en alta temperaturo, plie ĉe grandaj temperaturŝanceliĝoj ili jam ne povas ligi la CO2 gason, sed ili amase pereos ili pro la aliiĝintaj vetercirkonstancoj, la CO2 koncentracio subite altiĝos, ĝis aranĝiĝas la plantaro de la planedo al konvenan produktivecon donanta nivelo (C4 plantoj). La procezo progresas same ankaŭ retrodirekte, do post la efiko de malvarmiĝo restas ankoraŭ multe da CO2 pro la pereo de plantoj. Poste la C3-j rearanĝiĝo (kelkcentaj jaroj) la CO2 nivelo subite malpliiĝas.

**DEFLANKIĜO**

La degelo de Antarkto – interesa-maniere – ĝuste pro la ozontavol-maldikriĝo malfruis. La malrapide regeneriĝinta ozontavolo ne influas plu la procezojn en direkton de la malvarmiĝo (pro la malaperanta ozono la forcejefiko ne povis tian gradon atingi, kiel okazis sur la Antarkto); tiel la rapidiĝanta degelo ene de kelkaj jaroj prezentiĝos sur ambaŭ polusoj…”/Prelego de Csongor Horváth redaktoro – Pri la forcejefikaj gasoj – sur la retpaĝo de Klimato-rondo de urbo Tatabánya/:

Kvankam tiel ŝajnas, ke pri la nordaj kaj sudaj glacikovriloj de la Tero ĝuste kontrastaj aferoj okazas, ambaŭ simptomoj estas sekvoj de la homa agado – anoncis John Turner brita esploristo, okaze de la konferenco aranĝita pri la Internacia Polusa Jaro (IPY) en Oslo. Laŭ li la glacio de Norda-poluso degelas de jaro al jaro ĉiam pli kaj pli grandmezure pro la kreskanta karbondioksid-koncentracio de la atmosfero. Sed sur alia parto de la terglobo pro iu pli frua homa agado (la fabrikado de freon-gaso kaj ties eniĝo en nian atmosferon) dikiĝas la mara glacikovrilo. La glacio degelas ĉiujare pere de ŝanĝiĝo de sezonoj kaj frostiĝas denove… (Erika Csepe/nepszava.hu) Argentinaj ekologoj konkludis, ke ne la alsendado de CO2 al la aero, sed de ŝanĝiĝoj okazintaj en la Suno, kaj ĝia aktiveco dum la lastaj cent jaroj estas la kialoj de la klimato-ŝanĝiĝo.(eo.wikipedio.org).

La klimato-ŝanĝiĝo estas tre kompleksa procezo ankaŭ laŭ Zsolt Leitner Miŝkolca amatora astronomo.” La teran klimaton multoj efikas,

sed ne egalmezure. Eble plie la naturaj procezoj, la naturaj fenomenoj, ol ni homoj. Sed tio ne signifas, ke ekde tie ni poluciu trankvile nian medion, konstruu mediopoluajn, sanon damaĝantajn fabrikojn kaj dise lasu malpurigaĵojn, ne okupiĝu pri la medoprotektado. Sed tamen nia ĉi pensmaniero klarigas, kial disputas niatage ne nur la politikistoj, sed ankaŭ la fakuloj, kiom povas esti kulpigebla la homo pro la niatage okazanta klimatoŝanĝiĝo, kaj kiom estas konsiderebebla ĝi kiel natura procezo. Pruvi, ke la klimatoŝanĝiĝo plejparte „dankeblas" al la homa agado, preskaŭ maleblas, ĉar ne estas tiel. Sed unuafere mi certas – skribis s-ro Zsolt Leitner –: ankaŭ ĉiterene atendas la Homaron tre multe da laboro. Ni devas esplori, esplori kaj esplori, por pli bone ekkoni nian medion, kaj nin mem."

Degelas la neĝo, glacio ankaŭ de la altaj montaroj (Alpoj, Karpatoj, Kilimanĵaro…). La akvoj devenantaj de la degelantaj neĝo, glacio de la altaj montaroj provizas per akvo tre multajn industriajn uzinojn. Mi vidis ekzemple en la francaj Alpoj, ke okaze de la malpliiĝo aŭ perdiĝo de la akvokvanto, tiuj teritorioj eble senpopoliĝos. La ruinoj postrestintaj el tre malnovaj tempoj de la forlasitaj setlejoj, bone videblas sur satelitaj fotoj. Laŭ la indikoj de la hungara Vikipedio - la libera reta enciklopedio – „niatage la glaciriveroj enhavas la pli grandan parton de la dolĉaakvo-rezervo de la Tero, do de la Alpoj de Eŭropo. Tie estas favora la situacio al elformiĝo de glaĉeroj, kie la teritorio estas super la neĝolimo kaj la plej grandkvanta estas la precipitaĵo."

**12. NEĜOLIMO KAJ GLAĈEROJ**

La limo de la eterna neĝo estas tiu nivelo de la altaj montaroj, super kiu la atmosfera precipitaĵo falas ĉiam neĝoforme kaj la neĝo neniam degelas. En norda parto de Norvegio tio estas 720 metroj, en Himalajo 5670 metroj, sed en la Arkto ĝi samnivelas kun la marnivelo.

En 2009. dum vojaĝo farita en Francujo kun mia edzo ankaŭ ni ekskursis al la Monto-Blanka, por rigardi la glaciriveron. Kiam la aviadilo flugis kun ni en proksimeco de la plej alta pinto de Monto Blanka – sub ni la nubaro aspektis kvazaŭ senlima neĝkampo – surprizite ni spertis la 30-an de junio 2009-a, ke la pinto de la pli ol 4800 metrojn alta Mont Blanc, nude leviĝis al la brile blua somera ĉielo. Ni pensis, ke certe la nivelo de la neĝlimo nun pli supren puŝiĝis, pro tio ne kovris neĝo la pinton. Ĉi tiu neĝlimo en la montarsistemoj de Alpoj kaj en Karpatoj estas 2750 metroj. Dum la tago de nia ekskurso

(07.07.2009.) tuttage pluvis. Pri flankoj de Mont Blanc en dikaj strioj kiel akvofaloj falegis la akvo de la degelanta neĝo kaj glacio. De tempo al tempo haltis la pluvo, kaj tiam ni povis vidi la nur ie kaj tie neĝmakulan gigantan monton. De haltejo de la dentrada fervojo de Chamonix, de 2062 metrojn alteca tiea elvidejo ni rigardis supren al la pinto. Neforgesebla, fascina spektaklo estis ankoraŭ tiel senherbeje la plej alta punkto de la pramasivo. Ni aŭdis, ke multaj famuloj vizitis jam tie ĉe la glaĉero en Chamonix, por vidi la ĉiam neĝan monton. Inter aliaj vizitis tie Goethe (en 1797), Aleksandre Dumas en 1832. Pli poste ni eksciis, ke ankaŭ la fama hungara komponisto Ferenc Liszt (Francisko List) estis tie, li en 1836. Ni aŭdis, ke la tuta longo de la glaĉero Mont Blanc de Chamonix estas 14 kilometroj, ĝia larĝeco 400 metroj, do la glaĉero povis nutri sin kaj povas sinnutri ankaŭ hodiaŭ el granda neĝo-kaj glaciokovrita teritorio. Laŭ onidiroj ĝia vasto kaj dikeco malpliiĝas ĉiujare. Ĉirkaŭ la glacigroto oni povas vidi la bluan koloron de la praa glacio. Ĝi estas ege densa, tial estas tiom blua kaj ne blanka aŭ blankeca ĝia koloro, ĉar ne ekzistas ene aervezikoj kiuj blankigus ĝin.

La „Musée Alpin"= Muzeo pri Alpoj, ekspozicias memoraĵojn de la konkero de la Alpoj. Kiam en 1867 oni komencis konstrui la elvidejan terason, la laboristoj ankoraŭ pene povis supreniri tien pro la monton dense kovrita neĝo kaj glacio. Superhoma laboro estis bezonata trovi la rokon sub la glacio, por fiksi al ĝi la tenajn ferstangojn de vojlinio de dentrada fervojo. Niatage, sur la monton kondukas jam sen – neĝaj kaj glaciaj turistvojoj el la urbo situanta ĉe piedoj de la montarego (de Urbo Chamonix kiu situas en la orienta parto de Francujo, en la regiono Rhône-Alpes). Ni aŭdis plie, se la degelo progresos sam-mezure, jam nur por 20 jaroj sufiĉos la glacio de la glaĉero. La glaĉersurfacon kovras ŝtonfalaĵo kaj griza polvo, kaj ties amaso kreskas ĉiujare. Kiu atendas blanka ĉi tiun glaĉeron, al tiu iome seniluziiga estas ĉi vidaĵo, kiu malgraŭ tio majesta estas.

Ĉe la glaciomaro "La mer de glace" (kiel la francoj nomas la Mont Blanc-glaĉeron) kaj ankaŭ alie en Francujo paroltemo estis la klimatoŝanĝiĝo kaj ties atendeblaj efikoj al la homa- besta vivo, la terkulturado, al la nutraĵproduktado, la akvokvalito, koncerne la industrion kaj la komercon. Ne ĉiu homo pensas, ke ekskluzive mem la homo kulpas pro la ŝanĝoj. Multaj homoj opinias, ke kvankam kaŭzoj sendependaj de la homo povas roli en la ŝanĝiĝoj, tamen ne permesatas, ke la homo tiel grandmezure poluciadu la surfacon de nia planedo.

## 13. LA NATURAJ, KAJ DE LA HOMO KAŬZATAJ AERPOLUCIOJ

Ĉe ekzameno de la stratosfer-konsisto, ni devas ekzameni ankaŭ la planed-skalan naturan aerpoluciadon, konsiderante, ke la polucion de regiono al la alia portas la vento kaj la precipitaĵo aŭ ĝuste la marakvo.

La neorganikaj poluciaĵoj de la aerpoluciado estas ekzemple gasoj devenantaj el la vulkanerupcioj, vaporo, cindro, la saleroj devenantaj kaj ventoportataj el maroj, gasoj kreiĝantaj dum tempestaj fulmoj, polvo de polvoŝtormoj, krome la kosma polvo. Organikaj faktoroj estas: la fumo kaj polvo devenantaj el forbluo de plantoj (arbustejaj-fajroj, brulo de arbaroj, kreskaĵoj de agroj, kampoj, savano-fajroj), polenoj, fungoj, bakterioj, kaj la fumoj kaj fulgoj devenantaj el homaj hejmoj, uzinoj ktp. hejtitaj per karbo, tergaso, nafto. Varmegaj vulkanaj gasoj venantaj en la atmosferon, vaporoj kaj 5000 C gradaj temperaturoj estiĝantaj dum atomeksplodigoj aŭ akcidentoj de atomcentraloj same kontribuas al la varmiĝo de la atmosfero. Menciinda estas ankaŭ la foruzo de la ŝtonkarbo kaj lignito, dum kiu procezo same signifa estas la liberiĝo de metano kaj ĝia enatmosferiĝo. Ekzameninte la kaŭzojn ankaŭ aliaj faktoroj aperas, kiam ni parolas pri protektaj eraroj de nia planedo. Tiuj estas:

La eligoj de damaĝaj materialoj, pro kiuj la aer-konsisto ŝanĝiĝas

Pro la superkresko de loĝantaro de Tero ĉiam pli granda teritorio estos enkonstruata, pro kio plimalmultiĝas la teritorio por la la subfiltriĝanta precipitaĵakvo

La grandmezure etendiĝantaj arbarpereigoj en intereso de plivastigo de la kultureblaj agroj, la anstataŭigo de la dehakitaj arboj per nove plantitaj, ne okazas, aŭ ne konvenmezure okazas.

Kiel eble la plej rapidan aranĝon bezonas la problemo de nukleaj defalaĵoj primaraj en la grundopoluciado, la damaĝaj akcesoraj produktaĵoj de la industrio (ekz: la ruĝa ŝlimo dum la aluminio-fabrikado), kaj la plej diversaj kemiaĵoj (ekz: la parte aŭ tute ne foruzitaj kolorigaĵoj, lakoj, acidoj), radioefikaj elementoj de telekomunikadaj iloj, malrapide malkombiniĝantaj sintezaj rubaĵoj, vitrorubaĵoj kaj similaj aĵoj.

## 14. INTERNACIAJ KONTRAKTOJ

Konsiderante la spertojn akiritajn dum la pasintaj dudek jaroj, por organizi la farendaĵojn, fondiĝis tn.: Klimato-ŝanĝiĝa Interregistara Kontrakto. Antaŭeniĝis la decidofaro interese de la komuna celo kaj konstato de la respondeco, akordigo de la pluaj taskoj kaj la raportigo pri la faritaj paŝoj. Bedaŭrinde pluraj landoj rifuzis subskribi la Kyoto-kontrakton; inter ili estas ankaŭ la Unuiĝintaj Ŝtatoj.

La Medioscienca Prezidenta Komisiono de la Hungara Scienca Akademio en 2009. faris deklaron pri la klimatoŝanĝiĝo kaj la tiurilataj enlandaj taskoj. Ĉi tiu dokumento estis preparita surbaze de la rezultoj de la internaciaj kaj hungaiaj sciencaj esploroj. Kreiĝis Klimato-klubo (www.klimaklub.hu), Verduloj-klubo, Partio de Verduloj. En ties kadroj ankaŭ hungaraj sciencistoj agas kaj prezentas siajn starpunktojn pri la ĝis 2020 atendeblaj ŝanĝiĝoj, pri la utiligo de la disponeblaj energioj, bioenergio, sun- kaj ventoenergio, pri la lukto baziĝanta sur la komuna kunteno kontraŭ la klimatŝanĝiĝo, iniciatinte inter la gelernantoj la konscian medioamikan- medioprotektan vidmanieron. La Klimatŝanĝiĝa Skiza Kontrakto (Pakto) de UNo (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj /angle: FCCC/ en Rio de Janeiro estis oficialigita per subskriboj la 13-an de junio 1992. La konfirman dokumenton de la Hungara Respubliko oni registris ĉe la Ĝenerala Sekretario de UNo en 1994. Poste oni subskribis la Protokolon de Kyoto. En 2006 jam 188 landoj partoprenis la skizan pakton. En ĝia prilaboro ankaŭ Hungarujo partoprenis kaj aliĝis al la internacia pakto. (Vidu: La Debrecen-an Informilon de Medioprotektada Ministerio: eldonita en 2003: Internacia Kunlaboro al malpliigo de la klimatoŝanĝaj danĝeroj kaj eligadoj de emanoj de la forcejefikaj gasoj: www.ff3.hu/upload/KA-Klima.pdf)

Laŭ la klimatpolitika komisiito de Eŭropa Komisiono, la danĝeron de la klimatoŝanĝiĝo konfirmas la observoj, laŭ kiuj pro la fosiliaj hejtmaterialaĵoj, kaj la industria agado aŭ pere de la vulkanismo la enatmosferon iĝantaj sulfurdioksido kaj nitrata acido precipitiĝas en formo de acidaj pluvoj. La pli frue (en malvarmigaj aparatoj) uzita freongaso en la altan atmosferon iĝinte kondukis al maldikiĝo de la ozontavolo eksterordinare gravega por la tera vivo. Por solvi tiujn du gravajn problemojn naskiĝis la internaciaj kontraktoj bazigitaj sur sciencaj pruvoj, kaj pro iliaj bon-influaj finfaroj la solvoj de ambaŭ problemoj progresas en niaj tagoj.

## 15. NATURO KAJ MEDIOPROTEKTADO

Ekde sia apero sur la planedo, la homo laŭ siaj bezonoj transformis la naturon. Ĉi proceso ne estas haltigebla, ja la homo faras ċion en interesoj de sia komforto kaj agrabligo de sia vivmedio. Sed tamen ni ne devas ignori, ke al la protekto de nia medio apartenas ankaŭ la naturprotektado. La pretendo de la naturprotektado tiam enfokusiĝas pli forte, kiam la homo estiĝas atestanto de definitiva formorto de tiaj bestoj, kreskaĵoj, kiuj ĝis tiam estis integraj partoj estis nia vivularo, kiu pliriĉiĝis pere de ili.

Por mildigi ĉi tiun procezon, en 1935 estis kreita la unua naturprotekta leĝo, sed tiu laboro progresas malrapide. De tiam realiĝis ankaŭ en Hungarujo diversaj naturprotektaj distriktoj, Naciaj Parkoj, kiuj pro siaj raraj protektindaj bestoj, plantoj aŭ naturformacioj prezentas parton de la Monda-Heredaĵo. Ĉi tiuj estas niaregione la teritorio de Nacia Parko de montaro Bükk, en Kelemér la tn: Pramarĉaj-lagoj, la pra-arbedejo de juniperoj de Nacia Parko en Aggtelek. Sed protekton ĝuas ankaŭ la unikaj plantoj, la raraj arbospecioj kiuj troveblas en arbomuzeoj, botanikaj ĝardenoj, aŭ ili vivas sovaĝe. En nia regiono Nord-Hungario menciindaj estas sen pretendo de la senmankeco: la Hungara kolĉiko kaj la Stipo sur rokoj de Boldogkőváralja. En Slovakio sur flankoj de montaro Granda Fatro: troveblas la Orkido-specioj, kaj en la francaj Alpoj la sovaĝe kreskantaj Orkidoj kaj Azaleoj, kiujn ni povis admiri dum niaj ekskursoj.

## 16. RESPONDECO KAJ EBLECO

La variaj legitaj kaj aŭskultitaj opinioj firmigis mian opinion, ke la ***klimatoŝanĝiĝo ne estas puno de Dio aŭ ekprovo de homo de li, nek la alveno de la Apokalipso, sed estas natura procezo de la historio de Tero.*** La nuna stato povos daŭri eĉ plurmiljarojn ĝis elformiĝo de la sekva, radikale malsimila klimato. Sed per haltigo aŭ moderigo de nia mediopoluciado ni povos havi dum longa tempo la konvenan teran vevmedion por niaj posteuloj.

Jen tio estas la vivkondiĉo kaj respondeco de nia specio sur la Tero. Nia Tero donas nian lulilon, nutraĵon, trinkaĵon, prosperon, la lokon, kien niaj proksimuloj enterigas niajn korpojn, cindrojn. La protekto de nia medio, vivloko por la pluvivo de nia specio nepre bezonatas, kaj tial estas neevitebla!





*Glecero de Monto Blanka/ kaj ties flankoj*

# La Suno, Luno kaj la Steloj

Elinjo estis kvindekjarulino, kiam ŝia edzo mortis post ilia dudek kvin jara geedzeco. Infanon ili ne havis. Pro manko de la kutima kaj amata partnero, ŝi ne trovis sian trankvilon. Vane ĉirkaŭis ŝin la milpompa somero, la ĉiutagoj ŝajnis dezertaj, malplenaj, senkoloraj.

Foje en la vaporbanejo ŝi konatiĝis kun iu virino, kiu parolis al ŝi pri „la rondo familia"de la geesperantistoj, invitis ŝin tien, al ili. Ja, ankaŭ ŝi ne havas familion, tamen ne solas apartanente al la parolantoj de la lingvo Esperanto. Nu, Elizabeta pripensis provi, kaj skribigis sin unue en naturamikan grupon, poste en iun lingvolernejon por lernakiri tiun fremdan lingvon. Ŝi akiris multajn konatecojn, novajn geamikojn ambaŭloke. Ŝia vivo pleniĝis per nova senco. Baldaŭ ŝi konatiĝis kun esperantisto, kun kiu ili bone komprenis unu la alian kaj post ne longa tempo ili geedziĝis. De tiam ili jam kune ekskursis, iris en societojn, teatron, muzeon, eĉ danci. Karlo, la nova edzo kiu estis inĝeniero, multe helpis fari la hejmajn laborojn kaj dum sia libertempo ŝatokupante ankaŭ pentradis bildojn de naturo. Elinjo post fino de la kuirejaj laboroj - libertempante brodis kaj lignoskulptis. Ili estis vera artista paro. Ili ofte vizitis ankaŭ diversajn kunvenojn de artistoj, verkistoj.

Unujara estis jam ilia geedziĝo, kiam en iu socia kunveno aperis fremdulo, kiun ili ne vidis ĝis tiam. Iu informis ilin, ke la nur por ili nekonatulo estas konata ĵurnalisto, verkisto, poeto, arttradukisto, kaj mem ilustras siajn verkojn per propraj desegnaĵoj.

Gabrielo, la fremdulo iĝis simpatia al Karlo, do invitis lin en sian familian hejmon gastiĝi. Poste ĉi inviton sekvis pliaj. Gabrielo ĉiam volonte venis. Al sinjorino Elizabeta rimarkiĝis, ke la gasto vizitante ilin neniam kunportis florojn, deserton aŭ unu botelon da trinkaĵo kiel tio kutimas ĉe vizitoj. Ĉiam li klinas sin iom al ŝi, kaj manprenante salutas ilin. La salutmaniero ne ŝanĝiĝis post ilia rekta interamikiĝo, lia sintenado estis ceremonia. Al Gabrielo plaĉis brodaĵoj kaj la groteskvizaĝaj lignoskulptitaj bestetoj de Elinjo, kiuj fine estis foresenditaj, por ĝojigi infanojn, en iun proksiman infanhejmon. Ilia novamiko diris, ke la lignobestetoj similas al homoj kaj estas tre ridigaj. Elinjo ĝojis pri la rekono kaj malrapide ankaŭ ŝi povis kore akcepti la al ŝi pli frue tute ne simpatian novan amikon de sia edzo. Poste surprizis ŝin, kiel forte ŝi atendas la alvenon de sia amiko, atendegis la fortan varman manprenon kiu estis, kiel la ŝia. Fidon komencis senti ŝi al li.

Foje ŝi admiris lian griziĝadan harbuklon, foj-foje ektuŝantan lian altan frunton. Kiam ŝi rigardis sur lian vizaĝon, kaj kaptis la rigardon ripozantan sur ŝia vizaĝo de liaj brilaj okuloj, pensis: kvazaŭ la Suno, Luno kaj Steloj ripozus saltante surteren sur ĉi vizaĝo.

Sed Gabrielo tamen venis neniam malplenmane. Li portis montri siajn desegnaĵojn, freŝe verkitajn poemojn, manuskriptojn de siaj libroj. Li atendegis kaj ĉiam ĝoje akceptis iliajn opiniojn. Aparte gravis por li la opinio de Elizabeta. Kelkfoje okazis, ke la manuskripton de iu nova romano de Gabrielo ili legis kune, sidante unu apud la alia, kaj dume foj-foje alridis unu la alian pro iu interesa parto de la legata historio. Tiaokaze ili ambaŭ ruĝetiĝis. Poste ankaŭ Elinjo kunkolektis siajn malnovajn rememorojn kaj verkis sian unuan novelaron. Ĝian eldonon kunhelpis Gabrielo. Same li prezentis la novan verkon al la legantaro dum aŭtora renkontiĝo. Rekompence pro la helpo, li ricevis kiseton de Elinjo. Tuj ili sentis varmegon en la ĉambrego – eble tial ili ruĝiĝis ambaŭ.

Varme brilis la okuloj de Gabrielo, sed post iu telefonvoko ricevita neatendite, li tamen ne akceptis ilian inviton por festena vespermanĝo. Li klarigis, ke li estas okupita kaj devas urĝe hejmenveturi. Ilia sekva renkontiĝo jam ne estis tiel sennube intima, kia pli frue. Ia streĉeco oscilis inter ili. Kaj poste Gabrielo jam ne tre serĉis la ŝancon renkonti Elinjon kaj Karlon. Elinjo komencis rimarki la mankon de Gabrielo. Al la retadreso ricevita de li ŝi vane sendis mesaĝojn, respondo ne venis. Kiam ili renkontis sin, Elinjo riproĉis al li: kial li ne respondas al ŝiaj leteroj, kial li primemoris nur la nomtago de Karlo, sed ŝian ne, krome: kial li rakontas neniam pri siaj familianoj, ja ili ŝatus scii pri ili. Tiam Gabrielo ekstaris, senvorte foriris. Elinjo ektiminte postrigardis lin.

Kion mi faris? Kion mi faris? – demandis ŝi al si, kaj ekploris. Ŝi tre ekamis Gabrielon. Centfoje ŝi atentis dum siaj interparoladoj, petolaj babiladoj, ke ŝi ne ofendu lin per io, aŭ ne transpaŝu la limon de seriozeco. Ĉar ŝi pensis: se Gabrielo estas edziĝinta, havanta familion (certe li estas tia), ŝi povos havi kaj daŭrigi sian amikecon, se ŝi dece kondutas.

Poste Gabrielo revenis portante unu blankan rozon, mankisis kaj gratulis Elizabetan okaze de ŝia nomtago. Li esperis ricevi rideton, repaciĝon de ŝi. Tion li sukcesis atingi. Sed post ĉi okazo jam nenio estis tia, kia pli frue. Gabrielo ĉiam pli longtempe estis for de la kunvenoj de artistoj verkistoj. Tiam li jam treege mankis al Elizabeta. De tempo al tempo la mankosento jam suferigis ŝin. Tiafoje ŝi elprenis la bildkartojn

de Gabrielo senditajn de foraj landoj, kaj rigardadis ties bildojn kaj aliflanke la mallongajn saluttekstojn. Eĉ tiuj kelkaj vortoj bonvenis al ŝi. Poste ŝi konsciiĝis, kion ŝia amiko jam delonge sciis, – ke ŝi enamiĝis en Gabrielon. Ŝi jam estus ankaŭ per tio kontenta, se ŝi enspireblus la saman aeron kun li ie, nur gravus scii ke li estas ie en ŝia proksimeco. Sed se ili renkontiĝis, plimultiĝis inter ili la etaj misopinioj, kvereletoj pro bagatelaĵoj. Kion ajn verkis Elinjo, Gabrielo ne kontentis, taksis ĝin malaltnivela, ĉiam en ĉiu afero li pravis ks. Ĉi subtakso komencis ĉiam pli multe ĝeni Elinjon. La supozata desupra rideto pli kaj pli multe afliktis ŝian virinan vantecon kaj sincere varman koron. Se Gabrielo alparolis ŝin, ŝi ektremis, apenaŭ povis respondi.

Poste Gabrielo komencis diradi, ke li deziris ne tian amikecon kun Elizabeta. Kaj, ĉar Elizabeta aliiĝis, li retiras sian amikecon de ŝi. Ĉi eldiro jam tro multis por la amanta koro de Elinjo. Dume ŝi havis ankaŭ konsciencriproĉojn pro tio, ke ŝia edzo vane ĉirkaŭprenis ŝin per tiom multe da amo, ŝi pensis tage-nokte pri Gabrielo, sopirante lin. Ŝi konvinkiĝis: kion ŝi sentas, tio estas amo, amoro kaj tiom profunda, kian ŝi sentis neniam en sia vivo. Kunfandiĝis en ĝi la estimo al la elstara verkisto, amo al la amiko, la amoro kaj la dankemo pro lia multa senegoisma helpo.

Ankaŭ ŝi rimarkis la aliiĝon de Gabrielo, sed ne konis ties kaŭzon. Sed ŝi sciis tion, ke la amikeco ne estas paperfolio, kiun oni povas proponi por akcepto al iu, kaj poste repreni. La amikeco baziĝas sur ambaŭflankaj internaj kaj eksteraj homaj valoroj, reciproka simpatio, interkompreno, sed ne povas baziĝi sur orgojla desupriĝo aŭ momenta kaprico. Ŝi sentis, ke pro ilia malproksimiĝo unu de la alia, Gabrielo perdos ŝian sincere varman koron kaj per ĝi la ŝancon, ke ili povu doni multan puran vivĝojon unu al alia. Ŝi ne sciis: kial Gabrielo ne parolis pri sia familio malgraŭ tio, ke iam li montris ilian foton. Sur tiu foto videblis liaj edzino kaj tri filetoj. Ŝi pensis, ke feliĉa homo parolas, malfeliĉa ne. Certe ia tre granda malfeliĉo premas lian familion, pri kiu paroli estus tro suferige. Eble tial estas tiome moroza kaj malaproba ilia amiko, se ŝi demandis lin pri ili.

Elizabeta serĉis siajn figurojn en la romanoj de Gabrielo. Ne trovante ŝi pensis: ili estas certe tro simplaj homoj, kiuj ne meritas priskribon. Poste, kiam ŝi telefone volis saluti Gabrielon en lia nomtago, okazis la kontakto-rompo. Gabrielo, la homo laŭŝajne forta anima preskaŭ plore postulis de ŝi, ke ekde tiu tago ili interrompu sian interrilaton. Elinjo kaj Karlo serĉu lin neniam plu, kaj nek li serĉos la eblecon renkontiĝi kun

ili. La kialumo denove forrestis, kaj restis nedemandebla. Elinjo tuj promesis la plenumon de lia deziro por trankviligi lin, sed ŝia koro preskaŭ krevis pro la malĝojo. Ŝi plie sentis ol sciis, ke Gabrielo pro io certe bone decidis, sed ĉi decido tamen ŝokis ŝin kaj Karlon.

Post ĉi evento ili vere ne renkontiĝis kun Gabrielo dum la art-kunsidoj. La jaroj pasis unu post la alia. Ili atingis jam siajn sepdekajn jarojn, kiam vojaĝante en Budapeŝto, sur la rulŝtuparo de la ĉefurba metroo Elinjo rimarkis viron, sur kies mano prenanta la apogrelon du oraj fingoringoj brilas unu apud la alia. Sed, kiaj oraj ringoj!

La viro vojaĝis el la mala direkto kontraŭ ili. Subbrake li tenis grandan pakaĵon, alimane li tenis ŝajne pezan aktujon. Sur lian altan frunton falis arĝentgriza harbuklo, li indiferente rigardis antaŭ sin. Kiam li alproksimiĝis, Elinjo ekkonis unun el la du viraj fingroringoj. En iu kermesa foiro ŝi aĉetis la orfiligranan ringon kun du interplektitaj rozbranĉetoj kun blankaj rozoj. Tiam ŝi aĉetis du fingroringojn, ĉar la vendisto diris, ke en la mondo estas nur du tiaj. Ilin pretigis artisto por iuj geamantoj. Sed kiam la ringoj pretiĝis, la amo forpasis. Unu ricevis Gabrielo, la alian Karlo. Gabrielo promesis porti ĝin ĝismorte. Ankaŭ Karlo portas ĝin surfingre ĝis nun.

Kun nomo de Gabrielo, ĝojplena krieto forlasis la lipojn de Elinjo. Pro la voĉo la viro levis kapon kaj esplore rigardis ŝin. Ĝoja rideto inundis lian rondan vizaĝon kaj li ruĝetiĝis ĝis siaj arĝentaj harradikoj. Li ekkonis siajn geamikojn, sed li havis tempon jam nur por unu demando:

Ĉu via adreso estas la malnova? – kaj post ilia jesa respondo ili jam malaperis el la vido de unu de la alia.

Post kelkaj tagoj libropaketo alvenis. En ĝi estis la du lastaj libroj de Gabrielo. Unu estis dediĉita al Karlo, la alian li dediĉis al Elinjo jam en ties antaŭparolo. La titolo de ĉi libro estis: La Suno, Luno kaj Steloj. Ĝi estis romano, kian li ĝis tiam neniam verkis. Biografia romano, en kiu li priskribis sian propran vivon. Ĉion tiel, kiel tio fluis antaŭ kaj post la renkonto de Elinjo kaj Karlo:

Li ekvidis la mondon, kiel unuanaskito. Lia patrino mortis pro puerpera febro. Por anstataŭigi ŝin, la patro ankoraŭ dufoje edziĝis, (ĉar ankaŭ la dua edzino baldaŭ mortis), tiel tamen feliĉe li sukcesis pleneduki la filon. Gabrielo edziĝis frue. Li prenis al si germandevenan dezirindan blondan belulinon. Ili havis tri belajn filojn. Ĉiuj tri finis universitaton, sekvante la patran modelon, por la ĝojo de la gepatroj. Poste Gabrielo sendis ilin unu post alia por studvojaĝi eksterlanden,

preskaŭ samtempe. La ĝojo de la gepatroj ne longdaŭris. La filoj unu post la alia suferis akcidenton dum siaj eksterlandaj vojaĝoj. Ĉiuj tri ripozas en fremda tero. Lia edzino lin kulpigis pro la morto de la filoj – dirante, ke ilia patro mem sendis ilin en morton. Li suferis nervokolapson, longe restadis en nervo-sanatorio. Reveninte hejmen, bonodora letereto atendis lin. La edzino skribis, ke ŝi reiris en Germanion, ĉar ŝi jam ne povas kunvivi kun sia edzo. Gabrielo vane sendis revokan leteron al ŝi, respondo ne venis, li ne povis atingi ŝin. Lia edzino forlasis lin, sed lasis ĉe li ŝian nemovkapablan patrinon, kiun li, la bofilo devis flegi, nutri, prizorgi. Li povis nek disedziĝi pro nescio, kie estas la edzino. Krome, la bopatrinon li ne povis flegigi de alia edzino. Tiutempe li renkontis Karlon kaj Elizabetan.

Kiam evidentiĝis al li la amo de Elizabeta, li tute konfuziĝis. Unue li fieris pro la amo de tiu purakorulino. Sed pripensinda estis ankaŭ la situacio de lia amiko Karlo. Li ne havis rajton detrui la belan geedzan interrilaton de siaj geamikoj, kvankam li estis ĝisorele enamiĝnta en Elinjon. Inter liaj baraktadoj, neatendite realvenis lia edzino. Ŝi diris, ke ŝi malsanas kaj volas vivi hejme ĝismorte. Ŝi petis la edzon reakcepti ŝin en sian favoron.

Jen tiam li interrompis la kontakton kun la geedzoj, ĉar li, perlo de verkistoj ne povis trovi alian solvon por la ordigo de sia vivo. La edzino: la belega Hilde estis operaciita pro suspekto de mamkancero. La operacio sukcesis, kaj ŝi povis entombigi sian paralizitan patrinon post dek kvin jaroj. Post novaj kvin jaroj, ankaŭ ŝi mortis. Post morto de liaj bopatrino kaj edzino, translokiĝis al li la tria edzino de lia patro, por ke neniu el inter ili vivu sola. La jam multjara virino instigis lin verki la historion de sia peripetita vivo. Gabrielo dediĉis ĉi sian verkon al sia plejamato: al Elizabeta:

– Mi dediĉas ĉi mian verkon al vi, Elinjo – skribis li en la antaŭparolo –, kiu estis por mi la Suno, Luno kaj Steloj, brillumigantaj mian ĉielon konsolante min ĉiutempe.

Jam mallumo regis en la ĉambro, kiam Elinjo finis la legadon. Malrapide ŝi fermis la libron, rekliniĝis en la fotelo. Ŝi pensis pri Gabrielo. Kiam Karlo envenis kaj lumigis la ĉambron, ŝi donis la libron en liajn manojn, por ke ankaŭ li ekkonu ĝin. Post ĝia lego ili jam sciis, kion ili ĝis tiam nur sentis, ke Gabrielo estis ilia unika vera amiko, kiun ili neniam forgesos.

# La rozpetalo

La geedzoj, pace, ĝoje vivis, ame helpante unu la alian. Ili havis la samajn ŝatokupojn: kreskigis florojn en sia ĝardeneto por la hejmatablaj florvazoj kaj sur la tombojn de siaj estintaj geamatoj. Ekskursante ili ĝuis la belajn pejzaĝojn, sed jam ne grimpis al la montosuproj, por rigardi de tie malsupren al la lirlanta rivereto, zonita per urtikarejo. Sur la lagbordapuda kampo ili ankoraŭ kolektis sovaĝajn florojn, sed jam ne ŝiris la pli fortatigajn florojn por ornamado de sia loĝejo. Ili faris mallongajn promenojn, kaj ŝatis sidadi sur la benkoj de floraj parkoj. Tiam ili ridete rigardis la etulojn, kiel ili pilkludas, lernas bicikli. Foje, la edzino Elizabeta petis sian Karlon, ke ili vizitu la bestaron en la montosupra bestĝardeno. Apud la tien kondukanta vojo iam funkciis spirorgana rehabilita sanatorio, kies flegito ankaŭ ŝi estis, kiam oni provis mildigi ŝiajn astmajn suferojn. La promenado estis agrabla tien-reen tra la varmeta pinarbaro.

Hejmenveninte, surprizite ili vidis, ke ili havas poŝtaĵon. Jam delonge ili ne ricevis leteron. Sinjorino Elizabeta surmetis la okulvitrojn por vidi, de kie venis la koverto. Sur ĝi ne estis notita la nomo de la sendinto. Sed, laŭ la adresmaniero ŝi tuj sciis, kiu sendis la leteron. Ŝia koro forte ekbatis kaj pli rapide batadis plu. La malfermitan koverton ŝi transdonis al sia edzo Karlo. Li legu unue: kial, kaj kion skribis ties sendinto. Jam vesperiĝa mallumo regis en la ĉambro. Ili devis fari lumon. Karlo, ne leginte la leteron, redonis ĝin al Elizabeta. Legu ĝin ŝi, poste rakontu pri la enhavo. Li jam ne rememoris pri la sendinto.

– Kiu skribis, kiu li estas, kial li skribis? – demandis li per laca scivolo.

– Nia amiko: Gabrielo, la ĵurnalisto! – diris edzino Elizabeta. Li ŝatus revidi nin, venus viziti nin, se ankaŭ ni ŝatus renkontiĝi kun li – pepis sinjorino Elinjo.

– Jes, jes – diris la edzo. – Venu li. Delonge jam ni renkontis neniun. Kiom da tempo pasis depost nia lasta renkontiĝo? Ho, ĉu 10 jaroj, aŭ eble iom pli? Sekvatage Karlo enpoŝtigis sian respondon: venu Gabrielo, ili atendos lin ĉe la trajno.

Alvenis la antaŭlasta tago. Elizabeta kuiris, bakis dum la tuta tago. Karlo menciis: ŝi tiel prepariĝas al la gastoakcepto, kiel oni kutimas antaŭ geedziĝaj festenoj. Elinjo jam tre laciĝis ĉirkaŭ vespero. Ŝi baldaŭ enlitiĝis. Antaŭ ekdormo ili babiladis iom. Karlo rakontis, kiome li

admiris Elinjon kaj Gabrielon, kiam ili sidante unu apud la alia legis iun tiutempe aperintan romanon de Gabrielo. Ili sidis sur la arbarrando tuj super la ŝtonminejo, kaj ĝuste sub ilia loko faŭkis la buŝo de la minejkavo. Ili sidis kaj ofte ridis kune, kiam sekvis iu pli interesa parto de la enlibra historio.

– Vi ambaŭ estis tre obstinaj kaj tamen tre bone komprenis unu la alian – rimarkis pripensade Karlo.

– Nu, tiu kompreno ne estis tute kompleta – respondis Elizabeta.

– Jes, dank' al Dio, ĉar vi restis mia adorata edzino.

– Ankaŭ mi treege amas vin, mia Karlo – certigis lin Elizabeta. Kaj ili ame interbrakumis sin. Poste Karlo enlitigis la foto-albumon, por rigardi, kiel aspektis Gabrielo lastafoje. Alvenis la sekva tago, la lasta tago, la granda tago, la tago de reveno de ilia malnova, perdita sed reatendata amiko. La unuaj sunradioj salutis humidan matenon. Karlo vekiĝis malfrumatene.

– Ho, mia karulino estas ankoraŭ laca, ŝi ankoraŭ dormas ankaŭ nun – pensis li. Survestis sian negliĝon, poste mallaŭte, por ne veki Elinjon, la karulinon, li eliris en la kuirejon. Sur pleto li prezentis la matenmanĝon al sia edzino, sed ŝi movis sin nek al la agrabla odoro de la freŝe kuirita kafo. Do Karlo demetis la pleton, kaj por veki li kisetis la vangon de sia edzino. Malvarmaj estis ŝiaj vangoj, kolo kaj manoj. Li eksentis teruron, ekploris. Li volis kune matenmanĝi kun sia edzino, sed nun, li ne povis engluti eĉ unu peceton. Li plenvestis sin, kaj kuris al la kuracisto. Kiam li hejmenvenis kun li, antaŭ la pordego lin jam atendis Gabrielo. Mirante ke la geedzoj ne atendas lin ĉe la trajno, li iris rekte al ili. Tie atendis lin nova surprizo: al la sonorigado, frapado sur la pordo nur hundbojado respondis, venis neniu malfermi la dompordon. Li atendis iom, kaj kiam iu najbaro informis lin, ke Karlo antaŭ nelonge forkuris ien, Gabrielo konjektis ion malbonan. Ĉu eble unu el ili malsaniĝis? Li planis iom ankoraŭ atendi, kaj se Karlo baldaŭ ne revenos, li postlasos mallongan mesaĝon, kaj foriros hejmen. Li ne devis longe atendi, baldaŭ venis Karlo kun la kuracisto. Karlo kaj Gabrielo samtempe ricevis la kuracistan konstaton pri la morto de Elinjo. Kiam la kuracisto foriris, kaj oni forportis Elizabeton, la du viroj restis solaj. Ili interparoladis pri diversaĵoj, strangaĵoj de la vivo.

– Ĉu vi bonvolus rakonti al mi, kiam vi konsciiĝis, ke vi kaj Elinjo amas unu la alian? – direktis Karlo la demandon al Gabrielo, interrompante refojan silenton.

– Ho, ĉu vi sciis? – demandis nun Gabrielo.

– Jes, mi devis nur rigardi vin kaj ŝin, kaj ĉio evidentiĝis. Nu, kiam tio okazis? – demandis Gabrielon urĝige Karlo.

– Unue mi spertis nur la signojn de la pliiĝanta simpatio. Poste sekvis la donacita fingroringo. Mi sentis, ke pro la gesto mi devas porti ĝin. Ĉu vi vidas? Ankaŭ nun mi havas kaj portos ĝin ĝismorte.

– Sed la konsciiĝo de la plena certeco ekregis min en tiu Kristnasko, kiun foje mi pasigis ĉe vi. Al vi mi alvenis la dudektrian de decembro, ĉar vi promesis neĝglitadon, vintrajn ĝojojn. Delonge ne havante jam tiujn ĝuojn mi ne povis rifuzi, mi akceptis la inviton. Kiam mi alvenis, vi hakis lignon, pecigante ĝin al fajrobruligado en fajenca kahelforno, ĉar la pli maldikajn pecojn pli frue kaptas la fajro, ol la dikajn. Kontraŭ via protesto mi helpis vin en tiu laboro. Unue ni dissegis la pli grandajn trunkojn en ŝtipojn. Poste ni dishakis ilin en maldikajn pecojn. Pro la nekutima laboro al mi fariĝis varmege, sur mia ruĝa kolo reliefiĝis la vejnoj. Elinjo vane invitadis nin enen, ni daŭre plu segis, hakis la lignon. Neatendite ŝi aperis kun du skarpoj. Ŝi donis unu al vi, la alian vindis ĉirkaŭ mian kolon kaŝante unu ĝian finon sub mian ĉemizon de mia malbutonumiĝinta ĉemizo. Kaj tiam mi eksentis la scivolon en ŝia rigardo: ĝis kie vi estas ruĝa?

Tiu rigardo kaj la fingra tuŝo sur mia haŭto perturbis mian ĝistiaman trankvilon, mi ektremis. Mi ne povis daŭrigi la hakadon. Mia hakilo deglitiĝis el mia mano, kaj pikiĝis ĝia akro ĝuste apud mia dekstra piedo en la teron. Ni ĝojis, ke mi – pro mia nelerteco – ne detranĉis mian piedfingron. Tiam ni finis la hakadon dirante, ke ni devas lasi laboron ankaŭ por la nova jaro.

Post kiam ni duŝis kaj transvestis nin, sekvis la vespermanĝo: granda telero da ŝafkazeaj patkukoj kun multa laktokremo supre, kaj garnaĵo el frititaj lardopecoj, poste kuna sorbado de bona vino. Post la bongustega vespermanĝo ni kartludis, babiladis longe. Noktomezon batis jam la murhorloĝo, kiam ni decidis iri dormi. Tranoktejon mi ricevis en la ĉambro kun lignoskulptita meblaro de la domo. Tri infankapoj ornamis la kapotabulon de mia lito. Rigardante ilin mi ekmemoris miajn filojn kaj tre malgajiĝis. Sed Elinjo ordigis mian liton tiel ame, kvazaŭ karesante: molskuante mian kusenon kaj plumkovrilon, ke forgesinte miajn filojn mi ne povis omaĝi per sufiĉa admiro kaj dankemo pro ŝia ama zorgado pri mi. Ŝia kliniĝadanta korpo estis belega kaj dezirekscita. Ŝia pantalonita korpo figuris koron sub la zono.

– Ho, se ĉi tiu koro povus esti la mia – sopiris mi sekrete en mi, sed poste tuj mi ekhontis pro mia penso. Mi baldaŭ ekdormis kaj dormis kiel iu, kies dormon anĝeloj gardas. La dudekkvaran, kiam mi vekiĝis, ĉiuj estis jam plenvestitaj. Vi, Karlo ellitiĝis la plej frue kaj finis la lignohakadon. Baldaŭ poste Elinjo surtabligis la matenmanĝon: sekvinberan ĉokoladan bovlokukon kun varma lakto. Poste ni iris sledi sur la ne prikonstruitan montoflankon, situantan malantaŭ via domo. La ĉielo bluis, la suno brilis, sed la aero akris. Du kontraŭ unu – ni ludis la neĝbulo-maĉon. Tutegalis, kiam kiuj estis pare, – vi kun Elinjo aŭ ni la du viroj, – la rezulto estis ĉiam nedecidita kaj multaj ridegoj. Ho, kia estis ŝia rido! Ŝi havis admirindan sonoran ridon. Poste ni viroj ornamis la kristarbon, dume via edzino kuiris. La abio jam brilis, glimis meze de la antaŭĉambro, kiam vi ŝaltis la gramafonon. Vi dancis unuaj. Estis ĝojo, rigardi vin. Vi estis sperta dancista paro. Rigardante vin mi denove eksopiris:

– Ho, se ankaŭ mi povus ĉirkaŭpreni la talion de Elinjo. Ho, se ankaŭ mi povus brakumi ŝin, almenaŭ unufoje en mia vivo! Mia sonĝo ne ĉesis senplenume. Vi ŝanĝis la diskon kaj demandis min: ĉu mi ne daŭrigus la dancadon kun via edzino, ĉar vi havas nepran taskon aliloke en la domo, kiun vi devas fari ankoraŭ antaŭ la tagmanĝo. Ne sciante, kiu muziko sekvos, ŝi staris antaŭ mi kvazaŭ sekvus tango. Mi direktis ŝin tuŝante ŝian dorsomezon anstataŭ la talio, ke ŝi ne povu foriĝi de mi dum la ĉardaŝaj turniĝadoj. Eksentante la tremon de ŝia korpo, mi sentis tian senliman feliĉon, ke mi eĉ unu vorton ne povis eldiri. Ankaŭ ŝi silentis. Ruĝigante pro varmo ni ambaŭ dancis ĉi sangoekscitan hungaran dancon. Mi sentis tiam grandan dankemon al vi, ĉar vi donis al mi ĉi sekretan feliĉon. Vi volis, ke ankaŭ ni dancu kune.

– La feliĉon vi ambaŭ elmeritis kaj krome ni ne povas antaŭvidi la estonton – intermetis Karlo – ĉi via dancado estis mia donaco al vi du.

Post ioma silento Gabrielo daŭrigis sian konfeson.

– Vi revenis, la ĉardaŝ-muziko finiĝis, kaj ni sidiĝis por tagmanĝi. Dum via foresto vi fermis la lignajn fenestrotabulojn de la ĉambro kun skulptita meblaro. Ili restis malfermitaj nur tiom, ke tra la aperturoj povu trafiltriĝi la ekstera lumo en malvastaj strioj. La lustro-kandeloj brulis, ŝirmataj per marverda vitra kloŝo. Sur la tablo odoradis la altŝaŭma bonodora vinsupo de Elinjo. Vi, la ceremonio-majstro tute ravis min. Karlo, tiun vian talenton mi ne konis ĝis tiam.

La enfiltriĝanta ekstera lumo efikis, kvazaŭ la betleĥema stellumo falus sur nin. La sekva plado estis la majeste gustanta fandita fromaĝo. Kaj kiam samtempe kun Elinjo mi metis mian forkon kun la frititaj bulkopecetoj en la fonduon, niaj tremantaj manoj intertuŝiĝis por kelkaj sekundoj. Tiam ni du, kaj vi la tria samtempe kliniĝis super la fonduan pladon, por enspiri la majestan fromaĝodoron kaj kaŝi la briladon de niaj pro emocioj larmorosaj okuloj. Ankoraŭ nun mi pensas: ni estis la tri paŝtistoj, kiujn la betleĥema stelo gvidis tiam tien, ke ni povu ekkoni tiun ĉi por ni ne refojigeblan miraklon de la Kristnasko.

Sed, per tio ankaŭ ĉesis la miraklo. Eksonoris mia poŝtelefono. Flegistino de mia bopatrino telefonis, ke abrupte malboniĝis la sanstato de mia bopatrino, ŝi devis enhospitaligi ŝin, do mi iru hejmen, tuj kiam eblas. Samvespere mi hejmenveturis, sed ĉi tiu admirinda Kristnasko estis jam mia. Kaj ĉio estis tiom belega, ke ĉi tiun feliĉon mi volis dividi ĝis nun kun neniu. Ĉu vi vidas? Ne nur malfeliĉulo silentas, povas muti ankaŭ feliĉulo. Ĝuste pro via stelo mi decidis forlasi nian belan amikan interligon. Doloris, tre doloris, sed mi ne povis forpreni de vi Elinjon. Sed nun, kiam mortis ankaŭ la tria edzino de mia patro, kaj mi restis tute sola, denove tiu stelo gvidis min ĉi tien.

– Jes, la vivo estas ne antaŭkalkulebla – aldonis nun Karlo. Tiam vi forlasis nin, nun Elizabeta. Vi renkontis unu la alian nur por mallonga tera tempo. Sed, al vi Gabtrielo, mi povas danki, ke la anima sufero de Elinjo malrapide forpasis, kaj ŝi estis por mi la plej bela donaco de mia vivo.

– Ankaŭ vi estis tio por ŝi – diris Gabrielo konsolante Karlon. – Mi scias pri tio, foje ŝi skribis al mi prie.

– Jes, ni tre amis, komprenis unu la alian kaj ankaŭ vin, Gabrielo. Se vi volas, venu ankaŭ alifoje – vokis Karlo Gabrielon.

Adiaŭante larmo ekbrilis en la okuloj de Gabrielo, ĉar li rememoris la fotoalbumon, kie lian foton rigardis lastfoje Elizabeta. Baldaŭ alvenis la tago de la entombiga ceremonio. Aro da homoj staris ĉirkaŭ la tombo. Alvenis foraj gekuzoj, estintaj malnovaj gekolegoj, najbaroj, membroj de la kluboj de montogrimpantoj kaj esperantistoj kaj multaj aliaj homoj, kiuj konis, amis ŝin. La pastro longe parolis pri la bonkoreco de la mortinto. La tombejservistoj komencis porti la florojn sur la tombon.Ĉiuj estis nigre vestitaj, escepte Gabrielon. Li estis vestita en tiu vesto, kiun Elinjo foje laŭdis: li surhavis tiam kaj ankaŭ nun kolombogrizan kompleton kun malhelblua ĉemizo, arĝentgriza silka kravato, grizaj ŝuoj.

La ĥoro jam kantis la lastan psalmon, kiam de ie alflugis buntpluma birdeto kaj haltis sur la tomboŝtono, por ripozi. Ĉiuj okuloj observis la birdeton. La larmoj sekiĝis, la homoj ekridetis en si mem. La birdeto, sufiĉe ripozinte, elpikis petalon el iu blanka rozo de la florkrono, portita de Gabrielo, kaj baldaŭ forflugis.

Ĉiuj miris pri la okazintaĵo. Sed nur al Gabrielo konsciiĝis, ke la birdeto forportis nun la lastan memoraĵon de lia malfrua kaj entombigita amo.

## La Ripozo

El interna urbo de Miŝkolc, kune kun mia tri jara infano, mi jam iris al nia hejmo. Nia fileto estis laca kaj mishumora. Li ĉiamaniere volis sidiĝi sur la vintra strato sur la neĝo-kaĉan trotuaron. Mi ne permesis tion, do li forte, histerie ekploris. Unue mi silentigis lin, sed poste lasis plori, ĉar jam mi tre sopiris la baldaŭan hejmen-alvenon.

Iome li ankoraŭ ploretis, sed subite li ĉesis. Tiam al li turnante min mi diris, ke mi ĝojas, ke li lasis la ploregon.

Li tuj sciigis min: mi ne pensu, ke li finis, li nur ripozas.

# Sinjoro Herman, Ottó Kaj La Praa Popola Fiŝkaptado

En Miskolc-Lillafüred estas trovebla la somerdomo de Herman, Ottó [Ot:o: herman] la grandsignifa poliscienculo de la 19. jarcenta Hungario.

Li iniciatis la ekirigon de esploradoj pri la prahomo, sur la monto Avas [avaŝ], en urbo Miskolc [Miŝkolc], kaj malkovrojn de la grotoj en la montaro Bükk. Unu el liaj verkoj temas pri praa fiŝkapta metodo de Hungaroj. Pri tiu metodo mi vidis de li verkitan libron en iu vitra ŝranko de lia somerdometo. La konstruaĵo estas nomata Pele-ház/Domo de Avelgliro. La avelgliroj, grandaj gliroj estas plus-minuse samgrandaj bestetoj kaj similaj al sciuroj, sed ili ne havas flagrantajn vostetojn kiel la sciuroj. La avelgliroj havas grizan koloron, ili estas viglaj bestetoj. Pere de brilantaj okuletoj, gajecoj ili ridetigas la rigardantojn. Ĉi besteto ŝatas vintrumi ĉefe sur partoj de subtegmentoj de arbaro-proksimaj konstruaĵoj. Kiam la poliscienculo ekspertis ties subtegmentan ĉeeston en lia domo, tiam ricevis la somerdomo la nomon: Alvelgirla-domo.

La de li verkita, de mi jam menciita libro – ĉe la enaj ilustraĵoj – malfermite kuŝis en la vitroŝranko. La ilustraĵoj desegnitaj mem de la aŭtoro, montris la metodon de la praa popola fiŝkaptado, kiam multuloj kolektis fiŝojn. Apud la priskribo tiuj bildoj faris tute klara la manieron.

Dum mia unu semajna restado en la kroatia urbo Split, foje mi iris al la marbordo je la matena kvara horo, ĉar mi scivolis pri la tiamaj matenaj koloroj de la maro kaj ĉielo. Tiuj same tiaj estis, kiaj estas videblaj sur pentraĵoj de la pentroartisto Csontváry Kosztka, Tivadar. Neforgeseblaj estis ili. [Teodoro Ĉontva:ri Kostka, estis vera artisto de la koloroj.]

Mi staris sur la marbordo en proksimeco de la motelo ene kun la niagrupa tranoktejo.

Subite motoraj boatoj startis de la bordo kaj rapidis surmare al la foro. Mi rigardeblis kiel oni deĵetis fiŝkaptistajn retojn eksteren de la boatoj. La retoj estis ekipitaj per koloraj konkoj kiel pezaĵoj kaj tiuj povis servi ankaŭ kiel erarigiloj al la fiŝoj. Tiun agon ili ripetis kelkfoje. De la lasta loko ili revenis al loko de la unua reto. Kaj tiam en la ŝipetoj sidantoj ekstaris. La boato-motoroj lasis murmuron.

Oni per dikaj bastonoj komencis forte batadi la mar-akvon supren-malsupren. Per tiuj movoj pelis ili la fiŝojn en la retojn.

Kiam ili kuntiris la deĵetitajn retojn, tiuj havis bonegan kaptaĵon. La retoj tute plenaj estis per arĝente brilaj belaj grandaj fiŝoj.

Tiu fiŝkaptada maniero estis identa al tiu, kiun, s-ro Herman, Ottó la poliscienculo priskribis kiel praan fiŝkaptistan metodon.

# La Stelo Kaj La Sovaĝfloro

*/Memoro pri amikeco/*

Dum stelplena, luna nokto branĉo krakis, herbo kliniĝis. Herbejmeze en valeto, sovaĝfloro malfermiĝis.

Kia estas grundo, ĉielo? Disrigardis ĝi scivole. Birdpepado, aervarmeto, ĝin tikladis, ĝoje, fole. Okuletoj de la floro laŭ ĉielo kvazaŭ migras: de kie la lum' verŝiĝas, ho, kio kovras, trankviligas?

Jen stel-miloj sur ĉielo, kiel lampo Luno brilas, la proksimo kaj malproksimo, lumo kaj mallumo ludas.

Unu stelon ĝi rimarkas proksimiĝan malrapide.

– Saluton stelo! –: ĝin salutas la sovaĝfloro amsopire.

Kaj la stelo ĝin resalutis:

– Saluton floro! Estu ĝoja! Poste ĝi plu digne glimis sur la Laktovojo sprita.

Ora varmo de brila Suno, pluvoj kaj la tero utile vartis, gardis la floreton, plenkreskigis ĝin subite. Ĉiu nokte renkontiĝis jes, la stel', kaj la sovaĝflor'. Ĝoja estis, grandan kreskis sed jen, somero estas for.

– Ho amikec', komprenĝojo la vera, raraĵo estas, la ĝuo, plezuro tra viv-vojo ne ĉiun koron atingas! Printempo for, regas vintro. Laŭ la orbit' pasas stelo. Neĝkovrite la amiko, ne videblas de la ĉiel'.

Stelo memoras ne trovanta, ja diris la floramiko:

– Vi volis; mi estu brila, mi iĝu, kiel vi, stelo! Min beligis, vi mem vidu! Arĝenton vi ŝutis sur min. Ho serĉadu, ho serĉadu, sur Laktovojo vi trovos min.

– La stelo sin reenturnis, subrigardis kun malĝojo, kaj enspace malaperis: supre, en la luna nokto.

# La Ĝustatempa Helpo Valoras Oron

*– Fabelo –*

La du luphundojn de la Zooĝardeno – la patrinon kaj sian idon – post alveno de la nova direktoro oni forigis de tie. Ja, la nova direktoro alportis novajn gardhundojn.

La du luphundoj apartenis ankaŭ poste al la Zooĝardeno, sed oni portis ilin en Miŝkolc-Tapolca, kaj tie jam la parkprizorgantoj devis zorgi pri ili. Kaj ĉar la ido ankoraŭ estis tre juna, tial sur la boatlagbordo oni ligis lin nur per hundoŝnuro apud la ĉenon de sia patrino. Ĝuste tial okazis poste, ke oni provis forŝteli la belkorpan hundon multfoje, sed vane.

Tiutempe jam denove naĝadis cignoparo sur la lago, kie kune kun la sovaĝanasoj ili donis ĉarman spektaklon al la tienvizitantaj infanoj, kiuj manĝigis la akvajn birdojn per maizoj kaj enakvonĵetitaj panpecoj. Tiu famo disvastiĝis, ke cignoj tial ne estis videblaj dum du jaroj, ĉar malbonaj homoj allogadis ilin per nutraĵoj al la bordo, ili kaptis, murdis kaj manĝis la grandajn birdojn. Sed, pri kapto de la ŝtelistoj famo ne aŭdiĝis. Do, tasko de la du hundoj estiĝis gardi la lagaj birdoj, krom atenti pri la boatoj.

Dum iu somera nokto, kiam ĉiuj bonanimuloj estis jam ekdormintaj, du homoj kaŝiris – ĝis fino de la lagborda promenejo – zorgeme esplorante: ĉu la parko vere estas senhoma, aŭ ne. Ĉio kvietis, nur en la proksima arbaro bruetis io, sur kelkaj fenestroj de la strandmalantaŭaj loĝkvartalaj domoj videblis, ke tie iuj rigardas televidelsendon. La du homoj flustre babiladis inter si, pritraktis ion. Kvankam, la hundoj ekatentis, tamen ne moviĝis. Sur la enlaga insulo la cignoj ŝajnis dormi, perbeke sub flugilo. La sovaĝanasoj dormis surlage.

Laŭ la priparolita plano unu homo enpaŝis la lagon, kun kuntordita ŝnuro, sub sia akselo kaj malrapide ekiris al la insulo de la birdoj.

La alia staris atendante la amikon, tuj ĉe la akvorando, kun sako enmane. La afero iĝis suspekta al la hundido, ĝi vekis sian patrinon frotiĝante al ŝi. Nun jam levigitkape ili atentis , kion aŭdacos fari tie tiuj du homoj.

Unu cigno eksentis la danĝeron pro aŭdo de la ekplaŭdo, kaj ĝi malrapide flankenpaŝadante surglitis aliflanke la akvon. La hundoj eksaltis, la sovaĝanasoj disflugis. La alia cigno malfacile moviĝis, ĉar

antaŭnelonge batis sian piedon al la trunko de akvonenfalinta arbo, kaj nun la iro kaŭzis doloron. La homo malrapide atingis ĝin, kaptis, poste provis ŝnurligi. Sed la cigno defendis sin, malesperiĝante perflugile batis sian atakanton, perbeke svingadis, pikadis ĉirkaŭ sin. Fine ĝi sukcesis liberigi sin kaj surflugi la lagon. Vidante ĉi interbatalon, la hundoj komencis bojegi. Nek la surborde estanta homo volis perdi la predon, tial ankaŭ li enpaŝis la lagakvon kaj komencis foje marŝi, foje naĝi post la cignojn, depende de la akvoprofundo. La hundojn kaptis ekscito. Ili saltadis kaj skuigis siajn ligilojn, ĝis ili sukcesis eltiregi el la tero la ĉenon fiksigan paliseton, kaj la hundŝnuron ŝirante ili ekkuregis post la du homojn. Nun jam, ambaŭ homoj komencis persekuti la destinitajn birdojn. Sed tiuj rapidritme naĝis al la lagmezo, kie la fluejo estas jam profunda. La hundido ne povis sinregi, ĝi saltis sur la bordo-proksiman homon. Sed mise kalkulante la celon ĝi saltis apud lin. Tion vidante la homo provis dronigi ĝin, premante la kapon de la hundo sub la akvon. Fine, tamen la junhundo sukcesis eliĝi el la premo de la senindulgaj manoj, kaj kaptis la femuron de la viro. Tiu ekkriegis pro la doloro, piedbate liberiĝis de la atakanto, kaj vokis la kunulon por helpi. Sed tiu ne povis helpi, ĉar li luktis kun sia cigno. Li elŝiris jam multajn lanugojn kaj plumojn el ĝi, kiam ĝi sukcesis denove foriĝi de li. Tiu homo jam rondnaĝis la tutan lagon pro la birdo. Ĝuste nun li atingis la lagferman akvoforigantan kluzon, kiam post unu neĝusta paŝo li sinkis en la ŝlimon kaj plumovi ne povis. Vidante la hundo tiun situacion, naĝis surbordon ĉirkaŭkole kun ŝvebanta-flosanta planto, pro ŝlimo malpurege. Poste kuregante kaj bojante, sur la ponto super la kluzo, murmurante, dentogrincante ĝi timigis la homon starantan apud la kluzo, kaj tiu povis fari nenion kontraŭ ĝi, sed ankaŭ ne kuraĝis. La hundido atingante la bordon klopodis deskui la akvon kaj malpuraĵojn pri sia vilo. Pro tiu ago la vizaĝo de la surkluzon-grimpinta ulo iĝis simila al la makula ovo de la meleagro, je granda gajeco de la pli poste tien alvenintaj policistoj.

Dume la patrinhundo ne permesis albordiĝi la alian ŝteliston. La fiaskaj birdŝtelistoj kriegadante blasfemis. Pro la granda kriado kaj bojado la loĝantoj de la proksimaj domoj venis observi, kio okazas sur la lagbordo, kial bojas tiel forte la boatgardantaj hundoj. Ili venigis la policistojn de la proksima policejo. La alvenintaj policistoj ne, nur la post ili venintaj fajrobrigadistoj povis eltiri el la lago la du cignoŝtelistojn. La deliktiloj estis unusencaj. Unu fihomo surhavis

cignolanugojn, plumojn surharare kaj sur sia jaketkolumo, - la aliulo premis enmane ankaŭ tiam la sakon.

La policistoj fine malkaŝis la konindan fakton al la du stultuloj, ke la cignorostaĵo ne estintus ĝuoplena, ĉar pro la al granda streĉo de la muskolforto, necesa por la naĝo la cignoviando estas tro malmola, nemanĝebla.

Dankon al la du luphundoj, pro savo de la vivo de la ŝatataj grandaj birdoj.

# Miskono

La rakontota evento okazis dum la 51-a UK en Budapeŝto (1966), kiam super la enirpordo de kongresejo la gastojn atendis jena teksto sur tabulo okulfrapa:

Salaton al la gastoj!

anstataŭ la vortoj: Saluton al la gastoj!

En la kongresa halo post la oficiala inaŭguro estis granda tumulto. Ĉiuj serĉis aliulojn por diversaj celoj.

Min esperantigis samideano doktoro Ludoviko Győry Nagy, kiu estis la prezidanto de nia Departamenta Esperanto Komitato en Miskolc. Li estis amiko de doktoro Kolomano Kalocsay; ili ne nur kune finis la abbituran ekzamenon en la sama gimnazio, kaj ankaŭ kune ellernis la Esperantan lingvon en 1912.

Do, sinjoro doktoro Lajos Győry Nagy fieris je mia Esperanto lingvoscio, kion mi de le alproprigis; li volis prezenti min al sia amiko.

Iuloke en la kongresejo oĉjo Ludoviko diris al mi, ke mi ekatendu lin tie, ĉar li vidis sinjoron Kalocsay en la proksimo kaj prezentos min al li.

Mi ne atendis longe, ĉar li baldaŭ revenis, akompanante iun viron. Mi pensis ke tiu estas samideano Kalocsay, ĉar li tihavis la saman staturon, eĉ la saman vizaĝon, kiun mi konis per fotoj. Oĉjo Ludoviko diris al la viro atendi tie, li baldaŭ revenos.

Ne volante resti senvoĉa, mi alparolis la sinjoron esperantlingve.

– Estu kore salutata! Mi tre ĝojas ekkoni vin, kiel elstaran amikon de la

Esperanto literaturo. Mi estas lernantino de doktoro Ludoviko Győry Nagy… ktp.

La fremdulo pacience finaŭskultis min, poste ridante respondis.

– Multaj miskonis min dum ĉi tiu UK, pensante, ke mi estas samideano Kolomano Kalocsay. Mi tre bedaŭras, sed mi ne estas li. Mi nur similas al li: mi estas tute kalva, kiel li. La sinjoro estis Polo. Lian nomon mi bedaŭrinde jam forgesis.

# Neĝulineto

La patrino diris al sia fileto fabelon antaŭ ekdormo. La kvin jara fileto postulis ĉiam novan kaj denove pli novan fabeldetalon, do li ne ekdormis baldaŭ. Krome, la fabelo dum la ripetadoj iomete ŝanĝiĝis, transformiĝis.

– Nu: la arbaraj bestetoj tre ŝatis la blankhaŭtan reĝidinon kiu ĝuste pro tio ricevis la nomon Neĝulineto. Do ili multe helpis ŝian laboron. La kapreolo portis sur kornoj en poto freŝan akvon el la arbara fonto, la sciuroj gaje saltadante amuzigis la malgrandan, belegan, orfan knabinon. Antaŭ la domo la leporoj formaĉis la herbon tiel egalmezure, ke ĝi aspektis kiel vasta, mola tapiŝo ktp."

La fileto nun oscedis, poste rimarkis:

– Ho, panjo! Tiuj leporoj tre saĝaj estis, ĉar ŝparis monon al la bela knabino, al kies beleco kaj boneco simila estis trovebla nenie en la tuta lando.

– Ankaŭ ni aĉeteblus kelkajn leporojn por maĉi la herbon en nia ĝardeno. Tiam ankaŭ ni ekŝparus la multekostan herbotondilon!"

# La Ludo

La patrino, kaj la fileto ellasis la kuniklojn de la kaĝoj, ke tiuj libere kurade, herbon manĝade ĝuu la vivon en la ĉirkaŭbarita kurejo de la ĝardeno.

Sur la somera herbo, sub la griotarbo ĉirkaŭ la kaĝoj la kunikloj tiel vigle saltadis, ludis unu kun la aliaj, ke la du domaj katidoj enviis. La katetoj saltis sur la teron de la barilo kaj unue surteron kuŝante atentis la kuniklojn, poste sur la tero ruliĝadi komencis. Tiel vokante al komuna ludo la saltadantajn mallongvoston havantojn. La kunikloj unue nur rigardis ilin., nevolante ludi kun la nekonataj longvostanoj, subite al la katidoj alkuregante forpelis la fremdulojn.

Post tio la etaj katoj suprensidis sur unu kaĝtegmenton kaj de tie atentis la kuniklan gajecon.

Dume la patrino purigis la kuniklo - hejmojn, de tempo al tempo malsuprenkliniĝade al la sube estantaj lokoj. La fileto portis la bonodoran fojnon kaj hordeon en la jam purajn kaĝojn.

Subite la patrino tion rimarkis, ke ŝi povas movi ŝian kapon nek dekstron, nek maldekstron, ĉar io tre tiras ŝian hararon. Ŝi pensis, eble la vento blovita kaĝtegmento kaŭzas tion, eble en ĝin kroĉiĝeblis ŝia hararo. Fine, tamen la patrino sukcesis liberiĝi iomete. Ŝi tiam ekvidis, ke la katidoj kiel bridon, tiel prenas ŝian hararon. La patrino karese ektiklis la katidojn. Ili tiam tuj ĉesigis la ludon, sed novan agon, novan ludon pridecidis. Ili unue saltis sur la kapon de la patrino, poste ĝisfino ili kuris sur dorsode la patrino. Poste la katidoj saltis al la tero kaj malaperis en la ĝardeno.

# La Fidela Eta Apro

En iu sudhungaria vilaĝo foje okazis, ke iu viro iris en arbaron por kolekti fungojn, sufiĉe malproksime de la vilaĝo, kie li loĝis.

Li trovis malmulton da fungoj, do li iris pli enen en la arbaron, al la veprejo. Iuloke li trovis grandan aproplugaĵon, kaj kelkaj sangogutojn sur herba vojeto. Rigardante tien, de proksimo plendan apro-ido ploradon li aŭdis. Li staris – staradis tie kaj pensadis. Ĉu la aprino-patrinon mortpafis la ĉasistoj, ŝi ne moviĝas kaj tiel ploras sia ido? Kio okazis, li ne povis diveni. Li timis de la vundita sovaĝbesto, sed pikis lin la scivolemo. Fine, venkis la scivolemo. Singardeme li alproksimiĝis la plendantan voĉon. La bestpatrino ne videblis, sed apud la vepro kuŝis eta, vundita apro-ido. Tiu ploris kiel mortanto.

La kamparano ekkompatis, hejmenportis ĝin. Li vokis veterinaron al la mortmalsana besteto.

La kuracisto diris ke la etulo eble vivos ankoraŭ unu aŭ du horojn plu, poste ĝi certe mortos. Tamen li donis medikamenton, antibiotikuman injekton por plifortigi ĝin. La viro trinkigis lakton solvante la medikamenton pli frue en ĝi, kaj po kuleretoj donis ĝin al la malsana porkido. Poste, el diversaj grejnoj li muelis kaj faris laktan kaĉon kaj per tio manĝigis lian ŝirmaton. La bandaĝita kaj jam ne malsata besteto ekdormis.

Pro la zorgema flegado post kelkaj semajnoj la „orfo" resaniĝis kaj vigle kuradis en la korto. Kiam la vilaĝano iris en la drinkejon, ĝi akompanis lin. La ido ĉiam ricevis ion tie: tason da lakto, aŭ unu pomon. Foje okazis, ke ĝi ricevis la kutiman donacon pli malfrue. Pro malpacienco ĝi komencis renversi seĝojn, tablojn en la drinkejo.

Dume, la tempo pasis. La apreto pligrandiĝis. Je konsilo de la geamikoj kaj de aliaj vilaĝanoj, la „bonhomo" reportis la apron per aŭto en la arbaron, kie li trovis ĝin. La apro gaje enkuris en la arbaron. La homo trankviliĝis, ke lia protektato en la futuro vivos sian liberan vivon de apro.

Sed matene kiun li vidis vigle aprobleki, kun sia nazo puŝpikadi la korto-pordon? Neniun alian, ol lian ŝirmiton. La apro kuris plurajn kilometrojn ĝis la vilaĝo.

Tiu reen-porto plurfoje ripetiĝis, sed sensukcese. La plenkreskinta apro ĉiam reiris al sia amiko, kaj eĉ nun vigle vivas en la vilaĝo. (2003).

# Ĉu Nur Unu Minuto Estas la Vivo?

Ho, rapide kunpaku, kaj venu, ĉar la gepurigistoj jam koleretas, ke ĝis nun ni ne iris hejmen – diris Marianna [marian:a] al Ildikó[ ildiko:], kiam antaŭ la 18a horo ŝi enrigardis la laborĉambron de la kolegino. Sed ĉar Ildiko sidis plu antaŭ si rigardante, silente, senvorte, Marianna paŝis al ŝi, enŝrankigis la aron da oficejaj aktoj pretigitaj de Ildiko, karestuŝis ŝian ŝultron, kisetis ŝin kaj denove alparolis ŝin urĝante por la ĵusa hejmeniro:

– Vi sidas tiel, kvazaŭ neniu atendus vin hejme. Venu, do! Ne zorgu pri tiu senanima oficeja ĉefo! Pensu nur, pri via familio. Venu kara mia amikino!

Fine Ildikó ekstaris, kaj ekiris mekanike post Marianna.

– Dankojn pro via afableco. Ekde morgaŭ mi devos iri al kuracistoj por esplorigi min. Mi trolacigis min, ja la ĉeflibristo sian laboron farigas pere de mi, dume miaj farendaĵoj suferas prokraston. Sed por fari ankaŭ ilin, mi devas labori ĉiutage multe pli, pli ol ok horojn, entute 15 horojn.

– Ĉu pro via atendebla foresto koleriĝis tiome la ĉeflibrotenisto?

– Ne, sed tial, ĉar por pretigi mian laboron, mi nun prokrastigis la lian.

– Morgaŭ mi telefone anoncos, ke mi ne venos labori plu. Mi ne volas, ke mia edzo divorcu de mi – kiel li minacas min jam delonge pro tio, ke mi povas esti nek edzino nek patrino bona. Mi amas ilin, mi volas vivi por ili.

Babilante kaj pensadante pri Ildiko, Marianna ne elektis la hejmenkondukantan vojon. Tion ŝi rimarkis nur kiam ili enbutikiĝis jam la vendejon de nutraĵoj en la loĝkvartalo de Ildiko. Marianna tuj vokis poŝtelefone ŝian edzon por anonci, ke ŝi malfruos pro hejmenakompano de Ildiko, kiu ne sinfartas bone. La edzo de Marianna komprenante la situacion diris, ke li kisetas Ildikon kaj lian bonkoran de li tre amatan edzinon. Marianna pensis, ke ŝi povos porti la mansakon de Ildiko plenplena per nutraĵoj al la vespermanĝo, kaj eble povos ŝi preventi la edzan kverel-erupcion pro la malfruo de Ildiko.

– Tiom multe da manĝaĵoj vi aĉetis, kvazaŭ vi prepariĝus al festeno – diris ŝi.

– Jes, vere. Hodiaŭ estas mia naskiĝtago, pro kio mi promesis kuiri bonan vespermanĝon al la familio, ludadon kun miaj infanoj kaj amoran nokton kun mia edzo. Sed, ĉar mi havas jam nenienergion por kuiri, denove malvarma vespermanĝo estos.

– La kapon supren, kredu, ke ĉio reboniĝos! Alprenu gajan mienon! – konsolis Marianna Ildikon. Hejmenatinginte Emeriko, la edzo de Ildiko malfermis pordon, kaj tuj kolere alparolis la edzinon:

– Vi denove malfruis! Mi vidas, denove ne kuiriĝos vespermanĝo kaj vi denove malbonos en la lito! Ildiko mallaŭte respondis:

– Ni ne estas solaj, lasu min iom ripozi, sed poste mi rakontos kaŭzon de mia malfruo. Grava novaĵo atendas vin! Sed unue sidiĝu kaj komencu vespermanĝi la de ni kunportitajn malvarmajn delikataĵojn. Dume en unu ĉambra aperturo aperis gefiloj de Ildiko, kiuj kuris al ilia patrino, brakumis, kisetadis la alveninton. Ŝi same kisetante brakumadis ilin kaj dume kliniĝis al la edzo por kisi unu la alian. El la alia ĉambro zumis melodio de la modkanto: Nur unu momento estas la vivo…

– Panjo, ne komencu kvereli unu kun la alia, gravas, ke ni estas jam kune, venu, ke ni povu festi vin!

Sed intertempe la edzo rimarkinte stari Mariannan proksime al la enirpordo, kolerete turnis sin al ŝi:

– Ni bezonas nun nur mian edzinon. Kial vi venis?

– Mi helpis vian edzinon hejmenveni, ĉar ne sentis sin bone. Prenu Emeriko la mansakon per la nutraĵoj! Bonan apetiton al la vespermanĝo! Viglan festadon je naskiĝtago de Ildiko! Mi foriras jam.

Emeriko manon etendis al Marianna, kiu paŝis al la pordo eliri, kiam el la ĉambro aŭdiĝis ĝemo. Enkuregante ili ekvidis Ildikon kuŝante ŝi duone surtere duone surlite, forte spiregante kvazaŭ rigidinte pro iu spasmo. La plenkreskuloj tuj rekuŝigis ŝin sur la liton, la gefiloj portis ornamkusenojn sub ŝian kapon, ili malstreĉigis ŝian vestaĵon, per malseka tuketo viŝadis ŝian frunton, vizaĝon. La edzo nekompreneme staris apude kaj diradis:

– Kio estas? Kial vi kondutas tiel? Ĉu vi estas tiom laca?

– Eble tial okazis, ĉar hodiaŭ ne havante tempon mi manĝis, trinkis neniom.

Sed Marianna antaŭsentante malbonon, provis voki telefone la famili-kuraciston, poste la vesperan kuracistan deĵoron. Sed ĉar tiuj ne sinanoncis dum la sekva kvaronhoro, Marianna vokis telefone la ambulancon. Ili aperis post dek minutoj.

– Sinjorino persiste daŭrigu la profundan spiregon! Ni helpos! Kuraĝon! – konsolis la kuracisto. Post rakonto de Marianna pri la sanproblemo, la kuracisto mezuris la sangopremon de Ildiko, donis al ŝi injekton por malaltigi la altan sangopremon, ŝi ricevis blovon sublangan, kaj la kuracisto anoncis, ke ŝi devas esti tuj transportata en hospitalon pro koratako. La oksigenmasko ankoraŭ ne estis metitita al la vizaĝo de Ildiko, la familio ankoraŭ ne perceptis kio okazis, kiam ĉe ŝi nehelpeble sefektiviĝis la biologia morto. Al la familianoj Marianna rakontis pri labortago de Ildiko emfazante, ke multe da malagrablaĵoj, atingis ŝin en la oficejo. Poste ŝi kondolencis al la kompatinda familio kaj ankaŭ ŝi foriris.

El rezulto de la kuracista sekcado evidentigis, ke Ildiko estis atakita de korinfarkto kaj jam ne unuafoje. La situacion pligravigis korklapa cirozo, kaj la duontempa gravedeco. La familio samtempe perdis la patrinon kaj la duontempan feton.

Kompare al la eterneco la homa vivo estas nur minuto. Ĉu vere nur unu? Jes. Nur unu minuto estas la vivo, se oni estas feliĉa. La vivo de feto estis nur unu minuto, kaj la patrino eble per unu minuto pasis 40 jara, kiam ŝin forrabis la morto, kio iĝis la konsolo al ŝiaj suferoj korpaj kaj animaj.

# La Sep Makula Katica Skarabo

*- Fabelo -*

Ne trans la fabelmaro Operencio, nur sur la kampo trans la ronda arbaro en la granda naturo foje vivis eta skarabo. Ĝi estis kaj malgranda, kaj malbela en ĝia funebrokolora jaketo, kaj ronda, pro kiuj proprecoj la aliaj skaraboj vestitaj en pli belkoloraj vestaĵoj mokis la kompatindulon. Pro la mokadoj ĝi sentis sin malfeliĉa, forlasíta orfa. pro tiuj malgajigaj proprecoj ĝi neniam partoprenis la grandfaman Printempan balon kio estis parado ankaŭ de arboj, herboj, floroj, papilioj, insektoj. De jaro al jaro dum tiu balo de Printempo prezentis la revekiĝanta naturo siajn plurmilojn da mirakloj. Ĉiuj vivuloj sopiris ĉeesti ĝin.

Foje ĉi eta malgaja skarabo flugdirekton erarante surflugis al ruĝa vestaĵo de knabino. Belecon de la ruĝa vestaĵo faris pli magia unu blanka antaŭtuketo. La eta malgaja skarabo silente, pripensante ripozis sur la falbalo de la robo, sed foje suprenrigardante rimarkis la belan lokon sur kion flugis. Movante sin por forflugi, la knabino rimarkis la surrobe kaŭrantan skarabeton kaj alparolis ĝin:

– Kiel nomiĝas ci malgranda skarabo? Kial ci malgajas kaj ne konkursas flugante kun la printempa vento?

La skarabeto surprizite alrigardis la knabinon kaj respondis:

– Mi malgajas pro mia malbela funebrokolora nigra vestaĵo. Tial mi estas nenomito. Kaj vi bonkora knabino kiel vi nomiĝas?

– Mi estas Katinka – respondis la knabineto. Mi vidis cin jam ankaŭ alie. Ci havas belajn flugiletojn kiuj ŝajnas kiel flugiloj de la feinoj. Ci estas pro ili feine ĉarma!De nun pro la inter ni estanta amikeco mi nomos cin skarabo post mia nomo Katica. Ĉu ci vualflugila mia feina amiko akceptos de mi cian prinomigon?

– Jes, kara knabino la nomon mi akceptas pro via ĉarmo, sed tio neniom ŝanĝas, ĉar mi restas malbela.

– Malbela, malbela! Kion vi diras!? Mi donas al ci etan parton de mia robo. Metu ĝin sur vian jaketon! Tio estiĝos poste ruĝa. Ĉu bone?

– Ne, ne estos bona. Mi ne akcepteblas vian donacon, ĉar via patrinjo multe kudris laboris, ke tiun vestaĵon povu doni al vi. Pro la trua vestaĵo ŝi malgajus. Kiel mi estu kontenta, se dume mi malgajigos iun? Sed mi ne deziras jam alikoloran kompleton, ja mi ricevis pli multe de vi, ion alian nekutiman mi ricevis. Mi ricevis vian amikecon kio

plivalorasol ĉiu bela kompleto, ĉar min, la malbelan skarabon vi amas, vi vidas min bela.

– Se ci estas tiel modesta, ke rifuzas mian donacon, mi ne povas helpi vin alimaniere, nur preĝi al la Ĉiopova, ke li helpu vin – diris la knabino, surgenuiĝis sur la herbon kaj ekpreĝis pro helpo. Poste mansignis ŝi adiaŭon kaj foriris. La tempo pasis poste kaj baldaŭ alvenis tempo de la balo printempa. Kvankam dume nenio okazis koncerne de  la nova vestaĵo, tamen la skarabeto iris al la balo nur rigardi ĝian belecon. Estis tie printempaj kaj frusomeraj floroj, papilioj, multkoloraj kantantaj birdoj, multkoloraj insektoj, skaraboj. Dum la rigardado alpaŝis ĝin la floro Papaveto kaj alparolis la skarabeton:

– Ĉu mi bone aŭdis ke ci estas tiu skarabeto kiu ŝatus novan vestaĵon? Se jes, venu kun mi. Ci ricevos florpetalon el mia jupo. La kudristino aliformigos ĝin konvena por ci.

La skarabeto ne volis akcepti la florpetalon, ĉar tiuokaze eble Papaveto ne havos sufiĉnombran petalon al sia jupo. Sed la floro ne cedis. Denove invitis la hezitulon:

– Hej modestulino venu! Ĉu ci konas la diron: se oni donas akceptu, se batas forkuru? Venu do kara mia, tiu al ci donacenda florpetalo ne mankos al mia jupo!

Printempo-feino bonhumore akceptis ilin. Ŝi rapide eltondis sep truojn el la proponita florpetalo. Poste ŝi metis ĝin al la nigran jakon de la skarabeto, kaj surblovante ilin, la ruĝa materialo surgluiĝis sur la nigran jakon kiu iĝis tuj nova, ruĝa vestaĵo kun sep nigraj makuloj!

Hej ekĝojegis la skarabeto vidinte sin en la spegulo. Ĝojege kriis:

– Mi beliĝis! Dankegojn! Estu benataj pro la helpo! Nun jam ĝoja estas via seppunkta skarabeo Katica (Katrinjo), via kokcinelo! Poste ĝi enmiksiĝis inter la balaj dancantoj. Tie ĉiu povis vidi, ke ankaŭ jupo de Papaveto plibeliĝis ĉar la feino mallongigis unu florpetalon kaj tiel videbliĝis la verda trunko de la floro kiu estiĝis tielmaniere pli ĉarma, pli alloga.

Infanoj, neniam forgesu, ke la bona ago; la dono de donaco feliĉigas ne nur la donaciton sed ankaŭ la donacinton!

# Rozbukedo

Post mia bonsukcesa Esztergom urba baleto, mi superiris al domo de hungara poeto Mihaelo Babits. Tiu domo staris sur vitmonteto. Sur la dommuro ekstere mi rigardis la subskribojn, mansignojn de tiuj diversaj hungaraj poetoj, verkistoj, aktoroj, kiuj gastoj estis tie iam.

Dum mia reeniro, en la aŭgusta varmego mi decidis: mi serĉos Esztergom - urbajn geesperantistojn, sed almenaŭ unu esperantiston el inter ili. Mi eniris en la plej proksiman Kultur-domon kaj demandadis pri esperantistoj. La purigistino akompanis min al la de ŝi konata unu sola esperantisto, al la direktoro. Mi prezentis min. Esperantlingve diris mi, kial mi serĉas lin.

La direktoron tre ĝojigis mia tiea vizito. Longe ni paroladis kontraŭ tio, ke liaj laborhoroj jam delonge finiĝis. Poste, li invitis min al la sekvontan vesperon en lian familian hejmon por vespermanĝo. Li certigis min: lia edzino estas tre bona dommastrino, karega virino. Mi certe bonsentos ĉe ili. Mi akceptis la inviton.

Alitage matene ĉe la ripozŝipo sur la bordo starante mi atentis la vid' al vidan bordon de la slovakia urbo Párkányos. La super danubakvo trafluginta koltintila voĉo /similis al tio/ anoncis, ke la pramo tuj ekiros. Post kelkaj minutoj mi rigardeblis la naĝantan akvan veturilon. Poste, mi finlegis: „Ĉe Danubo" titolan poemon de Attila József hungara poeto. Mi legis jam pli frue ĝin, ĉiam plaĉis al mi. Post la tagmanĝo mi subite ekdormis, ankaŭ sonĝis.

En mia sonĝo viviĝis la historio de la legita poemo. Sed, ne tiel finiĝis, ĉar mia imago pluteksis, komplikis la agadon.

Mi sonĝis pri tio, ke mi staris apud la ripozŝipo sur la danubbordo, kiam du junfraŭloj venis tien. Ili komencis serĉadi platajn, maldikajn, rondformajn danubajn ŝtonetojn, poste komencis ludi per tiuj la tn: „ŝtonsaltigadon" sur la akvosurfaco.

Antaŭ longa tempo mi aŭdis klarigon koncerne la ludon. La praaj hungaroj en la 9-a jarcento tiel depafis liajn sagojn, ke ili kaŝirante sur la akvonivelo trafis, morton portante por la sovaĝanasoj. Tiuj sagoj tiel trafis, ke la sovaĝbirdojn atingis tuj sub la akvosurfaco. Dume la sagoj tuŝis la akvon je rompita tempo de unu momento, kaj rondojn faris sur la surfaco je ĉiu tuŝo.

La du junuloj per la plataj, rondaj ŝtonetoj same glitĵetadis. Fine la ŝtoneto subakviĝis en la lasta rondo sur la akvo. La ludo bezonis sperton, multon da lerteco.

Sed, subite aperis tie belvizaĝa, juna viro, kiu petis la du jam konatajn junulojn, lasu lin por ekprovi la ludon. Je ilia permeso ankaŭ li prenis desur la tero ŝtonetojn. La unua ĵeto ne sukcesis, sed la pluraj jam jes. Li estis tre lerta ludanto. Post la tria ĵeto li rigardis sur min, kvazaŭ atendus mian laŭdon. Mi preskaŭ diris jam ion, kiam subite vekiĝis. Sub mi la ŝipon luligis la ondoj de Danubo.

Mi rimarkis, baldaŭ mi devos ekiri al geedzoj Kovács, partopreni la proponitan vespermanĝon.

Mi aĉetis bukedon da gladiolo por la dommastrino kaj mi sonoris ĉe pordo de la ricevitadresa domo.

Kiam la dommastrino min enkondukis en la domon, ĉiu rigardo suriĝis min. Pro tiuj rigardoj mi sentis min kiel interesa skarabo, aŭ fantomo. Sed miaj gastigantoj dum la tuta vespero tre agrable kondutis, bonega societo estis ili por mi. La dommastro samideano Paŭlo Kovács prezentis al mi liajn du amikojn. La unua estis: direktoro de la urba muzeo, la alia estis direktoro de biblioteko. La lasta sinjoro preskaŭ ĝis fino de la vespero iĝis mia amuziganto, bonkunulo, kiu multe demandadis min pri mia vivo, pri miaj gepatroj, kaj ĉu mi vojaĝis iam en Ameriko? Mi diris, ke mi ne havas parencojn tie, kaj tiun landon viziti tro multekosta estus por mi. Do, mi neniam faris viziton en landojn trans la „granda maro." Mia novkunulo estis tre agrabla tamen unupiedulo, kiu perdis lian piedon foje en akcidento.

Li uzis lambastonon por trafiki. Post la vespero mi adiaŭis de la societo. Mia novkunulo ne lasis min iri sola, hejmenakompanis ĝis la ripozejo mia.

Dum tiu vespero ĉio estis bona, agrabla. Tamen, mi estis embarasita, ĉar mia kara novkunulo la sama viro estis, kiun mi vidis en mia songô, sed tiam li havis du piedojn.

Alitage mi iris adiaŭi de mia samideano. Post nia renkontiĝo li proponis al mi Danub-bordan promenadejan promenadon. Li ekzamenigis min, ekzercigis kun mi la: –ig, iĝ, –anta, –inta, –onta, –ata, –ita, –ota gramatikaĵojn.

Finfine, li kontenta estis per miaj gramatikaj scioj. Subite demandon faris al mi: ĉu mi ŝatus ekscii la vivhistorion de lia unupieda amiko? Je mia jesa respondo li komencis la historion rakonti.

Lia amiko junviro estis, kiam enamis simile junan, belan, plaĉan fraŭlinon, kiu devena estis el riĉa familio. Li plurfoje petis ŝin geedziĝi kun li. La fraŭlino ne regalis lin per promesoj, sed tamen ŝi ridegis kaj ridegis kokete. La viro ne serĉis alian fraŭlinon, ĉar li amegis ŝin.

La familio de la amatita junulino estis katolikreligia jam ekde multegaj jaroj. Ili estis konformaj unu al la alia, ĉar ankaŭ la viro estis samreligia. Do, li tre deziris jam la jesan respondon al la geedziĝo. Sed, tion li ne ricevis, vane pasis la tempo. Intertempe komencis flugi inter la homoj maltrankviligaj famoj pri Germaniaj judekzekutoj, perfortaĵoj, brutalaĵoj. La junfraŭlino komencis timegi pro tiuj. Fine ŝi konfesis la sekreton kune kun sia timego. Pro tio timas ŝi, ke eble ankaŭ en Esztergom eblus tia ekzekutado /ne nur en Germanio./ kaj tiam oni reenrigardos al juda deveno de ŝia familio. Tiam eblus, ke oni ankaŭ ŝiajn familianojn persekutos. La viro trankviligis, kel li tion ne povas imagi. Sed, daŭre timiĝis ŝi. Poste la junulino ankaŭ tion diris al la junulo: se li promesas ke fuĝigos ŝin en Amerikon, ili geedziĝeblos. La junulo tre ekĝojis. La geedziĝo ekokazis kaj ili en Amerikon iris al nuptovojaĝo. Sed, ĝojo de la viro ne estis longdaŭra. En Ameriko, kie la junedzino sentis sin jam en sekureco, ŝi disedziĝis de sia edzo. La juna malgaja eksedzo revenis en Eŭropon. Pro akcidento li perdis piedon. Poste li revenis en urbon Esztergom. Ekde tiam li vivas sola.

Antaŭ mia ekapero en Esztergom, la amikoj renkontiĝis. Tiam tion diris la unupiedulo al lia amiko, ke nur unufojon en lia vivo li ŝatus vidi lian eksedzinon, kel li povu fini en si mem historion de lia amoro. Li donus ion ajn por tiu renkontiĝo.

Kaj tiam alvenis mi en la urbon, kaj ankaŭ en lian vivon. Mi estis la tuta similulino de lia eksedzino. Ankaŭ mia voĉsono, parolmaniero, movado, figuro, ideoj pri la mondo do en mia tuta homeco estis mi la kopio de la eksedzino. Sed, la amikoj en domo de miaj gastigantoj povis konvinkiĝi, ke nek miaj gepatroj, parencoj, nek mi neniam havis ian ajn kontakton kun la estinta edzino, aŭ kun ŝiaj familianoj. Inter ni la grandskala simileco por ili estis preskaŭ horora, timiga.

Post la fino de la historio mi demandis de mia novsamideano: kielmaniere ekkonis lia amiko la pli postan sian edzinon? Lia respondo ankaŭ min ektremetigis.

„La junvirino tute tiam deŝipiĝis sur la danubbordon, kiam la junviro glitŝjetadis apud la ŝipo. La bela juna virino laŭdis lian lertecon…”

Strange, sed tute tiel okazis ilia renkontiĝo, kiel la nia en mia sonĝo.

Post adiaŭo mi reiris al la ripozŝipo, ke mi kunpaku miajn aĵojn por la sekvonttaga forvojaĝo.

La kultura respondeculo per tiu famo akceptis min, ke dum mia foresto serĉis min kuriero kaj portis ion al mi. Tion ili metis en mian kajuton.

Mi eniris kaj trovis tie ruĝan rozbukedon kun nomkarto de la sendinto, kun nomo de mia unupieda novkunulo.

Mi ekkomprenis. Tielmaniere dankis li, ke finfine li fermeblis lian amorhistorion por eterno.

# Ekzemplo Pri Humaneco

La evento okazis ankoraŭ la 27an de Decembro en 2011. Kun mia edzo mi promenadis en urboparto de Miskolc en Alŝo – Majlát por rigardi kiel progresas tie la laboroj de la tramvoj-rekonstruo. Poste ni enaŭtobusiĝis por vojaĝi hejmen. Je la dua halto de la veturilo, mi ekvidis virinon ĉirkaŭe 40. jaraĝan, klopodis iri antaŭen al la ŝoforo en aŭtobuso plenŝtopita de vojaĝantoj. Ŝi petis la ŝoforon ne ekirigi la veturilon, sed restu samloke, ĉar malsanulo estas sur la buso, kiu bezonas tujan kuracistan helpon, pro kiu ŝi petis venigi tien tuj ambulancan aŭton. La ŝoforo vere haltigis la movon de la veturilo, iris malantaŭen al la maljunulo por observi kio povis okazi pri li. Spertante li la samon, ke li ne povas ekkontakti la maljunulon, li tuj venigis la sav-aŭtomobilon. La vojaĝ-publiko descendis por atendi alian aŭtobuson. Ni restis pro scivolemo pri la maljunulo por ekscii; kiun sanproblemon povas havi la jam tre aĝa homo. Li sidis multe malantaŭ ni, pli frue ni ne vidis lin. La junsinjorino plurfoje alparolis la maljunan homon petante lin por rigardi ŝin, premi ŝian al li donitan manon, meti antaŭen sian dekstran, poste la maldekstran piedon, por diri en kiu haltejo li enaŭtobusiĝis, kio estis lia vojaĝcelo, kiel li nomiĝas. Ŝajnis tiel, ke la maljunulo ne komprenas kion volas de li la junsinjorino. Kun larmokule li rigardis eksteren tra la fenestro surde, mute, paralizite kaj tute ne movis siajn ekstremaĵojn. Nur post preskaŭ je la deka peto li povis preni sed nepremi la manon etenditan al li. Eĉ buŝ-malfermi kaj elparoli li ne kapablis eĉ unu sonon. La saman situacion vidis ankaŭ la ŝoforo kaj konvinkiĝis, ke la ĉirkaŭ 80. jaraĝa homo kondutas sin jene ne pro ebrio. Post proksimume 15 minutoj alvenis la ambulanco, al kies kuracisto kaj fleganto la juna virino rakontis pri siaj spertoj pri la grandaĝulo, kiu eble fartas tre malbone. Ankaŭ antaŭ ili la juna virino finprovis la vizaĝtuŝojn al la maljunulo, ekzameninta, ke la tuŝoj de la duonvizaĝpartoj ne estas sentataj de li. Vidante tiujn la kuracisto kaj flegisto tuj sidigis kaj fiksis la maljunulon al portebla seĝo, ili metis lin en la aŭton kaj senprokraste rapidis al la hospitalo estante en distanco 10 kilometroj al la hospitalo. La juna virino menciis, ke ŝi vidis la samajn simptomojn ĉe sia edzo atakita de la apopleksio, kaj ĉar ŝi rimarkis, ke la damaĝitan maljunulon neniu helpis. Ŝi ne volis same lasi lin kun lia malbono. La ambulanca kuracisto diris al ni; tre bona estis,

ke la virino venigis ilin, ĉar siastate la maljunulo bezonis la tujan kuracistan intervenon.

Ankaŭ laŭ mi tre bona estas, ke ekzistas ankaŭ tiuj homoj konantaj la simptomojn de la malsanoj, ne preteriras sensente la helpon bezonantan kompatindulon kaj ĉefe la maljunan homon, sed ili donas belan ekzemplon al ĉiuj pri la homeco.

Kvankam povas esti eĉ pliaj multaj simptomoj, kiujn ni ne rimarkas, sed al la plej oftaj simptomoj de la apopleksio apartenas, eventuale kiel ĝiaj antaŭsignoj: la hazarde elformiĝanta duonflanka membro-malforteco, paraliziĝo, eklangvora stupora duonvizaĝo, la baldaŭ-sekviĝanta parolkomprena perturbo, vortoformada-malfacilaĵo, diplopio, defalo de vidspaco, vidperdo aŭ malpeciĝanta vidklareco, kapturniĝo, kunordigaj perturboj, perturbo de memoro.

Malofte ekzistas, ke la statoj de simptomoj montras rapidajn pliboniĝojn, sed ankaŭ tiuokaze oni devas voki kuraciston, ĉar la simptomoj povas reveni kaj kaŭzi gravan paraliziĝon. Kaj same gravas, ke niaj malbonfarton montrantaj homfratoj ne restu sole, senhelpe pri ilia malsano. Helpu! Helpante ni povas savi vivon!

Ankaŭ la maljunulo estas homo! Ekzemplon doni ĉiu homo devas pri homeco.

# Norda Lumo en Norda Hungarujo

En vilaĝekstera tereno de Aggtelek en la „Almáŝ-dűlő/Poma-valavojeto” inter 1986-1988 iujare dum Pasko kelktagojn mi pasigis kunfamilie en luita forsista semajnfina domo, kiu servis ripozejo de familio de unu nia bofrato. Mi ne rememoras jam pri la jar-dato, nur la eksterordinaran okazintaĵon. Iunokte mi vekiĝante rimarkis la dormoĉambron kaj la korton plenigitan preskaŭ tutlumon. Rapide mi elkuris de la domo en la korton kaj mire rimarkis al la ĉielo. Nia domo kuŝis inter du montoj en malvasta valo, la slovaka landlimo ne malproksimis de ni. La valon defendis triflanke arbaroj, valfine kuris la landvojo kondukante al vilaĝo Aggtelek – fama pri ĝia sgutŝton-groto – situante al unu kilometro. La dumtaga lumo daŭris plurajn minutojn, poste traformiĝis verdecgriza, poste malaperiĝante al aŭrora grizeco, antaŭ ol la lumstriko plenplenigita en tuta larĝeco la valon estus forpasinta en direkton de Jósvafő, al la monta aliflanko. Post forpaso de la akra lumo denove la nokta nigra malhelo falis sur monton-valon. El inter la parencoj iu pensis pri eksterplanedanoj (UFO-j) pro la granda brileco, mi pensis pri meteorito, (tamen dubis ĉar ties lumon mi konis lumvosto, kaj ne pri vastastrike sur la ĉielo disvastiĝanta lumo). Alitage kelkaj vilaĝanoj supozis, ke en la landlimzono certe la slovakaj limgardistoj zononlumigis per iu forta lumo.

Sed la limgardistoj preterlasante la barilon de nia parcelo informis nin, ke ni povis esti atestantoj de unu lumo-spektaklo, natura fenomeno de Nordaj Lumoj, en Hungarujo tre malofte videbla.

# Blondulino

Mi alvenis en la mondon post multaj nebulaj, grizaj tagoj kun glacio, neĝo degeliĝanta pro vento, kun la unuaj pli varmaj sunradioj. Mia avo tuj nomis min Sunradinjo. Tiun tagon, la vetero estis kaprica kiel kutime estas printempe.

En la hospitalo, kie mi naskiĝis, vizitis nin multaj aĝaj virinoj de mia parencaro. Laŭ la ĉi-taga ŝanĝiĝema vetero ili antaŭdiris, ke mia vivo unue havos multe da nebuloj, sed poste ĝi estos sunradie ĝoja, ĝis la fino de mia vivo.

Sed por mia vivo ne praviĝis la superstiĉa antaŭdiro. Veras, ke min, kiel filineton – alvenintan post miaj multe pli aĝaj fratoj oni troe dorlotis, sed la familia ekvilibro egaliĝis post la naskiĝo de mia fratineto. Mia patra avo – tiu soldate rigora maljunulo – pleje min amis el inter siaj kvar genepoj. Kiam mi estis ankoraŭ malgranda, li sidigis min foje-foje sur siajn genuojn kaj hungare, aŭ germane kantis al mi kelkajn el inter siaj plej favorataj kantoj. Tio estis ekzemple la kanto de la hungar-cigana muzikisto Dankó Piŝta, kiu komenciĝis ĉi tiel: blondulineto ĉit, ĉit, ĉit. Ĉi tiu kanto iĝis kara por mi, ĉar ankaŭ mi estis blonda kaj mia amata avo kantis ĝin ĝuste al mi.

Lia kantado min ĉiam gajegis. Krome la belsona lingvo Esperanto – ellernita de li – iĝis nia sekreta, nur nia propra lingvo, kor' al koro. La kantoj de mia patra avo iĝis mia koro kantindaj kaj aldone la fabeloj de mia patra avino faris bela mian infanecon. Ili plantis en mian animon la amon al la vivo, al la patrujo; la hungaraj kaj germanaj regionoj. Al tiuj regionoj mi povis aldoni ankaŭ la nian, kie ni vivis kun siaj ĉiuj koboldoj, nanoj kaj feinoj.

Kaj foje-foje temis la rakontoj ankaŭ pri niaj tre malnovaj, iamaj antaŭuloj restintaj sur hungaraj teritorioj. Tiel jam ekde mia junaĝo nestiĝis inter miaj pensoj la demando: kio estis kaj kio povas esti en la fora Hungarujo, kio ne estas ĉi tie en Germanio? Kial ne revenis hejmen tiuj malnovaj forstistoj, ĉasisitoj? Ĉu sur la ĉasvojoj estis ili la ĉasistoj, aŭ ili iĝis la predoj? Miaj bavardevenaj praavoj ĉiam estis arbohavantoj, forstistoj, ĉasistoj.

Dum mi kreskis, mia familio deziris, ke ankaŭ mi havu ian profesion ĉe nia arbaro. Vere, mi havis emon tiurilate, sed sentis inklinon ankaŭ alirilate. Fine mi solvis la demandon por ĉies kontento. Mi estiĝis forstisto, sed samtempe finis ankaŭ pedagogian altlernejon.

Mi akiris diplomojn pri instruo de la forstistaj sciencoj, pri la lingvoj germana kaj angla kaj pri gimnastiko-fako. Do, post fino de miaj studoj mi komencis instrui miajn fakobjektojn en la forstista mezlernejo funkcianta sur teritorio de ni arbarego. Krome mi iĝis ankaŭ gvidanto de la lignouzino tie. Mi havis multe da okupiĝoj, sed mi fatis ĉion per granda energio.

Miaj geamikoj estis same agemaj kiel mi. Je nia agado kreiĝis tenisa kaj majoreta grupoj, koruso, orkestro de arbarmastrumaj laboristoj, kiuj merite gajnis rekonon ankaŭ inter la malproksimaj mezlernejoj.

Ni, membroj de nia familio, la konatuloj, parencoj, laboruloj kaj instruistoj vivis ĉi tie tiel, kvazaŭ ĉi tiu loko estus ĝoja insuleto en la kaosa mondo.

Neatendite alvenis nova instruisto, petante, ke li povu instrui ĉe ni. Nia direktorino diris, ke la nova instruisto estas altvalora homo. Li estos trezoro por ni, sed bedaŭrinde li ne restos ĉe ni longe. Li instruas en universitato kaj preparas sin akiri iun universitatan studan titolon kaj konvene laŭ atendo li pli facile atingos ĝin per ĉi tiea ekzerco. Ĉiuokaze Henri Kirner, la nova kolego alvenis precize kalkulante la tempon. Li pendigis sian jakon, salutis nin, la aliajn instruistojn kaj tuj iris instrui. Finante siajn laborhorojn, li prenis la jakon, salutis nin la ĉeestantojn en la instruista ĉambro kaj tuj iris for. Neniam li restis por iom interparoladi. Tiu ĉi maniero povis ĝeni ankaŭ nian direktorinon, ĉar la aranĝon de nia sekva lerneja soleno ŝi komisiis al li kaj mi. Tiun komisiitan taskon li ne eblis rifuzi.

Mia plano: kiel aranĝi la feston – por konsenti ĝian plivastigon kaj kompletugon – mi transdonis al sinjoro Kirner. Tiam okazis mia unua surprizo. Niaj planoj estis preskaŭ samaj, ĉar nin estris samaj pensoj. Ni pensis gravaj la samamajn farendaĵojn. Tio estis la unua okazo, kiam ni povis ekrigardi la pensojn unu de la alia. Kaj ni gratulis unu al la alia preskaŭ samtempe. La festo okazis ege bone. Post la solenaĵo la entrepreno aranĝis ĉasadon, kiun partoprenis nek sinjoro Kirner, nek mi. Dum nia foresto mi devis prezenti al sinjoro Kirner la lignodeponejon kaj la seguzinon. Necesis, ke li spertu, kiel ni subtenas la lignoindustrian-forstistan mezlernejon. Tre atenteme li rigardis ĉion dum mia prezento, foje-foje li ankaŭ pridemandis. Tiam evidentiĝis ankaŭ lia kono pri la lingvo Esperanto, kiam iun aferon mi klarigis hazarde duone esperante kaj li pridemandis ĝin same esperante. Sinjoro Henri, sekvante tian fojon, komencis veni pli ofte pli frue por instrui kaj tiam li interbabiladis kun mi kaj kun gekolegoj. Li interesiĝis

pri la malfacilaĵoj de la studobjektoj de mi instruataj. Foje li donis instruajn konsilojn.

Intertempe alvenis nia trideka naskiĝtago. Mi komencis sperti tiutempe jam, ke miaj geamikoj geedziĝis kaj el la novaj geedzoj ne ĉiuj volis daŭrigi la amikecon kun mi, kun la solulino. Aperis dume kaj komencis amindumi al mi trejnisto de nia tenisteamo. Li provis kisadi min, lian brakon li metis sur mian ŝultron kaj tiam li ektuŝis mian mamon per iuj siaj fingroj. Nek lin, nek tian lian agadon trovis mi simpatia. Kiam li aperis en mia proksimeco, mi ĉiam foriris de apud li.

Post ne longa tempo la trejnisto sciigis nin pri tio, ke li invitis iun hungaran tenis-teamon al ni por gastludi, kaj ili – akceptante la inviton – reenvitis nin al ili, somere.

La tenis-teamaj gastoj okazigis grandan intereson, ĉar Hungaroj tre malofte vizitis nian regionon. La ludo plenigis per ĝojo kaj refreŝigis min. Post la egala rezulto gratulis min sinjoro Kirner kaj akcesore rimarkis, kiel bedaŭrinde estas, ke mi ankoraŭ ne verkis la lastfoje de li proponitan sciencan traktaĵon. La rimarkon mi lasis sen respondo, ĉar tiutempe mi jam komencis senti kaj foje-foje per pligrandiĝanta forto, ke ankaŭ mi volas aparteni al iu. Mia sopirpostulo estis, ke mi havu iun, kiu ne nur admiru, sed ankaŭ amu min kaj ne vidu nur kolegon en mi.

Dume mi kaŝobservis inter miaj kolegoj ankaŭ kolegon Henri Kirner. Multfoje mi pensadis pri li. Kia povus esti por mi la ideala edzo? Ĉu li estus tia? Fine mi rezignis pri li, ĉar li estis troe serioza. Mi povis nur tre malfacile okazigi malgrandan rideton en liajn okulojn. Sed mi sentis ankaŭ tion, ke kolego Henri estas ĉiam fidinda, bonkore helpema, vera justulo kaj kiel tiu de mia avo ankaŭ lia koro pleniĝis per kantoj, muziko.  Kiam li donacis al mi siajn popolkanto-tradukojn, li honorigis min per sia fido. Senrompe li fidis, ke ankaŭ mi povos iĝi scienculo.

Nu, mi kelfoje skribis forstistajn informojn pri arbospecioj de nia arbaro, pri la arboj difektataj de damaĝaj insektoj, pri malsanoj de arboj kaj pri naturaj kaj kemiaj defendiloj uzataj kontraŭ ili. Ĉi tiu temo ne estis faka tereno de Henri, sed li ege forte prijuĝis miajn artikolojn.  Nu, Henri poste montris kaj klarigis la mankojn de miaj laboraĵoj kaj montris kiamaniere mi povus prilabori la temon pli komplete. Li instigis min al ĉiama memklerigo. Li daŭre instruis min al io, kaj fine mi ne suferis malutilon pro la konateco estanta kun li. Li iĝis mia spirita gvidanto. Dum la tempopasado mi ekŝatis, eĉ ekamis lin. Mi dezirintus

danki, rekompenci la prizorgadon, la fidon ricevitan de li, sed neniam venis okazo kaj mi sentis min ĉiam kiel lia ŝuldanto.

Mia kaŝita amo kaŭzis kutimon neakcepteblan por mia familio. Okaze de diskutoj, kiam estis demandite mia opinio, mi kutimis respondi jene: „Henri dirus tion,… aŭ: Henri certe ne elektus ĉi tiun proponitan solvon de la problemo….”

Por forpreni min el tiu opiniita „magia rondo” de Henri, mia patro akceptis inviton por vojaĝi en Nord-Hungarujon al somera cervo-observado kaj li vojaĝigis kun si krom aliajn du ĉasistojn, ankaŭ min.

„La hungara arbarmastrumejo igis tre agrabla la tiean viziton de la germanaj ĉasistoj” – skribis mia patro pli poste en iu loka ĵurnalo. Sed jen kiel vere okazis ĉio.

Iu 35.-jara distriktogvidanta forstisto, Aleksio Majoroŝ organizis la cervo-observadon. Kaj ĝi kaj la nova invito de la Hungaroj – „atento pri la cervoblekado” – havigis grandan ĝojon al mia patro. Alitage ĉi tiu sinjoro forstisto invitis la tutan societon al gulaŝo-tagmanĝo kuirita en kaldrono. La gastigado okazis sur la kampo antaŭ lia domo, kiu situis en pli alta parto de la valo. Surprizis min la moderna domo de Aleksio pro tio, ke ĝi estas egale for kaj de urbo kaj de vilaĝo. Al lia dombestaro apartenis unu azenino, nomate Manci, /kiu komprenis esperante/, vertaga paro kaj unu katino. Al mia karesado per herbobukedo kaj esperantaj vortoj la azenino respondis per fortvoĉa ĝoja azenblekado kaj vostosvingado. Ĝia unua posedanto tiel amuziĝis, ke li regule esperantlingve alparoladis la azeninon. Ankaŭ la striita kato ne konsideris min fremda. Ĝi tuj ekhavis agrablan lokon en mia sino kaj komencis ronroni je mia amema karestuŝeto.

Mi demandis de iu ĉasisto: kion mi devas scii pri nia gastiganto. Li tion respondis, ke Aleksio devas zorgi pri knabineto, sed neniu alia vivas kun li. Kiam mi plue demandis mian partneron iu vokis lin for. La demando restis nerespondita. Dum la preparo de la manĝado mi faris promenon en la arbaro malantaŭ la domo, ĉar mi volis pli multe rigardi la tre sopiratan Hungarujon. La arbaro servis per agrabla malvarmeto. Baldaŭ mi atingis iun muskan rokon. Ĉirkaŭanta ĝin mi rimarkis vojeton – kiun mi pli frue ne rimarkis – laŭ kio mi povis atingi la rokpinton. Kaj tie sidadis kaj kuŝis mi longe. Mi ĝuis la silenton kaj la sunradiojn malfiltriĝantajn inter la verda foliaro. Mi pripensadis: Kiom da landoj mi vizitis ĝis nun kaj tamen mi trovis mian karulon nenie. Kio povas esti ties kaŭzo? Ĉu mi estas tro postulema? Poste mi pensis, ke nenie mi trovos viron, similan al Henri Kirner. El miaj pensoj unue

mallaŭta brueto, poste fortbruaj paŝetoj vekis min. Unue aperis unu melhundo, kiu signis per vigla jelpado mian ektrovon. Poste ankaŭ Elek Majoroŝ ekaperis de malantaŭ la arbegoj.

„Ha! – ĉi tie estas vi, fuĝinto!" – komencis skoldeti min nia gastiganto. – „Ĉu vi ne scias, ke vi ne decas longe resti for de la societo? Povus atingi vin iu damaĝo sur mia ĉasvojo!" – diris Elek, sed tamen kontenta estis trovinta min. – „Ekzemple ĉi tie, se vi paŝos malĝuste, – kaj li montris la rokan vojeton – vi povus enfali en la kavon de roko kaj vundi viajn piedojn. Tiukaze kiel vi dancos kun mi dum la vespera amuziĝo? Donu do vian manon kaj mi helpos malsupreniri de la roko. Paŝu tien, kien mi montros!" – li proponis kaj bonvole li etendis sian brakon al mi. Senvorte mi akceptis la etenditan manon, obeeme mi sekvis liajn konsilojn kaj iome mi hontis mem post la skoldeto. Je la lasta paŝo li ĉirkaŭbrakis min kaj kisis mian vangon.

„Bone, ni povas jam reiri al la societo" – diris li kaj ni ekiris kune mano en mane en direkton de la domo. Sendamaĝe mi reatingis la societon de mia patro, kie poste Aleksio deklaris, ke li trovis min „sur lia ĉasvojo kaŝanta multajn danĝerojn por fremduloj" ĝuste tiam, kiam mi venis jan reen. La aliuloj ridis okulumis al mi por kompreni: mi estis inter bonaj manoj kaj estas jam ĉio en ordo. Al mi precipe plaĉis, ke li ne hontigis min pro mia forvago. Nu, mi iĝis nek ĉasisto nek predo – mi pensis.

Por la konsumo de la kaldrona gulaŝsupo ni devis sidiĝi sur ion. Oni elportis grandajn kverkotablojn kaj benkojn el la domo kaj je akompano de gramofona muziko ni gaje gustumadis la kuiraĵon de nia afabla dommastro kaj la trinkaĵon, kiun li regalis por trinki. Pli poste mi ankaŭ dancis kun Aleksio. Dum dancado li brakumis min tiel, kvazaŭ li volus lasi min neniam plu. Poste sekvis kantado. Mi ne povis sufiĉe miri, kiom multajn kantojn konas la Hungaroj. Ja ili kantis ĉefe hungarajn kantojn. Sed per kia korvarmiga beleco! La bele sonoranta kantvoĉo de Aleksio sorĉis min tute. Enpense mi komparis lin kun Henri. Lian konduton mi trovis pli mola, ol tiun de Henri. Mi konstatis, ke ankaŭ Aleksio estas tre serioza, sed li ofte ridetis, kiu tre konvenis al li. La konsumita vino levis mian humoron, mi fartis tre agrable. Kiam Aleksio petis min, por korespondi post mia hejmeniro, mi volonte jesis. Ni ŝanĝis adresojn kaj telefonnumerojn, poste ni interkonsentis pri nia nova renkontiĝo en aŭgusto, kiam nia tenistaĉmento akceptante la inviton gastludos en Hungarujo. Bona estos denove interparoladi kune.

Nu, alvenis la tempo de nia hungaria gastludo, kiu bone sukcesis kaj nia gastoakcepto estis tre sincere bonkora. Alvenis ankaŭ Aleksio rigardi nian ludon. La trejnisto de la hungara taĉmento – kiu eĉ ne sciis, ke ni konas jam unu la alian de pli longe – petis lin, amuzigi min, ĉar tiel ŝajnis, ke ĉiu havas jam partneron, nur mi ne.

Post tiu ĉi kazo okazis, ke spektante la boatan konkurson sur lago Hámori ĉe mia flanko dekstre staris nia germana trejnisto kaj maldekstre staris Elek. Nia trejnisto denove povis konfideneumi kun mi. De lia flanko mi devis plie alproksimiĝi al Aleksio, ĉar inter la barilo de la lago kaj la landvojo kondukanta malantaŭen ne troviĝis sufiĉa loko por preterpasi. Unue Aleksio ne komprenis la kaŭzon de mia movo, sed poste tamen komprenis ĝin, kiam li rimarkis la trejniston starantan rekte apud mi. Malantaŭ de mia dorso li krucmetis lian manon kaj prenis la apogrelon apud mi. Tiel apartigis li min de mia trejnisto, kiu baldaŭ ĉesigis sian molestan intencon, vidante la fortan pugnon de la viro staranta apud mi. Mi staris en tuja proksimeco de Aleksio, mi preskaŭ alpremiĝis al li. Vidante, ke la danĝero jam pasis pro foriro de la trejnisto, mi dankis al Elek, ke li savis min kaj rektiĝinte mi volis liberigi min el lia brakumo. Sed, ĉar Aleksio lasis sian brakon samloke, ne volante afliki lin, mi ne detiris min de lia brako. Sed post nelonge Elek invitis min eniri la hotelon Palaco, ke mi ne malvarmumu pro la intertempe ekblovanta malvarma venteto. Post nia eniro li demandis min: se li nun forirus kaj revenus ĉirkaŭe je la noktomezo, ĉu mi atendus lin spite de mia laceco pro la laciga tago? Li diris, ke li ne povas pasigi kun mi ankaŭ la vesperon en forstista uniformo. Li devas transvesti sin, sed kiel mi scias, li loĝas malproksime. Post mia jesa respondo li foriris.

Mi iris poste en mian gastoĉambron por transvesti min. Mi surmetis helbrunetan jupon kun blanka bluzo. Estis varma vespero. En babilejo de la hotelo Palaco unue mi aŭskultis muzikon, poste rigardadis la ŝakludantojn apud la majstre lignoskulptitaj marketritaj ŝakotabloj. La tempo malrapide pasis. Miaj taĉmentanoj jam komencis susuri: mi ne atendu plu, ĉar Aleksio jam ne revenos, vane mi atendas lin. Sed io sufloris, ke jes, li revernos.

Kaj je kvin minutoj antaŭ la noktomezo li enpaŝis. Li surhavis flavbrunan someran kompleton kaj tuj paŝis antaŭ min. Bona sento plenigis min, ĉar koncerne niajn vestaĵojn harmonio estis inter ni jam je lia ekveno. Ni vespermanĝadis kune kaj dancis. Miaj teamkunuloj surprize atentis mian partneron, kiel li daŭre amuzigas min. Dum nia

babilado li rakontis pri sia mortinta edzino, pri ŝia filineto, devenante de ŝia unua edziniĝo: tiun knabinon li adoptis kaj sole edukas. Tiu knabino bezonas patrinon, li edzinon. Li sopiras tiun edzinon, kun kiu lin ligos geedziĝo baziĝanta sur kompreno, serioza amikeco kaj amoro. Mi rimarkis, ke dum nia dancado li denove tiel brakumis min, kiel la iaman fojon. Rememorante la ricevitan kiseton sur la ĉasvojo kaj mian savon de la trejnisto, ĉi tiu brakumo ne efikis min malbone kaj denove agrable influis min ankaŭ lia kantado. Kantis li ĉion: kaj malgajajn kaj gajajn kantojn.

Mi fartis bonege kaj ankaŭ la dume konsumita vino de „Montosuba Vinregiono" el vilaĝo Mád, havigis al mi sian efikon. Nur miaj dekoltitaj ŝuoj agis malagrable. Ili vundfrotis miajn piedojn. Mi ne povis plu danci. Aleksio akompanis min reen al mia tranoktejo.

Ni adiaŭis jam plurfoje unu de la alia, kiam li demandis min:

„Sunradieto! Ĉu ni renkontiĝos ankoraŭ iam?"

Aŭdante kaj ĵus de li ĉi tiun mian karesnomon, mi tre surpriziĝis. De kiu li scias, ke mi estas alparolata tiamaniere, karesume? De kie li konas ĉi nomon?

Li informis min, ke la aŭdo de tiu mia karesnomo fare de miaj kunuloj de la teamo ankaŭ lin atingis surprize Sed la kono de la nomo devenas de alio. Dum la unua mondmilito germana oficiro donis ĉi nomon al la avino de Aleksio, kiu tiutempe ankoraŭ estis fraŭlino. Tra la malfermita fenestro de la domo, iu oficiro – de la tie garnizonanta korpuso – ekaŭdis ŝian pianoludon. Tuj poste li faris honorigan viziton al la hungara familio kaj dum la soldatoj restis tie, li ofte vizitis la familion por aŭskulti la pianoludadon de la fraŭlino. De ĉi tiu fraŭlino, Katinka li ekkonis preskaŭ kvarcent kantojn de la hungara ciganmuzikisto kaj kantoverkisto Danko: Piŝta kaj ankaŭ aliajn hungarajn kantojn. El multaj kantoj la oficiro elektis unun kaj li ofte kantis ĝin kune kun Katinka. Ili estis ĉarmega paro, diris Aleksio kaj volis rakonti plu: „Ĉar mia avino havis belegan, sur ŝultron falantan blondan hararon, la oficiro…"

„Ĉu li kantis kun ŝi la kanton: Blondulineto ĉit, ĉit, ĉit? – interrompis mi, – ĉu la sekva kanto estis tiu, kies tekston verkis Lajoŝ Póŝa kaj muzikon komponis Piŝta Danko:?"Mi ankaŭ tion sciis, ke tiu Ludoviko Póŝa vivis de 1850 ĝis 1914, estis verkisto, ĵurnalisto, aŭtoro de idiliaj poemoj kaj unu el la plej gravaj kantoteksto-verkistoj de la dudek jarcenta hungara literaturo. Liaj multaj kantoj muzikigite de Steĉjo Danko: vastaronde estis ŝatataj en la publiko. Dankó Piŝta

hungara ciganprimaso, kiu muzikis ankaŭ en Rusio, vivis de 1858 ĝis 1903. Liaj pli ol kvarcent kantoj estas vaste konataj kaj ŝate ludataj de muzikistoj. Per brilantaj okuloj aŭskultis Elek miajn vortojn, poste li demandis: „De kie vi scias Hanucika ĉion ĉi?"

Post mia nomo Han:a, sole li komencis nomi min Hanucika. Mi rakontis, ke en mia ĝisnuna vivo mi multfoje aŭdis ĝin kanti kaj klarigi de mia avo. Sed nun klariĝis por mi, ke de kie devenis la kantomemoraĵo de mia avo.

„Kaj vi, karulino, de kie scias paroli tiel bele hungare?" – demandis li plu. Mi konfesis, ke mi diligente vizitis la hungarajn lingvokursojn organizatajn de la Germa-Hungara Amika Societo. Tie mi sikcesis alproprigi la lingvon tiom grada, sed mi devus ekzerci ĝin pli multe. Pro tio estiĝis nia nova sekreto kaj mi tre ĝojis pro ĝi. Daŭre pliiĝis niaj malgrandaj komunaj memoraĵoj, kunligaĵoj inter ni. Kiam mi komencis iom frostotremi pro la malvarmo de la nokto, li malfermis la pordegon malantaŭ mi, buŝkisis, poste ebŝovetis min en la domon promesante adiaŭi de mi ĉe la trajno je nia forveturo hejmen.

Lia kiso jam ne atingis min malatende. Mi reciprokis ĝin plenĝoje. Je nia f orveturo li preskaŭ malfruis. Jam mankis ankoraŭ unu minuto, kiam alvenis kurante kaj transdonis al mi malgrandan paketon.

„En ĝi estas porvojaĝa dolĉaĵo kaj unu letereto" – atentigis li min. En la paketo estis skribita lia peto por mia mano, krome lia konfeso pri tio, ke de sia avino ne nur la germana oficiro – mia avo –, sed ankaŭ li – la nepo de Katinka – ellernis same la lingvon Esperanto, kiel mi de mia avo.

Hejme unue mi ekmoligis mian avon. Pri tiu anonco, ke salutas lin nepo de Katinka el Hungarujo kaj mi volas edziniĝi kun li, lia spiro preskaŭ haltis. Mia avo preskaŭ mutiĝis pro la surprizo. Poste li rakontis, ke li ekamis tiun ĉarman hungaran fraŭlinon, sed ĉar lia patro postulis por li germanan edzinon, li ne regalis ŝin per promesoj. Sed, ĝis nun li ame rememoras pri ŝi, ŝiaj belaj pianoludoj kaj ŝiaj esperantolingvaj instruhoroj. Pli poste, kiam mia patro deklaris, ke Aleksio estas ne nur perfekta fakulo, bona, ĝentila, honesta homo de la verto ĝis la plandoj, neniu jam kontraŭis nian decidon geedziĝi.

Nia ŝtata oficiala geedziĝa ceremonio okazis en Germanio. Dum la bankedo organizita post la ceremonio okazis, ke filineto de Aleksio ekvidante min kuris al mi, alŝovis mian sinon kaj kriis: „Patrineto mia, mi amas vin, restu kun ni!" Tiam ĉiujn sorĉis la ĝojo de la eta An:a. La germanian ceremonion kaj bankedon ne partoprenis nur Henri. Ĵus

tiam li estis nomumita al universitata profesoro. Tial li ne povis vidi nian ĝojon kaj la grandiozan geedziĝan ceremonion, kio estis tiam vera sensacio. Ĝi estis organizate lastatage de la Tutgermana Esperanto-Kongreso. Tie, inter niaj gastoj estis ankaŭ multnombraj geesperantistoj. Esperanto. flagetojn svingante marŝis nia maĵoreta grupo kaj inter ilia spaliro marŝis mia fianĉo kun mi. Kiam finiĝis la oficiala ceremonio ene, ekstere ni devis denove diri la jeson ankaŭ antaŭ tiuj, kiuj jam ne povis havi lokon en la ceremoniĉambrego. Mia patro kaj avo farigis Esperanto-stelajn aerbalonojn. Kiam Aleksio kaj mi eldiris la jeson, ĉiu partoprenanto de la geedziĝceremonio delasis flugi la balonojn kaj ekrigardis al la ĉielo. La tuta ĉielo plenplenis per Esperanto-steloj! Kaj mem la urbestro gratulis nin Esperantlingve! Ni fieris, ĉar nun okazis unuafoje, ke la urbestro mem gvidis la geedziĝceremonion anstataŭ la matrikulisto kaj Esperantlingve parolis al la publiko. Inter multaj bonvolaj gratulantoj estis iu damo, kiu iome malbonvoleme notis: „Nu, mi estas scivola, kiam vi vekiĝos el ĉi stulta Esperanto-sonĝo!" Ni per ĝojbrilaj okuloj diris: „Certe tio okazos neniam, ĉar ĝi daŭros por eterno! Ni atingis jam niam belegpromesan teran paradizon pere de Esperanto! Sed tiun tempon ni nun ne konas: kiam vekiĝos la homaro, tiam rekonos ĉiujn bonflankojn de Esperanto?! Ni staras sur realisma grundo kaj ĉiam faros ĉion eblan por antaŭenigo de la lingvo Esperanto." Poste okazis la komuna fotado. Sur la granda komuna foto ĉiu ridis surprizite, ĝoje, bonhumore. Alimaniere ne eblis, ĉar dume la papago de mia panjo komencis kriadi: Esperanto venkos! Esperanto venkos!

La sinjoro urbestro fermis kaj nian ceremonion kaj la Tutgermanan Esperanto-Kongreson:

„Jes, ni kredas: ESPERANTO VENKOS!"

La dume antaŭvenanta pastro aldiris siajn ben,- kaj finvortojn: Estu tiel! Amen.

# Avo

Dum miaj infanjaroj post forpaso de mia patro en 1952 kelkfoje mi somerumis en la ebenaĵa urbo Debrecen ĉe fratineta familio de mia patrino. Miaj kuzinetoj vivis en mult-loĝeja domo ĉirkaŭita per granda korto, kie multaj similaĝaj infanoj ludis kune je kontenta ĝojo de gepatroj kaj geavoj. Tiuj povis vidi la saĝiĝon, ĉarmon de la idoj kaj de la aliaj infanoj. Tutegalis kiujn profesiojn daŭrigis la gepatroj, gravis nur, ke ni infanoj komprenante unu la alian sentu nin bone kunludante unu kun la aliaj. La gepatraj okupiĝoj tute diferencis. Estis tie infanoj de meblisto, muntisto de akvokondukiloj, kuracisto, instruisto, kelnero, riparisto de ŝuoj, juĝisto, fotisto kaj similaj.

Por mi signifis ĝuojn ankaŭ la helpadoj en la kuireja mastrumado, la urbaj kaj eksterurbaj promenoj, kiam mi havis ŝancojn ekkoni la gravajn vidindaĵojn de la urbo, la vizitadoj de la strando kaj muzeo, pupteatro kaj la vendoplaco kune kun ties multegaj varoj. Tiuj someroj estas miaj koloraj memoraĵoj el la pasinto, ligiĝaj al ĉarmaj personoj de mia onklino Mici, ŝia edzo kaj la du bonkoraj kuzinoj.

Ĉe fino de la granda parcelo staris la metiejo forprenita de la kuzina familio. La patra avo de miaj kuzinoj estis entreprenisto pri banĉambraj instalaĵoj kaj akvodukto-muntado, do la necesaj objektoj estis tie stokitaj antaŭ la vendado. Sed post morto de la entreprenisto la uzino estis forprenita post 1945, ĝi estis igita ŝtata de la nova politika reĝimo, do ĝi iĝis fermita, neuzita kaj atendis sian pli bonan sorton. Sed foj-foje kiam mia onklo iris tien por pruntepreni ian ilon por ripari la doman akvotubon, ni infanoj iris en la metiejon kune kun li por rigardi ĝin kaj ludi tie. Ni tre atentis nenion rompi, ne fari damaĝon. Ordo regis tie.

Iutage hazarde mi ekaŭdis, kiam la maldika, malalta, sed ora spegula avo – el la najbara apartamento - tion diris al siaj nepinoj, ke:

– Genepoj miaj! Ili estas proletoj! Ne ludu kun ili!

En mia familio neniam temis pri proletoj, do mi ne sciis kion signifas la vorto. Sed mi sentis, ke tio povas esti ia malbono, ofendo. Mi priparolis tiun eventon al mia onklo. Li proponis, ke mi ne pensu pri la diritaĵo. Tio estas stultaĵo kaj mi lasu la aferon. Sed, mi atendis la maljunulon kiam li estos sola, por proponi, ke li ne diru ofendon alia foje, ĉar ni faris nenian malbonon al li. Mia onklo klarigis al mi, se mi tamen faros tion, mi estos same stulta, kia estas la avo dirinta tiun stultaĵon. Sed, mi estis infano, kaj ne volis cedi. Fine mi akceptis

proponon de mia onklo, ke mi ne diru mian direndaĵon antaŭ aliuloj, nur al la avo sen societo de iu ajn aŭdanta publiko.

Nu, la okazo veninta mi staris antaŭ lin kaj alparolis lin:

– Kial vi diris, ke ni estas proletoj? Kial estas malbona tio? Proleto estas mem, kiu diras tion al aliuloj!

La maljuna fotisto konsterniĝis. Li senvorte reiris en sian loĝejon. Posttagmeze forveturis la tuta familio. Kiam ili revenis, la cirkonstancoj ŝanĝiĝis. La avo salutis ĉiun antaŭen. Li babiladis al la kortaj infanoj kaj liaj nepinoj ludeblis kun ni.

Tiam ni vivis en tiu erao post la dua mondmilito, kiam multaj homoj volis akiri avantaĝojn facile senlaborante. Tiuj homoj ĉe la policistoj denuncis aliulojn espere, ke tiel ili ricevos ties loĝejon, havaĵojn, posedaĵojn. La aluditaj kaŭzoj de policaj ekzekutojokazis ofte, se la homoj faris pekon kontraŭŝtatan. Se la peko estis granda, la homoj estis arestitaj kaj portitaj en malliberejojn, aŭ en koncentrejojn en Siberion, aŭ sur teritorio de Hungario en Recsk (reĉk) aŭ al la ebenaĵo Hortobágy (hortobadj), kie la deportitoj vivis inter cirkonstancoj malhumanaj, mizeraj. Do, ege timiĝis la avo pro mia alparolo ĉar li ne scieblis pri la atenteblaj postsekvoj.

Nun mi scias jam, komprenas sencon de iama atentigo de mia onklo Ludoviko:

– la homo devas vivi respondece en ĉiu epoko. Oni neniam parolu stultaĵojn nur por terurigi infanojn aŭ plenkreskulojn, neniam subtaksu aliajn homojn, ĉar ĉiu homo povas scii ion, kion ni aliuloj ne scias! Oni ne devas klopodi por re ofendi la insultaĵon laŭrajtan aŭ malrajtan!

# Ombro en lumo

## *Historia dramo en tri aktoj*

## Origine verkita en Esperanto

**AGADO** okazas komence de regado de reĝo Ghezo (1818-1858) en la reĝlando „Fon” Dahomeo, laŭ mencioj de loĝantoj de Benino en la 21-a jarcento. Reĝo Ghezo estas historia persono, ankaŭ lia leĝo realas, ĉar sence de tio post morto de la reĝo oni ne rajtas mortigi liajn edzinojn, konkubinojn kaj liajn ceterajn virinajn apartenantojn por fari funebran manĝaĵon el ili. Krome, la nova leĝo malpermesis fari el ili oferdonojn al altaro de iu ajn dio. La pliaj rolantoj kaj agadoj estas elpensitaj.

**SCENOJ** estas en centro de la lando „Fon” Dahomeo sur teritorio de komunumo de la Joruba-tribanoj elmigrintaj de Niĝerio, survoje de tiu loĝloko al la reĝa rezidejo, kaj en la ĉefurbo kiu estas la sama kun la rezidejo. (La nomo Dahomeo estas donita de Britoj, la Fon antaŭnomo devenas el nomo de super la lando reganta kaj reĝojn dona tribo Fon.)

**ROLOJ: Ghezo:** la komercist-reĝo, **Fatima**: reĝedzino, **Jahaja***:* la komunum-estro de Tribo Joruba, lia pli juna frato: **Kodjo** kaj lia granda filo: **Latifou, aveto Gersi:** la saĝulo de vilaĝo**, fileto de Kodjo, Ĉefsorĉisto, sinjoro Ludoviko***:* la Franco, **Adarci:** la kuraca amazonfilino de la Joruba komunumestro, **Dina**:la atleta amazonfilino de la komunum-estro, aliaj amazonoj de „Fon” Dahomeo, soldatoj, pordgardistoj, kortega popolo, kurieroj, kuiristo, la **ĉefmilitestro** kaj **Reprezentanto de la Granda Konsilantara Komitato de Triboj.**

La nomoj de personoj, lokoj kaj plantoj eldirendas laŭ Esperantlingva akcento. **Ghezo** eldirendas: **Gezo.**

# UNUA AKTO
## Unua bildo

**Scenejo:** Antaŭ ronda domo staras du viroj. Unu el ili elegante vestita. Alvenas tri viroj kun virino al teritorio de komunumo de la Tribo Joruba. Ili reciproke kliniĝante salutas unu la alian.

**JAHAJA:**

Belan tagon gastoj! Rakontu kiel vi nomiĝas kaj kiucele vi vizitas nin.

**GEZO:**

Estu salutata estiminda ĉefo de ĉi tiu komunumo de tribo Joruba, kaj ankaŭ vi; saĝulo de tiu ĉi loko! Mi estas Gezo, komercisto. Jen, mia edzino Fatima. Ni travojaĝis sendamaĝe multajn malbonfamajn teritoriojn de batalemaj triboj, kaj nun preskaŭ tute atingintaj hejmen, atakis nin banditoj sur via teritorio. Ilin dispelis krokodila atako. Kiuj restis el inter la banditoj, tiujn atakis serpento monstroj. Viaj du parencoj liberigis nin de la ŝnuroj de la banditoj, kiuj volis vendi nin en foiro pri sklavoj.

**KODJO:**

Granda estro de nia komunumo; mia frato konsideradu, se ĉi tiujn homojn, kiuj estis traligitaj pere de ŝnuregoj de la rabistoj, kiel la araneo ligas siajn viktimojn, tiuj sanktaj bestoj lasis vivaj, ni devas apogi ilin ĉiumaniere, ĉu eble mi malpravus?

**JAHAJA:**

Jes, la konduto de tiuj sanktaj bestoj signifas, ke niaj praulоj destinis al vi ne fruan sengloran morton. Vi estas bonvenigataj ĉe ni.

**AVETO GERSI:**

Sinjoro, ĉu vi scias pri la reĝo elekto? Nia reĝo mortis, ne have filon post li restantan. Vi ŝancas al la trono, estante vi parenco de reĝo. En la proksimaj tagoj okazos la elekto el inter la kandidatoj, ni atendas la novaĵon pri la persono de la elektito.

**GEZO:**

Kiel mortis reĝo Adomoran?

**KODJO:**

Ni aŭdis, ke li suferis akcidenton pro lia pasio. Li murdis multajn elefantojn pro eburo konkuranta kun valoro de oro. Foje, kiam liaj servistoj kargis eburon al veturiloj dum lia kontrolo, elefanta grego kuratakis ilin.

**LATIFOU:**

Ok monatojn suferis reĝo Adomoran, luktis por sia vivo, poste tamen forpasis. La ĉefsorĉisto tiutempe gustumis la potencon. Nun li rigardas en ĉiu reĝkandidato sian rivalon, kaj klopodas malaperigi la plej multajn el sia vojo. Povas esti, ke ankaŭ vi estus nun lia viktimo, se la sanktaj bestoj ne estus intervenintaj.

**FILETO de KODJO:**

*(Akre krie enkuregas knabo.)* Paĉjo, paĉjo! Iu simio forportis vian pafilon!

**KODJO:**

*(Al la knabo.)* Rapidu por baldaŭ reakiri la fusilon ke tiu idiota simio ne faru ian damaĝon. *(Ili forrapidas.)*

**JAHAJA:**

Sinjoro Gezo, ĉu via edzino ne havas Joruba-tribajn radikojn? Ŝi havas similajn vizaĝtrajtojn kun nia iama parencino edzinigita kaj forportita de ano de la tribo Fon. (*Anstataŭ Gezo respondas Fatima.)*

**FATIMA:**

Vi pravas. La tribanino Joruba kaj la tribano Fon estis miaj geavoj. Ili formigris kaj ankaŭ mi agis same.

**JAHAJA:**

Kiel feliĉe, ke ni kontrolis la flankvojon. Vi povis saviĝi kaj ni nun denove havas kontakton kun nia laŭsanga parencino. (*Al aveto Gersi.)* Bonvolu akompani ĉi tiun belulinon al miaj edzinoj kaj filinoj. (*La saĝulo foriras kun Fatima, Kodjo ridete revenas.)*

**KODJO:**

Por fortigi nian parencecon, por ĉiam, mi rekomendas ligon helpi vin de nia komunumo, ĉu reĝiĝos vi, ĉu ne. *(Kodjo manon etendas al Gezo, kaj la ĉeestantoj agas same. Gezo premas ilian manon.)*

**GEZO:**

Mi alte taksas miajn helpantojn.

**JAHAJA:**

La okazo de via ebla reĝiĝo, sugestas demandon: se vi pli frue ol Fatima forpasus al transmondo, ĉu ankaŭ ŝi estiĝos oferdono? Ni tre bedaŭrus ŝin.

**GEZO:**

Neniam mi pensis pri tio, sed reĝiĝonte, mi nepre ŝanĝos tiun leĝon. *(Li levas manon al ĉielo.)* Mi vokas ateste niajn diojn, ke ankaŭ por mi same karas Fatima.

**AVETO GERSI:**

*(Kun li blankulo alvenas, kiun li prezentas al sinjoro Gezo.)* Jen sinjoro Ludoviko el Francujo.

**SINJORO LUDOVIKO:**

(*Li manon premas kun Gezo*) Mi aŭdis, kiel feliĉe vi saviĝis el via malagrabla situacio.

**LATIFOU**:

Sinjoro Ludoviko volas transporti palmoleon de ni en Francujon. Li atendas reĝan permeson por ĝi.

**SINJORO LUDOVIKO:**

Mi envias vin pro Fatima. Ankaŭ por mi dezirindas ŝi, sed ŝi estas jam eltirita ludkarto.

**JAHAJA:**

Nu, niaj gastoj bone interkonatiĝis. Rigardu nun la amazonojn! (*Li aplaŭdas, envenas grupo da junaj virinoj kaj prezentas militan dancon.)*

**GEZO:**

La ĉi – tiea ĉeesto de la virinaj soldatoj por mi estas bonega afero, ja tre grandioza estis ilia prezento. Mi ĝojas vidi ilin.

**JAHAJA:**

La amazonoj estas membroj de nia tribo kaj iliaj estroj estas miaj filinoj. *(Li mansignas, alvenas al ili unu amazono kaj sinprezentas.)*

**AMAZONO:**

Saluton nobla sinjoro! Mi nomiĝas Adarci, kaj mi estas ankaŭ kuracanto de vundoj, malsanoj.

**GEZO:**

Saluton Adarci! Via grupo valoras oron! Mi ŝatus, se vi venus kun ni en la ĉefurbon por organizi ĉi-similan armeon de amazonoj. Kion vi respondas? *(Adarci ricevi jes, alrigardas la komunumestron.)*

**JAHAJA:**

Mi volonte permesas vian foriron. Sed, ni iru nun jam ripozi, ĉar sinjoro Gezo kaj Fatima havis malfacilan tagon. Ankaŭ morgaŭ estos tago por babiladi. *(Ĉiuj kapjesas kaj foriras.)*

## Dua bildo

**Scenejo:** Sekvatage en la kortego de estro de la komunumo de la tribo Joruba, la servistaro prepariĝas al festeno je estimo de la parencaj geedzoj. Iuj portas telerojn, pladojn kun manĝaĵoj, aliuloj barelon da biero, fruktosukojn kaj enboteligitajn drinkaĵojn. Kaj denove aliaj homoj, montradas siajn belajn vestaĵojn surmetitajn al festeno.

**GEZO:**

Kune kun estas la multspecaj nutraĵoj, por trinki fruktosukoj, drinki preparita estas biero. Vi; niaj novaj parencoj vere estas grandanimaj, dankindaj.

**JAHAJA:**

Ni decidis donaci al geedzoj la ornamajn vestaĵojn de nia triba komunumo. Iru ankaŭ vi por surmeti ilin. Mi volas vidi, ĉu ili bonas?

**GEZO:**

Dankojn pro la altvaloraj donacoj. Mi iras alivesti min. *(Li foriras. Knabinoj venas kun korboj plenplenaj per florpetaloj kaj verdaj folioj, por alŝuti sur la parencan paron, simbolante la praan kutimon de fekundiga ceremonio. Aperas la geedzoj vestitaj en ornamajn vestaĵojn kaj akceptas kisetojn de la parencoj. Kiam sidiĝas ĉiuj por manĝi, aperas ebria soldato kaj ŝanceliĝadante provas transdoni pokalon da vino al la juna paro.)*

**SOLDATO:**

Gefianĉoj! Drinku amon unu de la alia el ĉi tiu pokalo! Bona, delikata vino estas en ĝi, kuraĝigilo por eldiri la jeson!

**GEZO kaj FATIMA:** *(kune)*

Ne bezonatas plia kuraĝo, ja, ni estas jam geedzoj. Sed, se vi rekomendis ĝin tiel kare, drinku vi mem! *(La soldato flanken kliniĝante ĉe zono kaptas Fatiman, kaj volas drinkigi ŝin ĉiamaniere. Sed, ŝi ne drinkas, sed provas liberiĝi de la perforta premo. Fatima batadas permane la soldaton kaj mordas lin. Alsaltas Latifou kaj Gezo, ke ili apartigu Fatiman de la ebriulo. Poste ankaŭ Kodjo helpas subpremi la soldaton kaj depreni de li la pokalon. Je ilia interveno la soldato falas surteren. Ili disiĝas kaj esploras la okazintaĵon.)*

**LATIFOU:**

Li mortis. *(La okazintaĵon ne komprenante rigardas ili unu la alian, poste Latifou kaj Kodjo forportas la mortinton.)*

**JAHAJA:**

Mi ne scias kiel povis okazi tiu ĉi incidento. Mi malkonas tiun soldaton. Li certe ne apartenis al nia komunumo. Poste mi esploros la okazintaĵojn, sed nun ni amuziĝu kaj manĝu! *(Ili apenaŭ sidiĝas kaj komencas manĝi aŭskultante la muzikon, kiam la komunumestro ekvidas aperon de tri soldatoj en uniformoj de reĝaj gardistoj. Li scivoleme iras antaŭ ilin, ĉar li bone vidas, ke la soldatoj rigardadas dise-mikse.)*

**JAHAJA:**

Bonvenon! Kial vi venis?

**SOLDATESTRO:**

Reĝaj soldatoj ni estas. Ni kontrolas ĉi regionon, ĉar nuntempe multas la bandit-atakoj. Ĉu vi spertis nekutimaĵojn?

**JAHAJA:**

Ĉi tie estas ĉio en ordo. Nun komunuma festo okazas. Ĉu vi volas ĉeesti ĝin? *(La soldatoj mansignas ne, lastfoje ĉirkaŭrigardas kaj foriras.)*

**GEZO:**

Kion volis la soldatoj?

**JAHAJA:**

Ili certe serĉis la soldat-kunulon. La rigardo de la soldatoj estis esplora kaj insida. De tie vi devos baldaŭ foriri, ĉar ĉi tiu vizito kaj la pli frua apero de tiu alia soldato, certe ne estas hazardo. Latifou, Adarci, Kodjo kaj sinjoro Ludoviko estas bonegaj uzantoj de ĉiaspecaj armiloj. Ili akompanos vin, por atingi vian hejmon sukcese. *(Ili konsente manpremas, kaj ĉiuj foriras.)*

## Tria bildo

**Scenejo:** Survoje de teritorio de komunumo de tribo Joruba al ĉefurbo Abomei, la grupo pasigas la nokton sur iu plataĵo. La geedzoj unu apud la alia, la aliaj grupanoj iom pli fore dormas. La scenejo malrapide heliĝas montrante, ke la nigra nokto cedas al la milde orumanta tagiĝo. Gezo malprofunde dormas. Li vekiĝas je ies alpaŝo inter li, kaj Fatima. Li tuj spertas, ke tiu per tranĉilo enmane klinas sin super lin. Gezo tuj movas sin de antaŭ la atakanto. Pro la rapida movo lia edzino ekvekiĝas kaj spertante la neordinaran situacion, komencas kriadi.

**FATIMA:**

Helpon! Helpon! Ho, ve!

**SOLDATO:**

Vane vi veadas, neniu aŭdas vin! *(Tiam alvenas tien iliaj geamikoj kaj vidas edzinon de sinjoro Gezo ekscitite kaj senpove stari proksime al la luktantoj. Fine Gezo sukcesas forpreni kaj forĵeti tranĉilon de la malamiko kaj forte premi lin al tero.)*

**KODJO, LATIFOU:** *(kune)*

Kial vi pensas aĉulo, se la sanktaj krokodiloj kaj la pitono savis vivon de sinjoro Gezo, ĉu vi povos forpreni ĝin?

**SOLDATO:**

Mia sinjoro la ĉefsorĉisto ordonis mortigi tiun ĉi tie, ĉar alikaze, miaj familianoj mortos. (*En momento preteratenta la soldato liberiĝas de la tero, kaj nun li alpremas surteren Gezon, kiun li komencas strangoli. Sed Gezo ne lasas sin kaj flanken turnante sin li sukcesas ekstari. Poste li puŝas la soldaton for de li. Tiu falas en truon, kaj dum sia eksperimento por ekstari li rimarkas kobrojn serpentumantajn sur sin.)* Kobroj! Ve, vivfino mia! (*La soldaton murdas la venenaj bestetoj. Gezo kun liaj amikoj forlasas la soldaton kaj reiras al sia dormejo. Tie ili renkontas la atletan Dina, la filinon de la komunumestro de tribo Joruba.)*

**DINA**:

Estu salutataj ĉiuj. Glorkrono al Vi, nia elektita reĝo de „Fon" Dahomeo. Rapidu en la rezidejon por enpostenigi, kroni Vin. Vivigu niaj dioj vin nia Ekscelenco kaj vian edzinon! (*Ŝi ĵetas sin surteren kaj kisas iliajn ŝuojn, poste stariĝas.)* Nun mi portos la informon al mia komunumo, kaj poste mi akompanos kaj servos vin dum mia vivo. *(Ŝi mansalutas kaj forkuras. Grupo de Gezo preparas sin por foriri. Kurteno! Paŭzo: dek minutoj.)*

# DUA AKTO
## Unua bildo

**Scenejo:** Per longaj militistaj fusiloj kaj ponardoj armitaj gardistoj staras en la reĝa palaco ĉe la pordo kaj ĉirkaŭas la tronon, kie sidas la reĝaj geedzoj. Proksime al ili staras sinjoro Ludoviko kaj kortegaj homoj. Poste alvenas la ĉefsorĉisto de la lando, kaj paŝas antaŭ la reĝon.

**ĈEFSORĈISTO:**

Akceptu mia Reĝa Moŝto mian plej profundan omaĝon. Niaj dioj vivigu vin Ekscelenco, ĝis vi servos interesojn de niaj popolo kaj dioj.

**REĜO GEZO:**

Ĉefsorĉisto, la spiritoj de niaj prauloj vivigu ankaŭ vin same. (*La ĉefsorĉisto senvorte klinas sin. La reĝo turnas sin al la araba skribisto.)* Skribu! Mi; Gezo, deka en vico de reĝoj de „Fon" Dahomeo, deklaras ke mi koncentrigos ekde hodiaŭ en miaj manoj, escepte de la drogkomerco, la tuton de la komerco specoj, inkluzive la hom-komercon. (*La reĝo nun turnas sin al la ĉefsorĉisto)* Grandsinjoro, Vi gardos niajn nordajn landlimojn. Kiel ĉefkomandanto de niaj tieaj armeoj, jam hodiaŭ vojaĝu tien, por okupi vian tiean defensivan pozicion. Miaj dekretoj estu deklarotaj en la tuta lando!

**ĈEFSORĈISTO:**

Pardonu min Reĝa Moŝto, sed ĝis nun al mia kompetento apartenis la hom-komerco. Per kio vi volas kompensi min pro la perdo?

**REĜO:**

Via estis kaj restis la drog-komerco, kaj la decido pri la ceremoniordo de la homoferoj. Nun, mi volas ĉesigi la kontraŭleĝe ekzercitan komercon de la infanoj sub dek jaroj. Pro via kontraŭleĝa konduto vi meritus mortpunon, sed vi ricevos nun ŝancon por ripari ĝin. Se vi metos ateston pri via fideleco, mi gratifikos vin.

**ĈEFSORĈISTO:**

Mia Reĝa Moŝto, pardonu mian kuraĝon fari mencion.

**REĜO:**

Skribisto! Transdonu la dokumenton, por ke mi metu sur ĝin mian reĝan sigelon. (*Li transprenas la paperon kaj turnas sin nun al la ĉefsorĉisto.)* Ĉefsorĉisto, bonvolu transdoni mian reĝan sigelon garditan de vi. *(Li transdonas ĝin. La reĝo alfiksas la sigelon sur la dokumenton, poste enpoŝigas la sigelon.)*

**ĈEFSORĈISTO:**

Ĝis nuno la sigelo estis ĉe mi, ĉu vi ne redonas ĝin por gardi plu?

**REĜO:**

Ĝi restos ĉe mi, ĉar ne estos bone, teni ĝin ĉe vi en proksimeco de la landlimo. Leĝdonado finiĝis, publiko foriru. *(La ĉefsorĉisto malbonhumore foriras, poste la reĝo alparolas la kuiriston.*) Ni malsatas, surtabligu la manĝaĵojn en la manĝoĉambro. *(Unue la kuiristo, poste la reĝaj geedzoj, poste ĉiuj eliras el la ĉambro.)*

## Dua bildo

**Scenejo:** En granda ĉambro de la palaco, la reĝaj geedzoj kaj la amazonoj, krome la ĉefsorĉisto ĝuas popoldancon kun muziko, kiam alvenas unu pordo gardisto kaj anoncas.

**GARDISTO:**

Kuriero alvenis. Reĝa Moŝto bonvolu tuj akcepti lin. (*La reĝo mansigne invitas.)*

**KURIERO:**

Majesta sinjoro Reĝo, malamika soldataro ekatakis nian landon el la reĝlando Togo. La tridekmil membra armeo vandale proksimiĝas al via rezidejo.

**REĜO:**

Dankon pro la anonco, foriru! (*Kuriero eliras.)* Atenton! Mia popolo devas ekscii antaŭ mia militeniro, ke dum mia foresto, mia edzino Fatima regos super la lando, kaj vi estos devigataj obei ŝiajn ordonojn. Nun foriru! Eksterordinara situacio estiĝis kaj mi devas disponi, aranĝi diversajn necesaĵojn. (*Ĉiuj foriras, escepte la reĝan edzinon, la ĉefsorĉiston kaj Din*an; *la amazonon.)*

**ĈEFSORĈISTO:**

Ho, mia Reĝo, vi estas tro juna, kvankam esperon vekanta kun bona talento, sed tute sensperta. Pli konvena ago estus por vi abdiki kaj doni avantaĝon por mi. Restu plie apud la jupo de via edzino transdonante la potencon al mi. Vi ekvidos mian triumfon!

**REĜO:**

Oj, mia ĉefsorĉisto! Vi ne defendis per via armeo la limon de la lando! Kial vi ne okupis la soldato pozicion ricevitan al tiu loko? Ĉu malfortiĝis via magia forto por plenumi vian devon? Senprokraste enviciĝu en mian armeon sub mia komandado, ĉar en danĝero ĉiun forton ni devas kunteni. Diru! Kial vi ne informis min pri la situacio?

**ĈEFSORĈISTO:**

Mi ne ĝenis vin en viaj mielmonatoj.

**REĜO:**

Konstateblas, ke vi trapensis malĝuste vian bonstaton, kaj tion de nia patrujo. *(Al la pordo gardisto)* Iru, portu mian ordonon al la ĉefmilitestro de miaj armeoj trumpeti alarmon, klarionu li kolektiĝon! Sciigu ke, la armeo pretigu sin al batalo! (*Al la ĉefsorĉisto)* Dignulo, anoncu vin ĉe mi antaŭ krepusko, ĉar tiam ni ekmarŝos! (*La ĉefsorĉisto levas la ŝultron, klinas sin kaj foriras. Gezo turnas sin al Dina.)* Sendu ilian

poŝtan kolombon al la komunumo-Joruba, falkojn al la aliaj regionoj kaj ĉevalajn rajdantojn al la pli foraj triboj kun miaj mesaĝoj devontigaj ilin por ekmiliti! La aroj de soldatoj aliĝu, ĉe la jam antaŭe markitaj lokoj!

**DINA:**

Senprokraste mi aranĝos ĉion. (*Ŝi klinas sin kaj foriras, Gezo kaj Fatima brakumas unu la alian.)*

**FATIMA:**

Se per viaj elefantoj vi pelos la atakantojn en marĉon, neniu eskapos sendifekte. Ĉar, se tamen estos pluvivantaj poste, tiujn manĝos marĉaj krokodiloj. Venkante fiere flagros via flago: en blua kampo ora krona elefanto.

**REĜO:**

Karegulino, vi havas elstaran militestran talenton. Morgaŭ post la pena interbatalo antaŭ la dormiĝo mi pensos en mia tendo pri viaj molaj paŝoj, silkecaj fingroj kaj dolĉaj, amoraj vortoj. Sed, nun jam venu ripozi mia dolĉa amatino! La tagiĝo estas kritiko de la nokto, la mezuriĝo de la tempo antaŭ la leviĝanta suno. Mi bezonas kolekti freŝan forton. (*Brakumante unu la alian eliras ili eksteren.)*

## Tria bildo

**Scenejo:** En la granda ĉambro de reĝa palaco la venkinta reĝo reveninta el la batalo, akceptas la honoro esprimojn de siaj popolanoj. Ĉeestas krom la reĝa paro kaj la kortega popolo ankaŭ la ĉefsorĉisto.

**REĜO:**

Kio okazis ĉefsorĉisto? Kial vi ne aperis sur la batalkampo? Ĉu eble vi volis ne reen sorĉi la atakantojn en ilian propran landon?

**ĈEFSORĈISTO:**

Ne moku, mi ne havas ŝerc-toleran animstaton. Brilon de mia hejmo funebro malheligis.

**REĜO:**

Pardonon kaj akceptu mian kunsenton. Ĉu mi povas helpi iel? Via armeo meritas laŭdon. Ni venkis.

**ĈEFSORĈISTO:**

(*Iome al si mem.)* Ne laŭdu la tagon antaŭ la sunsubiro. Ne fanfaronu reĝo! Min, vi ne povas simple neglekti. *(Li klinas sin kaj foriras. Post lia foriro, sen anonco kuriero enkuregas.)*

**KURIERO:**

Denove reaperis la malamiko! Nia patrujo suferas nun ĝeneralan atakon! Armeoj atakas ne nur de Niĝerio, sed ankaŭ de Niĝero kaj Burkino. (*La reĝaj geedzoj interrigardas.)*

**REĜO:**

Dankon. Iru en la kuirejon peti manĝaĵon, sed poste ne foriru, vi ekmilitos kun mi! *(Li turnas sin al la pordo gardisto.)* Gardisto voku mian ĉefmilitestron! *(La gardisto kaj kuriero foriras, la korteganoj laŭte interparoladas ekscitite. Envenas la ĉefmilitestro. Al li, la reĝo.)* Feliĉo estas en la malbono, ke ankoraŭ ne disiĝis la armeoj. Ĉefmilitestro, portu mian anoncon, ke por la sukceso de nia militiro mi oferos ŝafojn, kaprojn. Bakitajn viandojn de la oferitaj bestoj, kaj bonajn trinkaĵojn ricevos la soldatoj sed la diboĉadon, mi malpermesas! Post la dispozicioj fare de vi, mi volas revidi vin kune kun la ĉefoj de trupoj por priparoli la militan planon! La armeo ekiros dum matenkrepusko! Foriru por aranĝi ĉion! *(La ĉefmilitestro klinas sin kaj eliras, post li ĉiuj foriras.)*

## Kvara bildo

**Scenejo:** Gezo kun Fatima staras antaŭ la soldatoj ripozantaj apud la reĝa palaco. La reĝo alparolas la soldataron.

**REĜO:**

Miaj kunbatalantoj! En la nialanda historio ne okazis ĝis nun samgranda malamika atako kaj precipe samtempe. Miaj sanktaj antaŭuloj estis konkeraj reĝoj. Mi estos sama. Nun ni batalos por defendi nian patrujon. Ĵuru, ke vi batalos pro nia libereco: plenforte, fide, plene de kuraĝo kaj entuziasmege!

**SOLDATOJ:** *(unuanime)*

Ni al vi ĵuras!

**REĜO:**

Per forto, kuraĝo, entuziasmo, filoj de „Fon" Dahomeo ankaŭ nun unuiĝu! Ek! Soldatoj, ĉiam antaŭen! Helpu nin niaj sanktaj antaŭuloj, grandaj dioj! Venkinte sur nin salutos komenco de nova tempo!

**SOLDATOJ:**

Vivu! Vivu!

*(Dum kriado de la soldatoj, la reĝa paro foriĝas. Kurteno. Dek kvin minuta paŭzo okazos.)*

# TRIA AKTO
## Unua bildo

**Scenejo:** En la ĉambrego de trono ni vidas reĝinon Fatima, sinjoron Ludoviko, la ĉefsorĉiston, la kortegan popolon kaj la amazonojn.

**ĈEFSORĈISTO:**

Tre sangaj interbataloj estis, sed ni venkis. Tamen fine, el vestaĵo de nia reĝo gutis la sango, tion oni povis eltordi de ĝi. Post kiam la kuraca amazono lavis la sangon de sur nia reĝo, kaj metis sur lin puran veston, li senkonsciiĝis. (*Fatima kovras sian larman vizaĝon sub sian vualon.)*

**SINJORO LUDOVIKO:**

Laŭ tio, ĉu la reĝo toleris la lavon, sed la tordon jam ne?

**REĜINO FATIMA:**

Estimu, kies gastamon vi ĝuas! Ne estas tempo por ŝerci!

**SINJORO LUDOVIKO:**

Ne nubigu la malfeliĉo kaj duboj vian belan frunton! (*Li kisadas, brakumas Fatima, kiun surprizas la tenereco miksita kun sintrudo de la Franco, sed ŝi forpuŝas de si la viron kaj afliktite turnas sin aliflanken.)*

**ĈEFSORĈISTO:**

Vere, pasis jam unu Lun-monato, kaj nia reĝo estas nek vivanta, nek neaga. Same la landaj aferoj ne povos flui plu. Mi, apogato de spiritoj reĝos de nun, helpe de sinjoro Ludoviko, ĝis okazos la elekto de nova reĝo.

**REĜINO FATIMA:**

Vi certe ne serioze pensis, ke vi duope volas regadi sen mi, kies regadon dekretas leĝo de mia edzo! Ne aŭdacu aserti kategorie, ke alian reĝon vi volas starigi anstataŭ mia edzo! Se vi volas regadi, regadu kune kun mi. Helpante mian regadon mi akceptas vin, alikaze ne.

**ĈEFSORĈISTO:**

Dum mi vivas, „Fon" Dahomeo ne vidos reĝinon, nur reĝon. Plie vi ornamadu vin. La regadon lasu al viroj! Kaj estu plie kara katino ol fie langa virino. Iĝu mia seksa kunulino, ja vin ne povas posedi via edzo. *(Li paŝas al Fatima, zone kaptas ŝin kaj ekkisadas mamojn de la virino, dume premadas ŝian postaĵon. Fatima forte provas liberiĝi de li, sed nur tiam ŝi sukcesas, kiam ŝi mordas manon de la agresanto. Tiam li alkrias la korteganojn.)* Ĉu vi ne havas farendaĵojn? For! Ne staru ĉi tie! (*Tiuj foriras.)*

**REĜINO FATIMA:**

Lasu min! Ne konfidencumu! Ĉu vi ambaŭ freneziĝis? Ĉu blindigis vin ambaŭ, la sopiro pri potenco? Mi estas reĝino kaj ne unu el inter servistinoj! Tenu lanugon al nazo de mia edzo! Vi ekvidos ĝin moviĝi, kiam mia edzo enspiras.

**ĈEFSORĈISTO:**

For la lanugon! Se iu ne povas stari, iri, paroli, tiu ne vivas! Tiu ne povas plenumi la vivo taskojn! Ignoru finfine, vane vi volas atendi plu la restariĝon de via edzo!

**REĜINO:**

Vi malpravas.

**ĈEFSORĈISTO:**

Fatima! Ekrigardante viajn mamojn pomo formajn kaj malplatan postaĵon, inundas min terura sopirego simila al vulkana ardo, por posedi vin. Akceptu min via edzo, aŭ pri tio vi ankoraŭ pentos!

**REĜINO:**

Mi respondas ne.

**SINJORO LUDOVIKO:**

Karegulino ne alian, min akceptu! Mi amas vin. Mi sopiras al viaj okuloj rapide fulmaj, daktiloj de via lipo kaj svelta nigra korpo. Honesta oferto de mi peti vin esti mia edzino, kaj mi igos vin mia reĝino. Ni dividos la reĝan posedaĵon kaj sur vin kiel mia edzino ne etendiĝos la praa leĝo pri la homofero sur altaro de iu ajn dioj!

**EFSORĈISTO:**

Amindumas vin sinjoro Ludoviko. Sed li ne konas niajn leĝojn, ĉar reedziniĝi vi ne rajtas post forpaso de via edzo reĝa. Sed vi rajtas prezenti vin propravole kiel oferdonon por estigi via-edzan gloriĝon!

**REĜINO FATIMA:**

Dum vivo de mia edzo, mi ne apartenos al aliulo, kaj oferdono mi ne rajtas esti. Mi ne vidvas! Vi ne rajtas perforte devigi min, ĉar tiukaze vi efektivigas agon kontraŭ leĝo de mia edzo! Se tamen vi agas laŭ via propra leĝo, poste vi tre pentos.

**ĈEFSORĈISTO:**

Ha, ha, ha! Ĉu vi minacas min? Vane! Vi ofendis mian viran fierecon. La praan leĝon de mia amata patrujo via edzo ofendis! Vere, via edzo donis leĝon, sed ĝi ne estis anoncita de mi, tial ĝi ne realiĝis. Nenio kaj neniu defendas vin. Mi venĝos al vi pro la maljustaĵoj! *(Li forte aplaŭdas. Post tio servisto enportas korbeton kaj metas ĝin antaŭ la*

*piedojn de la reĝino.)* Malfermu korbon reĝino! Mi volas havi vian novan decidon.

**REĜINO FATIMA:**

Min ne interesas via korbo! Mi vidas nur, ke mi ne povas konvinki vin pri mia vero. Bedaŭrinde, ni povas fari nenian kompromison, ĉar vi ne kapablas objektive konsideri la farendojn en nia malfacila situacio. (*La ĉef sorĉisto perforte direktas la manojn de la reĝino al la korbo, devigante, ke ŝi malfermu ties kovrilon. La reĝino malfermas la korbon, kaj timiĝante sed kolere komencas kriadi tiumomente.)* Ho, ve! Kobroj! Vi estas malbenata frenezulo! Gardistoj envenu kaj forigu ĉi frenezulon! Li volas murdi min! (*Soldatoj enkuras, sed ilian provon por plenumi la ordonon malpermesas la haltiga mana manovro de la ĉefa sorĉisto.)*

**ĈEFSORĈISTO:**

Gardistoj! Se vi helpos, vi ŝanĝiĝos porkoj! (*La soldatoj direktas siajn longajn fusilojn ne al li, sed al la reĝino, kvazaŭ la vokanto ne ŝi estus. Poste li al Fatima.)* Pretiĝu reĝa homino! Post du tagoj la sanktan oferon vi prezentos antaŭ la sankta krokodila altaro! Tiutage ni helpos ankaŭ vian edzon transpasi al la spirit-mondo.

**REĜINO FATIMA:**

Kaj krepuske kaj vespere mi sentas min senpova. Mi tre malgajas. Plenumu mian lastan deziron por pasigi la sekvajn tagojn kun miaj amataj amazonoj.

**ĈEFSORĈISTO:**

Bone, estu tiel kaj vi forpasos kun lumo. Se vi drinkos miajn narkotajn trinkaĵojn, vi liberiĝos de timo tiom, eĉ vi volos flugi! *(Per manoj li faras flugajn movojn.*) Sed, notu bone, por fari nenian rifuĝpovon, ĉar se la sankta oferdono ne okazos, ankaŭ viaj amazonoj mortos! Amazonoj, akompanu vian kompatindan sinjorinon! *(La amazonoj kune kun Fatima eliras, poste ankaŭ la aliuloj.)*

## Dua bildo

**Scenejo:** Ni vidas la dormoĉambron de la reĝo. Surdorse kuŝas reĝo Gezo sur tapiŝo teksita el fibroj de palmoj. Apud li la kuracanta amazono Adarci frotadas, masaĝas la frunton, kolajn arteriojn, brakojn, bruston kaj la piedojn de la kuŝanto, kiam vizitanto alvenas.

**SINJORO LUDOVIKO:**

Eksciu; la ĉef-sorĉisto promesis, ke mi estos la sekva kronita oleita reĝo en Fon Dahomeo! Ĉu al la ekscelenco jam influis la kuirita venena herbo portita de mi hieraŭ?

**ADARCI:**

Kiel mi diru, por kredi tion? Vivas la reĝo! Jam ruĝiĝas la haŭto sur lia vizaĝo! Kvankam malrapide, sed bonefikas niaj sanktaj kuracherboj. Ili havas kuracefikojn kontraŭinflamajn kaj por adstringi la vunditajn histojn! Iliaj efikoj konatas en tuta Afriko! Ĉu vi ne konas la dekoktaĵon el tiuj folioj? *(Antaŭ ol respondus sinjoro Ludoviko, alvenas la ĉefa sorĉisto.)*

**ĈEFSORĈISTO:**

Kiam vekiĝos reĝo Gezo? Ĉu morgaŭ?

**ADARCI:**

Jes, povas esti, ke morgaŭ!

**ĈEFSORĈISTO:**

Tio ne povos okazi! Mi antaŭhelpos la foriĝon de lia animo, se de si mem ĝi ne volas. Mi ne povas atendi plu la komencon de mia regado. Dum reĝeco de nia pli frue reganta reĝo mi regis anstataŭ li, kaj nun mi forte resopiras. (*El sub sia mantelo elprenas skurĝon kaj komencas batadi la aeron super la kuŝanto.)*

**ADARCI:**

Grandsinjoro! Espereble vi ne intencas skurĝe murdi la ekscelencon**!** Ĉu mi erarus?

**ĈEFSORĈISTO:**

Vidu, ke sorĉisto de la estra Fon tribo de Dahomeo, faras animo pelon profesie! *(La ĉefa sorĉisto komencas turniĝi ĉirkaŭ si, klakigante la skurĝon enaere. Poste li haltas, manojn etendas al ĉielo kaj balaas per tuŝoj de la skurĝo vipoj la kuŝanton de kapo ĝis piedpintoj. Kiam li denove komencas rondiri, la agado ripetiĝas. Li tute lace haltas kaj komencas foriri kun sinjoro Ludoviko, sed haltigas ilin la voĉo de Adarci.)*

**ADARCI:**

Ekstaru kaj informiĝu! Nia reĝo nedormante kuŝas kaj eble aŭdis, ke vi ambaŭ volas murdi lin! Kaj lian edzinon dum lia vivo, vi jam oferdonis sur la altaron de sankta krokodilo! La senigon de la reĝo de la trono ne vi povas fari. Je tio rajtas nur membroj de Granda Konsilanta Komitato de Triboj! *(Dumtempe ŝi ĉagrene vekas sian majestan reĝan moŝton.*) Malfermu viajn okulojn, rigardu min kaj parolu mia dolĉa Ekscelenco!

**ĈEFSORĈISTO:**

Bone, morgaŭ antaŭ la de mi kunvokitaj membroj de la Granda Konsilanta Komitato de Triboj vi raportos pri la sanstato de reĝo. Pri la detronigo kaj elekto de nova reĝo, decidos la konsilianoj. *(Ili foriras nun.)*

**ADARCI:**

*(Ŝi surgenue preĝas.)* Mi petegas vin, ho niaj gloron havaj prauloj! Faru nian reĝon denove vivanta, ĉar aliokaze ni ĉiuj mortos! *(Ŝi provas fari novan enspiregon al la reĝo, kiam li ekparolas.)*

**REĜO:**

Karega mia, ĉu vi estas ĉi tie? *(Adarci ĝojege al la reĝo.)*

**ADARCI:**

Adarci, via kuracistino mi estas. Dankon al niaj sanktaj antaŭuloj, ke vi memkonsciiĝis. La ĉefsorĉisto altrudis vian edzinon Fatima, ke ŝi oferdonu sin sur la altaron de la sankta krokodilo, sed ni amazonoj savis ŝin. Por, ke la ĉefsorĉisto ne povu proponi sin al la elektantoj de reĝo, vi devos aperi morgaŭ antaŭ la Granda Konsilanta Komitato de Triboj.

**REĜO:**

Vidu! Mia mano plenas per sunradioj kaj disvastiĝas jam la lumo en mia memoro. (*Li montras sian manon, sur kiu fine verŝiĝas la sunlumo.)* Mi nepre punos, la kulpulon! Sed, nun mi malsatas, soifas. Pordo gardisto portu nutraĵojn kaj silentu pri ĉi landa sekreto! *(La pordo gardisto eliras, Adarci denove alparolas la reĝon.)*

**ADARCI:**

Mia Ekscelenco! Ankaŭ sinjoro Ludoviko punendas. Li kaj la ĉefsorĉisto estas kunkulpuloj, krome li forŝtelis trezoro-kesteton de sinjorino Fatima. Sinjoro Ludoviko ne neis la alprenon, nur menciis, ke la riĉaĵoj pli necesas al li, ol al la mortintoj. Punu ankaŭ lin Ekscelenco! Jen, la kesteto! Ĝi nun jam ne mankhavas! (*La reĝo prenas ĝin, rigardas en ties internon, poste redonas ĝin. Kurteno, dek kvin minutoj da paŭzo.)*

## Tria bildo

**Scenejo:** En la trona ĉambrego ĉe la muro staras ambaŭflanke reĝaj gardistoj, antaŭ ili membroj de la Granda Konsilanta Komitato de Triboj miksite kun armitaj viraj soldatoj kaj amazonoj. Inter la lastaj kaŝiĝante staras la reĝaj geedzoj. Proksime al trono trovis lokon ankaŭ la araba skribisto. Sur la trono sidas sinjoro Ludoviko kaj la ĉefa sorĉisto.

***ĈEFSORĈISTO:***

*Antaŭenpaŝu Reĝa kuracisto kaj raportu pri sanstato de nia reĝa moŝto!*

**ADARCI:**

*(Ŝi paŝante antaŭen)* Membroj de la Granda Konsilanta Komitato de Triboj reprezentantaj nian landpopolon, grandsinjoroj, soldatoj, amazonoj akceptu mian saluton! Mi raportas, ke nia reĝo ĝojas jam pri la plej bona sano kaj baldaŭ aperos ĉi tie. (*La aŭskultantaro vigliĝas.*)

**KODJO:**

La reĝo! (*Servistoj enportas kaj demetas unu palankenon ŝirmitan per kurtenoj.)*

**ĈEFSORĈISTO kaj SINJORO LUDOVIKO:**

*(Post ilia interrigardo)* Kial li ne venas al la trono? Ĉu li atendas nian iron por akcepti? Bone, iru! *(Ili aliras la palankenon, kaj ne perceptante iun ajn vivsignon, ili distiras la kurtenojn. Trovante ĝin malplena, ili indignas.)* Ludaĉo estas ĉi! Ĉu la ludanto ne timas nin? *(Dume malantaŭ ili fermiĝas vicoj de la armitaj fortoj. Dum la fiuloj venis al palankeno, la reĝo aliris la tronon kaj sidiĝis. La ĉeestantaro ekscitite ekmurmuras. Pro tio la ĉefsorĉisto kaj sinjoro Ludoviko turnas sin kaj ekrigardas reĝon Gezo. Ili rigidiĝas estante malagrable frapitaj pro surprizo. Kiam la reĝo mansignas, la armitoj ĉirkaŭas kaj eskortas la du tron-sopiregantojn al la trono.)*

**REĜO GEZO:**

Saluton al ĉiuj! Al la favora graco de dioj dankeblas, ke vi nun ne funebras, sed povas ĝoji pri mia apero. Ĉu vi akceptas min via nuna kaj estonta reĝo?

**REPREZENTANTO DE TRIBA GRANDA KONSILIO, SOLDATOJ:**

*(Kune)* Jes, ni akceptas Vin!

**REĜO:**

Dankon! Armitoj, bone gardu ĉi tiujn du homojn. Ili devos atendi decidon pri ilia sorto.

**PORDGARDISTO:**

Ekscelenco! Nome de la popolo de „Fon" Dahomeo mi akuzas la ĉefsorĉiston; per perfidoj patruja kaj ŝtata faritaj pro sopiro de potenco, misuzo de sia digno, per murdprovoj koncerne la reĝo paron kaj ĉantaĝo. Krome, mi akuzas sinjoron Ludoviko; per murd-provo pri la reĝo farita de kanajla intenco, per instigoj kontraŭ la reĝopara potenco, per provoj malĉastigi la pudoron de nia reĝino Fatima, krome mi akuzas lin per ŝtelo. Majestulo, frapu ilin per mortpuno!

**REĜO:**

Ĉu vi agnoskas vian kulpecon Ĉefsorĉisto, kaj sinjoro Ludoviko? Parolu laŭvole!

**SINJORO LUDOVIKO:**

Vi ne rajtas juĝi min, mi ne estas via subulo regata de vi. *(Por paroli sinanoncas la reprezentanto de la Granda Konsilanta Komitato de Triboj. La reĝo mansignas jes.)*

**REPREZENTANTO DE GRANDA KONSILANTA KOMITATO DE TRIBOJ:**

Ŝtelante, vi pekis kontraŭ, la gasto juro! Nun ĉi-loke estas – krom tiu en Jerusalemo – la Jehoŝafato; la Juĝo-valo; kie laŭ mencio de via Sankta Biblio senescepte ĉiujn homojn juĝos Dio, ĉu ili estas sinjoroj aŭ soldatoj. Nia reĝo nun estas la mano de Dio. Parolu plu!

**SINJORO LUDOVIKO:**

Mi ne devus paroli pri ĝi, tamen aŭdu! En Vian landon mi alvenis ne pro daŭrigo de negocado, sed por akiro de konoj al ĝia facila koloniado pere de mia lando. Aliparte, se la Hungardevena franca soldato Maŭrico Benjovski povis esti reĝo de Madagaskaro en 1785, kial mi ne povus esti la samo al „Fon Dahomeo?"

**ĈEFSORĈISTO:**

*(Liberiĝante li de la armitoj, kaptas sian ponardon kaj premas ĝin al la gorĝo de sinjoro Ludoviko. Sed la armitoj senarmigas lin, poste li kriaĉas al sinjoro Ludoviko.)* Ludoviko! Fulmo batu vin! Ĉu vi volis vendi mian dolĉan patrujon? Kaj kiel?

**SINJORO LUDOVIKO:**

Planita estis, ke mian reĝecon apogos franca armeo. Mi volis edzinigi Fatiman, sed ŝi ne konsentis. Miaj aspiroj al grandaj faroj neniiĝis, sed venos post mi iu kaj li venkos! Tiu civilizos vian popolon per kristana kredo, por perforte levi la vialandan vivon kaj kulturon al nivelo de Eŭropo.

**ĈEFSORĈISTO:**

Ho, ve, la hieno! Per tuta rigoro punu lin reĝo! Mi fidis lin, pensis lin mia amiko! Ho, kia infamio!

**REPREZENTANTO DE TRIBA GRANDA KONSILIO:**

Nome de la ĉeestantaro, mortpunon mi petas por ambaŭ fiuloj!

**REĜO:**

Laŭ miaj spertoj akiritaj dum mia malsanado kaj la nunaj eldiroj, ambaŭ kaptitoj estas kulpaj. Mi lavas miajn manojn. Per ŝnurega pendumo estos ilia puno. Ĝi okazos hodiaŭ vespere. *(La kondamnitoj kapon klinas senvorte. La amazonoj devigas ilin kuŝiĝi sur la teron.)*

**REĜO:**

Komprenu mia popolo! La reĝaj virinoj donas al vi la plej multe ne per iliaj viando kaj sango, dum la morta festeno, sed pere de agoj kaj idoj! Skribisto fiksu mian leĝon por ĉiamo! *(La skribisto ekskribas.)* **„Mi dekretas, ke post morto de reĝoj de „Fon Dahomeo" neniam plu rajtos esti oferdonoj: liaj edzinoj, konkubinoj kaj liaj pliaj inseksaj apartenantoj sur altaroj de la sanktaj dioj de la lando, kaj oni ne aranĝeblos funebran festenon el ili!"** Mi kredas, ke gardi kaj evoluigi nian kulturon ni bezonas similajn saĝajn leĝojn kaj ties obeojn! Sed kaj la nunan tempon kaj la estontecon konstrui bezonatas unueco, kunteno! Ĝis ni ne malkonkordas, nenia alia popolo povos venki nin! Por konstrui nian estontecon eklaboru jam nun mia popolo! Jen via reĝino Fatima, kies vivon gardis leĝon obeemaj amazonoj!

(*Fatima antaŭenpaŝas vestite en uniformon de amazonoj, el vico de la virinaj soldatoj starantaj malantaŭ la trono meze staranta, kaj iras al sia edzo. Reĝo Gezo brakumas ŝin kaj la kuracistinon Adarci. La kondamnitoj kuŝas sur la planko, sur ilia dorso trotas la piedoj de reĝa paro. Sur ambaŭ flankoj de la trono staras amazono kaj tenas flagojn de Gezo klinante ilin al la trono. Apud ili sur ambaŭflankoj arkforme staras unuavice soldatoj unugenue, malantaŭ ili la aliaj rolantoj. Solena sono de tamburoj fermas la agadon de la teatraĵo.)*

## – FINO –

# Letero Al Kreinto De Esperanto

*(Kvazaŭ li kaj mi estus vivantaj samepoke)*

## Saluton, Altestimata Sinjoro Zamenhof!

Intertempe Vi jam certe vekiĝis kaj mire rigardas niajn donacojn postlasitajn ĉe Vi. Ni tre esperas, Vi pardonos nin por ne veki Vin, kvankam Vi certe estus same tre ŝatinta babili kun ni, viaj vizitantoj el Hungario, ja ĝis nun Vi nur koresponde alparolis, instruis nin.

Mia edzo kaj mi nun vizitis vian landon pro aranĝo de oficialaj aferoj kun estroj de varsoviaj gimnazioj. Mia edzo tre zorge preparis la programojn kun ili, ja ĉie atendis nin la direktoroj de la vizititaj gimnazioj. La pridecidita programo estis tiel densa, ke ni ne sciis, ĉu ni povos viziti vin aŭ ne. Do pro tio ne okazis la necesa antaŭa sinanonco por la vizito ĉe vi. Sed kio kutimas okazi, ankaŭ ĉi-foje estiĝis prava; „ne ekzistas perfekta ago, nur perfekta intenco". Iu direktoro mistrafis la daton de siaj farendoj kaj tial ne povis akcepti nin. Do ni gajnis liberan duontagon por viziti Vin.

Post la porda sonorigo malfermis via estimata edzino, kiu atentigis nin, ke vi la doktoro povas akcepti pacientojn nur de la posttagmeza 15a horo, do ni devos reveni nepre tiam. Kiam ni sciigis al ŝi, ke ni ne estas pacientoj sed vizitantoj el Hungarujo, ŝi ekskuzis sin kaj petis nin enveni la loĝejon, akcepti gastigon konsumante teon el samovaro kaj kukojn freŝe bakitajn, ŝia edzo ja nun dormetas. Ni tuj diris, ke ni ne volas veki la sinjoron doktoron, ĉar laŭ hungara onidiro: „se oni dormas, lia animo vizitas transmonde. Por ke ĝi retrovu la hejman vojon, dormanto ne ĝenendas." Krome, post cerbaj, korpaj laboroj oni bezonas ripozon, do ni lasas lin prefere malstreĉiĝi. Ŝi kapsignis konsenton kaj preparis la tablon al teumado. Dume ni komencis malfermi nian mansakon por transdoni niajn donacojn portitajn kiel memoraĵojn por kreinto de nia komuna, nova lingvo. Ŝi dankis kaj ni altabliĝis. Dume via edzino rakontis pri Vi, viaj laboro, verkado kaj la familianoj. Ni paroladis nialingve, preterlasante la rusan. Post la teumado Via karega edzino Klara invitis nin en Vian ĉambron, por rigardi Vin dormanta kaj propramane meti la donacojn sur Vian skribotablon. Enpaŝinte la duonluman ĉambron, ni ekvidis vin kovrita per malpeza kovrilo, kuŝanta sur la divano. Pro la dorma varmeto, sur Via ridetanta vizaĝo burĝonis ruĝetaj rozetoj. Ni surtabligis niajn

donacojn. Via edzino atentigis nin, skribi letereton al vi. Ni ĝoje-emocie akceptis ĉi tiun eblecon skribi al Vi senpere, de-mane al mano.

Estimata sinjoro Doktoro Esperanto, kreinto de nia lingvo!

Ni portis al Vi kaj al Viaj familianoj salutojn de niaj gesamideanoj. Krome ni portis vinon por gustumi, gramofono-diskojn kun kantoj de nia popolo kaj esperantigon de hungaraj kantoj, por ke aŭdante la muzikon vi povu ĝui la kantojn de niaj regionoj. Ili enhavas ja korajn pensojn de la hungaroj. Ni skribis la vorton esperantigo, ĉar ni nomas vian lingvon Esperanto pro via aŭtora nomo Doktoro Esperanto. Mi ĵus finlegis vian tradukon de la romano Marta de Orzesko, eldonita en 1910, kies manuskripton mi rimarkis sur angulo de via skribotablo. Ni ŝatus finlegi ankaŭ la tutan Sanktan Biblion. Ankaŭ ĉi esperantlingva Biblio estas kaj estos tre bona legaĵo, eminenta ekzerca ebleco. Do, via edzino gastigis nin, kaj ni regalos Vin per la fama hungara vino specio: Asuo de Tokaj, kiu samtempe estas: „reĝo de vinoj kaj vino de reĝoj." Agrablan gustumadon! Servu ĝi je Via sano!

Vi povus demandi min, kial tiom da donacoj? Ho, kara nia estimata instruisto, ni ne forgesis vian morgaŭan naskiĝtagon! Ni deziras; vivigu Vin Dio, la ĉiopova, je ĝoja kontento de ni, adoptintaj vian ideon kaj Viaj estimindaj familianoj! Dio donu al vi longan, senzorgan vivon kaj plian entuziasmon por verki ankoraŭ pli novajn verkojn. Lastfoje vi demandis, mi nun respondas je via demando. Mi konatiĝis, enamiĝis al junulo, kiu samjare iĝis mia edzo – dum la unua Esperanto-lingvokurso en urbo Miskolc (miŝkolc), gvidata de sinjoroj Ludoviko Győry Nagy (djori-nadj) kaj Kolomano Kalocsay (kaloĉai), en la jaro 1913-a. Inter ili la dua montriĝas jam nun esti ankaŭ estonta bona kuracisto kaj Espertanto-lingve verkanta poeto, arta tradukisto. La unua ŝajnas, ke li estos ne nur bona advokato, sed ankaŭ elstara disvastiganto de via internacia lingvo. Kaj nun post la unua lingvokurso ni vidas jam ankaŭ ĝermojn de iliaj estontaj elstaraj esperantistaj posteuloj, sekvantoj en nia regiono. Inter ili certe estos: Ludoviko Király, Barnabo Batta, Stefano Pál, kaj ankaŭ virinoj. Ni diras nun adiaŭon, ĉar ĉi tiu letero iĝis iom pli longa ol mi volis, kaj ĉar urĝas nin la tempo por ne malfruiĝi al la trajno al nia patrujo.

Varsovio, la 14-an de Decembro 1916-a

Gardante Vin en nia memoro, ni restos poreterne Viaj hungaraj, Vin tre estimantaj fidelaj adeptoj de via ideo: sinjorino Adrienne, nome ankaŭ de mia edzo Ladislao Pásztor el Miŝkolc, Hungarujo.

## La Homo Timegata

La juna homo, pri kiu mi rakontas ĉi historion, la mezlernejajn studojn finis en la 2000-a jaro. Li ne nur abiturient-ekzamenis, sed ricevis ankaŭ majstran diplomon pri fako de muntadoj pri kondukilaj telefonaparatoj kaj poŝtelefonoj. Post finiĝo de la studjaroj li ne volis ripozi dumsomere, sed volis tuj eklabori. Sed, li vane serĉis laborejon. Pro la granda senlaboreco de la regiono Norda Hungarujo, li ricevis laboreblecon nenian, nenie.

Lian peton por pristudi komputilajn aferojn en universitato de Miŝkolc, estis obĵetate, ke ne estas jam pli multa loko por pli da studentoj. Liaj gepatroj ne povis ekpagi la pli multekostan lerneblecon en kadro de la universitata studo, pro ilia malalta nivela pensio. Do, li komencis plu lerni la deziritan studobjekton ne en universitato sed en alia mezlernejo.

La junulo sukcese finis la novajn studojn kaj akiris atestilojn pri la fakoj komputilmuntisto majstra kaj programfaristo kaj por ties praktikoj. Sed, feliĉo ne volis atingi lin, por ke li trovu laborlokon. La tempo pasis, kaj li jam forte sopiris labori, gajni monon, ke li povu establi sian vivon al la familiofondo. Kiam li estis jam treege malgaja pro la sensukceso, la Buroo de dungigo trovis por li laborlokon ĉe iu entrepreno.

La junulo havis tre grandan ĝojon kaj milojn da planoj. Ekzemple: kion li aĉetos el sia salajro, kiom li povos ŝpari el ĝi, kiom li donos el la monata salajro al la gepatroj… ks.

Lia laboro ne bezonis la utiligon de siaj akiritaj fakaj scioj. Sed, tamen li tre volis la laborejon. Al la laboro li estis ellernigita pere de iu tiea laboristo. Elprovi lin, la laborejestro postulis de li pli multe da laboro, ol kiom estis la deviga. La junulo faris ĉion, kion la laborej-posedanto deziris de li. La laborkunuloj ekamis la diligentan, bonhumoran junulon. Plurfoje atentigis lin, ke estu singarda, ĉar la estro ne estas bona homo. Tiu ŝatas eluzi la gelaborulojn, poste forsendas ilin senpage. La kolegoj parolis al li ankaŭ pri tio, ke ĉe la loka juĝejo kontraŭ ilia estro multaj pli fruaj gelaboruloj procesadas, kaj kelkoj el ili, jam gajnis laboraferan – kaj monaferan proceson.

La junulo ne akceptis la atentigon, ne volis kredi ilian sinceran, bonvolan parolon, ilian konsilon, ke li alie provu feliĉon, ne restu tie. Kiam lia ĉefo petis de li, ke el amikeco li tramuntu la oficejan komputilon, li tre volonte akceptis la novan taskon pensante, se li bone

plenumos la taskon, la ĉefo ekkonos sian bontalenton. Tielmaniere la laborejo iĝos por li bona bazo por la vivkomenco.

Sed, la labortempo ne sufiĉis plenumi la du specajn labortaskojn. Sen scio de la ĉefo li restis plu en la laborejo post la deviga labortempo, munti la komputilon, fari la deziritan kroman laboron. Tiel okazis, ke pro la tempomanko foje li ne restarigis la originalan staton de la komputilo post ĝia tramuntado. Per ĝi oni povis labori, sed ĝi ne estis preta. Li devis pli rapide plenumi la samtagan labordozon, do li devis rapidi. Do, li parolis pri la nepretigita komputil-tramuntado nek al la estro, nek al la laborkolego. Al la lasta tial ne, ke tiu ne ĵaluzu, ke la estro fidas jam lin. Poste, post la 15 hora laboro li iris hejmen tre lace. Alitage la junulo kun kolego alien iris por munti fotokopiadan maŝinon. Je malfeliĉo, li hazarde ekpuŝis iun diskon de la maŝino kaj ĝi rompiĝis. Semajnofino estis, kaj la oficisto kiu laboris per ĝi, jam hejmeniris. Ankaŭ tiu fraŭlo estis juna kiel li. Tial nia junulo tion pensis, ke se li ekaĉetos la novan konsistigan parton de la maŝino anstataŭ la rompita, kaj transdonos ĝin al la junoficisto, nenia malbono okazos. Tiuokaze sia laborĉefo ne informiĝos pri la eraro, kaj li povos eviti la punon.

Sed, ĉio okazis male. Li vokis la oficiston pertelefone dum la tuta semajnfino, sed ne povis atingi lin. La loĝadreson de la fraŭlo li ne konis, ne povis viziti lin ke ili povu diskuti la situacion. Li ne povis peti ties konsilon por kion fari. Li reiris en sian laborlokon, skribis atestan pravigan anoncon pri la evento kaj metis sur tablon de la ĉefo. Sed, ĉar li estis embarasita pro la nekonata ebleco de kionfaro, la rompitan diskon li metis en koverton, poste ĵetis ĝin en paperkorbon de la ĉefo. Lia semajnfino terura estis pro la travivita timego.

Alvenis la unua tago de la sekva semajno. Nia junulo iris kun la kolego denove aliloken por munti fotokopimaŝinojn. Li denove parolis al neniu pri la malfeliĉiga afero, ĉar li mem volis solvi ĝin. Sed, li denove ne povis atingi la necesan eblecon aranĝi la aferon.

Sekvis mardo. La junulo havis jam stomakdoloron pro la timego, kio suferigis lin pro la rompita disko. En la laborejo la estro tiel agrable kondutis lia direkte, ke li pensis pri nenia malbono. Poste lin, kaj la vicestron la ĉefo invitis iri en sian ĉambron. Ili eniris, sidiĝis. Kaj tiam, la ĉefo komencis timige kriegi el sia tuta gorĝo, skuis siajn pugnojn al la junulo.

Sur la estra tablo multaj oficialaj paperoj kuŝis. Tiel ŝajnis, ke tiuj antaŭpreparitaj estis por iu celo. La junulo ne vidis, kiuj estis tiuj. Li

spertis tion nur, ke la estro forte atakas lin, nomante lin je ĉiuspeca fihomo, aĉulo, kiu trompis lian konfidon, kiu ŝteli volis la oficejajn industriajn sekretojn kiel komputila pirato, kiu ŝtelis ankaŭ la diskon de tiu buroo. La estro ruĝega estis, kiel kolo de la meleagro kaj ne lasis la junulon klarigi la sitruacion. Kiam tio tamen sukcesis, li ne kredis al la mallaŭtvoĉa klarigantulo. Poste ili antaŭenprenis kaj la priskribitan atestilon pri la malfeliĉa situacio, kaj la rompitan maŝinan elementon. Sed tiam nenio helpis jam. La estro tion kriegis al la junulo, ke la laboranto deklaru, ke li estas komputilpirato, kiu volis forrabi de la laborerjo la sekretojn tiam, kiam li reiris en la oficejon post la laborhoroj sen estra scio kaj permeso. La estro denove kriaĉis, ke li tuj vokos policiston, kaj li forportigos katenite la junulon de tie.

Poste, li perforte devigis la junulon, ke la diversajn paperojn, kiuj estis antaŭpreparitaj sur la tablo li subskribu sen ties rigardo. Post ilia subskribo ties kopiajn ekzemplerojn la laborejposedanto donis en manon de la junulo kaj pordonfermite elpuŝegis lin de la ĉambro. La junulo apenaŭ povis hejmenatingi. Liaj piedoj malfortiĝis, tremis, vomemon havis pro la travivitaj humiligo, enkoton premo de sia honesteco. Li tute seniluziiĝis.

La gepatroj trarigardis la hejmenportitajn oficialajn paperojn. Ĉu, pri kiuj temas ili?

Do, ili estis diversaj. Sur la unua tio estis skribita, ke la junulo deklaris, ke li estas komputero pirato, kiu nur tial ne povis finfari la malhonoran agon, ĉar oni malhelpis lin dumtempe. Sur la alia estis skribita, ke li ne bedaŭras sian agon, ankaŭ aliam li volonte agos tiel. La tria atestilo tian tekston havis, ke li traprenis sian monatan salajron de la estro krome li sciiĝis pri sia prompta maldungo.

La junulo kun liaj gepatroj poste atendis la monon perpoŝte, sed vane. La eksestro pagis la monatan salajron al sia ekslaboranto nek en manon, nek perpoŝte.

La junulo, kiun la laborestro trompis, priŝtelis, eluzis, poste eksigis de la laborejo, denove iris novan laborejon serĉi. Dume li akceptis, ke aliam li obeos la ricevitan konsilon kaj ne estos tiel facile trompebla ol li estis antaŭe. Pasis unu jaro, kaj li trovis novan laborlokon.

Li ne volis serĉi sian pravon kontraŭ lia eksa laboreja estro. Li ĝojis liberiĝebi de tiu, volinta vidi tiun fihomon neniam plu en sia vivo.

La estroj de la nova laborejo de la junulo estas laboremaj, alte taksas la fakan scion, la diligentecon, la honoron de ilia juna laborkunulo.

## La skribilujo

Ekde mezo de aŭgusto malfacila estas trovi tempon kiam malplenas la paperbutikoj miaurbe. Tiam aĉetadas la homoj la diversajn varojn al la nova studjara komenco. Mi serĉis la vendejon de paperaĵoj ĉirkaŭ tagmezo, kaj mi sukcesis eltrovi, ke ne estu tiam tie multaj homoj. Do feliĉe mi evitis la tiean tumulton.

Mi libere serĉadis inter la leterpaperoj kun kovertoj, por trovi la sopiratan, kio multe similas al la iamaj leterpaperoj ricevitaj de sinjoro Michal Kucin, la eksa sekretario de la Orienta-slovakia Esperanto-Klubo en Koŝice. Li donacis al mia ĉiu naskiĝtago stokon da interesaj kaj belegaj leterpaperoj kun kovertoj. Ilin mi uzis skribi leteron al li kaj liaj familianoj krome al miaj aliaj elstaraj geamikoj en Esperantio.

Dum mia serĉado preskaŭ eksplodis en la butikon blonda knabeto kun lia simile blonda patrinjo. Ili serĉadis inter la varoj kaj poste aĉetis ĉion necesan al komenco de la unua klasa studjaro en la bazlernejo. La patrino portis la varojn al la kaso por pagi, kiam la vendejan montrofenestron dume rigardanta knabeto ekkris:

– Panjo! Tiun skribilujon en la montrofenestro mi tre ŝatus havi! Ĝi okulumis sur min! Aĉetu ankaŭ ĝin!

La panjo surprizite turnis sin al la fileto, kaj notis:

– Ne parolu stultaĵon! La skribilujoj ne kutimas okulsigni!

– Panjo, vere ne la skribilujo palpebrumis sur min, sed tiu knabo kiu pentrita estas sur ĝia malsupro. Mi tre ŝatus havi ankaŭ tiun skribilujon, aĉetu al mi, mi petas.

La patrino aliris la montrofenestron de la butiko por rigardi, pri kio parolas la infano. Poste klarige turnis sin al ŝia fileto:

– Mi bedaŭras, sed ni ne povas jam aĉeti ankaŭ ĝin, ĉar ĉi varoj multe plie kostis ol mi kalkulis. Vi ricevos la skribilujon de via frato Ludoviko.

– Sed, panjo, la skribilujo de Ludoviĉjo estas el plastiko farita kaj jam ŝiriĝis. Ĉi estas el ligno, ĝi estos bona pli longan tempon.

– Ne eblas, mi ne havas tiom multe da mono – diris la panjo, poste ŝi daŭrigis: ni devas aĉeti vindotukojn al via frateto Emeriĉjo, ni ne povos aĉeti ĉi skribilujon – diris kaj inklinis foriri. Sed la infano kun larmoplenaj okuloj petegi komencis: – ni devas aĉeti vindotukojn al via frateto Emeriko, ni ne povos aĉeti la ujon de skribiloj – diris kaj inklinis foriĝi. Sed la infano kun larmoplenaj okuloj petegi komencis:

– Panjo, se vi metus mian infanĝardenan viŝtukon kiel vindotukon sub mian frateton, ĝin vi devas nur lavi, ĝi povos esti uzebla pli longdaŭre ol la papera vindotuko. Mi ege ŝatus la skribilujon! Panjo, mi petas! La panjo malgaje, tamen strikte turnis sin neante al la knabeto.

– Ne eblas. Mi diris jam.

– Sed panjo, por ke vi tamen aĉetu ĝin kio devus okazi? Ĉu mirakloj ne ekzistas jam? Ĉu mirakloj okazas nur en la fabeloj?

– Aŭdinte ĉi parolon, ekbedaŭre la infanon alparolis ilin la kasistino:

– Se la vendejo malaltigus ties prezon – sinjorino – ĉu vi aĉetus ĝin?

La patrino de infano mire rigardis la kasistinon. Al la okazintaĵo ekatentis la estro de la paper-vendejo kaj turnis sin al la aĉetantoj:

– Kiom vi povus pagi pro la varo? Ĉu duonon de la prezo vi povus?

– La sinjorino surpriziĝis, poste tamen neis, sed dume denove alparolis ŝin la estro de vendejo:

– Sinjorino la de vi aĉetitaj varoj, estas fiksitaj prezaj, sed prezon de la skribilujo, mi povas mildigi. Nu, ĉu pro la duona prezo vi povus aĉeti ĝin al via infano, por ke la unuajn paŝojn je lia lerneja komenco li faru ne per amara seniluziiĝo? Ja li havos multe dum lia vivo! Vi scias pri tio! La virino forte pensadis, luktis kun si mem, poste tamen cedis:

– Bone, la duonprezon mi povas pagi, sed ne plu. Bonvolu transpreni la prezon – diris kaj transdonis la monon. La vendejestro elprenis de la montrofenestro la skribilujon kaj en etsaketon metante ĝin transdonis al la blonda knabeto:

– Prenu kaj portu karuleto ĉi skribilujon! Portu ĝi feliĉon al vi!

La infaneto ruĝe pro la ĝojo dankis la ujon de skribiloj kaj foririnte promesis tre bone lerni en la lernejo por danki sufiĉe la bonvolon. Poste ili adiaŭis kaj foriris. La butiko malpleniĝis.

Post ilia foriro la vendejo estro portis al la kaso sian monujon kaj pagis la mankantan monon al la plena kosto de la skribilujo. Dorson turniĝante rimarkis la vendeja estro, ke mi ĉeestis la okazintaĵojn. Li klarige almetis:

Mi ne rajtis prezon moderigi, sed mi volis helpi. Mirakloj bezonatis ĉiam. Necesis montri ankaŭ nun, ke ili vidu: mirakloj povas okazi ankaŭ nun en la reala mondo, ne nur en la fabeloj, nur oni devas forte kredi ilin. Povas esti, ke iam ĵus li fortigos la kredon, li transdonos miraklon al aliuloj, kiel mi pludonis nun la miraklon iam donacitan de iu nekonatulo por mi.

## Antaŭ 120 Jaroj Naskiĝis Doktoro Kálmán Kalocsay!

Por omaĝi al d-ro Kolomano Kalocsay – kiu naskiĝis antaŭ 120 jaroj ni kolektiĝis en lia naskiĝloko: Abaújszántó [abau:jsa:nto:] en Norda Hungarujo, la 6-an de oktobro 2011.

Ni la festantoj renkontis unu la alian unue en la Kulturdomo Petőfi Sándor (Aleksandro Petofi), kie atendis nin la urbestraro kaj Kulturdomanoj kun salaj kukoj, refreŝigaj trinkaĵoj, kafo, kaj freŝe presitaj koloraj prospektoj pri Abaújszántó. La prospektojn eldonis la urbestraro, la tekstojn kompilis s-ino Beáta Szúnyog[bea:ta su:njog], freŝe diplomita pri lingvoscio de Esperanto.

Kiam jam ĉiuj aliĝintoj alvenis, ni trairis en la Lokhistorian Muzeon, en kies korto estis starigitaj unu apud la alia urboflago, kaj hungara flago, la Eŭropunia flago kaj ĉiuflanke unu Esperanto flago. Apude staris sub la memorpiceo: sinjoro urbestro György Madár, s-ino Adri Pásztor[pa:stor], s-ro Imre Szabó[sabo:], s-ino Anna Bartek (Anjo Amika), popolkantisto kaj urba poeto István Nagy [iŝtvan (Sterfano) nadj] kiel la unuaj rolantoj de la solenaĵo. Vid-al vide staris cirkle la partoprenantoj.

Post aŭskulto de la Himno Esperanta parolis la sinjoro urbestro pri vivo kaj verkaro de doktoro profesoro Kolomano Kalocsay. Sinjorino Adrienne Pásztor parolis pri tio, kial ĝuste en Abaújszántó estis preparitaj la memorlokoj pri nia granda esperantista verkisto, poeto, arta tradukisto, kuracist-profesoro. Ŝi faris mencion pri la salutmesaĝoj alvenintaj por saluti kaj gratuli la organizantojn, la rolantojn de la programoj kaj la ĉeestantojn.

Mesaĝoj alvenis de s-roj: doktoro profesoro Humphrey Tonkin el Usono, de Herbert Mayer de la Aŭstria Nacia Biblioteko – Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko de Planlingvoj, nome de la bibliotekistoj, de Leopold Patek: ĉefdelegito de Aŭstrio, de prezidanto de la Fervojistaj Esperantistoj: Jindřik Tomíŝek l Ĉeĥujo, de Bronislav Ĉupin el Udmurtio (la Udmurta apartenas al familio de la lingvoparencoj de la hungara lingvo) kaj de sinjoro Tivadar Löwenkopf [loevenkopf] el Israelo de la Jordano. Post la evento alvenis mesaĝo de sinjorino Barbara Pietrczak de UEA. La mesaĝoj belsonaj estis kaj ĝojdonaj, honorigaj. Mi dankas ilin en ĉies nomo.

Sinjoro Imre Szabó prezidanto de HEA, lerte atentis la antaŭ li parolantojn, kaj li rakontis pri tiuj datumoj pri vivo de d-ro Kolomano Kalocsay, pri kiuj la pli fruaj parolantoj nenion diris. Tiel sukcesis eviti,

ke certaj indikoj ripetiĝu. Ĉiu parolanto diris iun novaĵon. La paroloj tiel iĝis multflanke koloraj.

Lian parolon sekvis neimiteble belega esperantlingva kantado de hungaraj popolkantoj, pere de s-ino Anjo Amika. Ŝia esperantlingva kantado estis bona ekzemplo antaŭ la neesperantistaj ĉeestantoj kaj parencoj de d-ro Kolomano Kaloĉay, kiel matura estas la internacia lingvo. La kantadon sekvis vizitado de la Kalocsay-memorĉambro kaj de la aliaj muzeaj ĉambregoj.

**La dua fazo** de la festo okazis ĉe la busto de nia granda sampatrujano. Tie ni povis sperti, ke la regule nian lingvon nelernantaj ok jaraj infanoj kiel bele, lerte prezentis dulingve versaĵajn fabelojn esperantigitajn de d-ro Kalocsay. La urba popolkantisto unue prezentis sian poemon porokazan, poste aliajn hungarajn popolkantojn. Sinjoro Wacha [vaha] de la Societo Kalocsay vigle kaj bonhumuron igante parolis pri sistemigo de la vortoparoj en la Esperanto gramatiko, pere de d-ro Kolomano Kalocsay. Poste okazis la florkronado, meĉobruligado ĉe la busto, kaj la komuna fotado parte de kaj pri la ĉeestantoj.

**La tria fazo** de la programo, okazis stratangule de la strateto Kalocsay, antaŭ la memortabulo estanta surmure de la supozita iama domo de la familio Kalocsay. Tie sinjorino Adri Pásztor rememoris unue pri la iamaj, la pioniraj esperantistoj de Abaújszántó kaj pri Barnabo Batta prezidanto de la iama Borsod-Abauj-Zemplén departementa Esperanto Komitato. Sinjorino Adri Pásztor rakontis ankaŭ pri tio, ke la unuajn spurojn de la familio Kalocsay esploris sinjoroj d-ro László Molnár kaj Barnabo Batta. Menciita estis ke doktoro Ladislao Molnár estis la unua esperantisto en la urbo, kiu esperanto-lingvokursojn gvidis inter la jaroj 1981.kaj1982, sed post lia transklokiĝo en urbon Sárospatak el la entuziasma 20 membra grupo preskaŭ neniu restis. Tamen ĝojinda estas, ke la instruistrino sinjorino Ildikó Széphalmi al la nuna festo instruis 15 infanojn, kiuj bele rolis montrante, ke la instruistino tre lertas. Tamen ni bedaŭras, ke ŝi regule ne instruas la internacian lingvon, estante ŝi pensiulino. Ŝi finante multajn aliajn kulturajn farendaĵojn, nehavante helpanton en la instruo, ankaŭ ĝin entrepreni jam ne scias, kvankam la elementa lernejdirektorino volonte instruigus la gelernantojn por fundamentigi la lingvoscion antaŭ komenco de la anglalingva instruado.

Same parolis ĉe la tabulo s-ino Margit Evva, kiu estas prezidantino de la Encs-urba Lokhistoria kaj Patrujkoniga Asocio. Samideanino

Margit Evva rakontis ankaŭ pri sia memoraĵo pri doktoro Kolomano Kalocsay. Ŝi alvenis kun la parlamenta deputito de urbo Enĉ, kaj ili florkronis. Florkronis ambaŭloke la urbestraro de Abaújszántó, HEA, doktoro Ernesto Gaál prezidanto de Societo de la Montosubaj Kreantoj (verkista societo) el urbo Szerencs, la Elementa Lernejo de Abaújszántó, la Societo Kalocsay, s-ro István Mészáros je la nomo de la KEA, s-ro László Pásztor je la nomo de la „Király Lajos" Esperanto Amika Rondo Miskolc, kaj de la Amikeco Esperanto-Asocio s-ro Jozefo Eszényi [ese:nji], Jozefo Gulyás[gujaŝ] el urbo Ózd, Ernő Könczöl[Ernesto Koencoel] el urbo Eger. Se ni rigardas la florkronantojn, ni povas konstati, ke la tuthungara esperantistaro estis tie reprezentata, el urboj de duono de Hungarujo, de Abaújszántó ĝis Budapeŝto.

Post la florkronado ni povis aŭskulti la blovinstrumentan prezentadon de belegaj popolkantomuzikoj pere de sinjoro István Ringler el urbo Szerencs. La lastan muzikon ni kune kantante akompanis. Ĝi estis la hungara preĝo, la proklamo de Vörösmarty:

„Dio benu la Hungaron…"

**Je tempo de la irado en la publiktombejon,** mi jam ne povis marŝi pro pied-doloroj.  Min portis la urbestrara aŭto. Tiam anstataŭigis min mia edzo Ladislao Pásztor, kiu alten tenante la niakluban esperanto-flagon gvidis la venantojn al la tombeja pieta vizito. Tie mi parolis pri tio, ke sinjoroj Jozefo Lénárt, Barnabo Batta kaj D-ro Ladislao Molnár serĉis la tombon de la patrino de d-ro Kolomano Kalocsay, kion signas granda nigra marmorobelisko prepariigita de mem de la filo, tamen trovi ĝin en la tomebejo estis tasko de la tri esperantistoj. Barnabo Batta eksciis, ke kaŭzo de morto de la patrino Jolán Panda estis la tn. cerboinflamo, kiu tiutempe estis notita kiel mortiga malsano. Ni surtombigis niajn florkronojn, bruligis meĉon, esperantlingve preĝis la Patro Nia-n. Per tiu ago finiĝis la oficiala parto de la programo. Poste ni tagmanĝis en la loka restoracio, kiel gastoj de la urbestraro. Dankojn nianomajn pro ĉi komplezo.

**Mi devas mencii,** ke estis kelkulojj, kiuj pli multe oferis, ol tiuj, kiuj vojaĝis aŭtobuse aŭ trajne. Ja el inter ili du malfrue vekiĝis kaj por atingi la necesan trafikilon ili jam ne sciis. Do: doktoro Ernesto Gaál[ga:l], atingis urbon Abaújszántó per taksio el urbo Szerencs. Sinjoro Jozefo Gulyás (kormalsanulo) vojaĝis permotorbicikle 200 kilometrojn tie-reen por atingi nian feston. Geedzoj Parkánszki [parka:nski] el urbo Miskolc vojaĝis pere de ili luita malsanulojnportanta aŭtomobilo de la Servo Por Movorganaj

Gemalsanuloj en Miskolc. Tiu aŭtomobilo portis la puŝĉaron de s-ino Suzana Parkánski [parka:nski], kiu nenimaniere volis resti hejme en Miskolc. Ŝi, nia amikrondanino partopreni rememori volis ĉi eventon. Mi dankas al ili ilian entuziasmon kaj grandan oferon esti kun ni, por kune partopreni ĉi belan eventon.

Post finiĝo de la programo kun gaja parolado ni pasigis la tempon ĝis nia adiaŭo, kiam ni hejmeniris sed konstatis kiel bela estas la senegoisma agado por la komuna celo; Esperanto.

Bela estas la unueco de la geesperantistoj de nia lando Hungarujo zonitaj kun niaj geamikoj en la mondo.

# Baniĝo

La geedzoj tute interkonsente pri ilia plano por bani, vojaĝis al la eksterurba banloko de urbo Miŝkolc.

Ili jam vizitis tiun lokon pli frue. Jam tre volante vidi kaj la belan montan regionon, kaj la florajn parkojn kaj mem la trakonstruitan grotan banejon ili vojaĝis kun streĉa atendado.

Aĉetis ili la denove plialtigitajn prezajn biletojn kaj eniris sur la teritorion de la grota banejo. La famo vera estis. La tuta banejo estiĝis pli granda, pli bela post la renovigo. Inter la ceteraj estis tre malvarma, krome ankaŭ 68 celsius gradojn havanta varmega banujo, kaj krome pli malvarmaj akvaj basenoj. Kie ili estis, la akvo varmeco estis tre agrabla. La geedzoj plezure baniĝis, ludis unu kun la alia. Ili fartis bone.

Poste la edzo kisetis kaj atentigis la edzinon pri lia deziro por naĝi en la profundan kaj malpli varman akvan basenon. Katarina, la edzino jesis, kaj promesis atendi lin ĉi tie en la tre agrabla banejo. Iru Nikolao, se li volas provi ankaŭ la tiu ĉambran naĝadon. Nikolao foriris. Katarina unue iris al la tn. „masaĝaj duŝoj", kiuj preskaŭ subakvon premas la homojn per fortoj de la subfalantaj akvo - strioj. Pluraj speciaj akvofalegoj funkciis tie. Estis tiu, per kiu oni povis masaĝi kapon, la vertebran kolumnon. Estis krome tiu, per kiu oni povis masaĝi la aliajn partojn de la homa korpo. Krome estis kaj varma, kaj malvarmeta kaj diversaj varmaj akvo-strioj. Katinka (Katrinjo) unue ĝuis tiujn, poste enuis kaj ŝi priesploris por decidi kion faru ŝi poste. Tuj ĉe la groto-muro ripozis kelkaj homoj. Ŝi ne sciante naĝi, volis ripozi ĉe muro de la groto. Super tiu parto de la plafono blankaj stalaktitoj pendis dense, simile al pajloj. Iome pli fore, apud la trairejo en la alian grotan ĉambron, la guto-ŝtonoj similis al aro da grizkoloraj pizoj. Ŝi volis trovi lokon inter la viro de ŝi ŝajne pli maljuna kaj la ripozanta virino apogantaj la groto muron flanke. Sed, alproksimiĝante la grotan muron, ŝi ne bone kalkulis la distancon kaj mispaŝis ĉe la etendigitaj piedoj de la tie ripozanta viro. Pro la atingita neatendita malhelpaĵo ŝi perdis sian ekvilibron kaj falis. Sed ŝi ne nur falis, sed tuj mergiĝis.

Ŝi komencis sufokiĝi, kiam du fortaj manoj eltiris ŝin de la akvo. La helpanto estis tiu viro, ĉe kies piedoj ŝi falis. Katinka dankis la rapidan helpon, provis stari sur siajn piedojn, sed ne sukcesis pro forta tremado. Tial ŝi devis akcepti la fakton, ke la viro unubrake tenas ŝin antaŭ mem. Kun la alia mano li provis forigi la akvan hararon de la virina vizaĝo, ke la akvo ne fluetu en ŝiajn okulojn. Dume la viro trankviligis

sinjorinon Katinka, ĝentile demandante pri ŝia stato. Finfine, sinjorino Katinka sukcesis tiome trankviliĝi, kaj povis ekstari en la akvo, kaj liberiĝi de brakumoj de la fremdulo. Ŝi dankis la helpon kaj aliris la alian flankon de la banejo. Kiam ŝi forlasis la viron, ĝuste tiam ekaperis ŝia edzo en la grota ĉambrego. Tiam revenis Nikolao de la baseno profunda akva, kie li naĝis laŭ sia plaĉo. La edzino tuj raportis pri la okazintaĵo kaj montris la viron, kiu savis sian vivon. La du viroj mansignante salutis unu la alian antaŭ la foriro de la geedzoj.

Ili trairis en alian banujan ĉambron. Tie subakva akvofluo plezurigis la naĝantojn. Ĝi ŝajnigis, kvazaŭ iu mara fluo fortrenus ilin. Sub la multa stela vespera ĉielo iu kosmoŝipo elleviĝis ĝuste tiam de sub la akvonivelo.

Ili volis eniĝi en la veturilon, kiam sentante de ie iom da malvarma aero, Katarina subite vekiĝis. Post la vekiĝo longe ŝi rememoris pri la grota baniĝo kaj la vivsavinto svelta.



**La grotbanejo en Miŝkolc-Tapolca**

# El inter miaj esperantigoj:

## La Arboj Mortis Starante - Fosilia Arbaro De Marĉaj Ciproj En Nordhungario

*Eksterordinaraj fosilioj estas trovitaj en la areo de la subĉiela lignitminejo de Bükkábrány. La ministoj trafis al 15 trunkoj de vivsituacie konservitaj taksodioj (marĉaj ciproj. La gigantaj arboj staris tie, kie ili mortis antaŭ plurmilionoj da jaroj. La sciencistoj devis rapide ekzameni ilin, ĉar la libera areo la arbotrunkoj baldaŭ pereos.*

### La trovaĵo

En la suda antaŭtereno de la montaro Bükk, ĉe vilaĝo Bükkábrány [buek:a:bra:nj], troviĝas unu el la plej grandaj subĉielaj minejoj de Hungario. Oni ekspluatas tie la *ligniton* por la karbo-baza elektrocentralo ekde 1984. En la lignito mem, kaj en la „sterilaj" intertavoloj de la kuŝejo ankaŭ, jam estis trovitaj kunpremitaj trunkoj kaj branĉoj, kaj en Bükkábrány, kaj en Visonta [viŝonta], en la antaŭtereno de la montaro Mátra. Sed en la proksima pasinteco oni trovis dum minado veran raraĵon: vertikale starantajn trunkojn de marĉa cipro! La draŝmaŝino elfosis sur 100x10 metra teritorio entute 15 arbotrunkojn. Ili situas sur la supraĵo de la lignitkuŝejo. Do, supozeble oni povas vidi la lastan epizodon de la vivo de la pra-marĉo.

### 1. La marĉa cipro

La marĉa cipro aŭ taksodio (*Taksodium distichum*) estas arbo apartenanta al la klaso de pinarboj (Coniferae). Nuntempe ĝi vivas en la marĉoj de la Sudorienta regiono de Nordameriko, ekz. en la Everglades de la ŝtato Florido. Ĉiaj helverdaj nagloj vintre defalas. Vivantaj marĉaj ciproj videblas en multaj parkoj kaj arboretoj, ekz. en tiu de Vácrátót [va:cra:to:t]. La marĉa cipro havas „spirradikojn" altiĝantajn super la grundon. Dum la terciara epoko de la terhistorio, precipe en la miocena aĝo, ĝi vivis amase en Eŭropo (Taxodium distichum miocaenicum). El la trunkoj de tiu arbospecio formiĝis grandegaj amasoj da brunkarbo. Estas konataj silikiĝintaj trunkoj de taksodio, ankaŭ en Hungario, ĉe Kazincbarcika kaj Sajókazinc en valo

de la nordhungaria rivero Sajó. Sed 15 starantaj trunkoj de fosiliĝintaj taksodioj estas vere unika trovaĵo.

## 2. Pra-geografia historio

Antaŭ 12 milionoj da jaroj, post la mez-miocena aĝo de la terhistoria novepoko, la maro de la  Karpat-baseno laŭgrade perdis kontakton kun la pra-mediteranea maro. Unue malkreskisis la salenhavo de ĝia akvo, poste estiĝis jam dolĉakva medio. La basenon de la tiel estiĝanta *Panonia lago* paŝo post paŝo plenigis la deltaj sedimentoj de la riveroj alfluantaj de nordo. La lagbordo progresis suden. La delta-ebenaĵo antaŭ ĉ. 8 milionoj da jaroj atingis la teritorion de la nuntempa vilaĝo Bükkábrány. Sur la plata lagborda areo etendiĝis larĝaj marĉoj. El la vivintaj plantoj devenis la grandega amaso de ligneca brunkarbo, la t.n lignit-kuŝejoj. Krom la diversaj pinoj, kverko, fago, platano kaj acero, la plej ofta arbarkreanto estis la taksodio (marĉa cipro).

La trunkojn ĉirkaŭas grizkolora sablo. Tiu t.n. fluanta sablo per siaj spektaklaj sediment-konusoj okupas grandan parton de la teritorio inter la arboj. La supro de la taksodio-trunkoj troviĝas ĉe la limo inter la griza sablo kaj la tiun kovranta flavkolora sablo. La marĉon, kun la arboj, subite kovris la griza sablo; partojn de la trunkoj forigis la erozio. En la flava sablo troveblas malgrandaj pecoj da ligno, sed tiuj kuŝas horizontale.

## 3. Kiel kaj kial konserviĝis la trunkoj?

La restaĵoj de arbotrunkoj estas 4-6 metrojn altaj, kun diametroj ĝis 3 metroj (!)

La jarringoj estas aranĝitaj dense. En iu 80 centimetrojn dika trunko oni kalkulis 400 jarringojn. Do la ligno estas tre kompakta. Pro tio, kaj pro la alta enhavo de rezino la taksodiaj trunkoj  bone rezistis al la fungoj kaj insektoj. Tamen, sur kelkaj oni trovis spurojn de sek-putriĝo. La internon de kelkaj ekzempleroj, plenigis „panonia (dolĉakva) sablo” (dolĉakva sablo) aŭ markazito. La eliĝo de la markazito (sulfido de fero, Fe S2). La  sulfuro verŝajne devenas el la malsupre kuŝantaj marĉaj sedimentoj.

Fosiliĝintaj arbaroj estas konataj el preskaŭ ĉiu epoko de la terhistorio. Sed tiuj estas silikiĝintaj, pro tio ili rezistis al la fizikaj kaj

kemiaj efikoj. Sed en Bükkábrány konserviĝis la originala ligna materialo, sen silikiĝo.

Ĝuste tio kaŭzas la rapidan detruiĝon de la trovitaĵoj. La *celulozo,* kiu igas solida la ĉelparietojn, grandparte malkombiniĝis. Konserviĝis nur la elasta *lignino,* kiu rapide disfalas je multe da mallarĝaj pecetoj. Kiam la ĉirkaŭinta sablo estis forigita, tuj komenciĝis la senakviĝo de la trunkoj, kio akcelas la disfalon.

## 4. Kaj kiel nun?

Antaŭ la kompleta neniiĝo de la taksodio-trunkoj la geologoj faros multajn ekzamenojn en la *Herman, Ottó* Muzeo en urbo Miskolc, kien la trunkoj iĝis transportitaj. Tie oni estas metitaj en malsekan sablon. La ekzamenadojn direktas d-ro Miklós **Kázmér** (Instituto de Paleontologio, Universitato ELTE de Budapeŝto) kaj d-rino Lilla **Hably** (Plantarejo de la Hungara Naturscienca Muzeo, Budapeŝto**).**

## Esplorlaboroj estas:

(1) identigi la diversajn arbospeciojn kaj ties lokon en la sistemo de plantoj,

(2) ekkoni la mekanismon de enteriĝo surbaze de la sedimentologiaj ecoj de la griza sablo,

(3) konstati la aĝon de la arboj kaj,

(4) malkovri la karakterizajn trajtojn de la iama klimato (ekz. alternado de sezonoj) surbaze de la jarringoj.

Pro la esplorlaboroj kaj la minado la trovloko ne estas vizitebla.

(Alfréd Dulai, la 30-an de julio 2007.ORIGO – Tudomány – Wikipédia: Megkövült erdőt találtak Bükkábrány térségében-Kompilis kaj esperantigis sinjorino Adrienne Földi-Pásztor)

# **Klara Domahidi:** La Diablo Ne Dormas

Oĉjo Petro ankoraŭ dormemetis, kiam iun somernokton li ekiris per la ĉaro sur la arbara vojo. La ĉevaloj takte paŝadis en la senstela, fulgonigra nokto. La luno montris sin nur por mallonga tempo, kaj poste tuj rekaŝiĝis malantaŭ la nuboj. Bone konis la ĉevaloj la vojon, ja ili jam multfoje traveturis ĝin. Ili iris kun certeco al la falĉejo, kiu estis ankoraŭ aŭ je 8-9 kilometroj for de la vilaĝo.

Bona pluva somero estis, multa fojno kreskis ĉi-jare, la brutoj ja bezonas ĝin por vintro. Petro falĉis tiel multe dumsomere, ke da ĝi li povis ankaŭ vendi. La fojno staris bele amasigita ĉe la arbarrando. Li volis ankoraŭfoje reveni, antaŭ ol la suno brulos dealte, ĉar pli malfrue jam ne eblos. Tiam tiuj aĉaj tabanoj komencos piki la ĉevalojn, kaj sola li jam ne povos reteni ilin. Ĉar la edzinon li ne kunportos plu! Li tre ekkoleris ŝin. Eĉ ĉe la enlitiĝo ŝi diris:

– Se mi ankoraŭfoje vidos vin, Petro, ebria, tiam mi certe forlasos vin, kaj reiros hejmen en la gepatran domon!

– Ej, do – ej, vi, edzino! Klaĉo-babilaĉo! Mi trinkas ja, vere, sed ankaŭ laboras multe. Mi bezonas ĝin! Punkto – fino!

Tamen, la afero multe ĉagrenis Petron. Kion li farus sen edzino, kvazaŭ li perdus unu brakon. Malgraŭ ĉio li ekiris sola por la fojno, kvankam alifoje ili faris tion kune. Li prenis al si botelon de „goerja" brando, eltrinkis longe, kaj ek! Ĉar tiuj en Gyergyó (Djerdjo: montara regiono en Rumanio) nomas ĉiun „goerja", kiu loĝas trans la montoj. Ankaŭ ĉi tiun bonspecan brandon li aĉetis hieraŭ de „goerjo" en la foiro.

– Kaj ne nur mi, sed ankaŭ Kolomano Sövér aĉetis. Do ni gustumadis, ej do! La dormemo, la frua ellitiĝo, krome ĉi fajna forta brando baldaŭ superfortis lin, kaj Petro ekdormis dum la vojo. La ĉcevaloj atingis la Maroŝ-ponton, tie returniĝis, poste direktiĝis hejmen. Per la timono ili premdifektis la mezon de la granda sikula pordego, kaj stariĝis laŭorde antaŭ la stalo. Onjo Véró elkuris pro la bruo kaj alkriis lin:

– Kio okazis Petro? Kial vi revenis?

Je tio vekiĝis oĉjo Petro, kaj kiam li rekonsciiĝis, en kiu situacio li troviĝas, diris nur:

– Mi lasis hejme la forkegon.

– Ba, ĉu vere! Ĉi tie estas unu, apogita al la stalo – tradonis ĝin la edzino.

Petro enpikis la forkegon en la ĉarflankon kaj tuj returniĝis.

La ĉevalojn kutimigis li al la scienco, ke tiuj mem malfermu la pordegon. Tiel longe li saltigis ilin kontraŭ la pordegon, ĝis ili enpuŝis ĝin per la timono. Onjo Véró hontis sufiĉe pro ĉi tiu aŭtomatigo antaŭ la najbaroj, kiam ili kaŝrigardis, kiumaniere Petro enveturas la korton. Ŝi diris tiam al li:

– Tion vi instruis al ili, ĉar se vi paŝus de sur la ĉaro, vi certe falus pro la multa drinkaĵo!

– Ja, estas vero. Nun unufoje Petro pentis pro la afero, ĉar la ĉevaloj nun ne estus enirintaj sur la korton, kaj nerimarkita li povus returniĝi al la arbaro.

– Sed mi elturniĝas el ĉiu situacio, kaj malgraŭ ĉio la edzino ne ekscios, ke mi misdormis.

Tiel okazis, ke tiutage li eĉ du ferforkegojn kunportis. Kaj ekstere, sur la vojo li denove tiris iom el la brandujo, iom da spirvarmigaĵo. Nun li sentis pleje ties neceson. Poste li plu grumblis sur la ĉaro:

– Ke mi altiras malbonon!? Ke ĉiufoje, kiam mi drinkas, okazas io! Ĉu mi iel kulpas, ke mia baptano volis iri Paske en preĝejon? Kaj estis tie nur unu loko, kie li tiam sidiĝis? Ĉu sidiĝis? Sidfalis! Kaj tuj ekdormis, kiel la marmoto. Nu kaj krome tiu pastro!? Se nur ne estus tie ankaŭ aliuloj el Ĉomafalva! Neniam iu sciiĝus pri tio hejme! Kion umadis ĝuste tiam kaj tie Jozefo Benedek kaj la liaj? Krome mi bele hejmenvenis bicikle, kiel decas. Nur hejme mi falis kontraŭ la barilon. Estas neeble, ke iu povis vidi min! Prefere mi estus obeinta tiam la edzinon, kaj ne transirinta priŝpruci mian baptofilinon en Újfalu! Ĉar ja kun la baptano ni bone tralavis nian gorĝon. Delonge ni ne vidis unu la alian, kaj krome estis festo. Ĝuste mi volis hejmeniri, kiam oni sonorigis. Insiste instigis min la baptano, ke ankaŭ ni iru en la preĝejon, kiel aliaj. Sed jam nur unu loko estis, en la unua vico. La baptano tuj falsidiĝis tie. Kaj mi estis devigata suprenbalanciĝi sur la balkonon. Mi atentis la predikon, kiel konvenas. Nur la baptano! Tiu mallaŭte ronkis malsupre. Vane mi ektusis kelkfoje, li ne malfermis la okulojn. Sed foje la pastro altigis la voĉon, kaj tiel meditis:

– Kiu estas supre? – kaj eĉ la manon levis, ĝuste al mi! Eĉ la montrofingron li tenis oblikve al mi. Je tio vekiĝis Pongrac, kaj tre laŭte ekparolis:

– Tiu estas mia baptano el Ĉomafalva!

– Kiu kreis la ĉielon kaj la teron… – daŭrigis jene la pastro. Je tio la baptano diris nur tion:

– Do tiu ne estas li! Mi ja bone konas lin! – kaj li jam dormis plu.

Je tio estiĝis granda murmurado en la tuta preĝejo. Troviĝis eĉ tiaj, kiuj hi-hi-his kaj ha-ha-his. Sed ja okazis, kio okazis… Se nur oni ne portus hejmen la famon al la edzino! Ke fritiĝu en infero tiu Amalia! Ŝi rakontis ĉion al Véró (Veronika), post la festo. Ankaŭ tiam la edzino hejmenkuris al siaj gepatroj. Ĉar ŝi diris, ke mi estas senhonta. Mi postiris ŝin nur post tri tagoj. Mi enrompis la pordon pro ŝi. Kial ŝi ne lasis min eniri!? Vane mi diris al ŝi:

– Komprenu, edzino, mi ne kulpas! – poste ŝi tamen pardonis min, sed deklaris, ke ĉi tio estis la lasta. Ĉar alie ŝi foriros tiel, ke neniam plu ŝi revenos. Hej, tiaj estas la virinoj! Sed, kion ŝi farus sen mi… Nu, nun mi rebonigos la aferon kaj hejmenportos la fojnon, kaj la lasas edzinon pripensi la aferon. Sed se ne, mi progresos ankaŭ sola! Kio estas ŝi, mi timas nek la diablon! Mi timis neniam, eĉ ne dum mia fraŭlaĝo! Ej, nek nun mi ektimas, nek tiam mi timus, se ni renkontiĝus! Foje mi forpelis eĉ urson. Mi estis apenaŭ dudekjara tiam. Kun Karĉi (Karleto) ni iris haki arbon en la arbaron. Ni ĉiam pli eniĝis en la arbaron sur vojeto, kiam urso ekstaris antaŭ ni kun levitaj antaŭpiedoj. Tre granda animalo estis tiu! Ni eĉ ne havis tempon, por pensi, tiel abrupte okazis la tuto. Tre proksime estis la bestio. Tra mia ŝultro mi rediris al Karĉi Borŝoŝ:

– Ni estas du, ĝi sola!- je tio preminte la hakilon en la mano mi saltis tuj kontraŭ la urson.

– Batu ĝin, Karĉi!

– Tranĉu ĝin, Karĉi! Iru deflanke!

– Celu ĝian kapon!

Mi donadis la frapojn deproksime, tiel mi batalis, ke la grandega urso forkuregis vundita en la densejon.

– Bone, Karĉi! – kaj tiam mi rigardis malantaŭen, sed Karĉi estis nenie. Malaperis, kiel vaporo. Tuj ĝis hejmo li forkuris, kiam li ekvidis la urson. Kvankam la vilaĝo estis je dekdu kilometroj for. Nu, tia fraŭlo estis Karĉi!

En la malhelo dum la longa vojo, oĉjo Petro reveme meditadis pri sia forpasinta juneco. Li, havis tempon por pensadi, la falĉejo ankoraŭ estis malproksime. Krome li povis diri nek unu vorton al iu ajn. Neatendite unu ĉevalo ekronkis kaj haltis. Petro lumigis per la lampo en la vojapudan foson. Tiam li vidis, ke tie vulpo ĉasas muson. Ĝi tre fervoriĝis, kiel kato ĝi saltis post la muson.

– Hot, ci Ciklono! Hot ci malkuraĝa! Ĉu ci timiĝis? Videblas, ke ci estas ankoraŭ juna! Ja, cia patrino Ŝtormo! Ŝi unua estas inter la ĉevaloj! Do, hot!

Ili iradis plu, kaj Petro ekmemoris, kiam la unuan ĉevalon, Ŝtormon li aĉetis. Li sekretis lian intencon eĉ antaŭ la edzino. Poste li hejmeniris kun la admirinde bela ĉevalo.

– Nu, edzino – jen ĉi tie estas Ŝtormo!

– Enportu la vestaĵojn per la korbo! Mi fermos la fenestron! – diris onjo Véró [Veronika] el la kuirejo eksteren.

– La Ŝtormo estas jam en la stalo! - stentoris oĉjo Petro. Tiam onjo Véró elkuris konsterniĝante.

– Ĉu vi ebrias? Ĉu vi drinkis denove? Bona ĝi estas, por malutilo, ĉu? – ŝi enrigardis la stalon, kaj jen, tie estis unu ĉevalo. Dum minuto ili rigardis unu la alian.

– Kies estas ĉi tiu ĉevalo?

– Ekde nun la nia. Per ĝi mi de nun perlaboros! Ĝia nomo estas Ŝtormo.

Onjo Véró ne ĝojis pri la ĉevalo, ĉiam forgesis ĝian nomon, ŝi diris:

– Ĝi estas Ventego! Aŭ Venteto, Fulmo aŭ Uragano!

Nu, oĉjo Petro tial donis la nomon Ventego al ido de Ŝtormo. De kiam Ventego iĝis similgranda al Ŝtormo, ili kune iris al la vilaĝo, arbaro, kampo.

– Fortikaj estas ĉi tiuj ĉevaloj, certe! Kun ili mi ne restas en honto! Mi ne povas tiome ŝarĝi la ĉaron per pintrunkoj, ke ili ne povus tiri ĝin! – li pensis.

– Nu vidu! Ni estas jam ĉe la sepa ŝtono. Ĉi tie ni devojiĝos maldekstren, ni jam devos ne multe iri. Nur ne estus tiom malhele! Kaj la luno apenaŭ lumas!

La hufoferoj sur la ĉevaloj kelkfoje eĉ fajreris sur la ŝtonoj, kiam oĉjo Petro frapetis ilin per la vipo. Li agis nur laŭkutime. Poste baldaŭ ili alvenis la fojnoamasoj. Apud la plej proksime staranta stako li haltigis la ĉaron, kaj eklaboris. Kelkfoje li devis ankaŭ grimpi sur la ĉaron, por ordigi la fojnon. Tiufoje la ĉevaloj emus ekiri, kaj tiel multe ili agitiĝis, ke fine li maljungis ilin el la ĉaro. Per ĉeno li kunligis kaj lasis paŝtiĝi ilin. Li faris sian farendon, kiel kutime. Alifoje li vokis helpe ankaŭ la najbaron, sed hodiaŭ lia koro ne lasis lin, veki lin. Li elturniĝos ankaŭ sola!

La ĉevaloj neatendite eksaltis! Leporo suprensaltis antaŭ Ventego, aŭ eble sciuro de sur la proksima pinarbo, Petro ne sciis certe. Ventego

ekronkis, kaj samtempe ili ĵetis sin en senbrida galopo. Unue arbardirekton, poste farante ĉirkaŭvojon ili malaperis en la malhelo. Petro ekfajfis, vokis ilin reen, sed vane. Ili panikiĝis. Nur la ĉentinto aŭdiĝis dum iom da tempo. Li ekiris reen sur la vojo al la vilaĝo. Ĉu ili ne haltos ĝis hejmo?

– Iel ja mi kaptos ilin vilaĝorande ĉe la riverponto de Maroŝ. Nur ke ili ne kuru ĝishejme! Tiam kolerus min la edzino!

Tri-kvar kilometrojn li marŝis, preskaŭ kuris, kiam li rimarkis ilin. Ili amblis sur la vojo.

– Ci Ŝtormo! Venu ci ĉi-tien! – li ekprenis la ĉenon, kaj kondukis ilin reen al la stakoj. Tie li jungis ilin antaŭ la ĉaron, ordigis iom la fojnon, kaj ekiris per la plenŝarĝita ĉaro al sia hejmo. Hejme ankaŭ la edzino helpis ĉe la malŝarĝado.

– Do, bone! Eble paciĝos mia karulino! – pensis li.

Urĝigis lin la tempo, li rapidis reen, por povi returniĝi, antaŭ ol la varmo ekatakos lin. Li jam eliris el la vilaĝo, kiam li ekvidis la sunon antaŭeniĝi el la kovro de la montoj. La malklaraj, misterecaj figuroj alprenis decidajn konturojn. Malfermiĝis la pejzaĝo, kiel pomarba floro malvolvanta siajn petalojn. Jam videbliĝis la vojapudaj prunelarbustoj, la bordon ĉirkaŭbrakumantaj salikoj, kaj sur la akvospegulo ekbriletis la suno. Ekviglis la birdomondo, per laŭta pepado salutis la aŭroron. De barilo de iu forlasita, soleca, kaduka garbejo cikonioj ekflugis dise, timiĝis pro bruo de la ĉaro. Vaste cirkulante ili serĉis sian matenmanĝon. Pli fore haltis kelkaj kapreoloj scivoleme; kiu ĝenas ilian matenan trankvilon. Ĉar ili ne sentis danĝeron, malrapideme ili paŝtiĝis plu. En la freŝa, verda herbo daŭrigis sian vojon la etaj formikoj, insektoj, ekflugadis buntaj papilioj, ekiris abeloj, por kolekti nektaron. Ĉiu animalo faris sian farendon, kiel estas kutime dum tiel bela somermatenp. Petro forgesis ĉiujn grumblojn, ĉagrenajn pensojn. La malhelaj konturoj de la pinarbaro, la pura bluo de la ĉielo trankviligis lin. La matena vaporo malrapide disiĝis, samkiel el li la malgajo. Kiu loĝas en tiel bela regiono, ne havas kaŭzon por malgaji. Freŝe, energiplene li atingis la monton Nagysomlyó [nadjŝomjo]. Li vidas, ke iu viro kaj virino lavas ĝuste en la riveretakvo. Alproksimiĝante li rekonis la gekonatojn Aloĵi kun edzino el Alszeg [alseg]. Salutis ilin kiel decas ĉi-regione:

– Donu Dio bonan laboron! Ĉu ne estas frue por lavi? Ankoraŭ malvarmas la rivereto, apenaŭ leviĝis la suno.

Je tio la sinjorino ek-vediradis:

– Ho ve, ne demandu, Petro! Vi ne kredos, kio okazis! Jam tri tagojn ni estas ĉi tie sur la falĉejo, turnadas la fojnon, kolektas ĝin, por hejmenporti. Estas multa farendo, ni restis ankaŭ por tranokti. Ni kunmetis al ni kabaneton el fojno. Bonan lokon ni havis por ni ambaŭ sub ĝi, kuntiriĝante kun mia edzo. Vidu, tie ĝi estas!

– Nu, kio postrestis el ĝi! – transprenis la edzo la vorton.

Dum la tuta tago ni laboris, je malheliĝo ni vespermanĝis. Tute laciĝinte ni enrampis en la kabaneton, kaj dormis, kiel peltmantelo somere.

Poste nokte ĵetis sin sur nin la ĉenhava diablo!!

– Li tintigis, klakigis kaj faris teruran bruegon, kaj eĉ la supron de la kabaneto ĝi depuŝis! Kaj dume li ridis!

– Eĉ la okuloj fajreris al li! Ni tiel timis, ke ĝis tagiĝo ni ne kuraĝis eĉ moveti nin.

Daŭre ni kaŝrigardis, ĉu li revenos, kaj kion li volas de ni.

– Jes ja, li kirlis tian ŝtormon kaj ventegon, ke ankaŭ ni preskaŭ forflugis!

– Sed ni jam iros hejmen! Ni ne volas plu renkonti lin! Certas, ke dimanĉe ni celebrigos meson. Nur li lasu nin de nun en paco, kaj forgesu nin!

– Kaj kio fariĝos al la fojno? – demandis Petro.

– Nin eĉ ĝi ne interesas! Nia vivo pli valoras! Nur sekiĝu ankoraŭ iomete ĉi tiu tolaĵo… – kaj tiam la virino honteme eksilentis.

– Ni tuj ekiros!

Petro preskaŭ sufokiĝis pro ridemo. Apenaŭ li povis reteni sin. Li ne kuraĝis konfesi, ke la ĉenhava diablo estis liaj sovaĝiĝintaj bestoj. Li nur ruzete ridetis sub la lipharoj.

– Kaj ĉu kornojn havis tiu inferulo?

– Tion ni ne povis vidi en la malhelo. Sed certe li havis. Pli teruran nokton ni ankoraŭ ne havis.

– Do trankviliĝu! – li diris, kaj kun la botelo da brando enmane desaltis de la ĉaro.

– Bonvolu preni iom da korfortigaĵo, ĝi efikos bone! – li tre atentis resti serioza. Li bezonis ĉiun sian forton, por ne ekridi.

– Dio benu vin! Kaj alifoje pli atentu! Vi sicas, la diablo ne dormas!

Sidiĝinte sur la ĉarbenko, li alfrapetis la ĉevalojn.

– Hot, Ŝtormo! Hot ci, Ventego! – poste mallaŭte li aldiris:

Vi ĉenhavaj diabloj! Veraj inferanoj!

# Tartalomjegyzék

Antaŭparolo ....................................................................6
Eta Damo ........................................................................9
Sako De Vintra Avo ......................................................11
La Vaganta Kaprino........................................................12
La Similulino ................................................................14
Kata Ĝojo, Kata Malgajeco ...........................................15
Danco de Feinoj.............................................................19
Kristnaskoj .....................................................................23
Fino Bona, Ĉio Bona......................................................28
Ĉe Tombmonumento De D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof
.......................................................................................35
Se, la Malsato Turmentas ..............................................38
Castro kaj Kristo.............................................................40
Ranreĝido ......................................................................43
De Buŝo Al Buŝo............................................................47
Panoptiko.......................................................................50
La Misio .........................................................................54
Ermito Nia-epoka...........................................................58
La hamstro kaj Dio la Ĉiopova .....................................62
La Perdita Mono.............................................................64
Ekskurso en Okcidenta Slovakio .................................67
Slovaka Bet-Leĥemo en Rajecká Lesná .......................69
Tutmondaj Defioj de la Klimatoŝanĝiĝo .....................73
1. KONFUZIĜINTAJ SEZONOJ ...................................73
2. AKVO KAJ ALIAJ DAMAĜOJ ................................74
4. KLIMATŜANĜIĜOJ EN LA PASINTO DE LA TERO......75
5. ĈEFAJ FAKTOROJ DE LA KLIMATO.....................76
6. SAMTEMPE PLURSPECA KLIMATO......................76
7. SCIENCA PROGNOZO KAJ POPOLAJ ANTAŬDIROJ PRI VETERO..........................................................................78

8. KIO ESTAS PRUVITA – KAJ KIO NE ESTAS .....................78
9. LA 11 KAJ 22 JARA CIKLOJ DE SUNAKTIVADO............79
10. LA TEORIO DE MILANKOVIĆ-BACSÁK [milankoviĉ-baĉak] ..........................................................................80
11. KARDINALA ROLO DE LA CIRKULADO DE KARBONO ..........................................................................80
DEFLANKIĜO ..........................................................................81
12. NEĜOLIMO KAJ GLAĈEROJ ..........................................82
13. LA NATURAJ, KAJ DE LA HOMO KAŬZATAJ AERPOLUCIOJ ..........................................................................84
14. INTERNACIAJ KONTRAKTOJ........................................85
15. NATURO KAJ MEDIOPROTEKTADO ............................86
16. RESPONDECO KAJ EBLECO...........................................86
La Suno, Luno kaj la Steloj ..................................................88
La rozpetalo...........................................................................93
La Ripozo...............................................................................99
Sinjoro Herman, Ottó Kaj La Praa Popola Fiŝkaptado .....100
La Stelo Kaj La Sovaĝfloro ................................................102
La Ĝustatempa Helpo Valoras Oron..................................103
Miskono ...............................................................................106
Neĝulineto...........................................................................107
La Ludo................................................................................108
La Fidela Eta Apro ..............................................................109
Ĉu Nur Unu Minuto Estas la Vivo? .................................110
La Sep Makula Katica Skarabo .........................................113
Rozbukedo...........................................................................115
Ekzemplo Pri Humaneco ...................................................119
Norda Lumo en Norda Hungarujo ...................................121
Blondulino ...........................................................................122
Avo .......................................................................................131
Ombro en lumo ...................................................................133
Origine verkita en Esperanto .............................................133

UNUA AKTO....................134
Unua bildo....................134
Dua bildo....................137
Tria bildo....................138
DUA AKTO....................139
Unua bildo....................139
Tria bildo....................142
Kvara bildo....................143
Unua bildo....................144
Dua bildo....................146
Tria bildo....................148
Letero Al Kreinto De Esperanto....................152
Saluton, Altestimata Sinjoro Zamenhof!....................152
La Homo Timegata....................154
La skribilujo....................157
Antaŭ 120 Jaroj Naskiĝis Doktoro Kálmán Kalocsay!....................159
Baniĝo....................163
El inter miaj esperantigoj:....................165
La Arboj Mortis Starante - Fosilia Arbaro De Marĉaj Ciproj En Nordhungario....................165
La trovaĵo....................165
1. La marĉa cipro....................165
2. Pra-geografia historio....................166
3. Kiel kaj kial konserviĝis la trunkoj?....................166
4. Kaj kiel nun?....................167
Esplorlaboroj estas:....................167
Klara Domahidi: La Diablo Ne Dormas....................168

**Aŭtoro**
Adrienne Földi sinjorino Pásztor

**Eldonejo**
József Bakos
Székesfehérvár
Holnap Magazin
E–mail: holnapmagazin@gmail.com
www.holnapmagazin.hu

**Nyomdai munkálatok**
Könyvműhely Nyomda, Miskolc
Megjelent 27,4 A/5 ív terjedelemben,
178 oldalon

**Presejaj laboroj ĉe:**
Presejo: Könyvműhely, Miŝkolc
Aperis en 27,4 A/5 arka amplekso,
sur 178 paĝoj

**Respondeca redaktoro**
József Bakos

**Reviziis /Lektorálta/**
István Tamás

**Kovrilbildo /Borítókép/**
Adrienne Földi sinjorino Pásztor

**Kovrilbildo planita de: /Borítóterv/**
Holnap Magazin

**Ĉiuj rajtoj rezervitaj!**
© Adrienne Földi sinjorino Pásztor 2012
© Holnap Magazin 2012